

MARIE WALEWSKA

*La sekreta amo de
Napoleono Bonaparte*

Historia romano

de

Octave Aubry

Tradukita el la Franca

de

Pieter Jan Doumen

Klarigaj notoj

Pro la multaj historiaj detaloj, kiujn la leganto renkontos en tiu ĉi historia romano sen ia ajn klarigo, mi sekvigas ĉi-sube mallongan historion de la vivo de la Franca imperiestro Napoleono kaj la historion de Pollando.

a. Napoleono Bonaparte

Napoleono Bonaparte naskiĝis en Ajaccio, ĉefurbo de Korsiko, la 15.08.1796 kiel dua filo de Carlo Buonaparte kaj Laetitia Ramolino. Ĉar Genovo vendis la insulon al Francio en 1768, li naskiĝis kiel Franco.

Lia patro estis advokato kaj apartenis al la eta provinca nobelaro. Li havis kvar fratojn : Joseph, kiu estis pli aĝa ol li, Lucien, Louis, kaj Jérôme, kaj du fratinojn : Pauline kaj Caroline.

En 1779 la patro sendis la du plej aĝajn filojn, Joseph kaj Napoleonon, al Francio, kie Napoleono ricevis stipendion por la gimnazio de Autun kaj poste lokon en la militista lernejo de Brienne, kie li brilis en matematiko. En 1785 li fariĝis dua artileria leŭtenanto kaj estis sendita al la garnizono de Valence.

Kiam lia patro mortis, la familio translokiĝis al Marseille, kie la patrino provis zorgi pri sia

granda familio kiel lavistino, dum Napoleono ŝarĝis sin per la edukado de siaj pli junaj fratoj.

Post la Franca revolucio de 1789 li estis promociita al kapitano. Politike orientita kiel jakobeno li estis sendita kiel artileriisto al la havenurbo Tulono. Danke al lia interveno de artileriisto Tulono estis liberigita de la Angloj.

En 1794 li fariĝis brigadogeneralo. En la aŭtuno de 1795 li denove distingis sin subpremante rojalistan ribelon en Parizo. En 1796 li edziĝis al Joséphine Tascher de la Pagerie, la vidvino de generalo de Beauharnais, kiu estis gilotinita dum la Teroro (1793-1794). En la sama jaro Barras, ĉefo de la direktorio, nomumis lin ĉefkomandanto de la suda armeo, kun kiu li invadis Italion.

Liaj rapidaj sukcesoj kontraŭ Aŭstrio decidis lin invadi la Aŭstrajn Alpoj, post kio li konkludis pacon kun Aŭstrio, kiu devis cedi al Francio Belgion kaj Nord-Italio, escepte de Venecio.

En 1797 li entreprenis militiron en Egipto kontraŭ Anglio. Sed la Angla admiralo Nelson neniiĝis lian ŝiparon en Abukir. Li tamen sukcesis reveni en Francio, kie li estis akceptita kiel nacia heroo.

Ĉar Francio troviĝis sur la rando de bank-rot, Napoleono kaj lia frato Lucien, prezidanto de la Nacia Asembleo, plenumis ŝtat-renverson en 1799. Ili estis helpitaj de Murat, kiu per siaj trupoj devigis la Asembleon aprobi ĝin. Sekve de tio li fariĝis Unua Konsulo de la Respubliko, sed li fakte estis aŭtokrato. En mallonga tempo li sukcesis restaŭri la ordon kaj la ekonomion en la lando. En 1802 li fariĝis konsulo por la tuta vivo kaj en 1804 imperiestro de la Francoj.

Post la batalo apud Austerlitz en 1805, en kiu lia venkis Aŭstrion kaj Rusion, li devigis la Habsburgan imperiestron rezigni pri la titolo imperiestro de la Sankta Romia Imperio Germanio kaj aneksis la nunan Germanion.

Ĉar lia geedzeco kun Joséphine de Beauharnais restis seninfana, kaj naskiĝis infano el lia amrilato kun la Polino Marie Walewska, li igis nuligi sian geedzecon kaj reedziĝis en 1810 al arĥidukino Marie-Louise de Aŭstrio, el kiu geedzeco naskiĝis filo.

Per lia Kontinenta Sistemo, per kiu li malpermesis al la kontinento komerci kun la Angloj, li preskaŭ ruinigis Anglion. Ĉar Rusio nur malbone aplikis la sistemon, li kondukis en aŭtuno 1812 la Grandan Armeon al Rusio, kie li perdis ĝin. Post kelkaj venkoj en Germanio, li tamen sukcesis eskapi al totala malvenko apud Leipzig (1813). Li retiriĝis al Francio, sed trovis

sian ĉefurbon okupita de siaj mal-amikoj. Li abdikis la 13.03.1814 kaj estis ekzilita al la insuleto Elba, de kie li eskapis en marto 1815. La trupoj senditaj por aresti lin, transiris al lia flanko, kaj li triumfe revenis al Parizo. Sed apud Waterloo li estis definitive venkita de la aliancanoj (21.06.1815) kaj ekzilita al insulo Sankta-Helena, kie li mortis en 1821.

En 1840 lia korpo estis transportita al Parizo, kie li ripozas nun en la Dôme des Invalides.

Liaj gefratoj :

Joseph (1768-1844), estis advokato, edziĝis al Julie Clary kaj estis reĝo de Napolo (1806-1808) kaj poste de Hispanio (1808-1812). En 1815 li elmigris al Usono, setlis poste en Londono (1832) kaj fine en Florenco (1841). La fratino de sia edzino, Désirée Clary, edziniĝis al marŝalo Bernadotte, kiu poste fariĝis reĝo de Svedio.

Lucien (1775-1840), edziĝis al sia amatino. Napoleono volis, ke li divorcu kaj edziĝu al la reĝino de Etrurio, kion li rifuzis. Tio kaŭzis rompon inter la du fratoj.

Louis Napoléon (1778-1846) estis devigita de lia frato edziĝi al ties vicfilino Hortense de Beauharnais kaj estis la unua reĝo de Holando (1806-1810). Ĉar li prizorgis tro bone la interesojn de Holando, li estis revokita kaj la lando aneksita.

Pauline (1780-1825) edziniĝis al generalo Leclerc, kiun ŝi trompis kaj divorcis. Ŝi reedziniĝis al princo Camillo Borghese. Ŝi akompanis Napoleonon en 1814 al Elba.

Caroline (1782-1839) edziniĝis en 1800 al Jérôme Murat, kiu fariĝis reĝo de Napolo.

Jérôme (1784-1860) edziniĝis al Usonanino, sed divorcis ŝin laŭ ordono de Napoleono kaj reedziniĝis al Catharina de Würtemberg. En 1808 li fariĝis reĝo de Westfalio.

b. Pollando

Ĝis 1618 Pollando estis la plej grava lando en orienta Eŭropo. Ĝi enhavis Litovion, Belorusion kaj grandajn partojn de la nunaj Rusio, Ukrainio kaj Germanio.

Unuflanke Prusio kaj Aŭstrio kaj aliflanke Rusio militis kontraŭ ĝi. Sekve de tio la lando estis trifoje partigita. En 1772 kaj en 1793 Prusio, Rusio kaj Aŭstrio aneksis grandan parton de Pollando. En 1794 eksplodis ribelo sub Kosciusko kontraŭ la Rusoj. Kiam en 1795 la Poloj estis venkitaj, ankaŭ la resto de ilia lando

estis dividita. La plej grandan parton de la lando ricevis Rusio : pli ol la duonon.

En 1797 generalo Dombrowski formis Polan legion, kiu batalis en Italio ĉe la flanko de la Francoj kontraŭ la Aŭstrojn. Post la paco de 1801 la legio estis disirigita, post kio multaj Polaj elmigrantoj translokiĝis al la Rusa parto, ĉar Prusio kaj Aŭstrio forigis ĉiujn lokajn administraciojn, dum la Rusoj lasis ilin plu ekzisti.

En 1802 la Pola princo Czartoryski fariĝis ministro pri eksterlandaj aferoj en Rusio. Caro Aleksandro I kaj li eĉ projektis restaŭri la sendependecon de Pollando, sed en 1805 la caro rezignis pri tiu plano kaj demisiis Czartorysky. Denove la plej multaj Polaj patriotoj metis sian esperon sur Napoleonon, kaj ĉi-foje ne tute vane. Laŭ la traktato de Tilsit (1807) inter Napoleono kaj caro Alexander I Prusio devis cedi siajn Polajn regionojn kaj estis formita la grandduklando Varsovio. En 1809 la lando estis pligrandigita per Lublin kaj okcidenta Gallicio, kiun Aŭstrio devis cedi. Tiu politiko tre plaĉis al la Poloj. En la militiro de Napoleono al Rusio partoprenis 100.000 Poloj.

Post la malvenko de Napoleono apud Waterloo, Pollando fariĝis disputobjekto dum la Konferenco de Vieno. Caro Aleksandro volis grandparte restaŭri la Polan reĝejon, sed sub sia propra scepro, kion forte kontraŭstaris Anglio kaj Aŭstrio. Tial la granddukejo Varsovio, pligrandigita per la Pola provinco de Rusio, fariĝis reĝejo sub la caro kiel monarĥo. La lando ricevis konstitucion (verkita de Czartoryski) kaj proprajn parlamenton kaj armeon.

Nikolao I, frato kaj sukcedinto de Aleksandro, bruskis la Polojn, ĉefe per lia malobservado de la konstitucio. Kiam en 1830 li planis interveni en la Franca kaj Belga ribeloj, kiuj kontraŭis la Vienan Konferencon, tio kaŭzis ribelon en Pollando, kiu estis subpremita en 1831 post furiozaj bataloj.

Pollando estis grave punita. Pluraj ĉefoj estis pendumitaj aŭ ekzilitaj. La universitato de Wilna estis fermita kaj la lokaj administracioj anstataŭigitaj per Rusoj. Pollando perdis sian parlamenton kaj armeon kaj la Rusa fariĝis la oficiala lingvo.

(Enciklopedio 'Oosthoek' 1963)

*
* *

Marie Walewska

I. En la rondo de la imperiestrino

«Lia Ekscelenco Sinjoro Fouché, ministro de la polico ! »

La bruoj de la voĉoj malkreskas kaj ĉiuj okuloj direktiĝas al la plej malamata, mal-glorata kaj timata konsilisto de Napoleono. Li eniras kaj, modesta en sia belegaj vestaĵoj de skarlata veluro, ŝajne glitante sur la pargeto, kliniĝas antaŭ Joséphine.

La imperiestrino, kiu ludas triktrakon kun Cambacérès, duone levas la kapon. Kutime la plej afabla kaj plej gastama virino, ŝi diras nenian vorton. Vestita kun eskvizita lukso kaj ornamita per floroj kaj perloj en siaj kaŝtane brunaj haroj, vestita per blanka robo brodita per oro, ekstreme dekoltita kaj ŝminkita, ŝi similas al senmova diino... Fouché rapide levas la fruntan, ĵetas ĉirkaŭ sin senĝenan, ekzamenan rigardon, kaj, salutinte la cere-moniestron Camba-cérès, paŝas rekte al la alia flanko de la salono, kie tronas la malamikoj de la imperiestrino, la Bonapart-oj.

Joséphine, antaŭe la konfidenculino, eĉ la amikino de la ministro de la polico, ne plu parolas al li ekde tiu tago en Fontainebleau antaŭ tri monatoj, kiam li kuraĝis, sen ke Napoleono sciis tion, paroli al lia edzino pri la neceseco divorci de ŝia edzo. Malgraŭ la riproĉoj de Napoleono, sed subtenata de ties familio, li ne malarmiĝis, sed persistis. En la Parizaj salonoj, en la gazetoj li senĉese revenigas la dolorigan temon, tiel ke Napoleono fine estas obsedita kaj ke en tio li vidas kvazaŭ eĥon de la volo de la popolo, kiu postulas heredonton de la Imperio kaj ne plu atendas tion de virino de pli ol kvardek kvin jaroj.

Aŭtomate la imperiestrino daŭrigas la ludon, kaj la konversacioj repreniĝas, dum Fouché multobligas siajn sekajn provojn trovi gracon ĉe sinjorino Laetitia, la patrino de la imperiestro, kardinalo Fesch, kaj Caroline Murat, kiu ankoraŭ hieraŭ estis simple sinjorino Bonaparte, kaj hodiaŭ rajtas nomi sin reĝino de Napolo. Pauline, la princino Borghese ne estas tie. Ŝi devas veni, sed kiel kutime la ĉarma fratino de Napoleono malfruas. Ĉi-vespere tiu malfrueco havas konatan kaŭzon, kaj ĉiuj virinoj en la Tuilerioj mallaŭte parolas pri tio, rigardante la imperiestrion.

«Mi timas, Via Alteco, » murmuris Fouché, klinita al Caroline, «ke la Imperiestro ne atendigas sin pli longe. Li venigis Clarke, kaj cetere ankaŭ venis novaĵoj el Hispanio. »

«Tre bone, » ridante diris Fontanes, la prezidanto de la leĝdona kunveno, «mi komprenas, ke ni devas denove prononci paroladojn, kaj ke la guberniestro de Parizo, » li aldiris al sia najbarino, la edzino de generalo Junot, «povos meti novajn flagojn sub la volbojn de la Invalidoj. »

«Kion do vi pensas, mia kara ? » vigle demandas Fouché. «La Imperiestro ne pensas pri nova milito en Hispanio. Mi havas miajn informojn pri tio... »

«Kaj mi havas la miajn, » interrompas lin Talleyrand, la ministro pri eksterlandaj aferoj, alte levante sian vizaĝon kun la kuspita nazo. «Mi forte eraras, se ni ne vidos grandajn ŝanĝojn trans la Pirineoj. »

«Mi kredas la princon, » diras Caroline, gracie turnante sin al Talleyrand, kies influon ŝi alte taksas. « Se mi estus la Imperiestro, mi ne plu suferus la perfidojn de la Burbonoj, kiuj malhonorigas sian tronon ! »

Ekde kelkaj monatoj ŝi ofte pensas pri tiu trono, kredante, ke ŝia edzo Murat, tiu admirinda kavaliro en siaj ekstremanaj kostumoj, kaj precipe ŝi mem, fratino de la cezaro, sidante sur tiu trono, faros la plej bonan impreson.

«Diru nenion pli pri tio, Via Alteco, » frustras Fouché, ŝajnigante timon. «Jen Lia Imperiestra Moŝto kaj la reĝino de Holando. Tiaj eldiroj ŝokus ŝin. Ŝi restis rojalistino. »

Caroline aroge ekridegas.

«Hortense! Nu, ŝi ne okupiĝu pri politiko, sed prefere pri sia mastrumado, kiu iras mal-bone! Ŝi devus esti en Hago. Kion ŝi faras ĉi tie kun sia pala vizaĝo kaj sia digna mieno ? Rojalistino ŝi ja estas, sed tamen malpli ol ŝia patrino. Joséphine havas la Burbonojn en sia koro. Barras riproĉis tion al ŝi. Se Napoleono estus aŭdinta ŝin, li estus vokinta ŝin al Francio! Danke al Dio, ŝi neniam havis influon escepte por stultaĵoj. Kaj nun ŝi eĉ ne plu kuraĝas peti pri ion : la Imperiestro malpermesis al ŝi okupiĝi pri ŝtataferoj. »

Caroline parolas preskaŭ laŭte. Ŝi estas tre orgojla, aŭdaca kaj ruza, kaj neniam pardonis al

tiu Beauharnais¹, ke ŝi devancis ŝin, ke ŝi estis reĝino, dum ŝi mem ricevis nur tiun etan dukejon Berg, kie ŝi ne povas dece rezidi... Vestita per strikta robo el pajlakolora sateno, brodita de oraj brilafetoj, portante diademon sur siaj belaj, brunaj haroj, kun ŝia viveca haŭtkoloro kaj ŝia abunda brusto, ŝi similas al belega, sed timenda demono.

Reĝino Hortense, kiu alproksimiĝas ĉe la brako de marŝalino² Ney, ŝia amikino de juneco, verŝajne aŭdas kelkajn el tiuj ofendaj vortoj. Farante paŝon flanken, ŝi alparolas la principon de Neuchâtel por doni al si sintenon. Grava, dolĉa muziko komencas aŭdiĝi el najbara salono. Estas la violonoj de la orkestro de la imperiestrino, kiuj ludas *Griselda* de Paër. Tiam bela vira voĉo aŭdiĝas en harmonio kun la kordoj. Estas tiu de Crescentini, la plej bona kantisto de Italio. Komence la babiladoj ĉesas, sed tiam, ĉar la Imperiestro ankoraŭ ne ĉeestas, ilia brueto denove plifortiĝas. Joséphine, distra, tamen aŭskultas la muzikon. Ŝi ŝajnas laca kaj esperas, ke la rondo baldaŭ disiros. Sed ŝi ne povas retiriĝi antaŭ ol la mastro aperas. Ŝi jam sendis paĝion por memori al Napoleono, ke la kortego atendas lin.

«Baldaŭ», murmuris la imperiestro.

Sed la tempo pasas, sen ke li venas. Tiam Joséphine decidas fari promenon tra la salonojn. Resti sidanta antaŭ Cambacérès, enfermita en la punto de sia kravato, ŝi ne povas pli longe. Ŝi ekstaras kaj, konfuzante per sia ringumita mano la eburajn kaj perlamotajn pecojn sur la triktraka tablo, ŝi diras kun sia tute natura gracio :

«Mi kapitulacas, princo, vi venkis min. »

«Via Imperiestrina Moŝto devas plendi nur pri tiuj ĉi malvenkoj, » respondas Cambacérès, plena je kortegana spriteco, kaj prezentas sian brakon al la Imperiestrino. Neniu reĝo kaj suverena princo ĉeestas. La honoro estas do al li, kaj li ne estas viro kiu lasas pasi tiujn okazojn montri sian estimon.

Ĉiuj sinjorinoj, eĉ la sinjorino Patrino levas sin. La imperiestrino pasas meze de la brulado de oraĵoj, juveloj kaj lumoj, respondante al ĉiuj kiuj salutas ŝin per rideto aŭ afabla vorto. Ŝia bona memoro por nomoj, familioj kaj malgrandaj detaloj estas miriga. Ŝi petas novaĵojn pri la infanoj, interesiĝas pri geedziĝoj kaj

karieroj. Ŝi ŝatas plezurigi aliajn kaj jam milfoje intervenis por aliaj ĉe la imperiestro.

Sendube ŝi ŝajnas malpli suverenino ol perfekta mondumulino. Ŝiaj paroloj havas pli da eleganteco ol da majesteco. Ŝi montras tro da natureco, tro da deziro plaĉi. Sed ŝi pensas, ke multe estas bezonata por malaperigi tiom da malegalecoj, mildigi la tro vivajn kontrastojn kaj fari kortegon el tiu kolekto de tiel diversaj homoj.

La tasko estas malfacila. La vivstilo de Versailles, la ŝajne tiel simpla rafinita tono de la reĝa ĉirkaŭaĵo ne plu ekzistas. En ilia loko venis peza devigo kaj la maldelikata gusto montri sian povon kaj premlatigi aliajn. La homoj de la malnova raso, alligitaj al la nova povo pro profito aŭ ordono, ŝatas kontrasti per siaj belaj manieroj kun la hazardaj soldatoj kaj nekonvenciaj riĉuloj kaj iliaj edzinoj. Tiel vivas unu apud la alia du diferencaj societoj, unuigitaj per la sola deziro de la mastro kaj kiuj tute ne timas esti impertinentaj, kiam la imperiestro ne estas tie.

Sed per laŭta voĉo la ĉambelano anoncas la eniron de persono eble tiel longe atendata kiel tiun de la imperiestro :

« Ŝia Imperiestra Alteco princino Pauline Borghese. »

Tiam per pli modesta tono, ĉar la etiketo provizis tiujn nuancojn:

« Sinjorino Colonna Walewski ! »

Ekestas leĝera bruo, kaj ducento da okuloj fiksiĝas sur duone malfermita orumita pordo. Malrapide per siaj diinecaj, supraj kaj iomete treniĝantaj paŝoj, aperas la plej frivola de la Bonapart-oj. La linioj de la fama korpo, kiun Canova havis la honoron skulpti nuda, estas apenaŭ vualitaj ĉi-vespere per la faldoj de blua tulo. Sur ŝia kapo, ĉirkaŭ ŝia kolo, sur ŝiaj fingroj, sur ŝiaj maleoloj brilas la altvaloraj ŝtonoj de la domo Borghese, ĉe kiuj paliĝas eĉ la juvelujo de Joséphine.

Per sia protektanta mano ŝi tenas tre junan, blondan virinon kun blindiga haŭtkoloro. Grandaj malhelbluaj okuloj prilumas ŝian dolĉan vizaĝon, kion emfazas la netaj nigraj brovoj. Ŝi havas rektan nazon, belan rozkoloran iomete paŭtan buŝon, delikatan kaj longan kolon, fajnajn brakojn kaj gracilajn ŝultrojn. Ŝi estas tre simple vestita, se oni konsideras la

¹ La burgografo Alexandre de Beauharnais (1760-1794) edziĝis al Joséphine. Li estis generalo en la Rejnarmeoj kaj mortis sur la eŝafodo.

² Laŭ la Franca kutimo la titoloj de la virinoj signifikas 'edzino de'. Tiel ili uzas 'generalino k.t.p.

lukson de tiu epoko, per blanka velura malfermita mantelo super robo en blanka krepo. Nenia pudro, nenia ŝminko, neniaj juveloj, sed kristnaskaj rozoj ĉe ŝia zono kaj en ŝiaj orkoloraj haroj.

Ŝi estas la Polino pri kiu oni tiom parolas ekde kelkaj monatoj, kaj kiu havas tiom da povo super la koro de Napoleono kaj kiu, cedinte al la deziro de la imperiestro forlasis Varsovion kaj instalas sin en Parizo. La antaŭan tagon li postulis, ke ŝi venu al la palaco Tuilerioj por esti prezentata. Pauline, ĉe kiu ŝi ekloĝis, post kiam ŝi alvenis el Pollando, rapidis prezenti sin al ŝi por konduki ŝin al la kortego.

La imperiestrino haltas. Kiel ĉiuj ŝi scias, kiu estas la juna Polino. La imperiestrino estas sperta virino, kiu havas tro da ruĝo sur la vizaĝo por povi paliĝi, sed ŝia mano ĉifas kaj taŭzas ŝian naztukon. Ŝi ŝajnigas interparoli kun siaj damoj, la kas-telgrafino de La Rochefoucauld kaj Claire de Rémusat, kiuj troviĝas en ŝia proksimeco.

«Venu do, Marie, » diris la princino, «ni alvenos tro malfrue por vidi la Imperiestrion dum ŝia ludo. Mi prezentos vin al ŝi dum ŝi preterpaŝos. »

Kaj senkonsidere de la ceremoniaro, metinte la manon ĉirkaŭ la talion de Marie Walewska, ŝi trenas ŝin kun si. En ŝia sulko la juna virino estas sekvata de la plej flataj murmuroj. Caroline, tiel vanta, ricevas ŝin kun karesa respekto. Fouché, Talleyrand, la granda ceremoniestro Ségur, grafo Metternich, ambasadoro de Aŭstrio, Fontanes, marŝalo Bernadotte ĉirkaŭas la ĵusalvenintan junulinon. Ĉiujn tiujn omaĵojn ŝi ricevas eble iomete timide, sed kun la distingiteco de alte naskita damo. Tamen nur kiam la grandmarŝalo de la palaco, Duroc, alproksimiĝas, vera rideto ornamas la gracion faldon de ŝia buŝo. Duroc estas fidela amiko, kaj ŝi konas lin de la tago kiam ŝi konatiĝis kun Napoleono, kies ombro li estas.

Intertempe la imperiestrino, farante seriozan mienon, reprenas sian promenadon. Si direktas kelkajn sensignifajn frazojn al la Sinjorino Patrino, kiu, nur ŝi, ĉe ŝia invito, residiĝas en sian orumitan grandan fotelon, kies brakoj finiĝas per kapo de ŝinkso. La patrino de Napoleono pensigas pri antikva Romia matrono per siaj duraj, sed regulaj trajtoj, sia fiksa rigardo, siaj malrapidaj gestoj kaj sia imensa orgojlo, kiun oni sentas fonti el ŝi. Sen sperto de la granda mondo, nescia, limigita, sed instinkte nobla, ŝi kaŝas siajn malfortecojn en sian statuecan trankvilecon, respondante per kapo-

signoj al la flatoj, atenta pri ĉio kaj serioza, kvazaŭ ŝi portus la sorton de ĉiuj tiuj Korsikanoj, kiuj, naskiĝintaj el ŝi, metis la piedojn sur la kapojn de la reĝoj.

Apud ŝi sidas ŝia honora damo, generalino Junot, kiun Bonaparte, kiel juna artileria kapitano igis salti sur siajn genuojn. Fariĝinte granda damo kaj mildigante per la talentoj de ŝia koro la eldirojn de ŝia akra lango, ŝi kelkajn fojojn diris veraĵojn al Napoleono, kiu eble ne amas ŝin, sed tenas ŝin apud si, ĉar ŝi amuzas lin, kaj ankaŭ ĉar ŝi estas, inter tiom da novaj geservistoj, fidela atestantino de lia estinteco.

La violonoj ludas nun danson de Spontini. Daŭrigante sian vojon, Joséphine proksimiĝas nun al la grupo, en kiu troviĝas Pauline kaj Marie Walewska. La flustroj ĉesas : ĉiuj estas tre atentaj. Por homoj kiuj ĉiam enuas, kia regalo estas tiu renkonto ! La fratino de Napoleono faras paŝon antaŭen kaj kun ĉarma impertinenteco post tre leĝera reverenco diras :

«Laŭ ordono de la imperiestro mi havas la honoron prezenti al Via Imperiestra Moŝto sinjorinon grafinon Marie Walewska, mia amikino... »

La vortoj « mia amikino » estis diritaj post mallonga paŭzo. Joséphine ne povas eviti tremeti. Severe ŝi rigardas la junan Polinon, kiu, emociita, ruĝiĝas en sia blanka robo kaj profunde kliniĝas. Silentante ŝi faras la tri reverencojn preskribitajn de la etiketo. Sen etendi al ŝi sian manon por la kiso, kiun preskribas la reguloj, la Imperiestrino limigas sin je mallonga saluto kaj diras, uzante la suverenan 'ni' :

«Sinjorino, ni jam aŭdis paroli pri vi, sed ni ne sciis, ke vi estas en Parizo. Ni certe revidos vin. »

Post tio, deturnante la okulojn de la junulino, ŝi pasas. Marie, senparola, estas svenonta. Sed la du fratinoj de la imperiestro, la bela sinjorino Maret kaj Fouché ĉirkaŭas kaj subtenas ŝin. Altranguloj kaj damoj de la kortego petas esti prezentataj al ŝi. Napoleono volis, ke ŝi venu ĉi tien. Ĉu oni ne devas honoru lin per tio ? Ŝi denove regas sin per la ĉarma hero-ismo propra al la virinoj, parolas, movetas sian eburan ventumilon kaj ridetas...

En tiu momento la pordogardistoj malfermas kun ceremonia bruo la du klapojn de la granda pordo kaj krias :

« La Imperiestro ! »

Profunda silento estiĝas en la salonoj. En la antaŭcambro sur la marmora planko oni aŭdis firman, rapidan paŝadon. Finfine li aperas.

Ĉiuj kapoj kurbiĝas sub la lustroj. Li antaŭeniras, rigardante rekte antaŭ si kaj esplorante la salonon. Li serĉas vizaĝon. Kaj ekde kiam li trovas ĝin, lia vizaĝo, kiu estis dura ĝis tiam, mildiĝas. Kiel kutime li surhavas la uniformon de la ĉasistoj de sia gvardio : frakon el malhelverda drapo, ruĝaj kolumo kaj refaldajoj, malgrandaj epoletoj, veŝto kaj kuloto en blanka kaŝmiro, silkaj ŝtrumpetoj, ŝuoj kun oraj bukoj. Sur lia brusto brilas la kruco de la Honora Legio.

Dum li direktiĝas al la imperiestrino, li faras signon kaj la vrinj de sia familio residiĝas. Ili releviĝas poste, ĉiufoje kiam li venas al ili. «Nu, mia amikino, » li diras al Joséphine, « Kiel vi fartas ? » Li interrompas sin, kaj respondante al la arteca saluto de la ĉef-kanseliero, li diras :

«Cambacérès, venu vidi min morgaŭ matene. Mi volas paroli al vi pri la aferoj de Romo. »

Tiam turniĝante al sia edzino, li diras :

«Oni ŝajnas enui ĉi tie. Kiom da longaj kaj malgajaj vizaĝoj ! »

«Estas tiel, ĉar ni longe devis atendi cin, » ŝi respondis. « Ĉu ci scias, ke estas preskaŭ noktomezo, Bonaparte ? »

Kiel per privilegio ŝi persistas en la kutimo nomi lin tiel ciente lin, escepte okaze de ceremonioj, dum kiuj ŝi uzas la imperiestrajn titolojn.

«Ĉu jam estas tiel malfrue ? Sed mi havas multan laboron. Vi, virinoj, kiuj faras nenion alian ol vesti vin kaj akcepti amikinojn, vi ne povas imagi, kio estas laboro. Sed mi finfine trovis momenton por malsupreniri kaj saluti miajn amikojn. » Ŝi leviĝas por akompani lin kiel ŝi ofte faras.

«Ne, restu ĉi tie, » li diras. «Vi ŝajnas laca. Ripozu iomete. Mi tuj revenos. »

Kaj dum ŝi residiĝas seniluziigita, li iras per sufiĉe mallertaj paŝoj, balanciĝante, kun unu mano sur la dorso, al la heĝo de kurbiĝintaj viroj en iliaj vestaĵoj el multkoloraj veluroj aŭ uniformoj kun galonoj kaj ordenoj, kaj de virinoj vestitaj en la plej riĉaj kaj helaj silkoj kun profunde malkovritaj brustoj. La generaloj, ministroj, princinoj, dukinoj, grafinoj kun malnovaj grandaj nomoj aŭ kun novaj nomoj faritaj per venko, sentas ŝrumpi siajn korojn ĉe la proksimiĝo de tiu malgranda oficiro de la ĉasistoj kaj kolektas sian kuraĝon por diri al li «jes, Siro » aŭ «ne, Siro », kion ili tre ĝuste kapablas prononci, respondante al eble dura demando, kiu ĉiakaze preskaŭ ĉiam estis tedeĝa

aŭ neantaŭvidita. Estas speco de revuo, kiun li igas ilin suferi, kaj verdire liaj ‘grum-bluloj’³ estus pli komfortaj. Kun ili li ankaŭ estas pli natura kaj libera. Lia malriĉa kaj studoza juneco ne donis al li la kutimon troviĝi en salonoj, kaj li la unua sentas sin tie ĝenata.

Estas generalino Junot kiu trapasas la fajron. Sed Napoleono estas tre bonhumora. Jam de longe oni ne vidis lin tia.

«Jen do vi reveninta de Portugalio, sinjorino Junot. Oni ĉiam lernas vojaĝante : vi nun faras vian reverencon pli bone. Ĉu ne, Hortense ? » li aldiras, turniĝante al la reĝino de Holando, kiu staras apud li. «Ĉu ŝi ne aspektas pli bone ? Ŝi ne plu estas malgranda knabino. Ŝi estas nun Sinjorino la Ambasadorino kaj baldaŭ ŝia situacio estos ankoraŭ pli bona. »

Sinjorino Junot radias. Ŝia longa olivkolora vizaĝo kun granda nazo, nigraj okuloj – vera Araba masko – transformiĝis. Ŝi fariĝis bela.

«Kaj Junot ? Kion li faras ? Mi ricevis liajn depeŝojn. Mi esperas, ke li estas serioza. Sed vi estas saĝa, vi, kaj ne plu tormentas lin. La virinoj ne rajtas tormenti siajn edzinojn. »

De sia loko Joséphine devas aŭdi ĉion. La generalino, duone ridante, duone suferante, ne kuraĝas respondi al tiu aludo al la amrilatoj inter la granda knabo, kiu estas ŝia edzo kaj Caroline Murat, kies rezulto estis, ke Junot subite estis sendita al Portugalio.

Post malgranda movo de la kapo Napoleono pasas al la najbarino, maldika virino kun fajre blondaj haroj, vestita per splenda verda robo.

«Bonan vesperon, Sinjorino de Chevreuse, » diria Napoleono.

Ŝi estas lia ‘malamikino’. La imperiestro, pasiante pri la malnova nobelaro, devigis ŝin veni al la kortego por funkcii tie kiel damo de la palaco. La kaprica dukino malfacile povas regi sin kaj ne timas rezisti Napoleonon, kiu ofte provas venki ŝin en vortlukto. Li apenaŭ sukcesas. Iufoje li forlasas ŝin dirante: «Mi pensas, ke mi venkis la antipation de sinjorino de Chevreuse. » Sed li ne kredas tion kaj neniu kun li.

Hodiaŭ li komplimentas ŝin pro ŝia tualetto. Li asertas kompreni ion pri tio. La dukino, senmova, alprenas orgojlan sintenon, kiu ne trankviligas siajn amikojn.

«Vi almenaŭ ne estas senguste vestita kiel tiom da aliaj. Tiu verda koloro bone sidas al vi. Vi aspektas belega. Sed kia malfeliĉo ke vi estas rufa!»

³ La soldatoj de lia maljuna gvardio.

Sinjinorino de Chevreuse ekscitiĝas kaj, rigardante la imperiestron en la okulojn, respondas :

«Ĉu vere, Siro ? Ĉu tio eblas ? Neniu viro diris tion al mi ĝis nun ! »

Napoleono kuntiras la brovojn. Ĉirkaŭ li ĉiuj retenas sian spiradon, atendante fulmon. Sed li ekridas kaj, levante la ŝultrojn, faras kelkajn paŝojn antaŭen.

Nun li staras antaŭ sia onklo, kardinalo Fesch, dika ankoraŭ juna viro kun vulgara vizaĝo kovrita per ruĝaj makuloj, kies sutano kaj mantelo malbone kaŝas lian rustikan devenon.

La imperiestro ne etendas al li la manon. Li ne ŝatas premi manojn, escepte en intimeco. La prelado komencas diri komplikajn frazojn, sed li interrompas lin vikle, sed ne brutale :

«Sinjoro Kardinalo, la penso trairas mian kapon, ke iuj pastroj de Liono partoprenas en la protestoj kontraŭ la pretendita stato de dependeco de la papo. Necesas atenti pri tio. Vi do agus bone, se vi pasigus kelkan tempon en via diocezo. »

Tiam al sia patrino, subite sombriginta pro tiu ordono, kiu separos ŝin de amato frato, asociita al ŝia vivo, li diras:

«Kiel fartas sinjorino Laetitia? Ĉu ŝi estas kontenta? »

La sinjorino patrino respondas per kelkaj apenaŭ kompreneblaj vortoj :

«Jes, sendube, ŝia sanstato estas bona, sed ŝi havas tiom da zorgoj... »

Tiam vidante la imperiestron tiel bonhumora, ŝi subite kuraĝas repreni mallaŭte por la tioma fojo la ideon kiu obsidas ŝin, nome tiu de la repacigo de la du filoj:

«*Napoleone*, mi ricevis kelkajn leterojn de Lucien... »

Ĉe la nomo de sia frato, kiu ekzilis sin, ĉar li rifuzis divorci sian edzinon por la prezo de krono, Napoleono faras tranĉan geston per la mano, kaj rapide diras malproksimiĝante :

« Ne parolu al mi pri li. Li havas malbonan kapon, li frenezas. Mi havas nenion komuna kun civitano Lucien. Ke li faru malmultan bruon, se ne mi forpelos lin el Eŭropo. »

La granda kanceliero de la Honora Legio, Lacépède, al kiu paŝas la mastro, estas maltrankviligita per tiu paroleksplodo. Sed la imperiestro tuj retranskiviligas. Se la impresoj sur li estas vivecaj, lia nefleksebla volo tuj bremsas ilin. Cetere li ŝatas kontrasti la salutojn : tio estis unu el liaj koketaĵoj.

«Mi serĉas vin, Lacépède. Mi ricevis vian leteron pri la domo de Ecoen. Kion mi diris pri via administrado, ne devas maltrankviligi vin.

Tio ne estis mia intenco. Mi gardas por vi mian tutan estimon... »

La reverenco de la reĝino de Napolo estas mallerta, sed ŝia stato postulas indulgecon. Ŝi estas en sia oka monato de gravedeco. Kaj tiu gravedeco ankoraŭ pli malbeligas la malgracian virinon, filinon de la silkkomercisto François Clary el Marseille, al kiu Joseph Bonaparte povis tiel feliĉe edziĝi. Ŝia fratino Désirée estas la edzino de marŝalo Bernadotte. Nun ŝi surhavas fermitan kronon, rifuzante esti reĝino alie ol en Parizo, kontraŭstarante kun humila obstineco la ideon forlasi Parizon, ĉar nur tie ŝi sentas sin bona inter siaj filinoj, ŝia fratino, siaj kuzoj, vivante kaŝitan burĝan vivon, kiu ŝokas Napoleonon. Sed li jam ĉiam montris grandan komplezecon al sia bofratino. Malofte li rifuzis al ŝi gracon. Kaj ŝi demandas multajn da ili...

«Ha, Julie, kiel vi fartas ? Mi esperas, ke vi nun donos al ni knabon post tiom da filinoj. Imitu Hortense, kiu havas du knabojn. La filinoj ne validas multe. Ili taŭgas nur por esti edzinigataj. »

Julie rektiĝas : ŝiaj mincaj lipoj apenaŭ malfermiĝas :

«Siro, mi tiom amas miajn filinojn, kiom mi amas miajn filojn.»

«Tio estas eraro. Mi preferus ne havi infanojn ol havi nur filinojn. »

Nenia infano... Tiu penso ĉiumomente revenas obsedi lian genion. Sen infano la heredeco ne estas certigita kaj la estonteco de la Imperio en danĝero. La revolucio povas reveni. La tuta giganta konstruaĵo plu ripozas sur li sola, kaj li estas nur homo, kiu povas esti mortigita, vundita, malsaniĝi. Li kredas, ke Joséphine sufiĉe pruvis sian fertilecon naskante Hortense kaj Eugène. Pro la fakto, ke ilia geedzeco ne donis frukton, ŝuldas do nur li. Lerte la imperiestrino parolas al li pri tiu impotenteco, kiu tamen ne estas certa, kaj ĝis nun ŝi tiel protektis ŝin kontraŭ divorco, kiun ŝi multe timas. Ĉu ŝi tamen povos resti lia edzino ?

Napoleono apenaŭ rigardas Talleyrand, la ministro pri la eksterlandaj aferoj, kaj la Aŭstran ambasadoron Metternich. Li rapidas por alveni en tiu profunda fenestra aperturo, kie apud lia fratino Pauline staras Marie Walewska. Li ne plu povas atendi, li plirapidigas siajn paŝojn, salutante preterpaŝe Fouché, Fontanes, Caroline, sinjorinon Maret kaj dek aliajn, kiujn li ne vidas, kaj iras al la celo kiu altiras lin kaj sur kiu, sen montri tion, la tuta asembleo tenas direktitajn siajn okulojn.

«Jen vi estas, » li diras gaje, « la reĝino de la senvalorajoj ! Bonan vesperon kaj dankon, mia fratineto ! »

Per fingro li karesas la vangon de Pauline, signo de lia extrema favoro. Tiam, kliniĝante al la grafino, li, tiel malmulte galanta, kisas ŝian manon kaj gardas tiun manon momenton en la sia. Kaj post kiam li sidigis ŝin, li mem sidiĝas en la fotelon, kiun Caroline, kompli-cino de ĉio kio povas malĝojigi Joséphine, for-lasis antaŭ minuto.

Kliniĝinte al la orelo de sinjorino Walewska, li murmuris :

«Mi finfine retrovas vin, Marie, mia dolĉa Marie ! »

Ŝi ridetas, feliĉa, sed timema, kaj diras per ŝia voĉo iom kantanta, kies moduladoj havas preskaŭ italan langvoron :

«Regu vin, Siro. La tuta kortego rigardas vin, ankaŭ la Imperiestrino... »

«Ba, » li diras senzorge, « ŝi kutimiĝos al tio. »

Kial li regus sin por Joséphine? Jam ofte li konfidencis al ŝi siajn intermitajn amojn. Li supozas, ke ŝi akceptas lian malfidelecon sen riproĉoj kompanse de ŝia konduto, kiu estis tiel frivola estintece. Li povis pardoni ŝin, sed la memoro pri certaj horoj, malgraŭ ĉio revenas al li kaj lasas lin malbonhumora.

Kaj tuj li reprenas :

« Kia ŝi estis por vi ? Afabla, mi esperas. »

Marie ruĝiĝas kaj silentas. Sed la princino de Borghese, kiu, laŭ deziro de sia frato, restas apud ŝi, desegnas per kelkaj vortoj la konduton de Joséphine. Napoleono havas kvazaŭ nervozan ŝokon. La anguloj de liaj naztruoj tremetas, signo kiu anoncas tempeston, kaj liaj grizebluaj okuloj iomete refermiĝas.

Marie tuŝas la brakon de la imperiestro kaj tremetante petegas lin:

«Siro, mi petas vin pensi pri mia situacio ĉi tie : ne faru ĝin malebla per kolereksplozo. La imperiestrino fakte pravas. Por ŝi mi certe kulpas. Mi venis, ĉar vi deziris tion. Sed tio ĉi certe ne estas mia loko. La scivolemo de tiuj ĉi homoj, kiuj ŝajnas scii ĉion pri mi, pezas sur mian koron. Mi volus kaŝi min en angulo... »

Li reprenas sian malgrandan, blankan manon, tenas ĝin en la sia. Neniu Burbonino havis tiel belajn manojn.

«Trankviliĝu, mia kara infano. Mi faros ĉion necesan. Sed ni pensu en tiu ĉi momento nur pri nia plezuro esti kune.»

Servistoj de la imperiestraj palacoj, vestitaj per verda kaj ora livreo, pasas inter la multaj ĉeestantoj, portante pladojn kun sorbetoj. Napoleono haltas unu el ili kaj insistas, por ke lia amikino akceptu refreŝigaĵon. Ŝi konsentas por doni al si sintenon. Li mem volas servi ŝin. Sen mal-trankviliĝi pri la rigardoj de la ĉeestantoj li etendas al ŝi kristalan glason kaj kulereton el orumita arĝento, atentigante ŝin pri la tenileto, kiu estas ornamita per simpla B.

«Vi vidas, Marie, la kulereto apartenas al mia arĝentaĵo el la tempo de mia konsuleco. Mi estas tiam pli juna, » li aldiras kun bedaŭro.

«Jes, » ŝi respondas mallaŭte, «sed por mi vi estas juna ankoraŭ nun kaj ĉiam estos tia. »

Li ankoraŭ ne havas kvardek jarojn, estante naskiĝinta en 1769, sed liaj ŝultroj portas la ŝarĝon de tiel mirakla sorto, ke pro tio li ŝajnas pli aĝa al ĉiuj, sed ne laŭ la korpo. Li jam estas leĝere korpulenta, sed tio ne sidas lin malbone. Lia frunto jam estas ornamita per lia legendara harbukleto. Sed lia vizaĝkoloro estas hela, sen sulketoj, lia rigardo estas klara kaj akra, liaj dentoj admirindaj. Li estas pli atentema ol iu el siaj generaloj. Lia potenco, lucida kaj ordema cerbo entenas senlace la enorman administracion de la imperio, la kurbojn de sia poli-tiko, la planojn de siaj militiroj. La tuta mondo miregas pri la plej surprizaj eventoj de la historio, kiujn li okazigis en la spaco de nur dek kvin jaroj. Li bone scias tion, ĉar li ĝuste juĝas pri si mem. Sed apud Marie, li ŝajnas forgesi tion ĉi, refariĝante nur viro, viro kiu amas kaj estas amata.

Tamen Joséphine, sidanta en la centro de rondo de la virinoj, ne povas ne ĵeti rigardon sur Napoleonon. Ŝi volus aŭdi la vortojn kiujn li interŝanĝas kun Marie. Sed tio ne eblas pro la distanco kaj la homamaso. Ŝi povas nur vidi, kaj kion ŝi vidas sufiĉas por malĝojigi ŝin.

Hortense venas sidiĝi apud sia patrino. Vane ŝi provas distri ŝin per sia babilado, en kiun ŝi engaĝas la apudajn damojn. Ŝi suferas pro la ofendo de la imperiestro farita al sia patrino, kies aventurojn ŝi tamen konas, kiel cetere la tuta kortego. La patrinon kaj la filinon kunligas forta afekcio. Per sia tenereco Hortense provas protekti sian patrinon. La imperiestrino, leĝera kiel birdo de siaj insuloj⁴, tuta dediĉita al la mondumo kaj la modo, lasas sin gvidi de sia filino, kiu dolĉe riproĉas al ŝi ŝian konduton. Hortense provas bridi ŝian malordon, kiu

⁴ Martiniko, grupo da insuloj en Okcidenta Hindio, apartenanta al la Antiloj.

malkontentigas Napoleonon. Ŝi jam ofte solvis problemon en la imperiestra geedzeco. Mal-feliĉa en sia propra situacio pro la kulpo de sia patrino, kiu edzinigis ŝin kontraŭ ŝia volo al Louis, "tiu malsana piono", dum ŝi amis alian viron, grandmarŝalon Duroc, ŝi havas grandan influon sur sia patrino kaj sur la imperiestro, kiu plendas, aprecas kaj dorlotas ŝin.

Hortense suferas pro sia patrino. Ŝi estas maltrankvila. Certe, tio ne estas la unua mal-fideleco de ŝia vicpatro, sed la unua fojo ke li montras ĝin tiel malferme. Kaj lia rilato kun grafino Walewska, kiu jam daŭras unu jaron, ne estas kaprico, sed io senfine pli profunda, pli grava. Tre fajna, Hortense ne eraras. La aliaj amantinoj de Napoleono neniam estis danĝeraj por Joséphine. Ili estis ambiciaj kaj naivaj. Marie Walewska ne similas al ili. Ŝi amas Napoleonon. En tio estas ŝia forteco, la sekreto de ŝia dominado. Tial ŝi estas grava minaco por la pozicio de la imperiestro.

Al tiu pozicio, laŭ la signifo kiun ŝi donas al tiu vorto, kroĉas sin la estinta kastelgrafino de Beauharnais. Ŝi sentas por Napoleono alligitecon, en kiu strange miksiĝas timo, respekto kaj speco de dankemo. Jam de longe la sentoj de la Kreolino brutiĝis. Sed unu potenca sento dominas ŝin : la vana kontenteco kiun ŝi sentas estante la unua virino en okcidenta Eŭropo, la edzino de la plej granda kapitano de ĉiuj tempoj, lia konfidenculino, ĉio tio resumita en unu vorto : imperiestrino de la Francoj!

Daŭra pasio ĉe Napoleono, precipe amo kiu povas doni fruktojn, ĉu tio ne estus la kondamno de la sterila suverenino, kiu ĝis nun suk-cesis konserviĝi en la menso de la cezaro nur per ruzoj kaj mensogoj ? Pri tio pensas Hortense, kaj malgraŭ ŝiaj klopodoj reaperigi rideton sur la lipoj de ŝia patrino, estas pri tio ke obstine pensas Joséphine. Estas pri tio ke daŭre pensas la tuta kortego ĉirkaŭ ili...

Ĉe Marie Napoleono kredas esti retrovinta tiujn senzorgajn momentojn, kiujn li konis en la komenco de sia kariero. Li ridas, parolas, radias kaj volas plaĉi, sentante ke li plaĉas al ŝi. Li faris signon al Duroc, ilia konfidenculo ekde la tagoj en Pollando, kaj la grandmarŝalo venas meti sin malantaŭ la fotelo de Pauline. Kur-bigante sian altan silueton, li respondas kiel eble plej bone al la ofte senĝenaj ŝercoj de la princino, al kiu la favoro ŝajnas iomete turni la kapon. Duroc ne estas trankviligita per la afablaĵoj de ŝia Alteco. Li konas ŝian kaprican humoron. Pauline estas tre bela, kaj oni diras ke ŝia koro estas libera ekde kiam la afabla Canonville aliĝis al la

armeo. Sed la grand-marŝalo, kvankam ankoraŭ juna, estas tro saĝa por riski ĵeti sin en tian aventuron. Tial liaj sentoj iras aliloken.

Subite Napoleono interrompas sin. Unu plian fojon li kaptis la rigardon de Joséphine, kiu pezas sur lin. Lia malplezuro, plie lia kolero de antaŭe revenas. Li diras al Duroc :

«Petu Sinjorinon de Rémusat veni por paroli kun mi. »

La grandmarŝalo, reprenante sian kutiman gravan mienon, faras al si vojon al la imperiestrino. Momenton poste sinjorino de Rémusat, la damo de la palaco, malgranda, dika kun ordinara trajtoj, faras sian reverencon antaŭ la imperiestro. Li tuj ekstaras kaj trenas ŝin malantaŭ si en angulon, kie ili restas solaj, ĉar ĉiuj gekorteganoj, vidante lian intencon, retiriĝis de tie por doni spacon al ili.

«Sinjorino de Rémusat, » diras Napoleono, « vi havas grandan influon sur Joséphine. Vi estas, mi kredas, ŝia plej kara amikino. Ĉiakaze ŝi ŝatas vian juĝon. Konsilu do al ŝi ne ŝajniĝi esti ĵaluza. Tio malbone konvenas al ŝi. Ŝi priridindigas ŝin. Se ŝi malbone ricevas majn amikojn, ŝi povus bedaŭri tion. Unu fojo sufiĉas. Vi diras tion al ŝi, ĉu ne, kaj ankoraŭ ĉi-vespere. »

«Certe, Siro, mi ripetos la parolojn de Via Moŝto. Sed mi ne komprenas... »

Ŝi levas siajn naivajn okulojn al la imperiestro. Li malmulte fidas ŝin, sed li scias, ke ŝi estas lerta intrigantino.

«Ne necesas, ke vi komprenu. Ŝi kompre-nos : tio sufiĉas. »

Nerveze li interfrotas siajn manojn, dum tiko pasas sur lia vizaĝo, kaj subite, rapide prononcante la vortojn, li diras :

«Ĉu ŝi ankoraŭ ne konas min ? Mi ne estas iu ajn. Mi akceptas kondiĉojn de neniu. Estas la lasta fojo, ke mi memorigas tion al ŝi. Ŝi fariĝu saĝa. Mi estus dankema al vi pro tia ŝanĝo. »

Per signo de la kapo li finas la interparola-don, rekondukas sinjorinon de Rémusat al la centro de la salono kaj tiam reiras al Marie. Apud ŝi, anstataŭante Pauline kiu forlasis ŝin, troviĝas Fouché, kiu estas plena je profunda respekto.

La paroloj de Fouché sendube plaĉas al ŝi, ĉar Napoleono ridetas proksimiĝante per tiu ĉarma rideto de la Bonapart-oj, kiu heligas siajn trajtojn per homa lumo : la severa estro ŝajnas tiam la plej bonvola kaj la plej alirebla amiko.

La imperiestro prenas la ministron per la orelo. Fouché faras komikan grimacon, ĉar Napoleono forte pinĉas.

«Mi vidas, grafino, ke mia ministro de la polico estas agrabla kompanio por vi. Tio ne mirigas min. Li estas la plej inteligenta viro en mia administracio.»

«Prefere diru : la plej dediĉita al Via Moŝto, Siro, » diras Fouché kun saluto, kies precipa celo estas liberigi sian orelon.

«Hm, mi volas kredi tion. Ĉiakaze vi pensas pri multaj aferoj kaj vi estas tre atenta. Estas monsieur Fouché, grafino, kiu hieraŭ memorigis min pri via frato Laczinski. Mi tuj nomumis lin kapitano ĉe la Polaj lancistoj de mia gvardio. Diru al mi, Marie, ke vi estas kontenta.»

Ŝi murmuris jes tiel tenere, ke Napoleono estas tuŝita. Li diras kvazaŭ por kaŝi sian emociion :

«Auskultu, Fouché, alvenante en Parizo la sinjorino grafino ekloĝiĝis en la domo de mia fratino Pauline. Tio konvenas por kelkaj tagoj, sed tio ne povas daŭri. Ĉu vi volas serĉi bonan hotelon⁵ por ŝi kaj instali ŝin laŭ ŝia gusto ? Mi kalkulas je vi por tiu elekto. Vi havas takton.»

«Ĉu la sinjorino grafino havas preferon koncerne la lokon de ŝia estonta rezidejo ?»

Marie faras geston de nescio. Ŝi venis al Parizo la unuan fojon...

«Mi konas tre eskvizitan domon apud la Champs Elysées,» diras la ministro.

Napoleono interrompas ŝin

«Tio loko estas tro dezerta, preskaŭ kamparo. Prefere la Chaussée d'Antin. Mi ŝatas tiun kvartalon. Tie estas spaco, grandaj ĝardenoj.»

«Via Imperiestra Moŝto donu al mi du tagojn, kaj mi havos la honoron prezenti al la sinjorino grafino loĝejon digna je ŝi.»

«Sinjoro ministro, » diras Marie, «mi dankas vin pro viaj zorgoj, sed se mi rajtas esprimi deziron koncerne la lokon, kie mi volas loĝi, ĝi estu modesta, retirita. Tro vasta, riĉa domo ne plaĉus al mi. Tie mi ne sentus min hejme. Mi tute ne ŝatas grandan lukson. Vi komprenas min, ĉu ne, sinjoro ?»

«Ĉu vi aŭdas tion, Fouché ? Agu laŭ la deziro de la sinjorino. Mi volas antaŭ ĉio, ke ŝi estu kontenta.»

La antaŭa konvenciano⁶ kliniĝas.

«Mi ne havas alian intencon, Siro. La sinjorino povas kalkuli je mi.»

Marie dankas lin per gracia kapklino. Li volas foriri, sed la imperiestro retenas lin ĉe maniko.

«Estu ĉe mia ellitiĝo morgaŭ frue. Mi devas paroli al vi.»

«Mi ĉiakaze tiam prezentus min tie, Siro. Mi devas paroli al Via Moŝto pri konspiro, kies dratojn mi povis trovi. Ŝajnas al mi, ke la bona momento estas veninta frapi la kulpulojn, kio malkuraĝigos por longa tempo la apertajn aŭ sekretajn kontraŭulojn de la imperio.»

La jam tiel blanka vizaĝkoloro de Marie ankoraŭ pli paliĝas.

«Ĉu konspiro ?» ŝi murmuris mallaŭte.

«Ne maltrankviliĝu, Marie,» plaĉe diras Napoleono, «vi ankoraŭ ne konas sinjoron Fouché. Li ĉiam havas komploton en sia tirkesto. Li volas fari sin utila. Ĉu vi ne hontas, Sinjoro, tiel maltrankviligi belan, junan virinon pro tia etaĵo ? Fi do, ni ne plu parolu pri tio.»

Fouché humile akceptas la riproĉon.

«Mi malpravas, estas vere, Siro,» li diras, klopodante doni al sia faŭseta voĉo preskaŭ emociitan komplezan tonon. «Mi estas mallerta, parolante pri tiu afero antaŭ sinjorino grafino Walewska. Cetere estas nenio timenda. Mi bone aranĝis ĉion, kaj vi estos, mi kredas, kontenta pri mi.»

Marie ne fortunis siajn okulojn de la ministro, dum li respondis al Napoleono. Tiuj kelkaj vortoj spiris dediĉitecon. Tial Marie ridetas al li kun dankema simpatio.

«Bonege,» diras la imperiestro, «ni vidos morgaŭ. Sed se via imago denove eraras,» li plaĉe minacas lin per fingro, «mi ne multe donas por via kapo.»

Li residiĝas apud Marie. Inter la homamaso kiu plenigas la salonojn, ili estas solaj. Inter tempe sinjorino de Rémusat verŝajne flustris iun konsilon en la orelon de la imperiestrino, ĉar la rigardo de Joséphine nun evitas ilin.

Muziko denove resonas tra la salono: estas pura kaj malrapida muziko.

«*Proserpine*, de Paesiello, » diras Napoleono. «Mi ŝatas tiun melodion.»

Estas efektive la muzikon kiun li preferas. Ĝiaj regulaj, ofte monotonaj melodioj, trankviligas lin, malstreĉas lin kaj stimulas lin al revado. Li ŝatas la ripetojn, ĉar, li diras, la impresoj kiuj ripetiĝas estas la solaj kiuj superfortas nin.

Momenton li restas senmova, senparola kun fermitaj palpebroj, kun marmoreca sereneco sur siaj trajtoj. Tiam subite li eliras el tiu sensobuzeco, tiras sian horloĝon el la veŝpoŝeto.

⁵ La nobeloj kaj riĉuloj en Francio nomis sian domegon en urbo 'hotelo'.

⁶ La Konvencio gvidis la revolucion kaj kondamnis reĝon Ludovikon XVI al la gilotino.

«Jam estas la dua !» li diras. « Aĥ Marie, kun vi mi forgesas la tempon. Mi estis devonta resti ĉi-tie nur momenton. Mi devas resupreniri.»

«Kio, ĉu jam estas tiel malfrue, Siro ? Ĉu vi ne povas prokrasti tiun laboron al morgaŭ ? Vi mortigas vin laborante. Duroc diris tion al mi.»

« Duroc scias nenion pri tio, kaj ankaŭ vi ne, mia infano... Mi devas labori nun, morgaŭ kaj ĉiam. Sed ne timu pro mia sano. Tio ne lacigas min, kontraŭe. Mi pasigas multajn noktojn kun miaj dosieroj kaj mapoj, kaj matene mi estas tiel freŝa kiel post dek du horoj da dormo en mia lito. Mi ne povas diri la samon pri miaj sekretarioj, ekzemple. Neniu havas mian rezistokapablon. Mi ne scias, ĉu mi dankas tion al mia Korsika sango, sed mi sentas min kvazaŭ farita el fero. Nu, adiaŭ, Marie, dormu bone. Ridu al mi por ke, kiam vi estos foririnta, mi gardu konfidan kaj feliĉan bildon de mia eta Marie. Morgaŭ mi venos viziti vin ĉe Pauline. Mi ankoraŭ ne scias en kiu momento. Mi devas akcepti la diplomatan korpuson, poste la privatan konsilantaron, tiam aŭdiencojn. Verŝajne mi venos en la posttagmezo, sed mi igos vin averti.»

«Tio ne necesas, Siro. Ne faru al vi zorgojn pri mi. Mi ne forlasos mian hotelon. Nenio estas pli dolĉe ol atendi vin.»

«Ne, ne, vi devas eliri, se ne tiuj vangoj kaj lipoj perdos siajn kolorojn. Ne, rajdu sur ĉevalo kun la princino, aŭ igu konduki vin al la Bois de Boulogne⁷ aŭ al Saint-Cloud.»

«Mi atendos vin, Siro,» ŝi flustris.

Li kapjesas.

«Nu, bone. Jen, mi havas bonan ideon. Mi venos per simpla veturilo sen livreo al la ĝardenpordo. César kondukos min, kaj ni ambaŭ iros al la kamparo. Adiaŭ, mia amikino, ĝis morgaŭ !»

Li leviĝas kaj leĝere premas ŝiajn fingron, trairas per rapidaj paŝoj la salonon. Distrita, li salutas plurajn damojn, kiuj retiriĝas, lanĉas amikecan vorton al Hortense, kiu, antaŭ li, leviĝas kun la imperiestrino. Joséphine provas regi sin, sed ŝi ne sukcesas. Ŝiaj nervoj cedas. Larmoj fluas el ŝiaj okuloj.

Inter la gesuverenoj okazas rapida interparolo:

«Kio estas al vi, Joséphine? Ĉu vi mal-sanas ? Kiel vi aspektas do ĉi-vespere ?»

«Nenio estas al mi. Mi estas nur laca... »

Ŝi hezitas.

«Kaj plue, mi estas seniluziigita.»

La imperiestro atente rigardas ŝin kelkajn sekundojn kaj levas la ŝultrojn.

«Ne necesas malĝoji,» li diras trankvile. «Ĉu mi malĝojas ? Cetere, mi ne havus tempon por tio.»

Ŝi ne respondas. Kion ŝi dirus, kio ne estas danĝera ? Tiam li mallonge konkludas :

«Joséphine, estu gaja, se vi volas plaĉi al mi. Precipe neniam ploru. Larmoj malbone sidas al vi.»

Kaj turnante sin sur siaj kalkanoj, li vokas sian ŝtatestretarion.

«Maret, ni multe malfruiĝis. Ni devas rekupe-ri la perditan tempon. Ni supreniru.»

La grafo de Ségur kliniĝas al la orelo de sinjoro de Rémusat, granda stultulo, kiu ŝajnas esti bildo de enuo.

«Jen tiu povra Maret, kiu denove pasigos sendorman nokton. Ne valoras la penon havi tiel belan edzinon !»

Sekvata de sia ministro, Napoleono malaperas kantetante inter siaj dentoj, kontenta povi reiri al siaj planoj, siaj memoroj kaj siaj ŝtatoj, kiuj havigas al li veran kaj profundan plezuron. Kiel li diris al Marie, tio ne lacigas lin. Neniam li estas pli komforta ol en sia kabineto kun siaj paperaĵoj, irante kaj venante kun la manoj krucigitaj sub la baskoj de sia ĵaketo, la kapo leĝere klinita, diktante leteron al Méneval aŭ Maret, kiuj, sidante antaŭ siaj tabloj, skribas galope, senpaŭze, per siaj rigidigitaj fingroj. Tie Napoleono sentas sin tute libera. Sinjoro de Ségur pravas : la kandeloj sur la tablo de la imperiestro estingiĝos nur ĉe la aŭroro.

II. Marie Walewska

« *Mi vidis nur vin, mi admiris nur vin, mi deziras nur vin. Rapide sendu respondon por trankviligi la malpaciencon ardon de N.* »

Tiun letereton, tre rapide skribitan per preskaŭ nelegeblaj leteroj trovis Marie ĉe si, revenante de la balo ofertita de princo Jozef Ponia-towski por festi la alvenon de la imperiestro en Varsovio. Ŝi ĵetis ĝin en la fajron. Al kia virino do kredis Napoleono havi aferon ?

Ŝi enlitiĝis, sed ne dormis. En tiu momento ŝi malestimis kaj malamamis la Korsikanon. Ŝi, kiu tiom estis admirinta lin, kiu estis farinta el li sian grandan heroon, kiu estis kurinta al la poŝtdomo

⁷ Arbaro situanta okcidente de Parizo, kie ofte pro-menas la riĉuloj.

de Bronie por vidi lin pasi, kiu, vestita per dekoltita robo, malgraŭ la dudek gradoj da malvarmo, estis ĵetinta florojn al li de sia balkono ĉe lia eniro en la Polan ĉef-urbon !...

Li estis levinta la okulojn al ŝi, estis ridetinta al ŝi per rideto kiu sorĉis ŝin, kaj, levante sian ĉapon de martesfelo, li longe estis salutinta ŝin... Ŝi kredis morti pro ĝojo.

Nun li insultis ŝin. Ŝi ĵuris neniam plu revidi lin.

Tio okazis en januaro 1807. Sklavigita, diskvaronigita, Pollando, post la malvenkoj de Prusio, estis leviginta kvazaŭ havante unu solan animon, unu solan voĉon por akلامي la liberiginton. Unu miliono da homoj formis procesion por Napoleono, kiun sendube neniu konkeranto iam havis. Li mem, tamen absorbita per siaj politikaj planoj, estis emociita sentante en la aero kiu ĉirkaŭis lin, la religian tremadon de tiom da koroj

«Tio estas vere bona popolo, » li diris al Duroc, «kiu meritas, ke oni pensu pri ĝi.»

La postan tagon li renkontis Marie dum la festo de princo Poniatowski. Kiam ŝi estis nomita al li, li haltis antaŭ ŝi, dum ŝi klinis la kapon, kaj prononcis frazon, kiun ŝi en ŝia konfuzeco, ne aŭdis. Kaj li pasis. Dufoje li returnis sin, kvazaŭ li volus memorteni la bildon de tiu fragila, tre malpeza virino, ornamita per la koloroj de Pollando, kaj kiu tenis manon sur sia koro por kvietigi ĝiajn batojn.

« Kiu ŝi estas ? » demandis Napoleono.

*
* *

Marie estis nakiĝinta Laczinska, el la plej pura Pola sango, ne fama, sed nobela ekde kvar aŭ kvin jarcentoj. Ŝia familio estis malriĉa. La patro mortis juna, kaj la eta bieno produktis apenaŭ sufiĉe por vivteni la patrion kaj ŝiajn ses infanojn, kiuj loĝis sur ĝi.

Je ŝia dek-kvina jaro Marie forlasis la pensionaton, kie li lernis la Francan lingvon, iom da muziko kaj dancadon. Ŝi estis timida, obeema, sufiĉe romantika kaj tre pia. Ŝia pieco dividiĝis en du kultojn : tiu de Dio kaj tiu de la rompita patrio, kiu ne plu estis ŝtato. Eble Marie estus enirinta en monaĥinejon, se oni estus lasinta ŝin agi laŭ ŝia inklino. Sed la patrino mal-juniĝis kaj bezonis helpon.

Granda sinjoro de la regiono, kiu rimarkis ŝin, petis ŝian manon. Sed la pretendanto, grafo Anastasio Walewski, jam havis pli ol sesdek jarojn. La geedziĝo estis tamen konkludita. La Walewski-oj, branĉo de la familio Colonna en Romo, estas unu el la princaj domoj en Pollando kiuj posedis tie terojn kaj arbarojn de la grandeco de provinco. La sinjorino Laczinska estis fascinita, sed ne Marie. Ŝi rezistis, petegis, ploris kaj nur cedis, ĉar ŝia patrino estis kaptita de febro, kiun ŝi atribuis al la malĝojo, kiun kaŭzis al ŝi ŝia filino. Kaj Marie rezignaciis.

La unuaj jaroj de tiu geedzeco estis dolĉaj sed malgajaj. Retiriĝinte en la kastelo de Walewice, la juna virino legis, vizitis la malriculojn, servis kiel sekretariino sian edzon, la grafon, kiu estis honesta viro kun striktaj moraj principoj kaj tre fervora patrioto, sed li montris sin bona por ŝi. Ili pasigis sian vivon sen ia gajeco kaj kun malmulte da distraĵoj. La Walewski-oj ne akceptis amikojn kaj ne eliris en la mondumon ekde la partigo de Pollando. Necesis la alveno de Napoleono, por ke la grafo remalfermis sian domon en Varsovio.

*
* *

Ĉe sia ellitiĝo Marie ricevis alian mesaĝon. Ŝi ne rompis la sigilon kaj igis reporti ĝin al la sendinto sen respondo. Sed la sonorilo de ŝia pordo ĉiam denove resonis. La vizitantoj sukcesis sin kaj plenigis la atendejon : Jozef Poniatowski, la plej famaj magnatoj, tiam Talleyrand, Duroc, Maret, Savary... Ŝi volis ricevi neniun. Ŝia edzo petis, ke almenaŭ la Poloj estu allasataj. Ŝi akceptis ricevi por kelkaj momentoj princon Joseph. La grafo lasis ilin solaj.

La granda heroo de la sendependeca milito Tadeo Kosciuszko⁸ havis preskaŭ kvindek jarojn. Li estas granda kaj dika viro kun ruĝa vizaĝo, sufiĉe batalema, kiu ne konsideris la pudoron de la virino. Ĝis tiam Marie vidis lin nur sub tiu fanfarona aspekto.

Unufoje ŝi akceptis en tiu mateno personon kun digna sinteno : politikiston. Li parolis al ŝi modere, sed firme, pri la neceso por ĉiuj Poloj plaĉi en ĉio al la antaŭdestinita persono, kiu povus revivigi ilian patrion. Ŝi ŝajnis ne kompreni. Li insistis, varme pentris la suferojn

⁸ La heroo de la Pola epopeo « Pan Tadeusz », verkita de Adam Mickiewicz kaj esperantigita de Antoni Grabowski sub la titolo « Sinjoro Tadeo »..

de la popolo kaj ĝian ekstazan esperon esti liberigita. Por fini li malfaldis petegon subskribitan de li kaj de la membroj de la provizora registaro, en kiu oni petegis ŝin, naive kaj krude, ne rezisti al la deziroj de Napoleono Bonaparte:

Sinjorino, malgrandaj aferoj ofte havas grandajn sekvojn. La virinoj ĉiam havas grandan influon sur la politiko de la mondo. La historio de la plej fora estinta tempo, kiel tiu de la moderna tempo, certigas nin pri tiu vero. Tiel longe ke pasioj regas la virojn, vi, sinjorinoj, estos unu el la plej fortaj popoloj.

Ĉu vi kredas, ke Esther donis sin al Assuero pro amonto? Ĉu la timo kiun li enspiris al ŝi, tiel ke ŝi svenis antaŭ liaj okuloj, ne estis la pruvo, ke tenereco ludis nenian rolon en tiu unio? Ŝi oferis sin por savi sian popolon, kaj ŝi spertis la gloron savi sin mem.

Fariĝu, ke ni povos diri la samon por via gloro kaj feliĉeco!

Kiujn sentojn tiu eksterordinara petskribo de la plej grandaj viroj de ŝia lando povis naski en la koro de virino de dek ok jaroj, kiu estis sola, sen konsilisto, sed pasia patriotino? Oni certigis ŝin, ke la feliĉeco de la Pola popolo dependis nur de ŝi. Ŝia virteco tamen ne konfuziĝis. Ŝi forsendis Poniatowski kun malklaraj vortoj. Li foriris, ricevinte nur la promeson iri la saman vesperon al vespermanĝo ĉe Talleyrand, kien, laŭ Poniatowski, Napoleono nur irus, se ŝi estus tie. »

Kiam ŝi alvenis, la imperiestro jam ĉeestis. Li venis al ŝi, gracie salutis ŝin, kondukis ŝin al seĝo kaj, starante, petis de ŝi novaĵojn pri ŝia familio.

«Oni kredigis min, sinjorino, ke vi malsanetas. Mi ĝojas povi konstati, ke vi resaniĝis. » Tiu dolĉeco, tiu kurtezeco ravis ŝin. Ŝi trankviliĝis. Ĉe la tablo ŝi estis preskaŭ gaja. Sidanta apud Duroc, fronte al Napoleono, ŝi aŭskultis kun bateganta koro, kiel la imperiestro parolas pri Pollando, metis demandojn pri ĝia historio. Ŝi forturnis la okulojn, kiam ŝi renkontis la liajn, kiuj estis animita per stranga ardo. La manĝo daŭris mallonge. Baldaŭ Napoleono leviĝis kaj, prezentante manon al Marie, rekondukis ŝin en la salonon. Poste li foriris, kaj oni ne plu vidis lin la tutan vesperon. Sed reaperis Duroc, la konfidenculo de la granda viro, kiu traktis ŝin kun respektoplena kortezeco kaj ne ofendis ŝin. Oni konspiris, lasante ilin sen atestantoj... La grandmarŝalo decidis fidele plenumi sian taskon.

Grava kaj nobla, li diris al Marie, ke Napoleono pensis nur pri ŝi, ke nur ŝi povas redoni ripozon al lia menso, kiu estas superŝarĝita per zorgoj. Kion li deziris de ŝi? Amikecon, konfidon. Lia gloro estis soleca. Li, Duroc, kiu bone konis lin, povis respondi, ke li estas digna inspiri veran amikecon al malavara koro, kaj ke li repagos ĝin.

Li donis al ŝi leteron de la imperiestro. Kiam ŝi rifuzis akcepti ĝin, li malfermis ĝin kaj mallaŭte voĉlegis ĝin al ŝi:

Estas momentoj, kiam tro de plialtiĝo pezas, kaj tion mi spertas nun. Kiel kontentigi la bezonon de enamiĝinta koro, kiu volus ĵeti sin antaŭ viajn piedojn? Ho! Se vi volus! Nur vi sola povas forigi la obstaklojn kiuj separas nin. Mia amiko Duroc plifaciligos la rimedojn.

«Ho, venu, venu! Ĉiuj viaj deziroj estos kontentigitaj. Via patrio estos pli kara al mi, se vi kompatos mian povran koron. N.

Tiuj vortoj brulis en ŝi. Do estis vere kion oni ripetis al ŝi, ke Napoleono interesiĝis nur pri Pollando, se ŝi liveris sin al li! Li mem skribis tion... Ŝi metis sian kapon en siajn manojn kaj longe pripensis. Kiam ŝi relevis la fruntan kaj rigardis Duroc, speco de transformo prilumis ŝian vizaĝon. Ŝi konsentis: ŝi estis oferonta sin. Sed kiam la grandmarŝalo forlasis ŝin por averti la imperiestron, ŝi komencis plorigi.

Proksimume horon ŝi restis sola. Ĉirkaŭ ŝi ĉiu bruo mutiĝis. La malforte prilumita salono ŝajnis plena je sufoka aero. Ŝi malfermis fenestron, kaj longe, kurbiĝinte super la fenestrobreto inspiris la nokton aeron, vidante la festantan Varsovion: la popolon kiu dancis ĉe la vojkruciĝoj en la lumo de torĉoj...

Subite Duroc revenis. Li metis sur ŝin peltaĵon kaj prenis ŝin per la mano. La imperiestro estis atendanta ŝin en la Granda Palaco. Ŝi diris nenion, sed sekvis lin per aŭtomataj paŝoj. Ŝi enpaŝis lian veturilon, kvaronhoron poste elpaŝis ĝin kaj penetris en imensan galerion ornamitan per pentraĵoj, tiam en salonon. Si lasis sin fali sur seĝon. Pordo malfermiĝis, viro envenis, surgenuiĝis antaŭ ŝi kaj pasie kisis ŝiajn manojn. Estis Napoleono.

Li dankis ŝin pro tio ke ŝi venis, kredis je li kaj konsentis malpezigi per ŝia ĉeesto sian vivon plenan je aferoj kaj luktado, kiuj ofte superŝutis lin... Li releviĝis, deprenis ŝian peltaĵon kaj ŝian vualon, sidiĝis apud ŝin, tiam kliniĝis kaj provis kisi ŝian vizaĝon. Per salto ŝi leviĝis kaj kuris al la pordo. Sed li estis tie antaŭ ŝi, turnis la ŝlosilon kaj metis ĝin en sian poŝon. Tiam

preskaŭ portante ŝin, li rekondukis ŝin al kanapo.

Li estis konsternita. Kutimiĝinte al komplezoj, al rapidaj kapitulacoj, li unue pensis, ke li havas aferon al ruzulino, decidita kare vendisian malvenkon. Sed la larmoj, kiuj fluis sur ŝiaj palaj vangoj, la suspiroj, kiuj konvulse levis ŝian puran bruston, ŝajnis tiel sinceraj, ke li sentis sin kaptita de kompatado por ŝi. Li fariĝis preskaŭ patreca. Li demandas ŝin de kiu familio ŝi devenis, kie ŝi estis edukita, kial ŝi edziniĝis al maljunulo. Komence ŝi ne respondis. Tiam, ĉar la tono de la interparolo trankviligis ŝin, ŝi balbutis kelkajn vortojn, kiuj permesis diveni la malvarmon de ŝia vivo.

Poste li parolis pri si mem, animita de tiu aparta elokventeco, kiun li ofte trovis en sia privata vivo. Li rakontis pri sia infaneco en Ajaccio, liaj unuaj revoj, la malriĉeco de sia familio, lia malgaja alveno en Francio. Interesata kaj dominata ŝi atente aŭskultis. Subite oni aŭdis gratadon sur la pordo.

«Estas nia amiko Duroc, » murmuris la imperiestro. Ni devas forlasi nin. »

Kun preskaŭ virina zorgemo li envolvis ŝin en ŝian mantelon, kovris ŝian kapon per la vualo kaj, ĉe la pordo, venkante ŝian reziston, premis ŝin sur sian koron.

«Iru, mia kara Marie, » li diris. « Ne timu min. Mi tute estas via, sed mi estos pacienca, mi atentos ĝis vi konfidos al mi vian sorton. Revenu morgaŭ en la sama horo. Promesu al mi tion. »

Ŝi promesis tion. Tiu intervidado igis ŝin denove esperi, ke Napoleono kontentiĝos per iomete tenera amikeco. Sed lia delikata afaebleco flatis ŝian virinan vantecon, kiel ajn malmulte da ĝi ŝi havis.

Ĉe ŝia vekigo la morgaŭon ŝi ricevis letere-ton kaj kofreton. Ŝi legis la leteron :

«Marie, mia dolĉa Marie, mia unua penso estas por vi, mia unua deziro estas revidi vin. Vi revenos, ĉu ne ? Vi promesis tion al mi. Se ne la agloflugos al vi. Bonvolu akcepti tiun bukedon : ĝi fariĝu mistera ligo, kiu establos inter ni sekretan rilaton, kiam ni troviĝos ĉirkaŭitaj de homamaso. Elmetitaj al la rigardoj de la homamaso, ni povos kompreni nin. Kiam mia mano premas mian koron, vi scios ke ĝi estas tute okupita de vi, kaj por respondi vi premos la bukedon. Amu min, mia aminda Marie, kaj via mano ne forlasu vian bukedon. N.

Tiam ŝi malfermis la kofreton. Ĝi enhavis, en belega juvelujo farita el blanka ledo semita per abeloj, bukedon de lekantoj kaj viburnoj faritaj

el smeraldoj kaj diamantoj. Marie remetis la bukedon en la juvelujon kaj resendis ĝin zorge sigelitan al la grandmarŝalo.

Unu horon poste Duroc prezentis sin en la hotelo Waleski. La grafino ricevis lin kun riproĉoj. Ĉu oni volis ofendi ŝin donacante al ŝi juvelojn. Kio ŝi atendis de la imperiestro, tio ne estis juvelojn, sed la resurekto de ŝia lando.

Duroc, embarasita, respondis, ke Napoleono jam komencis liberigi Pollandon, sed ke tio estis longa tasko kaj ke li bezonis kuraĝigon. Li petis Marie akcepti la altvalorajn ŝtonojn, kiuj en la okuloj de la Imperiestro estis nur sensignifa galantaĵo. Sed sinjorino Walewska kategorie rifuzis kaj deklaris, ke, se oni insistis, ŝi avertus sian edzon, kvankam li malsanis kaj devis resti en la lito. La grandmarŝalo retiris sin konsternita. Li estis honesta viro kaj malŝategis la rolon de intervenanto kiun Napoleono asignis al li. Sed la imperiestro apelaciis al lia amikeco. Kaj kiam Napoleono tiel parolis al Duroc, li povus obteni de Duroc, ke tiu ĉi irus ĝis la fino de la mondo sur la genuoj.

La imperiestro revenis la vesperon je la deka, kaj, kiel la unua fojo, li igis veturigi Marie al la Granda Palaco en sia veturilo kun mallevitaj kurtenoj.

Napoleono akceptis ŝin malbonhumore.

«Vi ne komprenis min, Marie... Vi ofendis min, rifuzante la florojn.»

«Siro, » ŝi diris dolĉe, sed kun firmeco, kiu mirigis lin de tiel juna buŝo, «mi akceptus kun ĝojo verajn, simplajn florojn, sed ne diamantajn florojn. »

«Kial ? Kial do? »

Li balbutis pro eksciteco. Lia longe regata malpacienco bolis en li, serĉante elirejon. Marŝante tien kaj reen antaŭ Marie, kiu klinis la kapon, li akuzis ŝin:

«Ĉu vi ne akceptis miajn unuajn omaĝojn ? Ĉu vi ne promesis al mi vian amikecon ? Kaj nun vi malproksimiĝas de mi... Ĉu vi pri-mokas Napoleonon ? Estu singarda...Pri tio kion mi pretas fari por vi, por vi sola, vi aŭdas, mi ankoraŭ povas rezigni. Relevi Pollandon ne estas parto de miaj politikaj planoj. La deziroj de la Poloj estas egalaj al mi. Ili estas leĝermensa, orgojla popolo, je kiu mi ne povas kalkuli. Forpreni ĝin al la Rusoj, la Prusoj kaj la Aŭstroj, ĉu tio interesas min, ĉu tiu interesus Francion ? Ĉu tio valoras la lacegon kaj la sangon de miaj soldatoj ? Nur por plaĉi al vi, por kontentigi vin mi decidis fari tion. Sed vi havas malfortan koron, kaj vi ne amas vian patrimon, ĉar vi povas oferi nenion por ĝi. Kaj kia

ofero ? Ĉu ĝi estas tiel granda ? Ĉu mi estas do abomeninda ?... Vi diras nenion, vi obstinas en via falsa honoro. Nu, estu tiel, reiru al via maljuna edzo, kiu ne amas vin kaj kiun vi ne amas. Foriru kun viaj antaŭjuĝoj, viaj folaj monaĥejaj ideoj. Por vi ili anstataŭu amon, ili servu vin kiel patrio: vi restos Pru-sino. Plaĉu al Dio, ke poste vi ne havu rimor-son kaj ke via popolo kaj viaj infanoj ne malbenu vin, ĉar vi oferis ilin al via mallarĝa virto... Nu, kion vi atendas ? Foriru... »

Lia voĉo resonis dure pro la emocio, kiu revenis ĉiumomente. Senmove, ne kapabla prononci unu solan silabon aŭ fari geston, ŝi eltenis teruran agonion. Fine tiuj riproĉoj, tiuj minacoj, tiu impetego malaperigis ne ŝian kuraĝon, sed ŝiajn fortojn. Malforte ŝi ŝrumpis en sia fotelo kaj lasis fali sian senkoloran kapon kontraŭ la dorson.

Napoleono kuris al ŝi, prenis ŝin inter siaj brakoj kaj kovris ŝin per kisoj. Ŝi svenis, apenaŭ spirante. Li metis ŝin sur kanapon, kaj kuntrenita de la deziro posedi ŝin, kiun li havis jam de multaj tagoj, kaj ne povante venki la fajron en siaj venoj, li plenumis la certe neantaŭplanitan malnoblaĵon, kiun li poste bedaŭris : li prenis ŝin...

Kiam ŝi rekonsciiĝis, kaj pro la timigita mieno de Napoleono kaj la vortoj kiujn li murmuris por ekskuzi sian deliron, ŝi subite komprenis, kio okazis.

Ŝi trovis lin malalloga. Ŝi forpuŝis lin per ambaŭ manoj, ĝemis kiel vundita infano kaj, duone sinkinte en la kusenoj, ŝi ekploris. Dikaj, varmoj larmoj falis sur ŝiajn vangojn kaj fluis sur ŝian robon. Nuligita, malespera, ŝi ne forviŝis ilin. Apud ŝi Napoleono, penetrita per nekonata angoro, senĉese alparolis ŝin per rompita voĉo:

«Marie, Marie, respondu min... Viaj larmoj mortigas min. Rigardu Napoleonon: li estas via amiko. Neniam vi estis pli kara por li... Marie, aŭskultu min : mi donus mian vivon por povi reiri al hieraŭ. Pardonu al mi la eksceson de mia amo. Nur ĝi ŝuldas pro tio. Ve, estas momentoj kiam mi ne konas min mem. Mia sango brulas kun sovaĝa ardo. Sed mi ĵuras al vi, mi faros nenion plu kio povus malplaĉi al vi. Mi submetas min al via volo... Nun mi scias, kiel nobla kaj pura estas via koro...»

Ŝi ne respondis.

«Pro amo al vi, Marie, mi amos vian patrion, mi defendos ĝiajn rajtojn, mi redonos al ĝi sian gloron. Eĉ se milionoj da homoj dankas al vi

sian liberecon, estos ankoraŭ juste repuŝi min kaj malami min !... »

Ŝi ankoraŭ ĉiam ploris. Kaj li, la mastro de granda imperio, timigita de tiu doloro, ne plu kuraĝis tuŝi ŝin per la manoj...

Kelkaj horoj tiel pasis. Plurfoje Duroc gratis sur la pordo, sed ĝi restis fermita. Napoleono ne povis forŝiri ŝin de tiu doloriga rendezvo. Sed la tago estis komenonta. Necesis foriri. Helpate de Duroc, la imperiestro relevis Marie, portis ŝin al sia veturilo kaj akompanis sin al ŝia domo, sen ke ŝi ŝajnis sentema al la premo de liaj manoj aŭ al lia kortuŝa adiaŭo.

Dum tuta semajno Napoleono atendis ŝin ĉiuvespere, sed ŝi ne revenis. Duroc, kiu iris viziti ŝin, eĉ ne rajtis vidi ŝin. Ŝi ekskuzis sin ĉe ĉiu festo kaj ricevis nenian viziton. Enfermita en sia ĉambro, ŝi ploris, preĝis, ape-naŭ manĝis, malespere pensante pri sia singlardecon akcepti viziti Napoleonon, centfoje preta ĵeti sin antaŭ la piedojn de la grafo, sed retenis sin, ĉar ŝi hontis fari tiun konfesion. Unu sola espero subtenis ŝin. La imperiestro ŝuldis al ŝi la prezon de ŝia virina honoro. Li promesis pagi sian ŝuldon reanimante ŝian patrion. Tiam, sed nur tiam, ŝi estus pardononta lin.

Sendube Napoleono komprenis, ke li estis revidonta ŝin nur sub tiu kondiĉo, ĉar ekde tiam li komencis orientigi sian politikon al la laŭgrada restaŭro de Pollando: regula registaro estis instalita, ŝtatkonsilantaro kaj ministroj estis nomumitaj... Ankoraŭ pli: Napoleono formis la kernon de Pola armeo, en kiun eniris la junularo de la tri liberigitaj provincoj, kaj la famaj flagoj de antaŭ la partigoj, eliris el siaj pias kaŝejoj kaj denove flirtis super la regimentoj de lancistoj, dragonoj, leĝera kavalerio metitaj sub la komando de Poniatowski.

Kiam ŝi eksciis tion, kio certe estis nur paŝo, embrio elmetita al la hazardoj de la milito, sed kio montris, ke la imperiestro ne forgesis sian promeson, Marie sentis iom post iom reveni sian trankvilecon. Kaj denove ŝi povis pensi pri Napoleono sen kolero.

Ŝi estis en tiu stato de mensa ripozo, kiam ŝia maljuna ĉambristino Daŝa venis iuvespere anonci al ŝi, ke la grandmarŝalo kaj alia oficiro venis, tiel rompante la interkonsenton.

«Lasu ilin eniri,» ŝi tamen diris.

Ĉe la pordo, Duroc kliniĝis antaŭ sia kompano. Tiu ĉi demetis sian ĉapelon kaj sian mantelon. Estis Napoleono.

«Ĉu vu ĉi tie?» ŝi demandis lin per tremetanta voĉo.

«Mi devas veni al vi, Marie, ĉar vi ne plu venas ĉe min. Ĉu vi kredis, ke mi povos forgesi vin? Sed mi daŭre pensas pri vi... Cetere, vi certe estas kontenta pri mi, ĉar mi faris ĉion kio povus plaĉi al vi.»

Kaj starante ankoraŭ pli proksime, li aldiris:

«Ĉu vi ankoraŭ koleras kontraŭ mi?»

Ŝi etendis al li la manon.

Li prenis sian fajnan kaj delikate vejnititan manon kaj premis ĝin sur sian koron.

Ŝi paliĝis ĉe tiu tenera gesto tiel neatendata de Napoleono kaj fermis la okulojn... Duroc diskrete retiriĝis. Ekde tiam Napoleono venis ĉiutage. Grafo Walewski estis forlasinta Varsovion por viziti siajn posedaĵojn en Poznanio, damaĝitaj de la prusaj trupoj. Maltrankvila kaj kaj obsedita de konscienciproĉoj, Marie ne rifuzis la karesojn de sia amanto, kiu, provante trankviligi ŝin, fariĝis preskaŭ timida antaŭ ŝi.

Dum la du semajnoj kiuj pasis antaŭ sia foriro al la armeo, li pli okupiĝis pri Marie ol pri siaj militistaj planoj, kaj ofte Duroc trovis

lin kun la kapo en la manoj, antaŭ mapon, kiun li ne vidis, pensante pri la virino, kiu estis penetranta en lian koron per la plej simpla vojo.

Li petis ŝin ĉeesti ankoraŭ kelkajn akceptojn. Li volis vidi ŝin en la brilo de ŝia juneco kaj beleco sub la lumoj de la palaco. Ŝia gracio, ŝia rideto estis dolĉaj por li, dum li plenumis la ofte pezajn devojn de la imperiestra funkcio. Ŝi konsentis, kvankam kontraŭvole. La tro respektoplena akcepto per la Pola nobelaro, ĝia diskreta entuziasmo, kiu deziris fari el ŝi modernan Esther, plenigis ŝin per konfuzo. Ĉiuj traktis ŝin kiel suvereninon. La fratinoj de ŝia edzo, princino Jablonska kaj grafino Bir-genska estis inter la unuaj grandaj damoj de Varsovio, kiuj ĉirkaŭis ĝin per honoroj, laŭdis ŝian konduton, sed ne por defendi ŝin, ĉar ŝia gusto de sinoferado kaj tio kion oni sciis pri ŝia sekreta doloro, malarmis eĉ la ĵaluzulinojn.

Intertempe la rusaj trupoj sub Beningsen kolektiĝis en orienta Prusio. Napoleono volis, meze de la vintro, frapi neatendatan baton kiu kapablis fini la militiron, kaj li donis la ordonon al la armeo komenci marŝi

La lasta renkonto kun Marie estis plena je plena sindono. Li forlasis ŝin kun bedaŭro, sed li iris batali por ŝi. Temis pri la sorto de Pollando. Se li venkus, kion li atendis, li dediĉus la konkeritajn laŭrojn al ŝi. Li promesis sendi ĉiutage kurieron al ŝi. Ŝi dankis lin kun emocio. Post kiam li premis ŝin lastfoje inter siaj brakoj kaj forlasis la palacon, ŝi sentis, kiom, malgraŭ ĉio, ŝi korligris ŝin je li. Kaj en

siajn preĝojn, kion ŝi ankoraŭ neniam faris, ŝi enmetis la nomon de Napoleono.

La unuaj kurieroj alportis nur novaĵoj de sukcesoj. En ĉiuj kontaktoj la Francoj triumfis. Granda batalo estis proksima: la batalo apud Eylau. Beningsen eltenis dum dek du horoj la furiozajn atakojn de la Francoj kondukataj de Bessières kaj Davoust. Fine, je la oka vespere, la brulantaj torĉoj en la Franca linio prilumis la retiriĝon de la Rusoj kaj imensan bataalkampon prisemitaj de mortigitoj, kiujn jam kovris neĝo.

Tamen la *Te Deum* ordonita de Napoleono estis kantata sen ĝojo en la Polaj preĝejoj. Malgraŭ la asertoj de la bultenoj, la afero estis nedecidita. La venko ne finis la militon. Sed oni devis nun retiriĝi en la vintrajn loĝejoj, reformi la trupojn kaj prokrasti la decidan batalon ĝis poste.

Marie Walewska ne estis avertita per kuriero ĉi-foje. Estis Duroc mem kiu prezentis sin antaŭ ŝi. La imperiestro, kiu instalas sin en Finckenstein, atendante la momenton, kiam li povos repreni la operaciojn, sendis lin venigi ŝin. Li estis moroza, iritebla kaj ne povis, li diris, vivi sen ŝi. La grandmarŝalo, kiu estis la sincereco personiĝinta, tamen ne kolorigis la aferojn. Por li la batalo apud Eylau estis malsukceso. Kaj tiel malproksime de siaj bazoj dum li havis antaŭ si la nepenetreblan Rusion, kie kolektiĝis por ĵeti sin sur lin en la printempo nekonatan batalantaron, Napoleono estis kaptita de maltrankvilo la unuan fojon en sia vivo.

Per la batado de sia koro Marie komprenis, ke ŝi ne povis rezisti al la petego de Napoleono. Al la venkisto ŝi certe estus rifuzinta, ĉar foriri tiel el Varsovio, estus forlasi por ĉiam sian domon kaj publike montri sian mal-honoron.

Sed malfeliĉa, Napoleono estis nerezistebla por ŝi. Ŝi tuj faris decidon kaj diris al Duroc, ke la morgaŭon ŝi estos preta sekvi lin. Tiam ŝi iris al sia edzo, la grafo.

Ŝi tute ne hezitis plenumi tiun decidan paŝon. Iom de la dolora ĝojo de martirino ravis sian animon, kaj ankaŭ la sento, ke ŝia konfeso parte forviŝus sian eraron.

Ŝi parolis al la konsternita maljunulo, kiu suspektis nenion. Ŝi humile diris ĉion per tremetanta voĉo:

“Sinjoro, mi petas vin aŭskulti min, kiel vi aŭskultus la lastan de viaj servistoj, se li venus peti vian pardonon. Jam antaŭe mi submetas min al tio kion vi ordonos al mi. Ne plu vidu en mi vian edzinon, sed la plej mizeran kreitulinon... Mi pekis kontraŭ vi, kontraŭ mi mem kaj kontraŭ Dio... Mi malobservis la sanktajn

komandojn kaj sordidigis la purecon de mia korpo... La imperiestro volis, ke mi apartenu al li. Mi ne cedis pro orgojo aŭ amo, mi prenas la anĝelojn kiel atestantojn, sed mi estis nesingarda, mi estis malforta... Kaj ofe-rante min mem, mi kredis liberigi nian patron.

Tiam ŝi metis sin sur la genuojn kaj atendis lian verdikton.

La grafo, kiu surhavis hejmvestaĵon, sidis en sia fotelo, kaj lia vizaĝo esprimis imensan malgojon. Li longe silentis. Fine li diris:

«Releviĝu, Marie, kaj lasi min. Mi bezonas esti sola. Mi igas vin voki.»

Ŝi iris al ŝia ĉambro kaj atendis pli ol horon, dum kiu ŝi preĝis.

Venigite de la grafo, ŝi trovis lin en kolero kaj konfesis ĉion al li. Kun miriga digneco li parolis al ŝi kiel vera nobelulo, patrioto kaj kristano.

«Via konfeso multe dolorigas min, Marie. Mi konas vin, kaj mi scias, ke malnobla motivo ne igis vin tiel agi. Eble mi mem meritas riproĉojn. Vi estis tro juna por edziniĝi je mi. Mi lasis vin tute sola. Sed kiuj ajn estas viaj ekskuzoj, vous tamen makulis nian blazonon. Mi ne povas pardoni vin nun. Eble pli malfrue, se la imperiestro plenumas sian promeson...»

«Li plenumos ĝin, » diris Marie.

La grafo skuis la kapon:

«Kion oni scias pri la princoj? Se li tamen plenumos ĝin, kaj se mi vidos Pollandon reunuigita kaj feliĉa – estas via devo atenti pri tio – , mi forgesos, kiun prezon mi devis pagi por ĝi. Mi nek povas nek volas retenigi vin. Estontece niaj vivoj estos separatitaj. Post nelonge mi foriros al Romo, ĉar mia pozicio ĉi tie fariĝis netenebla. Mi lasos al vi Walewice. Mia intendanto ricevos la necesajn ordonojn... Adiaŭ, Marie, mi esperas, ke Dio permesos al mi revidi vin.»

Tiam forta emocio rompita lian voĉon, kaj li permesis al ŝi kisi lian manon, kaj donis al ŝi signon retiriĝi.

La postan tagon Marie forveturis kun Duroc al Finckenstein.

Kun ĝojo Napoleono vidis ŝin alveni. Tiu monato, dum kiu li trovis sin senigita de ŝi, faris el sia deziro veran pasion. Li amis ŝin, ne nur per la pensoj, sed per sia tuta animo, kiel li verŝajne ankoraŭ neniam amis.

Lia sopiro je Joséphine estis estinta violenta. La juna ĉefo de la Itala armeo preskaŭ deliris dum sia fulmanta militiro, pensante pri la Kreolino, kiu la unua kapablis emocii lian koron. Kiam lia ardo malkreskis, li ekkonis la veran Joséphine. Ŝi ne amis lin kaj nur edziniĝis

je li kiel krizaranĝo. Ŝi trompis lin, humiligis lin kaj primokis la ekstazojn de la malgranda generalo. Ankoraŭ antaŭ la Egipta ekspedicio, malgraŭ ilia repaciĝo, estis inter ili nur agrabla interrilatado kun malmultaj revenoj al tenereco, kiuj fariĝis ĉiam pli maloftaj. Reveninte en Francio, li volis divorci ŝin, kaj li nur cedis al la plorado de Hortense kaj Eugène por resti. Ekde tiu momento la familio Bona-parte estis nur fasado.

Joséphine, avertita de sia aĝo, adiaŭis siajn aventurojn. Sed Napoleono ne plu ĝenis sin, kaj damoj de la konsula kortego, aktorinoj, burĝinoj laŭvice distris lin. Supraĵaj rilatoj, eĉ kun sinjorino Duchâtel, fraŭlino Georges kaj Eléonore Delaruelle. Ili amuzis lin, interesis lin, kontentigis lin, sed neniu el ili emociis lin.

Kiam la imperiestro renkontis Marie, li estis nur la amanto de potenco kaj gloro. La juna Polino kun ŝiaj bluaj okuloj konfuzis lian koron, kiu ĝis tiam batis malrapide. Ŝia rezisto al li, ŝia modesteco, ŝia neintereso kaj la pro-funda amo al ŝia patrio, en kiu Napoleono vidis la ĉefan virton, emociis en li la tutan homecon kiu restis ankoraŭ en li. Kiam li estis ĉe ŝi, li instinkte demetis la imperiestron. Por Marie li volis simple esti nur amiko, amanto, kiu volis forgesigi al ŝi ĉion kion ŝi forlasis por li kaj kion en certaj momentoj ŝi bedaŭris.

Ilia monotona vivo en la kaduka kastelo de Finckenstein, kiu gastigis ilin, permesis al Marie, konfuzita per tiom da malagrablaj eventoj, iom post iom retrovi sian mensan ekvilibron. Napoleono forlasis ŝin matene por labori kun Berthier, Maret kaj Savary. Li revenis vespermanĝi kun ŝi. Lia ĉambristo Constant servis ilin ĉe malgranda tablo. Tiam alvenis Duroc, kiu iufoje estis iomete maldelikata, sed fidela... Marie, kiu antaŭe malfidis lin, nun ŝatis lin, aprecis sian koncentritan menson. Li laŭspecigis kun Méneval la poŝtaĵojn de la imperiestro el Francio, kiujn tiu ĉi ne plu vidis, por permesi al li resti pli longe kun Marie.

Tiel pasis la horoj malrapide kaj tran-kvile. Ŝi legis kaj brodis, kaj Napoleono, kiu provizis per rimarkoj la raportojn de siaj minis-troj, ĵetante la dosierojn kaj libretojn sur la plankon proksime de si. Granda fajro de ŝtipoj brulis en la alta fajrejo. Fojfoje Napoleono ekstaris pensema, forpuŝis per la piedo la paperan ŝutaĵon, faris kelkajn paŝojn tien kaj reen, rigardis tra la fenestro la kamparon, kiu kuŝis ankoraŭ sub dika tavolo de neĝo, tiam revenis varmigi siajn ŝuojn, post kio li iris ĉirkaŭbraki Marie.

Ŝi nun estis sentema por liaj atestoj de tene-reco. Ŝi eble ankoraŭ ne amis lin. Sed vivante kun li en tiel streta intimeco, ŝi iom post iom ekkonis lin. Ŝi ankoraŭ admiris lin, sed ŝi sentis sin malpli lia predo. Precipe proksimigis sin al li la momentoj de melankolio, kiuj estis oftaj ĉe Napoleono, dum kiuj li plendis pri la soleco de la homoj kiaj li, pri ilia tiel malofte kontentigita bezono je sekuraj konfido kaj afekcio. Kaj Napoleono, kiu konis ŝin, fojfoje montris sin pli senrevigita, ol li vere estis, por sperti la plezuron vidi ŝin emociiĝi kaj ĵeti sur lin pli tenerajn okulojn.

Tiel pasis aprilo kaj majo, interrompitaj per kelkaj forestoj de la imperiestro, kiu foriris al la antaŭpostenoj. Pluraj bataloj redonis al li sian kutiman memfidon. Dantzig kapitulacis al Lefebvre. La vera militiro estis baldaŭ rekomenciĝonta. La 6-an de junio Napoleono aliĝis al la armeo. Unu plian fojon li frapis la malamikon fulmrapide. La 14-an, la datrevenon de la venko apud Marengo, li frakasis la Rusojn en Friedland. Caro Aleksandro, kiu perdis sian artilerion kaj sian tutan gvardion, fuĝis trans la riveron Njemen. Vespere Napoleono skribis tiun ĉi mallongan letereton al Marie:

Ni venkis la malamikon. Paco estas atendenda. Mi pensas pri vi. Mi amas vin. N.

Paco estis efektive neevitebla. Aleksandro, konsternita de la genio de Napoleono, petis lin pri rendevuo. La pactraktato de Tilsitt estis subskribita de ambaŭ imperiestroj meze sur la rivero Njemen. Aleksandro estontece regos de la Balta maro ĝis la Arĥipelago. Napoleono dominas la Okcidenton... La reĝo de Saksio fariĝis grandduko de Varsovio. Pollando, pro respekto al Rusio, estis nur duone restaŭrita. La duono de ĝia malnovaj provincoj restis Moskvaj aŭ Aŭstraj.

Ĉe tiu novaĵo Marie estis konsternita. Friedland superekcitis sian esperon. Ŝi kredis, ke ŝia revo estos efektivigita. Sed Tilsitt kruele elrevigis ŝin. Ŝia Slava karaktero ekflamiĝis. Ŝi malbenis Napoleonon, kiu trompis ŝin, kaj por akuzi lin kaj rompi kun li por ĉiam ŝi iris al Königsberg.

Dum la tri tagoj kiujn ili pasigis kune Napoleono multobligis siajn afablaĵojn kaj karesojn. Precipe, kion li neniam faris por virino, li eksplikis la aferon, donis siajn politikajn kialojn, malvualis siajn planojn. Por gardi ŝin, por konvinki ŝin, li malkaŝis al ŝi la kaŝitajn motivojn de sia ŝajna modereco.

Li venkis, sed Rusio restis kolosa, potenca malamiko, kaj li mem bezonis pacon kun Rusio.

Li bezonis ĝin por rompi la reziston de Britio. Neniam Aleksandro estus konsentinta pri la kompleta restaŭro de Pollando sub ĝia antikva nomo kaj en ĝiaj historiaj limoj. La granddukejo Varsovio estis la kerno ĉirkaŭ kiu estontece estis algluiĝontaj la ankoraŭ mal-liberaj provincoj. Por esti daŭremaj tiu restaŭro devis esti farita en etapo. Ĉu li ne havis ankoraŭ sufiĉan tempon por fari tio? Necesis kutimigi Eŭropon al la ideo, ke Pollando reprenas sian lokon inter la nacioj. Iom post iom ĝi estis retrovonta sian lokon kaj sian veran aspekton. Marie povis kalkuli je li por realigi tion. La sekureco de la imperio kaj la deziro kontentigi Marie akordiĝis por redoni al ŝi iutage sian patrimon restaŭritan laŭ ĝia malnova bildo.

Per tiuj certigoj kaj promesoj la senreviĝo de Marie fandiĝis. Ŝi denove kredis kaj esperis. Ŝi devis esti pacienca, kaj ŝi volis esti tia. Kie? Ĉu en Pollando, dum Napoleono, repasante tra Germanion, revenis al Francio? Li ne konsentis pri tio. Li volis, ke ŝi akompanos lin. Ŝi defendis ŝin, petante povi reiri al Walewice kaj vivi tie retiriĝinta. Tiam unu el liaj subitaj kaj violentaj koleroj kaptis Napoleonon. Li prenis ŝiajn manradikojn kaj kriis per brutala voĉo:

«Vi venos, vi devas veni, mi postulas tion!»

Poste kun larmoj en la okuloj, li aldiris:

«Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas, ke mi ne plu povas vivi sen vi?»

Unu plian fojon ŝi cedis. Tiam ŝi pasigis kelkajn semajnojn ĉe ŝia patrino, dum la imperiestro vizitis Nord-Italion, kie oni atendis lin. Post tio ŝi estis venonta al Francio. Napoleono igis ŝin ĵuri sur kruco.

Tio ne necesis.

Ŝi estis venonta, ĉar nun ŝi amis lin. Ŝi, kiu tiom timis lin, kiu eltenis lin, esperante ke li reaĉetos sian eraron per heroa ago, ne plu hezitas, ne plu bedaŭras. Sub la fajro de la vortoj kaj la krudaj karesoj de la Korsikano la sango de la filino de la nordo, nova en amo, febrigiĝis. Nun ŝi pasie amas Napoleonon por ĉiam.

Kaj por li estas la plej bela triumfo, scii ke tiu virino, juna kaj tenera, fieraj kaj fidela, kies brakoj tiel dolĉe ĉirkaŭprenas lian nukon, ekde nun estas lia, tute volonte, sen kalkulo, sen ambicio, volante vidi nur lin kaj dependi nur de liaj deziroj.

Kiom li amas ŝin! Kiom li ĉiam amos ŝin! Li kiu havas ĉion, sed ankoraŭ ne tion, kaj kiu eĉ malesperis povi konkeri la junan virinon, nun sentas, kiam li rigardas Marie, supreniri en sian tiel ordigitan, fortan kapon, specon de ebrico ...

III. Fouché

Kelkajn tagojn post la akcepto en la palaco Tuilerioj, Marie, jam vestita, kvankam estis nur la dek-unua horo, sigelis letereton por la imperiestro, kiu komunikis al ŝi, ke li povos vidi ŝin nur la morgaŭon. Ne tre for de ŝi, en speco de granda duoncirkla niĉo en la muro, sur sofo kovrita per belegaj blankaj ursaj feloj, kuŝis princino Pauline, ŝia gastigantino kaj amikino, vestita per multkoloraj muslinoj kaj la kapo ankoraŭ kovrita de la nokta punto.

Ŝi estis en siaj tagoj de kapricoj, ĵurante, ke ŝi ne povas meti unu piedon antaŭ la alian, sed tamen kaptita de la deziro vidi homojn kaj babili... Ŝi igis sin porti ĉe Marie en la port-seĝo de sia apartamento, kaj jam tutan horon dum kiu ŝi estis tie, gaje babilis, konfidante al sinjorino Walewska, kiu aŭskultis nur per duona orelo, cent plaĉajn historietojn pri la kortego kaj Parizo.

Pli afekta en sia sinadaptado kaj fantazioj ol princino de malnova nobela familio, pli apatia ol la Kreolino, Pauline kurioze kontaktis kun Marie, kiu, laŭ Napoleono, estis 'simpla kaj kuraĝa kiel unu el liaj grenadistoj'. Sed al ambaŭ plaĉis esti kune. Malgraŭ siaj kapricoj la Alteco kapablis ĝuste taksi verajn sentojn, kaj Marie divenis, kiom da grandanimeco kaj kuraĝo povas enhavi la koro de la dorlotita infano de la Bonapart-oj.

La buduaro, en kiu ili troviĝis, dekorita de Fontaine, meblita de Jacob, kiel la resto de la hotelo, montris nevidatan lukson : muroj tegitaj per karmelita silko kun arĝentaj kronoj, seĝoj en amaranta ligno inkrustitaj per eburo kaj bronzo, tapiŝoj teksitaj en la Savonnerie laŭ desegnaĵoj de Pauline – feliĉe plibonigitaj de pli bona artisto. En la speguloj, dismetitaj sur dek lokojn, reflektiĝis la agrabla lumo de la du altaj fenestroj, kiuj permesis ĵeti rigardon sur belan parkon kun arboj, kies senfoliaj pintoj supreniris en la delikate bluan ĉielon.

Estis tre varme en la buduaro. La fajrejo, plenigita per aroma ligno, ruĝis. Ĉiuj Bonapart-oj estis frostotimaj, kaj Pauline ankoraŭ pli ol la aliaj. Ŝi ne forlasis sian varmakbovezikon, donacon de Canouville, kiu, sur la ruĝo de la recipiente kuraĝis gravurigi du sin bekantajn gekolombojn.

Oni gratis sur la pordo, laŭ la etiketo en la imperiestraj palacoj. La maljuna Daŝa, la fidela ĉambristino de Marie, kiu sekvis ŝin, kiam ŝi

forlasis Pollandon, duone malfermis la pordon, kaj, interŝanĝinte kelkajn vortojn kun lakeo, iris al ŝia mastrino.

«La ministro de la polico igas demandi, ĉu via Ekscelenco povus permesi al li interparoladon.»

«Ĉu Fouché ? » ekkriis princino Borghese. «Kion li venas fari ĉi tie ? »

«Eble la imperiestro sendis lin. Ĉu via Alteco permesas, ke mi akceptu lin ? »

«Si, si, » respondis Pauline, kiu diris nur la Italan vorton por 'oui' (jes). «Vi devas akcepti lin, Marie. Li tro gravas, por ke oni forsendu lin. Li scias tiom da aferoj, kaj li havas tiel grandan infuon sur la imperiestro, ke oni devas bone rilati kun lin. Mi mem traktas lin kun respekto, kvankam mi ne ŝatas lin. Akceptu lin ĉi-apude en la malgranda salono. Ne fermu la pordon. De kie mi estas, mi povos aŭdi lin, mi esperas. Sed atentu kaj estu singarda kun tio kion vi diras al li.»

Post tio, lacigita per tiu penado, ŝi gapis kaj denove etendiĝis sur la ursofelojn.

La ministro de la polico prezentis sin en malstrikta maniero, kiel amiko, ankoraŭ ne familiare, sed kiel iu kiu deziras konkeri.

«Sinjorino, » li diris, «mi venis doni al vi raporton pir la misio, kiun la imperiestro kaj vi konfidis al mi. Mi trovis, mi kredas, hotelon kiu konvenas al viaj deziroj kaj tiuj de la imperiestro.»

«Ha jes,» diris Marie, «mi forgesis tion.

Fouché ridetis. Lia rideto similis pli al rapida grimaco.

«Vi forgesas tro facile, Sinjorino, kio gravas por via sekureco... Feliĉe la Imperiestro ne forgesas vin, kaj ankaŭ ne liaj amikoj, – mi kredas, ke mi estas unu el liaj plej bonaj amikoj, kiuj havas la honoron servi vin.»

Marie dankis lin per kapsigno.

«Mi konfuziĝis, ĉar la plej okupita ministro de la imperio forlasis multe pli gravajn aferojn por viziti min.»

«Estu trankvila, Sinjorino, mi neglektas nenian aferon : tio ne estas mia kutimo. Sed mi konfesas, ke tio kio koncernas vin – kaj tial tiom gravas por la imperiestro – inspiras al mi la plej sinceran intereson. La loĝejon kiun mi vizitis, situas laŭlonge de la Chaussée d'Antin en trankvila, sana kvartalo, ĉirkaŭita de ombro-riĉaj parkoj. Estas komforta kaj tre pura domo inter korto kaj ĝardeno, kiu eliras samtempe en la strato Houssaye kaj en malgranda sakstrateto, kie veturiloj povas atendi sen vekati atenton. La imperiestro, al kiu mi parolis hodiaŭ

matene, diris al mi aĉeti ĝin. Sed mi volis antaŭe informi vin kaj koni vian opinion. »

«Kio plaĉas al la imperiestro, ankaŭ plaĉas al mi, » diris Marie, «kaj cetere mi estas certa, ke vi faris bonan elekton. »

«La imperiestro ne vidis ĝin per siaj propraj okuloj, kaj mi povis vidi ĝin nur kiel simpla viro. Multaj detaloj certe eskapis al mi. Estas do al vi, kiu devas honori tiun loĝejon, decidi, ĉu ĝi respondas al viaj deziroj. Se vi permesus tion al mi, mi volonte kondukus vin tien en momento kiu estos agrabla al vi. »

« Sendube respondis Marie, tentata.

« Ankoraŭ ne estas tre malfrue. Miaj ĉevaloj staras antaŭ via pordo. Ĉu plaĉus al vi, ke ni iru nun ? »

Ŝi volonte konsentus al lia propono, amuzite de la neatendata renkonto. Ŝi devis nur ĵeti ŝalon super sian grizan robon. La ideo baldaŭ havi loĝejon, kie ŝi povus vivi sola, multe plaĉis al ŝi. La lukso kiu ĉirkaŭis ŝin en la hotelo Borghese pezis sur ŝin. Kaj kiel ajn gracia kaj bonkora estis Pauline, ŝia babilado, ŝiaj kapricoj, ŝiaj deinaj pozoj ofte tedis ŝin. Ŝi sopiris je la trankvileco en Pollando, en kiu ŝi longe vivis kaj kiun ŝia modesta naturo pli kaj pli deziris, nun ke ŝi estis transportita al mult-homa kaj multforma mondo...

Sed tuj ŝi ekpensis, ke ŝi devas respekti la humoron de ŝia gastigantino. Tial ŝi respondis :

«Mi ne povus fari tion ĉi-matene, Sinjoro. La princino deziras akuratecon ĉe la tagmanĝon kaj mi timas ne esti reveninta ĝustatempe por reaperi tie ĉi.»

«Tiam posttagmeze ?»

«Posttagmeze mi estos libera, kaj tiam mi volonte iros vidi la domon kun vi. »

«Permesu min do, Grafino, veni preni vin je la kvara.»

«Bone, sed ĉu mi ne povus iri tien sola. Mi jam perdis al vi tro da tempo.»

«Mi ne povus utiligi ĝin pli bone ol en via servo. La okazo povi montri al vi mian dediĉitecon kaj admiron estas kara por mi, kredu min, Sinjorino.»

Marie ruĝiĝis.

«Milfojan dankon, Sinjoro, » flustris Marie, «sed se mi dankeme akceptas la dediĉitecon de viro kiel vi, mi ne komprenas, per kio mi povus enspiri al li admiron.»

Tiom da natureco lasis lin senvorta. Li tamen kredis povi savi sin el la situacio per pompa komplimento laŭ la gusto de tiu tempo :

«Ĉu vi ne scias, Sinjorino, ke via beleco imponis la tutan kortegon ?»

Sed ĉar ŝi skuis la kapon sufiĉe malankolie, li komprenis, ke li sekvis malbonan vojon. Tiel li neniam estis akironta ŝian konfidon. Tial, uzante sincerecon kaj bonkorecon, kiuj estis liaj preferataj atutoj kaj kiuj, venante de tiel forta viro, samtempe mirigis kaj altiris, li rapidis aldiri :

«Grafino, ĉiakaze sufiĉis al mi vidi vin por senti min altirata al vi per respektoplena simpatio. Akceptante ĝin vi feliĉigus min, kaj mi ĉiam ĝojus esti utila al vi. Kaj se vi havus kontraŭulojn aŭ malamikojn, mi ĵuras al vi, ke ili estos ankaŭ la miaj. »

« Mi dankas vin, Sinjoro, pro viaj tiel bonvolaj intencoj. Ankaŭ vi havos en mi amiki-non. Mi esperas ĝui en Parizo ekziston tiel diskretan, ke ĝi neniam ekscitos ĵaluzecon kaj kalumniadon. »

«Vi estas juna, Sinjorino. Permesu do al preskaŭa maljunulo diri al vi, ke vi malbone konas la mondon, precipe tiun ĉi Jam de du tagoj en la palaco kaj la urbo oni parolas nur pri vi. La imperiestrino estas maltrankvila. En tiu ĉi momento ŝi provas informiĝi pri vi, pri viaj rilatoj, pri viaj planoj. Vi ne povas imagi ĝis kie povas iri ŝia ĵaluzeco. Tiu virino estas la ruzeco mem. Ĉiakaze mi ordigos tion. Ne estas la unua fojo, ke mi metas obstaklon al ŝiaj planoj. Ŝi ne ŝatas min, sed mi ankaŭ ne ŝin, kaj mi jam ofte informis la imperiestron pri la damaĝoj kiujn ŝi kaŭzas per siaj intrigoj. »

Mirigita, sinjorino Walewska aŭskultis la ministron, kiu kuraĝis paroli tiel malkaŝe pri la edzino de sia mastro. La akcepto ĉe Joséphine ofenditis ŝin, sed ŝi ne timis ŝin. Ŝi havis konfidon en Napoleono. Ĉu unu vorto lia ne forviŝis ĉion?

Fouché tamen daŭrigis :

« Ne kredu, grafino, ke mi sentas personan rankoron kontraŭ la imperiestrino. Mi longe ekskuzis ŝin kaj ofte defendis ŝin antaŭ Napoleono. Ankoraŭ pli : mi helpis ŝiajn amikojn kaj parencojn. Sed estis mi kiu preferis rompi. Joséphine ne malgraciis min. Mi libere rompita kun ŝi, ne por servi miajn interesojn, sed tiujn de la imperiestro. Ŝi ne estas la edzino kiu konvenas al li. Morale ŝi havas nek la gravecon kaj la rezerviĝemon, kiuj estas necesaj al ŝia stato. Ŝiaj ŝultroj estas tro mincaj, ŝia kapo tro leĝera por porti la titolon, kiun ŝi havas. Imperiestrino ! Ŝi ne respektas la nomon Bonaparte. »

Tiam Fouché sinkigis sian amaran voĉon, kiu estis nur murmuro :

«Mi ne nur riproĉas al ŝi tion ĉi. Mi batalas kontraŭ ŝi por preciza kaj malferma politika celo. Ŝia ĉeesto sur la trono estas embaraso kaj danĝero por la imperiestro. Ses jarojn pli aĝa ol li, kvankam ŝi provas kaŝi tion, ŝi neniam donos al li heredonton. Sekve de tio la laŭleĝa ordo, establita kun tiom da peno, povos esti endanĝerata ĉiumomente. Ĉar nur unu vivo separas la Burbonojn⁹, kiuj restadas en Mittau kaj Londono, de la Franca trono. Ili ne ĉesas esperi iam esti revokitaj. Por rapidigi la proceson, ili daŭre komplotas kontraŭ Napoleono. La jakobenoj¹⁰ kaj la Angloj imitas ilin por sia propra celo. Senĉese mi forigas tiun danĝeron, sed ĉiam denove ĝi renaskiĝas.»

Marie, kiun tiu akra kritiko pri Joséphine metis en rezervon, tremetis ĉe tiuj ĉi vortoj.

«Ha, Sinjoro,» ŝi diris, «mi ne ĉesis pensi pri tiu konspiro ekde de tiu vespero. Mi parolis pri ĝi kun la imperiestro. Li respondis al mi, ke tio ne gravas. Ĉu estas vere ? »

«Tute ne, grafino, » respondis Fouché grave, «inter ni mi diras, ke tio estas grava. Sed mi aranĝis antaŭrimedojn, kaj la konspirantoj, tuj kiam ili agas, falas en mian reton. Hieraŭ, post kiam la imperiestro donis al mi la ordonon, la tri ĉefoj de la konspiro – ŝuano¹¹ kaj du elmi-grintoj, estis kaptitaj kaj kondukitaj al Vincennes. Militista komisiono juĝos ilin la venontan noktan. Morgaŭ ĉe la tagiĝo ili estos ekzekutitaj.»

La lasta vorto de la malnova konvenciuo falis de liaj lipoj kiel sabro. Marie Walewska malgaje kunmetis la manojn.

«Tio estas terura ! Kaj tiuj homoj, ĉu ili kulpas ? Ĉu oni estas certa ? »

«Tre certa. Ili planis ponardi la imperiestron okaze de la venonta revuo de la infanteria gardio. »

«Ĉu vi ne timas, ke tiel rapida juĝo povus acidigi la opinion aŭ plivigli la malamon kontraŭ la Imperiestro ? Laŭ mi tio ankaŭ estas timenda.»

«Kontraŭe , sinjorino, tiaj ekzemploj estas necesaj. Necesas frapi juste, rapide kaj forte por ne devi ofte frapi. Tio estas mia metodo. Kaj ĝis nun la Imperiestro ĉiam estis kontenta pri tio.»

«Se vi sciis, Sinjoro, kiom mi estas obsidita per tiu maltrankvileco, kaj kiel dankema mi estos al vi, kiu tiel bone gardas la imperies-tron!

Li ne estas singarda, ve, kaj elmetas sin ĉiumomente...»

«Jes, sed mi estas gardema. Tiel longe ke mi estos tie ĉi, mi respondecas pri li. La sola atenco kiu preskaŭ sukcesis, nome tiu de 1800, povis okazi, ĉar mi estis sen mandato en tiu momento. Cetere mi avertis la unuan konsu-lon, sed li ne serioze konsideris mian aver-ton.»

Fouché mensogis. La eksplodo de la infera maŝino, kiu preskaŭ mortigis Bonaparte, tute surprizis lin, Fouché, kaj dum kelkaj tagoj la riproĉo de la publika opinio estis tiel forta kontraŭ la ministro de la polico, ke la tuta Parizo kredis, ke li estos maldungita. Sed Fouché regrimpis sur la deklivon, de kiu li ruliĝis. Per la rapida proskribo de 130 jakobenoj, liaj antaŭaj amikoj, kaj la aresto de kelkaj rojalistaj ĉefoj, li riparigis sian eraron kaj sian reputacion.

«Ankoraŭ nun, » li daŭrigis, « la imperiestro povas ŝajnigi primoki miajn avertojn, kiel vi aŭdis en la rondo de la imperiestrino, sed en sia kabineto kun mi, li dediĉas al ili la necesan atenton. Do ne timu, sinjorino...»

Kaj li kuraĝis aldiri:

«Ni ambaŭ kune estos sufiĉe fortaj por ami kaj defendi lin. »

Marie ne reagis al tiu tamen direkta frazo, en kiun Fouché glitigis oferton de alianco. Kion li serĉis en tiu subtila interparolo, revenante al temo tamen malpermesita de Napoleono, estis timigi, poste trankviligi, enspiri konfidon, ŝajni nemalhavebla. Sinjorino Walewska, kiu estis tiel malmulte informita pri la aferoj en Francio, povis nur esti sentema al tiaj vortoj el la buŝo de viro, kies sagacecon kaj organizajn kvalitojn la imperiestro mem laŭdis. Ke li volis esti agrabla al ŝi, certe ne interesis ŝin. Sed la fakto ke li montris sin tiel fervora en la servo de Napoleono, ke li garantiis ties sekurecon kun tiom da energio kaj decidemo, tuŝis sian koron. Oni kalumniis tiun ministron, kies reputacion transiris la limojn de la lando. Kvankam naiva, Marie komencis malfidi la opiniojn de la kortego. Fouché estis transirinta terurajn epokojn. Li tiam devis plenumi agojn, kiujn li, maljuniĝinte kaj pligrandiĝinte, ne plu volis memori. Kaj se li estis vere dediciata al la imperiestro, kiel pruvis sia maniero paroli pri li, kiu estis samtempe respektoplena kaj fami-

⁹ La Burbonoj, al kiu apartenis Ludoviko XVI, kiu estis senkapigita en 1793 kaj kiu havis tri pli junajn fratojn, kiuj poste dum mallonga tempo okupis la Francan tronon antaŭ ol esti detronigitaj.

¹⁰ Grupo de tre fervoraj revoluciuloj, kiuj kunvenis en la abatejo Sankta Jakobo, de kie ilia nomo.

¹¹ Unu el la ribeluloj en orienta Francio dum la Revolucio nomitaj laŭ ilia ĉefo Jean Chouan.

liara, li estis, per sia admirinda inteligenteco kaj sia supla persisteco senfine utila helpanto.

Tiam li adiaŭis ŝin, sed antaŭ ol eliri, li haltis kaj diris pli laŭte, ĉar li divenis, ke Pauline estis tie :

«Ĉu mi povas peti vin, grafino, prezenti miajn plej respektemajn omaĝojn al ŝia impe-riestra alteco ? Mi ne kuraĝas prezenti min al ŝi sen aŭdienco en tiu ĉi horo. Anoncu al ŝi, ke mi havas la feliĉecon doni justecon al persono kiun ŝi bonvolas protekti, la markzinon de Vassoigne, iun elmigrinton... Laŭ mia peto la imperiestro rajtigis ŝin reveni al Francio, kaj mi klopodos reestabli ŝin en siaj bienoj. »

Marie certigis lin, ke ŝi tuj transdonos al la princino lian mesaĝon, kaj memorigante lin pri la posttagmeza rendezuo, rekondukis lin al la sojlo de la antaŭĉambro. Tiam la pordo de la buduaro leĝere malfermiĝis, kaj Pauline, vekita el sia vera aŭ ŝajnigita dormemo, metis la kapon tra ĝi, tiel maldiskrete kiel simpla mortemulino.

«Ĉar la imperiestro vere amas vin, Marie, » ŝi mallaŭte murmuris, «Fouché deziras fariĝi via intendanto ! »

IV. Napoleono kaj Marie

La imperiestro ankoraŭ venis al la strato Houssaye, kie Marie nun rezidis. Malgraŭ lia granda deziro viziti ŝin en ŝia hotelo, imensa kvanto da laboro najlis lin en la Tuilerioj Tamen lia deziro premi inter siaj brakoj dum kelkaj momentoj sian amikinion, estis tiel forta, ke li ne povis reteni sin, kaj dufoje, dum tiuj kelkaj tagoj, li venigis ŝin vespere per Duroc, kiu kun mil antaŭrimedoj, enkondukis ŝin per la malgranda interna ŝtuparo en la sekretan apartamenton de la imperiestro.

Ĝi troviĝis super lia oficiala apartamento kaj estis loĝejo kun sufiĉe malalta plafono, konsistante el du salonoj, manĝoĉambro, dormoĉambro kaj buduaro. Bourrienne, lia konsuleca sekretario, okupis ĝin. Ekde de ties maldungo la imperiestro rezervis ĝin al si mem, kaj li eĉ ofte sola dormis tie, preferante tiujn simplajn ĉambrojn, provizitajn de komfortaj mebloj, al lia splenda oficiala ĉambro. Alterne lia unua servisto Constant kaj la Mamluko Roustam estis ĝiaj fidelaj gardistoj. Neniam la impe-riestrino rajtis eniri ĝin. Tiom pli ŝi brulis de deziro penetri en ĝin.

Iun nokton ĉirkaŭ la unua post la kutima akcepto, ŝi restis sola en sia teretaĝa salono kun sinjorino de Rémusat. Joséphine estis eks-citita. La raportoj kiujn ŝi ricevis de agento, kiun ŝi

pagis kaj kiu cetere sekrete komuni-kiĝis kun Fouché, pri la instalo de sinjorino Walewska en Parizo, akrigis sian ĵaluzecon. Claire de Rémusat, al kiu ŝi konfidis ilin, ne sukcesis trankviligi ŝian timon. Seka kaj sen-kora, ŝi ofendiĝis pro la kruda konsilo de la Imperiestro pacienciĝi. Cetere la favoro de la grafino iritis ŝin. Mem revinte rekonkeri la koron de Napoleono, ŝi komencis malami lin.

Subite ŝi leviĝis kaj, kaptante la bra-kon de la palaca damo, diris al ŝi preskaŭ konvulsie:

«Venu. La dubo en kiu mi troviĝas, estas tro doloriga. Mi ne plu eltenas tion : mi preferas havi certecon. Tiu Polino devas esti ĉe Bona-parto. Mi volas kapti ilin ĉe la freŝa faro. »

«Ĉu vi vere intencas fari tion, Sinjorino ? » demandis Claire de Rémusat, timigita. «Ĉu Via Imperiestra Moŝto pravas aŭ malpravas, ŝi kaŭzos skandalon, kiun kolerigos la impe-riestron. Ĉiakaze, mia ĉeesto je tiu ĉi horo en la sekreta apartamento de la imperiestro estus granda malkonveno, kiun la imperiestro ne pardonus al mi. Pensu pri la sceno kiu povus okazi, se viaj suspektoj montriĝos veraj. En kia embaraso vi trovos vin mem ? Kaj kion vi intencas fari ? Fari riproĉojn al Lia Imperiestra Moŝto ? Mi timas, ke vi ne estas sufiĉe forta por elteni la sekvojn, kaj ke la Imperiestro, se li kulpas, kriados tre laŭte por siltentigi vin...»

«Sufiĉas al mi,» interrompis ŝin Joséphine, « mi ne povas elteni, ke li tiel trompas min, je kelkaj paŝoj de mi. Mi lasas lin libera, vi scias tion, Claire, sed finfine li misuzas sian liberecon. Okazu kio volos, sufiĉas al mi. Se vi ne havas la kuraĝon sekvi min, restu ĉi tie : mi iros sola... Estas la sorto de tiuj kiuj estas en mizero, esti forlasataj de siaj amikoj. »

«Ĉar Via Imperiestra Moŝto insistas, mi akompanos ŝin, sed mi ripetas al Ŝi : nenio bona eliras el tio ĉi. »

«Ni vidos, » diris Joséphine. «Prenu tiun torĉon. Ni paŝu tre mallaŭte.»

La imperistrino antaŭe, sinjorino de Rémusat malantaŭe, forlasis la salonon per lupaj paŝoj, kaj supreniris la ŝtuparon, kiu kondukis al la unua etaĝo. Tiam ili eniris la 'nigran' internan koridoron kaj supreniris kelkajn ŝtu-pojn de la interna ŝtuparo. Ili renkontis neniun pordogardiston. La paĝioj jam foriris. La gardisto de la paperujo jam dormis. La silento en tiu labirinto de koridoroj kaj ŝtuparoj estis terura. Subite leĝera bruo aŭdiĝis. Joséphine returnis sin tremetante kaj tenante ambaŭ manojn sur la koro.

«Aĥ ! » ŝi murmuris. « Ĉu tio ne estas Roustam ? Li gardas la pordon de Bonaparte. Li kapablas tranĉi al ni la gorĝojn ! »

Post tio sinjorino de Rémusat, timigita aŭ ŝajniganta esti timigita, malsupreniris la ŝtuparon kiel eble plej rapide, tenante la torĉon en la mano, kaj senhonte forlasis la imperies-trinon en la nokta mallumo. Momenton poste ŝi estis en la salono malsupre, kie preskaŭ tuj Joséphine alliĝis al ŝi... Ili silente rigardis sin momenton, kaj tiam, vidante unu la alian tiel timigitaj, ili ekridegis. Ne plu estis parolo pri vizito al la imperiestro tiun vesperon.

Ĉu la imperiestrino aŭ la damo de la palaco parolis pri tio? Ĉiakaze la morgaŭon oni avertis Duroc, kiu informis Napoleonon. La imperiestro tute ne kolorigis sed ridegis prezentante al si la bildon de la du senkonsilaj damoj kurantaj dum la nokto tra la palaco. Sed li tamen tiris instruon el la aventuro. Zorgeme evitante skandalon, li decidis ne plu ricevi sian amikindon en la Tuilerioj, sed iris al ŝia hotelo, malpli por indulgi sian edzinon, ol por eviti ĉiun surprizon kaj ĉagrenon al sinjorino Walewska.

Li spertis por ŝi tute nova senton : respekton. Ĝis tiam, kvankam li ĝuis ilian kompanion, li malbone komprenis la virinojn. Li timis iliajn intrigojn kaj kredis, ke ili ĉiuj estas stultaj. Liaj unuaj kontaktoj kun ili en mondo perturbita de la revolucio kaj militoj, malkaŝis al li nur malrigorecon de la moroj, kio seniluziigis lin, kiu ŝatis la Korsikanaj konceptojn pri familio kaj honoro. La komplezeco, kiun li, fariĝinte ĉiopova, renkontis ĉe ĉiuj virinoj sur kiujn li ĵetis sian rigardon, konvinkis lin de la banaleco de ĉiuj virinoj, kaj longe li kredis, ke nur unu virino vere dignis esti honorata pro la alta moraleco de sia vivo, malgraŭ siaj mankoj, nome la maljuna sinjorino Laetitia, lia patrino kiu, montrante soldatan koron en mizero kaj danĝero, ne ŝanĝiĝis fariĝante la patrino de imperiestro.

Per sia origino, la cirkonstancoj de sia falo, sia nuna sinteno, sia modesteco, sia sincereco kaj sia tenereco Marie malfermis antaŭ li horizonton, kiu ĝis tiam restis malfermita al li. Li estis mirigita, trovis sin plijuniĝinta, sentis sin pli bone : li amis.

Preskaŭ ĉiun vesperon post la vespermanĝo pasigata kun Joséphine, kie la penso pri lia kokrado donis al li bonan humoron, je la granda kontenteco de la imperiestrino, kiun rideto, amikeca rigardo jam ravis, Napoleono forlasis

la Tuileriojn en nigra frako kaj ronda ĉapelo, plej ofte kun Duroc. Sur la kajo atendis lin veturilo sen armiloj, kondukata de César, lia plej fidinda kuĉero, kies spiritĉeeston li estis aprecinta dum la eksplodo de tiu infera maŝino.

« La strato Houssaye, » diris Duroc.

La veturilo, ĉe la trankvila troto de du ĉevaloj, ruliĝis al kvartalo ankoraŭ duone dezerta, kiu donis la iluzion de kamparo. La imperiestro elpaŝis ĉe la pordo de la sakstrateto, kiun li mem malfermis per sia ŝlosilo. Duroc foriris piede aŭ restis en la veturilo, se Napoleono estis revenonta dormi en la palaco. Envolvite en sia mantelo, li instalas sin sur la kusenoj por dormi kiel trupano, ĉar li sciis, ke la atendo daŭros plurajn horojn.

La hotelo, en kiu loĝis sinjorino Walewska situis, kiel diris Fouché, inter sufiĉe vasta kortego, ĉirkaŭita de aneksaj konstruaĵoj kaj ĉevaloj, kaj malgranda parko aranĝita laŭ la Angla maniero. Belaj arboj enkadrigis gazeton, kie nigris iu Flora¹² el la antaŭa jarcento. La domo estis simpla, sed bone partigita. En la teretaĝo larĝa vestiblo malfermis la vojon al du salonoj kaj manĝoĉambro dekoritaj laŭ la Pompeja gusto, kiu tiam furoris. En la unua etaĝo troviĝis biblioteko, du grandaj ĉambroj kaj tre intimeca ĉambro, kies muroj estis kovritaj per blanka kaŝmiro kun nigraj desegnaĵoj, meblita laŭ la Turka maniero per klaviceno, skribtablo kaj pentrostablo. La parkedo estis kovrita per dika tapiŝo. Tie preskaŭ ĉiam troviĝis Marie. Ekde la fenestroj ŝia rigardo etendiĝis super liberaj, somere verdantaj spacoj. Ŝi legis, pentris, ludis sur la klaviceno kiel malpli scianta ol sentema muzikistino Italajn kaj Francajn operojn kaj precipe certain muzikaĵojn de Glück kaj precipe Mozart, kiun ŝi preferis al ĉiuj majstroj.

Ŝi vivis tute retiriĝinta, vidante nur sian ĉambristinon Daŝa, kiu estis edukinta ŝin, sian petoleman bofratinon, principinon Jablonowska, kiu vizitis Francion kaj ne povis forlasi ŝin, sian fraton Théodore Laczinski, knabo kun iomete malforta cerbo, kiun ĝojigis lia nova uniformo de Pola lancisto. Ĉiusemajne doktoro Corvisart venis, laŭ ordonon de Napoleono, informi sin pri la sanstato de Marie, kiu cetere estis bonega. Pli ofte venis Duroc, Ornano aŭ Philippe de Ségur, kiuj alportis leteretojn de la imperiestro kaj ekscii ŝiajn dezirojn, kiuj estis plenumataj tuj kiam ŝi esprimis ilin.

¹² Antikva Itala diino de la floroj kaj ĝardenoj. Je ŝia honoro oni festis la *floraliojn*.

Sed ŝi esprimis neniajn alian dezirojn ol revidi Napoleonon, esti kun li. Ŝi rifuzis donacojn, titolojn kaj monon. Ŝi estis nek koketa nek malŝparema. Ŝi tute ne faris al si zorgojn pri ŝia estonteco, ne povante imagi ĝin sen sia amanto. Por ŝi sufiĉis, ke li estas tie. Tiam alia spirito animis ŝin.

Proksime de Napoleono ŝi ŝajnis respiri heron aeron. Liaj ardaj paroloj, lia forta, ĉiam ĉeesta volo, lia regado de ĉiuj eventoj kaj estuloj, kiuj emanis el li, ebrietigis ŝin. Ŝi ne plu estis la juna senreliefa virino, kiu ŝi aperis esti por fremduloj. Ŝi parolis, diskutis kaj ekflamis por ideoj, eventoj, eĉ por homoj. Oka-zis, ke ŝi ne samopiniis kun la imperiestro, kaj fojfoje, per ŝia sincereco kaj obstineco ŝi igis lin akcepti ŝian juĝon.

En obtuza kaj bizara tono li ofte recitis poemojn de Ossian¹³, lia preferata poeto. Ŝi ne trovis lin je sia gusto, trovante lin enuiga, vanta, false epopea kaj oponigis al li Virgilion kaj Homeron, kiujn ŝi bone konis.

Ili longe diskutis pri tio. Tiam, subite, ŝanĝante sian penson, ŝi iris al la klaviceno kaj ludis mallongan melodion.

Ŝi malofte parolis pri politiko. Ŝi tamen interesiĝis pri ĝi per sia tute vigla inteligenteco, sed ŝi kontentigis sin aŭskultante Napoleonon, kiu denombris siajn armeojn, analizis kaj ĝus-tigis la kialojn kaj mekanismojn de siaj alian-coj kaj militoj kaj eksplikis sian revon domini la tutan Eŭropon, krom Anglio, kiu estis eston-te ekskludota. Tamen estis temo, pri kiu li ofte petis ŝin instrui lin, kaj pri kiu ŝi neniam ĉesis paroli : Pollando.

Per dolĉe kantanta, klara voĉo, en kiu trasonis kelkaj Slavaj ruladoj, ŝi elvokis la grandan historion de sia popolo, la senĉesaj bataloj por la defendo de la kristana kredo dum la terura tempo, kiam la torento de la Turkaj trupoj minacis gluti la tutan kristanan Eŭropon. Ne sen lerteco ŝi memorigis pri la multjarcenta amikeco, kiu ligis Pollandon kun Francio, pri la feliĉaj aliancoj kontraŭ la Habsburgoj¹⁴, pri la longtempaj servoj akceptataj kaj farataj, tiam pri la katastrofoj de la fino : la Prusoj, Rusoj kaj Aŭstroj, kiuj ĵetis sin sur la landon malfortiĝintan per siaj malordo kaj disputoj, kaj dividis ĝin inter si kiel beston en buĉejo, dum Francio, tro malproksima, okupiĝis pri sia Revolucio. Kaj ĉiam ŝi finis, demandante al

Napoleono, ĉu tia lando, tiel grandanima, tiel heroo, ne meritis, ke la granda imperiestro de la okcidento, por sia propra avantaĝo, revivigu ĝin ?

Napoleono tiam ridetis. Li komprenis, ke ŝi restis korligita al ŝia patrio, li kiu flatis sin voli nur la gloron de la sia.

«Necesas pacienci, » li tiam diris. «Kion mi promesis, mi certe plenumos, mi restaŭros Pollandon. Sed tio ne estas la laboro de unu tago. Ni staras nur sur la unua ŝtupo. La aliajn ni surgrimpos en iliaj konvenaj momentoj. Vi scias, ke mi preparas miajn agojn jam de fore en la tempo. Unu jaron, du jarojn antaŭe mi vidas kiun vojon mi elektos. Mi vivas nur en la estonteco. Ĉi-matene mi decidis, kion mi faros la venontan someron, kaj mi konfidence diras tion al vi, Marie : en julio 1809 mi estos en Vieno. »

«Ĉu temas pri vizito al imperiestro Francisko ? » demandis Marie, mirigita.

«Ba ! Li trovos tiun viziton malagrable ! »

«Kiel do, mia kara Siro, tiel baldaŭ vi planas novan militon?»

«Jes,» diris Napoleono. «Tiu milito estas neevitebla. Aŭstrio ne resignacias : ĝi sekrete armas sin. Mi montras nenion de mia plano, sed mi disponas pri ĉio por frapi ĝin... Kion vi ekhavas ? »

Sulketo estis formiĝinta sur la bela, blanka frunto de Marie, kiu murmuris :

«Pro vi, Siro, kaj pro mi, mi timas tiujn militojn, kiuj senĉese rekomenciĝas. »

«Ĉu pro mi ? Kion vi volas diri ? Ke mi povus esti mortigita ? Mi estas bone protektata. Cetere : kio estas morto ? Eterna dormo sen sonĝoj ...»

Li interrompis sin. Marie estis kaŝinta sian vizaĝon en siajn manojn kaj dolĉe, senbrue ploris. Napoleono ĉirkaŭbrakis ŝin.

«Kia infano vi estas! Plori pro tio. Mi nur ŝercas, Marie, ridetu al mi. Antaŭ ĉio mi volas, ke vi estu gaja kaj kontenta. »

«Tiam ne diru tiajn terurajn aferojn. »

«Ne, mi promesas tion al vi. Cetere mi scias, ke mi vivos tre longe. Necesas, ke mi vivu pli longe ol ordinara homo por sekurigi ĉion kion mi fondis. Kaj mi vere sentas min sufiĉe forta por vivi naŭdek jarojn. Mi neniam sentis mian kapon, mian koron aŭ mian stomakon ! »

¹³ Legenda Skota bardo el la III-a jarcento. Sub ties nomo Macpherson publikigis en 1760 kolekton da

sombre melankoliaj kaj bombastaj poemoj. Temas pri tre libera imitaĵo de la origina teksto.

¹⁴ Nomo de la Aŭstraj imperiestroj.

Li kantetis la melodion de *Monako*, je kiu li estis dancinta en Valence¹⁵. Nuntempe li ne plu dancis, sed tiu melodio restis en lia memoro. La vizaĝo de Marie resereniĝis. Li daŭrigis :

«Vi devas timi por mi nek kuglon nek bajoneton. Mi havas taskon plenumendan, kaj ĝi estos plenumita. Mi ĉiam estis bonŝanca : la malfacilaĵoj, la danĝeroj ĉiam cedis al mia volo. Kaj tiam, mi jam diris tion al vi : mi havas stelon. Mia nutristino Saveria montris ĝin al mi, kiam mi sidis sur ŝiaj genuoj en Ajaccio¹⁶. Mi neniam forlasis ĝin per la okuloj. Mi vidis ĝin en Autun¹⁷, la vesperojn kiam, apogante per la kubutoj sur la fenestrobretton en mia ĉambreto, mi lasis kuntreni min de miaj infanoj revoj. Ĝi brilis sur la vintra ĉielo, kiam mi foriris al Italio. Mi retrovis ĝin en Egiptio. Mi vidis ĝin ĉe ĉiu krizo en mia vivo : la 18-an de *Brumaire*¹⁸, en Marengo, en Austerlitz, en Friedland, kaj mi ankoraŭ vidas ĝin nun... »

Li prenis ŝian manon kaj kondukis ŝin al la fenestro, antaŭ kiu li forigis la kurtenon. La ĉielo estis plena je astroj.

«Rigardu, » li diris mallaŭte, «estas tiu kiu brilas ne tre for de la Granda Urso, kiu trembrilas kun blueta lumo. Ĝi estas antaŭsigno de feliĉeco, Marie. Tiel longe ke mi vidos ĝin, Fortuna¹⁹ favoros min. »

Marie skuis nekredante la kapon.

«Ha ! » li ekkriis impete. «Vi ne suspektas, kiom da eventoj restas nepenetreblaj al la okuloj de la homoj, kiom da fataleco ludas rolon en nia vivo. Ĉu mi mem ne estas klara ekzemplo ? Malgraŭ mia volo supreniri kaj atingi lokon en la mondo, kio mi estus hodiaŭ sen la hazardo, la neantaŭvideblaj eventoj, la bonŝanco kiu igis min surgrimpri unu post la alia la ŝtupojn de la trono ? Malmulte mankis por ke mi elmigru en 1792. Nur la manko de mono retenis min... Kial mi estis elektita por savi la Konvencion la 13-an *Vendémiaire*²⁰ ? Ĉar Barras²¹ parolis al mi en Tulono²². Se mi ne estus sursabliĝinta antaŭ Saint-Jean-d'Acre, mi ne estus riskinta *Brumaire*, sed penetrante en la orienton, mi estus provinta imiti Alek-sandron la Grandan kaj eble mi estus finiĝinta kiel li je la aĝo de 30

jaroj sur la bordo de rivero en Azio sen revidi Francion... »

Li prenis sian tabakujon, inspiris ties parfumon kaj glitigis ĝin denove en sian poŝon.

«Kia romano estas mia vivo ! Kiam mi komparas mian nunan staton kun miaj duraj junaj jaroj, ŝajnas al mi, ke mi revas...»

Tiam li rakontis al Marie, kiu ĉiam atente sekvis la movojn de lia menso, pri sia ado-lesko, la militista lernejo, la silenta laboro de malgranda, maldika stipendiisto, la moko de siaj kamaradoj pli bone naskitaj, pli belaj, inter kiuj li malĝojis, ĉar li estis tiel sola. Poste pri sia vivo de juna oficiro en Auxonne, manĝante sekan panon, broŝante mem siajn vestaĵojn por ke ili restu propraj pli longe, sloŝante sian pordon por kaŝi sian malriĉecon, havante nur unu plezuron, unu konsolon : la laboro, pasia kaj furioza laboro, kiu fojefoje svenigis lin.

Ŝi neniam interrompis lin dum tiuj longaj monologoj per kiuj li ŝatis rakonti pri si mem, analizi sin mem, profundigante por sia aŭskultantino kaj por si mem la kaŝitajn motivojn de siaj agoj. Al aliaj li ofte mensogis, sed kontraŭ Marie li estis sincera. Li sciis, ke ŝi povis kompreni ĉion. Kial li, ankaŭ ŝi konis sombrajn tagojn, kaj tiu simileco igis ilin senti pli grandan tenerecon unu por la alia, specon de nedifinebla parenceco kiu aldoniĝis al ilia amo.

«Mi ankaŭ, » ŝi diris, «estis malriĉa. Mia familio vivis en malabundeco. Tial mi akceptis forlasi ilin, sed mi tre longe ne plu spertis ian ĝojon en mia vivo. »

«Estas vere, Marie, kaj sendube tial mi tiom ŝatas vian rezignacian, iomete malgajan karakteron, tiun trajton de seriozececo.»

Tiam li revenis al si mem, plonĝante kun ĝuo en sian pasintecon, kio igis lin pli ĝui kaj ŝati la hodiaŭan splendecon.

Se vi estus koninta min, mia amikino, en la periodo de la Revolucio ! Mi estis tre maldika kaj flava. Oni vidis nur mian nazon, longan nigran hararon kaj miajn hundajn orelojn. Kun miaj volbiĝintaj ŝultroj, mia kava brusto kaj mia mizeraspekta uniformo, mi apenaŭ estis farita por plaĉi al la belaj damoj. Kaj tamen mi leĝere

¹⁵ En 1785 Napoleono estis ĵurigita kiel dua leŭtenanto de la artilerio kaj enkazernigita en Valence.

¹⁶ Ĉefurbo de Korsiko, insulo en Mediteraneo, kie li naskiĝis en 1769. En 1768 Francio aĉetis la insulon.

¹⁷ En 1779 li ricevis stipendion por la gimnazio de Autun.

¹⁸ La 18-an de *Brumaire* de la jaro X-a de la Revolucia kalendaro (la 9-an de novembro 1799) Bona-

parte plenumis ŝtatrenverson, per kio li fariĝis unua konsulo kaj poste imperiestro.

¹⁹ Roma diino de la hazardo.

²⁰ La 5-a de oktobro 1795 li subpremis, laŭ peto de Barras, rojalistan ribelon en Parizo.

²¹ Ĉefo de la direktorio (nomo de la registaro).

²² Kiel 24-jara artileriisto Bonaparte esence kontribuis al la liberigo de Tulono de la Angla okupacio.

iris tra la stratoj kun la kapo plena je planoj. Ĉar mi kredis je mi mem, eĉ en la plej nigraj momentoj. »

Tiu kredo je si mem kune kun lia fatalismo estis la fono de lia naturo. Ĝi eksplikis liajn plej multajn agojn. Ĝi permesis al li paciencie atendi, energie labori, kalkuli ĉion, esti sen-zorga, kaj donis al lia animo mirigan diver-secon, kiu longe protektis lin kontraŭ ekscesa tensio aŭ laceco. Ĉiutage li renovigis sin.

Li faris kelkajn paŝojn tra la malgranda ĉambro, tiam li sidiĝis ĉe ŝian flankon kaj prenis ŝian manon. Marie ne plu surhavis sian geedzegan ringon., sed en ĝia loko kavan ringon kiu enhavis harojn de Napoleono. Ĉirkaŭ la leĝera ora cirklo estis gravurita la devizo : *Kiam vi ne plu amos min, mi ankoraŭ amos vin*. Napoleono donacis al ŝi tiun ringon antaŭ ol forlasi ŝin en Königsberg, reirante al Francio. Kaj fojfoje Marie diris al li, ke ne ekzistas la ebleco, ke ŝi ĉesos ami la unua, kaj ke ŝi sentis en sia animo, ke ŝi amos la lasta.

Post tio Napoleono koleretiĝis:

«Ĉu vi do ne scias,» li ekkriis, «ke viroj kiaj mi neniam ŝanĝiĝas? Mi naskiĝis por vivo en familio. Se mi trompas Joséphine, estas ke ŝi komenciĝis seniluziigi min. La virinoj kiujn mi havis, ne pli gravas por mi ol matenmanĝo de antaŭ du jaroj. Vi, Marie, vi ne estas la sama afero. Vi ne devus dubi pri mi. »

Tute emociita, ŝi petis lin pardoni ŝin, Sed li ekskuzis sin siavice, ridante :

«Mi estas soldato, tre prompta kaj sufiĉe kruda. Mi ne estis edukita en kortego kaj mi apenaŭ scias kiel oni parolas al damoj... »

Li trovis en tiuj interparoloj trankviligon, kiun li ankoraŭ nenie sentis. Neniu el tiuj kiuj vivis plej proksime al li – Joséphine, Hortense, Eugène, liaj fratoj, Berthier, Maret, Méneval – ne kontentigis lian spiriton. Ĉe neniu el ili li divenis tiun absolutan sindonon, kiu sola povus kontentigi lin. Kiel ajn submetitaj kaj kompletaj ili estis, ili ankoraŭ ne sufiĉe forgesis siajn proprajn interesojn, siajn proprajn dezirojn. Nur eble Duroc... Sed lia sincereco ofte estis malplaĉe tro akra. Kaj vere estis nur unu virino kiu akceptis lin per silento kiu komprenis, kiu emociis, kiu vekis tiun konfidon kiu invitis lin malfaldiĝi kiel karto, filozofadi plurajn horojn pri siaj sentoj kaj ideoj.

Aliaj fojoj, laca pro dutaga obstina laboro, dorminte nur kelkajn horojn, li venis kvazaŭ

ventego, ne plu eltenante la aeron de fermita ĉambro. Tiam li igis Marie grimpi en sian veturilon, kaj ili veturis tra Parizo, la antaŭurbojn, al Sèvres, al Meudon, al Boulogne. Unufoje li faris al ŝi la honoron viziti Malmaison. Alian tagon li veturigis ŝin al la Placo de la Sorbonne viziti la atelieron de David, lia preferata pentristo, kiu ĵus finis la grandan pentraĵon pri lia *Sacre*²³.

Kvankam li havis malmultan gustan por arto kaj sciis nenion pri pentrado, lin ravis retrovi tiel noble fiksita per la peniko la majestecon de tiu triumfa horo. Li komplimentis la majstron kaj petis lin komenci la portreton de lia amikino.

La Sparteca David, moligita per la gracio de lia vizitantino, kial ankaŭ per la kelkaj deli-kataj vortoj, kiujn ŝi direktis al li pri liaj pentraĵoj, konsentis translokiĝi por ŝi, kion li rifuzis fari por la fratinoj de la imperiestro, kaj li venis al la strato Houssaye, kie li pentris ŝin en ŝia blanka buduaro, duone kuŝantan sur kanapo kun ŝia cigna kolo, kun mano sur duone malfermita libro kaj turnante siajn okulojn de transvidebla bluo kaj sian melan-kolian rideton al preciza malvarma tago.

V. La plano de Fouché

Plurfoje, sub la preteksto de konsilo donenda, de servo ofertenda, Fouché direktiĝis al la hotelo de sinjorino Walewska. Li pasigis tie kvaronhoron ĉiam en la plej favora momento, kaj tiam malaperis por reiri al siaj mil unu aferoj. Li montris sin afabla duonoficiala viro. Per lia influo abundegaj gracoj estis ŝutataj sur la Polinon.

Iom post iom Marie kutimiĝis al lia terura paleco, lia maldika, longa vizaĝo kaj lia tranĉa voĉo. De tiu viro deiris tia inteligenta ĉarmo, kiun oni tuj sentis esti samtempe tiel profunda kaj altruisma, ke oni forgesis lian malbelecon. Lia prizorgemo emociis Marie, lia varia kaj neniam mallerta komplezeco flatis ŝin, kaj kion diris pri li la imperiestro ne malgrandigis lin en ŝiaj okuloj.

Li ĝuis grandan favoron ĉe Napoleono en tiu epoko. Ne tial ke la imperiestro ŝatis lian karakteron. Sed la eksterordinara memfido de Fouché, lia komprenivo, lia escepta kapableco kaj liaj enormaj scioj kurioze fascinis lin. Tiuj du tiel diversaj mensoj ŝatis kaj serĉis unu la

²³ Ceremonio de la unktado de Napoleono kiel imperiestro far papo Pio VII en Parizo.

alian. Tial Napoleono konfidis al li pli kaj pli la traktadon de la plej gravaj aferoj, tiuj en kiuj troviĝis la esenco de lia politiko. La ministro de la polico fariĝis lia ĉefministro. Li havis la manojn en ĉio kaj sur ĉio.

Antaŭe Fouché pensis certigi sian krediton ĉe Napoleono donante al li amantinon. Li tiam pensis pri sinjorino Récamier. Nek tiu virino tro laŭdata, nek la imperiestro favoris tiun planon, kiun li tuj forlasis. Sed ekde la apero de Marie en la vivo de Napoleono, Fouché, bone informata de siaj agentoj, ankoraŭ pli bone informata de si mem pri la profundeco de la sentoj de Napoleono, alia plano ekokupis lian menson. Ligi sin al la amikino de la imperiestro, direkti sian konduton kaj tiel firmigi sin en la fido de la suvereno, tio estis lia plano. Marie sciis konkeri la koron de Napoleono. Pacience helpate kaj fajne konsilate, ŝi povus konkeri la kronon. Fouché divenis, ke ŝi tute ne estas vana, sed ke ŝia tenereco por Napoleono estas granda kaj sincera. Kaj kiu scias, kio okazus, se li akriĝus certajn rankorojn kontraŭ Joséphine? Li kredis, ke interesoj, kiuj povus ankoraŭ ekesti, povus igi ŝin akcepti tiun kontrakton. Ili ambaŭ povus renversi la Kreolinon, lia malnova kaj danĝera malamikino, kiu, se li ne agus rapide, povus venĝi sin je li – ĉar la Beauharnais tute ne estis naiva. Cetere la imperiestro deziris nenion pli ol levi sian amindan amantinon, kiu estis juna, bela, diskreta kaj kiu havis neriproĉeblan pasintecon. Tiam, unuafoje dum multaj jaroj li povus senti sin sekura kaj solida. Subtenate de la nova imperiestrino, estante la ĉefa ministro de la mastro de okcidenta Eŭropo, li povus doni liberan kuron al sia genio. Se la imperiestro estus havonta heredontojn, pri kio li ne dubis, malgraŭ la opinio de Corvisart, ĉar li sciis, ke Napoleono ne estas impotenta, la internaj kaj eksteraj malamikoj de la imperio, malkuraĝigitaj, devus demeti la armilojn. La rojalistoj ne plu esperus, ke la malnova monarĥio povus reveni. La jakobenoj rezignus pri sia ĥimera libereco. Anglio kaj Aŭstrio kliniĝus por ĉiam. Estus la fino de la daŭraj militoj, kiujn Fouché malamis. Estus la rejuniĝo de iu Eŭropo, finfine tirita el sia sangobano. Tio signifus sekureco kaj paco...

Tiaj pensoj hantis tiun flavecan frunton kun platigitaj haroj. Ili fariĝis pli precizaj kaj pli necesaj kun la tagoj. Por atingi ilian realigon Fouché ŝparis nenian klopodon. Pli longe atendi estus danĝera. Joséphine spionigis lin. La

ministro tendis tiom da kaptilojn ! Hazardo povos kaŭzi ŝian malfavoron.

La imperiestro estis forlasonta Parizon por la Pirineoj, de kie li volis observi la Hispanan vespejon por esti preta agi. Joséphine ne rajtis sekvi lin, dum Fouché estis restonta en Parizo kun la registaro. Tia kunesto de la du gezedzoj en la izoleco de provinco, povus esti fatala por li. Fouché havis nur unu monaton antaŭ li. Tio sufiĉis por inciti la imperiestron kontraŭ lia edzino kaj igi lin rezigni pri ŝia kompanio. Se la imperiestra paro estus separita, la ministro povus tiri avantaĝon el la certaj indiskretaĵoj de Joséphine, pligravigi ilin en siaj ĉiutagaj raportoj kaj venenigi ilian jam nestabilan rilaton. Sed antaŭe li devis certigi sin de la kunlaboro de Marie.

Iumatene li aperas en la strato Houssaye, kiam Marie estis elironta surĉevale por sia kutima promenado en la Bois de Boulogne. Estas la sola kutimo kiun ŝi gardis el sia juneco en la Pola kamparo. La imperiestro permesis tion, cetere kontraŭvole, ĉar li timis la renkon-tojn : li estis ĵaluza.

La hela marta suno orumas la sablon de la aleoj. La gazono verdiĝas. La arboj ŝveligas siajn burĝonojn. Subtila gajeco ŝvebas en la printempa aero. La vetero estas dolĉa.

«Ĉu vi deziras paroli al mi, Sinjoro Grafo ?» demandas Marie. Fouché havas tiun titolon de ok tagoj.

Kaj kiam li ekskuzas sin, kaj diras, ke li revenos, ŝi ne volas aŭskulti lin, kaj, ĵetante la bridon de ŝia ĉevalo al la ĉevalprizorganto, ŝi gracie invitas la ministrinon sekvi ŝin en unu de la teretaĝaj salonoj.

«Jes, Grafino, » diras Fouché, post kiam li instalas sin en komfortan grandan fotelon, kun la dorso turnita al la taglumo, kiu, kiam ĝi estas tro viveca, igas lin palpebrumi per siaj ruĝaj okulharoj, «jes, mi deziras paroli al vi, kaj, se mi konsentis, ke vi prokrastu vian pro-menadon por mi, necesas, kreu min, ke nia konversacio havu grandan intereson. »

«Mi aŭskultas vin, Sinjoro, » diras Marie, interesigite de tiu solena komenco.

«La bonkoreco, kiun vi ne ĉesis montri al mi ekde via alveno en Francio, la respekto, kiun inspiras al mi via karaktero kaj la dediĉiteco kiu ligas min al nia amata imperiestro, helpas min, mi esperas, en la sufiĉe malfacila konfidenco kiun mi devas fari al vi. Temas pri la imperiestrino kaj ŝiaj projektoj koncerne vin. »

«Ĉu la Imperiestrino ? Kiujn projektojn koncerne mi ŝi faris ? »

Fouché klinas la kapon.

«Vi kredis povi malarmi ŝin per via modesteco. Via retirita vivo ne devus ofendi ŝin. Sed tiu virino, kiu, se ŝi estus saĝa, kontentigus sin per la rolo de oficiala kompanino de Napoleono, tiu virino malamas vin, timas vin kaj juris pereigi vin. »

«Ĉu min ? Sed kiel ? »

Senparola, Marie trovis nur tiujn vortojn.

«Instigite de sia filino, la reĝino de Holando, Joséphine pacience serĉis rimedon fortunigi vin de Napoleono. »

«Kaj kio estus tiu rimedo ? »

«Ĝi ŝajnus stranga por honesta virino. Sed por konservi sian edzon, Joséphine trovis nenion pli bonan ol havigi al li distraĵon, tiun malgrandan fraŭlinon Guillebeaux, instruitan de Hortense, kiun ŝi promociis al la rango de legistino por enirigi ŝin en la familiarecon de la palaco. Cetere tio ne estas la unua fojo, ke Joséphine servas sin per tia ruzo por teni Napoleonon sub siaj okuloj. Ankaŭ lia ligo kun fraŭlino Gazzani estis zorge aranĝita de ŝi... »

«Ĉu ŝi vere kapablas fari ion tian, Sinjoro ? » ekkrias Marie, pli kolera, ol timigita. Tio estas tre malnobla ! »

La ministro demetas unu genuon de la alia kaj kurbiĝas al Marie..

«Jes, mi jam diris tion al vi : vi ne konas tiun ĉi landon ! Mi ne kuraĝas ĵuri, ke mia amiko Talleyrand, kiu estas tre afabla en via ĉeesto, ne havas la manon en tiu afero – leĝere kiel li faras ĉion – en tiu malbela intrigo... Kiel ajn estas, fraŭlino Guillebeaux ĉiumomente sekvas Napoleonon. Hortense, la Rémusat, Joséphine puŝas ŝin inter liajn brakojn. Ŝi estas amuza, juna, freŝa, firme decidinta fari ĉion por sukcesi, kaj ŝia agmaniero klare petas pri la favoro de la Imperiestro. »

«Sed kiu estas tiu persono ? Mi ankoraŭ ne aŭdis paroli pri ŝi.»

«Mi facile povas kredi tion : vi renkontas tro malmulte da homoj. Oni certe ne parolis pri ŝi al vi, eĉ ne la bona Duroc, kies metio estas diskreteco. »

«Sinjoro Grafo, vi dolorigas min dirante tion pri la grandmarŝalo, kiu en multaj cirkonstancoj montris sin ne nur fidela servisto de la imperiestro, sed ankaŭ tre kompleza amiko mia. »

Sentema al la reago de Marie, Fouché tuj interrompas sin.

«Bone, Sinjorino, mi volas diri nenion kio malplaĉus al vi. Cetere generalo Duroc estas homo de honoro, kaj kvankam li apenaŭ ŝatas min, mi scias agnoski siajn grandajn meritojn. Vi demandas, kiu estas la Guillebeaux. Ŝi estas malmultvalora persono. Ŝia patrino, kiu estas Irlandano, lernigis al siaj du filinoj Boheman kaj Hispanan dancadon, kaj jam de tri jaroj ili iras en la salonojn ludante per la kruroj kaj tamburinoj. La pli aĝa sukcesis trudi sin al sinjorino Baccocchi, kiu trovis edzon por ŝi. La pli juna, nome la nia, post kelkaj aventuroj kun Junot kaj Murat, estis ĵetita el la palaco Eliseo far Caroline, kiu volis gardi sian aman-ton kaj sian edzon. Hortense akceptis ŝin kaj transdonis ŝin al sia patrino. Virino de tiel facila virto faras ĉion, kompreneble por bonega prezo, kion oni petas ŝin fari.

«Mi dankas vin, Sinjoro, » diris Marie, « pro la peno kiun vi faris por averti min. Mi ne forgesos tion. Sed mi ne povas kredi, ke la Imperiestro lasos sin kapti en tiaj kaptiloj. Vi sendube bone konas lin, sed ankaŭ mi bone konas lin kaj mi havas pli da fidon ol vi en la korligiteco kiun li sentas por mi. »

Fouché suspiris.

« Sed li estas viro malgraŭ la grandeco de sia genio. Kaj la homoj cedas al strangaj tentoj. Certe la imperiestro senfine amas vin. Sed ĝis hodiaŭ lia naturo ankoraŭ ne instigis lin al fideleco. La virinoj kiujn li distingis per sia intereso, estis rapide neglektitaj... Mi eksplikas tiujn forlasojn al mi tiel : neniu el tiuj virinoj havas la specon de ĉarmo, kiu povis ligi viron kiel Napoleonon. Tamen la regno de kelkaj el ili estus daŭrintaj pli longe sen la kaŝa influo de Joséphine. Mi ekskuzas min pro tiuj ĉi vortoj, sinjorino, sed via intereso devigas min diri ilin.

«Ĉiufoje ke amsento por alia virino ŝajnas naskiĝi en ŝia edzo, Joséphine faras ĉion por ĉesigi tiun ligan. Ŝia sperto kun Napoleono estas tiel vasta ! Ŝi tre bone konas lin, pli bone ol mi, pli bone ol vi. Per unu vorto, per unu gesto ŝi naŭzigas kaj malkuraĝigas lin. Por gardi la imperiestron vi havas Junecon, gracion, inteli-gentecon, mil fizikajn kaj moralajn bonegajn kvalitojn, pri kiuj vi mem ne konscias. Mi tamen demandas min, ĉu tio sufiĉas kontraŭ la ruzoj de la Imperiestrino. »

Marie aŭskultis la ministrinon kun ekstrema atento. Tiuj klaraj vortoj dolorigas, sed ne ofendas ŝin. Napoleono kutimigis ŝin al la senartifikaj formoj de la vira lingvaĵo. Malgraŭ ŝia fragila aspekto, ŝi tute ne estas sentema

pupeto. Ŝi kapablas aŭskulti la veron. Kuraĝo neniam mankas al ŝi.

«Sinjoro,» ŝi trankvile respondas, «mi ne komprenas, kial la imperiestrino tiel obstine volus pereigi min. Mi scias, ke mi kulpas kontraŭ ŝi, sed eble ŝi ne kredas tion, ĉar mi ne forprenis Napoleonon de ŝi. Jam antaŭ longe ŝi perdis lin. Se mi ne estus cedinta al li, li certe estus elektinta alian virinon, sed ne estus reveninta al Joséphine... Sed finfine ŝi estas lia edzino, kaj mi komprenas, ke ŝi koleras kontraŭ mi. Konsentinte al akcepto en la Tui-lerioj, mi faris grandan eraron, kaj mi decidis neniam plu aperi tie por ne plu ofendi ŝin.»

«Koncerne tion, permesu al mi diri, ke vi malpravas.»

«Ne, mi neniam plu reaperos tie. Tiel ambigua situacio estas tre doloriga por mi. La flataĵoj de unuj kaj la de impertinentaĵoj de la aliaj apenaŭ tuŝis min. Sufiĉas al mi plaĉi al la imperiestro, por ke ĉio fariĝu facila por mi. Sed al la doloro kiun mi kaŭzis al la imperiestrino, mi ne deziras aldoni aliajn. Mi ne spitos ŝin. Mi ne estas malamikino ŝia. Ŝi povus provi neniigi min, sed mi ne respondos al ŝiaj battoj. Mi deziras nur gardi la afekcion de la Imperiestro, la permeson ami lin en la ombro kaj forgesita de la aliaj.»

«Joséphine ne apartenas al tiuj personoj kiuj forgesas...»

«Kiam ŝi komprenos per mia konduto, ke ŝi ne devas timi min, mi esperas, ke ŝi ŝanĝos sian opinion.»

«Permesu min dubi pri tio, Grafino. Tiu sinteno de submeto ne povos trankviligi Joséphine, kiu vidos nur hipokrizion en via rezerviĝemo. Supraĵe gracia, ŝi funde estas senkompata. Se vi ne detruos ŝin, ŝi detruos vin. Ŝi profitos de ĉio kontraŭ vi, de la plej malgranda el viaj agoj, de viaj paroloj, de via silento... Ŝi atendos, ĉar ŝi estas pacienca kaj ruza. Ŝi elektos la bonan momenton. Ŝi estas preta fari ĉian malnoblaĵon : ŝi ne havas skupulojn. La sola rimedo por protekti vin, estas, ne refrapi, sed frapi la unua.»

«Sed kion mi povus fari, Sinjoro ?»

Ŝia voĉo leĝere tremetas, kio estas heroldo de larmoj.

Fouché pli proksimiĝas al ŝi :

«Kion vi povus fari ? Sola vi povos fari tre malmulte : vi havas tro da senartifika boneco. Sed vi povos fari ĉion kun mia helpo. Mi volas tutkore subteni vin per ĉiuj miaj fortoj, kaj, kio ankaŭ gravas, ankaŭ por mia propra intereso. Mi estas en la sama pozicio kiel vi : Joséphine

deziras, ke la imperiestro forsendu min. Inter ŝi kaj mi nenia akordo estas ebla. La milito inter ni estas senkompata kaj aperta, ĝis unu el ni kuŝos sur la grundo. Se mi ne sukcesus perdigi ŝin, mi estus forpelita. Jam de du jaroj mi laboras por ŝia divorco. Plurfoje mi preskaŭ sukcesis, sed Joséphine ĉiufoje povis mastri la situacion. Mi estis sola, sen familia, intima apogo, apud Napoleono : la partio ne estas egala. Hodiaŭ, se vi volas, se vi helpas min kaj sekvos miajn konsilojn, mi garantias bonan rezulton. Antaŭ ol ses monatoj estos pasintaj, la imperiestrino estos kondamnita. Napoleono laciĝis pro ŝia ĵaluzeco, ŝia pridubinda ĉirkaŭaĵo kaj ŝia malŝparemo. Ne estos malfacile puŝi la imperiestron sur tiun deklivon. Incidento povos cetere plirapidigi tiun procezon : se vi naskus infanon, la repudio de Joséphine estus certa.»

Fouché montris ĉi-foje sian tutan ludon. Sed tiuj zorge ordigitaj frazoj, kiujn li prononcis kun perfekta natureco, kiel Marie ricevas ilin? Ĉu ŝi akceptos lian proponon ? Komence ŝi ŝajnas ne atenti pri ili kaj respondas nur al liaj lastaj vortoj :

«Kion donus tio al mi, se oni sukcesus, kion mi ankoraŭ ne havas ? Ĉu tio faros, ke la imperiestro amos min ankoraŭ pli ? La forigita imperiestrino eble influos pli forte lian menson ol la ĉeesta imperiestrino. Li bedaŭros ŝin, kaj tiam li estas malpli mia.»

Respondo de amantino kiu konsideras nur sian amon. Malgraŭ sia kutima sinregado Fouché ne povas mastri sian ekscitecon.

«Kia infano do vi estas!» li ekkrias preskaŭ kolere. «Kiam Joséphine estos foririnta, Napoleono estos libera, kaj la trono apartenos al vi. Grafino Marie Walewska estos la imperiestrino de la Francoj kaj reĝino de la Italoj !»

Pala pro emocio, ŝi ekstaras kaj diras :

«Ĉu mi imperiestrino ? Ĉu vi vere pensas tion ?»

«Mi pensas nur pri tio, » respondas Fouché, retranskiviliginta.

Ŝi residiĝas kvazaŭ sensobtuzigita. Ŝi neniam pensis pri tio. Tiam, preskaŭ tuj, ŝia virina instinkto igis ŝin meti la sekvan demandon :

«Mi bone komprenas, kial vi deziras la falon de la imperiestrino. Tamen kiun avantaĝon vi vidas en tio, ke mi prenu ŝian lokon ?»

«Nenian alian – ĉar ĝi estas imensa – ol tiu ke ni havos kiel suvereninon amikinon dignan je ĉia respekto anstataŭ maldigna, malestimata malamiko. Aĥ, sinjorino, kiajn perspektivojn tia evento povus malfermi ! Pensu pri la feliĉeco

kaj trankvileco de Napoleono, kiu havos tenere amatan edzinon, kiu vere amas lin, kaj heredontojn de sia sango, kaj povas profiti de la sperto de fidela ministro kiel mi, kiu jam de dudek jaroj, esploras la kaŝejojn en Francio kaj scias, kio necesas por ĝia grandeco kaj gloro ! Via modesteco povus suferi pro tio, sed per via alveno, aŭ mi forte eraras, la vizaĝo de Eŭropo kaj sia sorto multe ŝanĝiĝos! »

Inter ili ekestas peza silento. Per malrapida gesto Fouché karesas siajn maloftajn, blankiĝantajn vangharojn. Tremetante pro sekreta malpacienco li atendas la vorton kiu devas sigeli akordon tiel gravan por li, aŭ reĵeti lin en lian izolecon. Nenian momenton Marie hezitas en sia intenco rifuzi la proponon. Sed ŝi estas juna, timida virino, kiu ne volus repuŝi tiel potencon viron per tro kruda respondo, kiu ne nur pekos kontraŭ ŝi per eksceso de fervoro, kaj al kiu, se al li mankas diskreteco, ne mankas respekto.

Finfine ŝi diras per sia dolĉa voĉo, kiu hezitas iomete :

« Tio estas revoj, Sinjoro Grafo. Ne esperu, ke mi iam faros ion por realigi ilin. Mi dankas vin pro via bona intenco, kiu flatas min, sed vi forgesas, ke mia vivo estas engaĝita per ago kiu reduktas al nenio ĉiujn viajn projektojn. En Pollando vivas honorinda viro, kiu donis al mi sian nomon kaj kiun mi kovris per la plej doloriga humiligo. Se li volas repudii min, li faru tion : mi certe meritas tion. Sed mi ne petas lin divorci min por denove vundi lin kaj pligrandigi la skandalon en nia ilustra Pola familio. Cetere tia divorco povus esti nur civila, kaj malgraŭ miaj pekoj mi estas tro konvinkita katolikino por kontentigi min per ĝi. Tiel longe ke la grafo deziras tion, mi restos Marie Walewska, konforme al la leĝoj de la Katolika Eklezio.»

Per la pligrandiĝanta firmeco de tiu respondo Fouché komprenas, ke la partio estas malgajnita. Li tamen provas lukti plu.

«Se la Imperiestro volus fari el vi sian edzinon, mi estas certa, ke vi konsentus. La obstakloj pri kiuj vi parolas, ne estas nevenkeblaj. La sinteno de grafo Walewski estas inspirita al li de la profundaj interesoj de lia lando. Li certe kliniĝus antaŭ la deziro de Napoleono, kiu, kiel garantio de siaj intencoj koncerne Pollandon, metus Polinon sur la

tronon de Francio. Kio koncernas la Eklezion, oni povas facile antaŭvidi ĝian sintenon : la papo ne kuraĝus rifuzi al la imperiestro la nuligon de via geedzeco... »

Tiam ideo transflugas sian menson.

«Ĉu vi, Grafino, kiu estas tiel korligita kun Pollando, ne komprenas, ke vi, per eksceso de humileco, rifuzas uzi la rimedon redoni al ĝi sian liberecon kaj gloron? Sekurigante vian estontecon, vi sekurigas tiun de via lando. Akceptante la kronon de Francio, vi relevus tiun de la Jagelonoj²⁴. Kion Napoleono, mi timas, ne faros por sia amikino, li certe faros por sia edzino, por la patrino de sia filoj, precipe se iu en lia ĉirkaŭaĵo kuraĝigus lin en la plej favora momento. »

«La Imperiestro promesis tion al mi, Sinjoro, kaj, sen fari premon sur lin, mi atendas, ke li realigu sian promeson.»

«La Imperiestro ofte promesas pli ol li tenas. Inter ni, » kaj ĉi-tie Fouché alprenas mienon de ironia konfido, « cetere en Tilsitt li estus povinta fari pli por viaj kunpatriotoj, ol li fakte faris. Se la venontan jaron prezentiĝus nova okazo favora al milito kontraŭ Aŭstrio, kion mi atendas, vi ne devas lasi ĝin eskapi. »

«Mi ne volas maloportuni la imperiestron. Mi ne metas mian fierecon kien vi supozas : se Pollando devas renaskiĝi, kio estas mia plej kara deziro kaj por kio mi volonte donus mian sangon, tio ne okazos per intrigo. Ĝia sorto estas skribita tie supre, kaj la kalkuloj de la homoj ŝanĝos nenion pri tio. »

«Oni ŝanĝas, kion oni volas, sinjorino, kaj kiam oni volas. »

Marie Walewska rektiĝas kun decidema faldeto sur sia frunto.

«Sinjoro,» ŝi diras, « ni devas fini tiun konversacion. Ni diris ĉion pri la temo, kiu, vi sentas tion, estas doloriga por mi. Ni lasu la ĥimerojn. Ili ne povas fari bonon nek al vi nek al mi, kaj se la imperiestro estus informita pri ĝi, li ne estus kontenta. Dankon pro viaj avertoj. Mia vivo estos, kia Dio volas ĝin. La imperiestro restos korligita kun mi aŭ forlasos min. Se li ŝanĝiĝus tiurilate, mi reirus al mia patrino en Pollando, kaj mi plu vivus sen plendi kun la memoro pri lia amo. Sed mi provus fari nenion por reteni lin. Mi hontus ŝuldi sian afekcion al intrigoj. La Imperiestrino agu kiel si volas. Tio estas afero inter si kaj ŝia konscienco.

²⁴ Jagelo, reĝo de Pollando kaj grandprinco de Litvo (1348-1434), prapatro de la dinastio de la Jagelonoj, kiu regis ĝis 1572.

Neniu vorto iam eliros mian buson por forigi ŝin de la Imperiestro. Kion ajn vi pensos pri la bonfaroj de divorco, ĝi dolorigus lin, mi kredas. Li sendube ne plu amas ŝin, sed li gardas amikecon por ŝi. Tro da tagoj ligas ilin por ke Napoleono ne suferu pro rompo kun la pasinteco. Nu, vi vidas, mi volas fari nenion kiu povus malĝojigi aŭ eĉ tedi lin. Li jam havas sufiĉe da zorgoj, por ke tiuj kiuj amas lin, aldonu aliajn.”

Fouché ekstaras, prenas sian ĉapelon kaj per akra tono, kiu perfidas lian koleron, li diras:

«Vi do preferas la hodiaŭan situacion? Ĉu ĝi estas digna je vi? Ĉu ĝi estas digna je la imperiestro? Ĉu vi volas resti submetita al kaprico, al hazardo, dum maldigna edzino partigas lian tronon? Sed estas por li, por lia laboro, por lia heredaĵo, ke vi vidas min en zorgoj. Se tiu virino restos kie ŝi estas, mi deklaras tion al vi, tiam la Imperiestro estas kondamnita.»

Li ne plu moviĝis, sed fikse regardis la verdan kaj nigran rosacon sur la tapiŝo. Eble li esperis fleksi la reziston de Marie per tio atako. Sed ŝi ne respondas. Tiam ŝi leviĝas.

Tiam retrovante tiun Eklezian prediktonon, kiu memorigas, ke li iam estis oratoriano, Fouché decidis konkludi :

« Mi bedaŭras vian decidon, Sinjorino, sed ĝi honorigas, mi konfesas tion, la delikatecon de viaj sentoj. Ĉar tiu konversacio pezas sur vin, mi tuj finos ĝin. Mi tro alte taksas vian gracion por riski malkontentigi vin. Tamen permesu al mi diri unu lastan vorton. Tiu ŝanĝo, por kiu vi ne volas kunlabori, okazos malgraŭ via noblanima rezerveco. Ĝi estas neevitebla. La savo de Napoleono kaj la tran-kvileco de Francio necesigas ĝin, kaj mi laboras por realigi ĝin. Kiam la evento estos okazinta, ni tiros el ĝi la konsekvencojn. Hodiaŭ mi petas nur unu aferon de vi : nome, ke vi permesu min estontece servi vin, ser-vante la Imperiestron. Mi pretendas nur esti la plej modesta kaj la plej atenta el viaj amikoj. »

Tiam Fouché kliniĝis antaŭ Marie avec speco de respekto kun kiu oni povas turni sin nur al la imperiestrino de morgaŭ...

*
* *

Marie neniam parolis al Napoleono pri tiu konversacio. Ŝi timis ofendi lin kaj malaltigi sin mem per aludo al la nova legantino de Joséphine. Aliflanke ŝi volis teni sin ekster la disputo de la imperiestrino kaj Fouché. Ŝi do

silentis pri tio al la imperiestro. Sed malgraŭ ĉio, pli maltrankvile ol ŝi volis lasi aperi, ŝi petis Duroc pri lia opinio, tuj kiam li montris sin ĉe ŝi. La karaktero de la grandmarŝalo inspiris al ŝi varman simpatian. En la kortego genuante antaŭ la triumfanta soldato, li estis preskaŭ la sola kiu gardis la kapon alta kaj la menson libera. Liaj ofte tro aŭdacaj vortoj estis fojfoje malbone ricevataj de la imperiestro, kiu, se oni kontraŭis lian opinion, vidis en tio kritikon, kiu revenos poste. Sed lia dediĉiteco faris el li nekompareblan amikon, la solan kiun Napoleono gardis en lia alta loko. Tial lia influo estis imensa : li neniam misuzis ĝin kaj neniam uzis ĝin por si mem kaj liaj familianoj. Li uzis ĝin nur por justaj aferoj, la malpezigo de la sorto de la malriĉuloj kaj la vera bonfarto de la imperiestro.

Marie kaj Duroc proksimiĝis unu al la alia per sia komuna afekcio por Napoleono. Cetere la grandmarŝalo havis delikatan estimon por Marie, kiun li ne traktis kiel mastrinon. Ofte konsultata de ŝi, li volonte faris sin la mentoro de la juna nesingarda virino, kiu oferis ĉion pro Napoleono kaj kiu povus esti forlasita morgaŭ pro kortega intrigo aŭ vira kaprico.

La grandmarŝalo gratulis Marie, pro tio ke ŝi rifuzis konkludi aliancon kun Fouché. Li timis la cinikan aktivecon de la ministro, parolis al li pro la bezonoj de sia tasko, malgraŭ la deziro esprimita de la imperiestro, kiu plurfoje provis repacigi ilin.

«Vi agis saĝe,» li diris. « Vi ne povus esti tro singarda kontraŭ Fouché. Li volus fari el vi sian instrumenton. Li ankoraŭ ne rezignis pri tio, ĉar la eltrovemo de sia menso estas neel-ĉerpebla. Lia averto pri fraŭlino Guillebeaux estas nur preteksto. Mi ne kredas, ke la eniro de tiu persono en la domon de la imperiestrino estus la rezulto de intrigo. Ĉiakaze reĝino Hor-tense certe ne havas la manon en tiu afero. Ŝi mem havas tro da zorgoj por enmiksiĝi en tiajn intrigojn.»

Li restis fidela al sia malnova amo por Hortense, ĉiam defendante ŝin, eĉ kontraŭ ĉia evidenteco, kvankam jam de longe ŝi konsideris lin kun leĝera malestimo. Ŝi estis tre egoisma, kaj ŝia afabla ekstero ne povis tute kaŝi ŝian malĝojan kaj malvarman koron. En la tempo de la Konsuleco ili amis sin kaj revis povi geedziĝi. Al Napoleono plaĉis tiu geedzeco, sed Joséphine oponis ĝin. Ŝi deziris krei kiel eble plej multe da ligoj inter la Bonapart-oj kaj sia familio Beauharnais. Unuigante Hortense kun Louis, ŝi kredis prepari al si sekuran kaŝejon

kontraŭ estontaj tempestoj. Ŝi intrigis kontraŭ Duroc, kiu estis tro soldato por bone defendi sian aferon. Amare plorante, Hortense fariĝis sinjorino Louis Bonaparte kaj poste reĝino de Holando. Finfine Duroc laŭordone de Napoleono edziĝis al riĉa, orgojla, kaprice-ma Hispanino, kiu faris lin komplete malfeliĉa. Li rifuĝis al la imperiestro kaj konstante vivis ĉe lia flanko. Tio plaĉis al Napoleono, kiu deziris, ke oni vivu nur por li.

Por tute trankviligi Marie, Duroc promesis al ŝi teni la okulojn sur la agadon de fraŭlino Guillebaux.

«Al mi ŝi ŝajnas tute sensignifa, » li diris al Marie, « Ĝis nun la imperiestro tute ne atentis pri ŝi. Se li rimarkus ŝin, ni povus decidi kion fari. La imperiestrino kapablas, mi kredas, serĉi per ŝi distraĵon por la imperiestro, sed ni estas ankoraŭ malproksime de tio, kaj vi erarus, se vi jam nun timiĝus pro tio.»

Ŝi rigardis Duroc. Granda, kun larĝaj ŝultroj, li havis sur sia alta kolumo kapon kun fortaj trajtoj kaj kun granda tufo da konfuza hararo. Sed lia buŝo havis faldon de bonkoreco, kaj liaj tre larĝaj bluaj okuloj estis dolĉaj. Marie sentis sin komforta en lia ĉeesto, aŭdante lian firman voĉon.

« Mi pensas, ke ni jam sufiĉe parolis pri mi, kara generalo. Ni parolu nun pri li. Ĉu li estas gaja ? Ĉu li laboras ankoraŭ tiel multe ? Ĉu mi povas esperi, ke li venos ĉi-vespere ? »

VI. Marracq

La 2-an de aprilo 1808 Napoleono forlasis Saint-Cloud por iri al Bayonne. Li volis mem reguligi la aferojn de Hispanio. Murat, kiun li estis sendinta al Madrido, revis nur povi fariĝi reĝo de Hispanio. La Angloj estis alvenintaj en la duoninsulo. Necesis meti ordon en tion ĉion. Malgraŭ siaj petegoj, Joséphine ne ricevis la permeson akompani la imperiestron. Fouché opiniis, ke la pompo kaj lukso de kortego tute ne konvenas al diplomata kaj militista kampanjo. Kaj li aldonis, ke sinjorino Walewska povus sekvi lin post iom da tempo kaj esti establita ne tre for de li.

« Ne, » replikis Napoleono, « tio ne decus. Eksterlande mi faras, kion mi volas, sed en Francio mi ne volas kaŭzi babiladon. La grafino samopinias. »

Marie vidis foriri la imperiestron kun malĝojo, sed ŝi kaŝis sian emocion. Napoleono estis skribonta al ŝi ĉiutage, kaj komence li tenis sian

promeson. Matene aŭ vespere alvenis en la strato Houssaye speciala kuriero kun tre tenera letereto. Marie tuj respondis al ĝi, tiel pasigante la longajn tedajn tagojn.

Tamen, tuj kiam li instalis sin en la malgranda kastelo de Marracq en la ĉirkaŭaĵo de Bayonne, li antaŭvidis, post ekzameno de la Hispana konfuzeco, ke li devos rezidi tie plurajn monatojn por solvi ĝin kaj bedaŭris sian decidon foriri sola. Li ne povis elteni la solecon kaj sentis la bezonon de intimeco, afablaĵoj kaj amuzaj babilaĵoj, kiujn nur la ĉeesto de virino povis havigi al li. Joséphine kaj ankaŭ Marie kutimis fari tion. Nur tio povis malstreĉi lin post lia laciga ĉiutaga laboro. Venigi sinjorinon Walewska estis nepensebla, kaj li vokis al si la imperiestrino.

Joséphine, tre ĝoja, tuj forveturis, kaj la 27-an de aprilo ŝi aliĝis al la imperiestro.

Tiu subita turno de Napoleono, kiu konsternis Fouché, redonis al la imperiestrino siajn iluziojn kaj kuraĝon. Malproksime de la abomeninda la ministro, kiu ne ĉesis persekuti ŝin per sia malamo, daŭrigante en la gazetoj kontraŭ ŝi sian venenan kampanjon, ŝi esperis rekonkeri la imperiestron. Ŝi sciis, kiamaniere ŝi povos plaĉi al Napoleono kaj per kiuj rime-doj tuŝi lian koron. Ĉirkaŭ ŝi ŝi kreis etoson de agrabla komforto. Ĉiam preta, ĉiam ridetante, parolante kaj silentante kiel kon-venis, ŝi atendis bonan okazon, incidenton, malfortan momenton – kiu scias ? – por, se ne regajni la amon de la imperiestro, almenaŭ denove ricevi liajn konfidencojn, kiuj ebligis ŝin reestabli etoson de fido kaj amikeco.

Joséphine prenis kun ŝi fraŭlinon Guillebaux, sur kiu, kion ajn povus pensi la honesta Duroc, ŝi fondis pli-malpli la planon, kiun Fouché pentris antaŭ Marie.

Gardinte pri la geedzeca fideleco ideojn de la Malnova Reĝimo, ŝi akceptis, ke Napoleono trompas ŝin, kondiĉe ke li ne korigiĝas al sia amantino. Se la Guillebaux devis forgesigi Marie Walewska, kiu fariĝis danĝera, ŝi sciis, kiel forgesigi al li la Guillebaux. Ekspertino pri tiaj intrigoj ŝi faris ĉion ekde tiu momento por altiri la atenton de Napoleono al sia legistino.

En Marracq, kiel en la Tuilerioj, li tagmanĝis sola kaj vespermanĝis kun la imperiestrino. Sed antaŭ tuj reiri al sia kabineto, li sekvis Joséphine al la salono la du unuajn vesperojn kaj iĝis servi al si kafon. Nur kelkaj damoj estis tie : sinjorino de la Rochefoucauld, sinjorino de Rémusat, sinjorino Maret, sinjorino Lavalette kaj bela, tre blonda kaj rozkolo-ra filino, kiu,

kiam Napoleono pasis proksime de ŝi, levis siajn admirindajn grizajn okulojn al li kaj tuj mallevis ilin kun batetado de la palpebroj, plena je la plej lerta emocio. Tio estis fraŭlino de Guillebeaux. Napoleono jam rimarkis ŝin en Parizo, demandis ŝian nomon kaj ne plu pensis pri ŝi.

En la rondo de la eta kastelo, la koketulinino estis tuj rimarkita. La imperiestro venis al ŝi kaj komplimentis ŝin pro ŝia simpla kaj sam-tempe eleganta tualetto : robo el blua silko kun blankaj borderaĵoj, kaj, ĉar ŝi estis legistino, li petis ŝin legi kelkajn tekstopartojn laŭ sia propra elekto.

«Kion mi legu, Siro ? Jean Zaïre, Ossian, nova romano de sinjorino Gay...»

Tio estis verkoj kaj aŭtoroj kiujn Napoleono preferis. La elekto estis do bone farita. Sed la imperiestro montris malgrandan libron duone kaŝitan sub aliaj volumoj.

«Kio estas tio ĉi, fraŭlino ?»

«Ha, Siro, tio estas *le Cid* de Corneille.»

«Nu, tial legu al ni kelkajn versojn el *le Cid*. Ni estas proksime de Hispanio. Tio estas vere bona elekto, ĉu ne Joséphine ?»

La imperiestrino respondis per rideto, kaj fraŭlino Guillebeaux komencis legi per belsona voĉo parton de la tria sceno el la tria akto, kie Chimène malfermas sian koron al sia konfidenculino kaj konfesas sian amon por Rodrigue.

La noblaj versoj resonis tra la granda tran-kvila salono, dekoraciita per blankaj lignaĵoj kaj meblita laŭ la modo de la XVIII-a jarcento, en kiu la lampoj lasis ombroĉajajn spacojn.

*Elvira, estas malmulte diri : mi adoras lin ;
Sed mian amon kontraŭstaras mia rankorego ;
En mia malamiko trovas mi mian amanton,
Kaj mi sentas, ke malgraŭ mia tuta kolero,
Li ankoraŭ batalas kontraŭ mia patro.
Li atakas lin, premas lin, cedas, defendas sin,
Jen forte, jen malforte, jen triumfante ;
Sed per la dura batalo inter kolero kaj amo
Li disŝiras mian koron kaj mian animon... »*

Fraŭlino Guillebeaux legis vere agrable, kun ĝuste tiom da emfazo kiom necesis por plaĉi al la imperiestro. Tiuj versoj plenaj je heroeca emocio alprenis en ŝia buŝo pli homan am-sopiron, kaj ŝia voĉo arte fleksiĝis por emfazi la plivigliĝon de pudoro ĉe Chimène, kiu fine kapitulacas.

Tiam ŝi alvenis al la dialogo, en kiu Rodrigue kaj Chimène, alfrontas sin, havante insul-tojn

en la buŝo, sed konfesas sian amon unu al la alia :

*Rodrigue, kiu kredus tion ? Chimène, kiu dirus,
Ke nia feliĉeco estis tiel proksima kaj tiel
baldaŭ perdiĝis ?*

Napoleono, ripetante la aleksandrojn per la lipoj, ekstaris kaj komencis marŝi tra la salono kun la manoj sur la dorso. Per speco de tiko, kiun li fojfoje havis, li leĝere relevis la deks-tran ŝultron kaj skuis la kapon.

Kiam la legistino alvenis ĉe lasta verso, kiu fermis la kvinan scenon, nome

Mi serĉas la noktanta silenton por plori ,

li iris al fraŭlino Guillebeaux kaj donis al ŝi signon fermi la libron.

«Dankon, fraŭlino. Vi voĉlegas tre bone kaj eĉ povus ĵaluzigi niajn tragediistinojn. Sed ne daŭrigu : vi lacigus vian voĉon, kaj tio estus bedaŭrinda.»

Tiam li komencis paroli pri Corneille, kiun li bone konis kaj asertis kompreni pli bone ol iu ajn. La nuancoj de la versoj de Racine, lia mezurita pleneco, lia sekreta lirikis-mo trovis malmulte da eĥo en lia imago, kiu inklinitis al forteco kaj pompo. Li preferis al ili la ofte bombastan stilon de la granda pliaĝulo.

Li parolis ankaŭ pri *Cinna*, kiu estis laŭ li la modelo de la politika tragedio kaj kiu ne havis laŭ li sian egalan en la teatro. Li laŭdis la sekvan verson :

Ni estu amikoj, Cinna, estas mi kiu invitas vin.

Li ĉiam diris Sylla anstataŭ *Cinna*²⁵, kiuj estis malamikoj, kaj kiam oni remarkigis tion al li, li respondis, ke tio tute ne gravas, ĉar li respektis la ritmon. Li certe estus daŭriginta pli longe la konversacion, aŭ prefere la monologon, se Maret ne estus enirinta la salonon, informante lin, ke kuriero de Hispanio estis alveninta.

« Estas bone, » li diris, « mi sekvos vin. »

Antaŭ ol foriri, li tre gracie salutis la damojn, kaj ripozigis sian rigardon sur la bela duone nuda sino de fraŭlino Guillebeaux.

Oni frue enlitiĝis en Marracq. Sed tiun vesperon la imperiestrino, gaja kaj viveca, longe retenis siajn gastinojn. Ŝi ĝojis pri la sukceso de sia ruzo. La legantino baldaŭ estis havonto kaŭzon ankoraŭ pli ĝoji. Du horoj post ŝia legado, dum ŝi lozigis siajn harojn por la nokto en la modesta ĉambro sub la ĉevronoj, kiun estis asignita al ŝi, iu frapis sur la pordon. Ŝi malfermis kaj rekonis la Mamelukon Rous-tam,

estis amiko de Marius. Post la morto de Marius Sylla fariĝis diktatoro de Romo.

²⁵ Dum la unua interna milito en Romo ĝiaj protagonistoj Sylla kaj Marius, onklo de Caesar, luktis inter si pro la potenco. Cinna, la bopatro de Caesar,

kies orientan kostumon kaj ferocaj lipha-roj en la duonmallumo, estus forte timiginta malpli decideman personon ol fraŭlino Guille-beaux. Li rekte komunikis al ŝi, ke ŝi estas ricevonta la imperiestron. La ruza junulino juĝis superflua pretendi konfuzon aŭ ofendon. Kelkajn momentojn poste ŝi troviĝis inter la brakoj de Napoleono.

Li vizitis ŝin plurajn noktojn sinsekve, trovis ŝin laŭ sia gusto, facila kaj aminda. Sed iumatene, amuzite per la aventuro, li rakontis ĝin al la grandmarŝalo, kun kiu li promenis tra la aleoj de la parko. Duroc, fariĝinta atenta per kelkaj bruoj, ankoraŭ ne estis certa. Je tono de severa respekto, pro kio la imperiestro fojfoje nomis lin 'mia konscienco', li respondis, ke tiel malgranda venko certe ne meritis gratulojn.

«Kaj kial ne?» demandis la imperiestro, iom pikita. «Ĉu ŝi ne estas bela kaj agrabla? Ŝi estas tre bone farita, sen tro da karno. Vi ŝajnas vere naŭzita. Kion do vi bezonas, vi?»

Kaj li ellasis la brakon de la grandmarŝalo.

«Fraŭlino Guillebeaux certe havas fizikajn kvalitojn, kiuj rekomendas ŝin. Sed ŝi estas knabino kiu penetris en la kortegon por esti rimarkita de Vi. Ŝi ne bezonis multan tempon por tio: tio pruvas ŝian sperton.»

«Kion do vi diras? Ĉu vi frenezas?»

La grandmarŝalo rakontis sen eŭfemismoj la antaŭaĵojn de fraŭlino de Guillebeaux. Ŝiaj amrilatoj kun Murat kaj Junot igis la cesaron²⁶ kuntiri la brovojn. Sed Duroc ne ĉesis post tio. Li havis la talenton rakonti ĉion, kaj profunde tuŝite per la manko de fideleco de la imperiestro al virino kia Marie, li ne hezitis akuzi Joséphine pro tio, ke ŝi aranĝis la tutan intrigon por instigi Napoleonon forlasi sinjorinon Walewska.

La imperiestro laŭte blasfemis. Tiu trompo kolerigis lin. Pro kolero liaj okuloj fariĝis mal-lumaj. Li reprenis la brakon de Duroc kaj trenis lin al la kastelo.

«Ni tuj ekscios, kio okazis,» li diris, «sed ve al li aŭ ŝi kiu trompis min! Atendu min en mia kabineto...»

Li rapide supreniris la ŝtuparon kiu kondukis al la apartamento de la imperiestro kaj eniris ĝin kiel ventego sen anoncigi sin.

Joséphine estis faranta sian tualeton. Je la aĝo kiun ŝi atingis, certaj artifiko estis necesaj, kaj ŝi ne ŝatis, ke Napoleono surprizis ŝin ĉe tiu

okupo. Li tamen kelkfoje venis, ĉar li multe ŝatis enmiksiĝi en ŝian tualeton, malfermi la juvelujojn, provi kolĉenojn kaj brasletojn. Tiu frivola okupo amuzis lin. Cetere tio estis maniero kontroli la troan malŝparemon de Joséphine.

Ŝi returniĝis al li kaj faris al li amikecan signon per la mano. Herbaut estis aranĝanta ŝiajn harojn. Li estis bagatelema artisto, kiu ne ŝatis, ke oni interrompu lin. Sed Napoleono konsideris nek lin nek la ĉeestajn damojn. Per militista gesto li sendis ilin eksteren.

«Kio estas, mia amiko?» demandis Joséphine, tremante antaŭ tio kion ŝi nomis lia 'uragana vizaĝo'.

Li maldolĉe prenis ŝin ĉe la manradiko.

«Tiu Guillebeaux, kiun vi trenis ĉi-tien, ĉu estis via intenco, ke mi dormu kun ŝi? Nu, estu kontenta: tio okazis.»

Joséphine, konfuziĝinta, komencis balbuti.

«Kian furiozecon vi do havas, ke vi ĉiam puŝas virinojn inter miajn kruojn? Antaŭ tiu ĉi, estis la Gazzani. Vi ekzercas belan metion! Kie vi lernis tion: ĉe onklino Renaudin aŭ kun Barras?»

La insulto estis tre kruela: ŝian tutan kotan pasintecon li vortigis en unu frazo, kiu li ĵetis sur ŝian vizaĝon. Joséphine kaŝis sian vizaĝon en siaj manoj kaj komencis plori. Proksime de ŝi Napoleono furioze piedfrapis.

«Tuj konfesu, ke vi denove faris tion, se ne mi detruos vin kiel tiun ĉi pleton.»

Li kaptis belegan pleton de Sèvres, sur kiu troviĝis la teservico de la imperiestro kaj ĵetis ĝin sur la plankon, kie ĉiuj objektoj rompiĝis en mil pecetoj.

Joséphine respondis nenion, sed ploris pli forte. Ŝiaj preskaŭ konvulsiaj singulto skuis ŝiajn maldikajn ŝultrojn.

Napoleono malamis larmojn. Antaŭ ili li sentis sin senpova, anticipe malgajninta. Li timis tiun senton, al kiu li neniam povis eskapi. Ankaŭ ĉi-foje, li sentis sin malfortiĝi.

«Nu, parolu,» li diris per malpli kruda voĉo kaj sidiĝis apud ŝin.

«Sed kion vi volas, ke mi diru?» replikis Joséphine, provante gajni tempon.

«Mi volas aŭdi la veron, kaj se vi diros ĝin al mi, mi eble pardonos vin. Sed ne provu mensogi. Tio finiĝus malbone por vi.»

²⁶ Familia nomo de la Romia diktatoro Gajo Julio Cesaro, Latine *Gajus Julius Caesar* (pron. Kajsar), kiun transprenis ĉiuj imperiestroj de Romia, tiel ke

poste ĝi signifis imperiestron. La Germana *Kaiser*, la Nederlanda *keizer* kaj la Rusa *carj* devenas de ĝi.

Li prononis tiujn vortojn kun malvarma decidemo. Joséphine timis tiun malvarman trankvilecon ankoraŭ pli ol lian koleron. Ŝi decidiĝis. Per mallongaj interrompitaj, sed lertaj frazoj, ŝi faris sian konfesion:

«Komence mi ne kredis, ke la Guillebeaux povus plaĉi al vi... Mi dungis ŝin laŭ rekomendo de Hortense... Kaj poste, kiam mi konis ŝin pli bone, jes, mi pensis, – aĥ, Bonaparte, kiel kruela vi estas, igante min diri tion! – mi pensis, ke ŝi eble povus amuzi vin... Kion vi volas? Sed ankaŭ vi suldas pro tio!... Vi frenezigas min per via dureco, via konduto kun tiu Polino, pri kiu oni diras, ke vi volas edziĝi al ŝi, post kiam vi estos divorcinta min!... Tiu monstro Fouché ne ĉesas disvastigi tiun famon. Ĉiuj miaj amikoj estas konsternitaj... Mi ne plu havas ripozon. Mi ne plu dormas, mi apenaŭ manĝas. La timo perdi vin por ĉiam devoras min. Aĥ ! Mia amiko ! Vi igas min terure suferi!... Antaŭ longe mi mis-kondukis kontraŭ vi, sed temis pri leĝeraj eraroj. Ili ne estis tiaj, kiaj Fouché kaj viaj fratoj raportis ilin al vi. Sed vi igis min kare pentofari pro ili. Mi scias, ke vi ne plu amas min. Sed mi amas vin ankoraŭ ĉiam kaj ĉiam pli... Ve! Mi faras ĉion kio povus plaĉi al vi, kaj vi havas por mi nur lezajn vortojn kaj kolerajn rigardojn!...»

La sinteno de Napoleono ŝajnis malstreĉiĝi. Sentante, ke ŝi duone gajnis sian aferon, la imperiestrino daŭrigis karese kaj humile :

«Memoru tamen, Bonaparte, kiel feliĉaj ni estis antaŭe, memoru nian malgrandan domon en la strato Chantereine, memori Italion kaj Malmaison. Tiam vi havis nur okulojn pro via Joséphine. Povra Joséphine! Nun ŝi estas la celobjekto de moko kaj rido por ĉiuj. Dio mia, je preferas morti ! Jes, se tiu ekzisto daŭros ankoraŭ pli longe, mi preferos morti ! Ĉu vi volas tion ?»

Kun duone sincera, duone ŝajnigita depremiteco, ŝi lasis sinki sur sian robon siajn maldikajn brunajn brakojn. Napoleonon venis al ŝi kun malsekaj okuloj kaj kisis ŝin.

«Nu, granda stultulino», li diris, «ne plu ploru. Mi deziras, ke vi amuziĝu kaj ridu kial antaŭe. Kion vi devas timi de mi ? Viaj amikoj kaj Hortense metas stultajn ideojn en vian kapon. Estu bona kaj saĝa, kaj ne plu okupiĝu pri mia konduto. Vi kolerigis min uzante malnoblajn rimedojn, maldignajn je vi, mal-dignajn je mi. Ne plu rekomencu kaj ĉio estas forgesita.»

«Ne, mi ne rekomencos, mi promesas tion al vi, Bonaparte, neniam plu ! Sed ŝparu min, diru

al mi, ke vi sentas ankoraŭ amikecon por via Joséphine !»

«Sendube, kaj vi devas scii tion, ĉar mi estas bona edzo por vi. Ĉu vi ne havas ĉion kion vi bezonas ? Ĉu mi ne bonege zorgis pri la viaj ? Mi fermas la okulojn sur via malordo. Mi ne ĉesas doni al vi monon kaj juvelojn. Sed viaflanke vi devas bone kompreni, ke mi volas esti libera. Viroj kiaj mi ne povas esti submetitaj al la kutimaj reguloj. Vi devas respekti miajn fantaziaĵojn aŭ almenaŭ ignori ilin. Ĉu mi ne donis al vi ekzemplon de indulgemo ? Tiu disputo povas neniakaze esti ripetata. Lasu min fari kio plaĉas al mi, se vi volas resti mia amikino. Ĉu vi ĵuras fari tion ?»

«Jes, Bonaparte, mi ĵuras tion,» diris Joséphine, eligante longan suspiron.

Ŝi estis tre kontenta, ke ŝi savis sin tiel bone kaj malkare el tiu afero. Ŝi tamen rimarkis, ke Napoleono tute ne respondis al ŝia aludo al divorco. Li donis al ŝi nenian certecon pri la estonteco. Ĉu li faris tion intence ? Ne estis facile scii tion, ĉar jen Napoleono transbordiĝis per Itala multvorteco, jen per brutala sincereco. Tiel ŝi restis necerta.

Turnante la dorson al ŝi, li foriris trovi Duroc. Li petis lin silenti pri tiu okazaĵo. La grandmarŝalo promesis tion, sed li ne kaŝis al la imperiestro, ke sinjorino Waleska estos alarmita. La leteroj de Napoleono iom post iom estis disspaciĝintaj. Ekde ok tagoj li ne sendis leteron al la strato Houssaye. Kelkaj frazoj senditaj de Marie al Duroc por peti novaĵojn pri la imperiestro perfidis ŝian timon.

« Povra infano! » ekkriis Napoleono. « Kiel forte ŝi teniĝas je mi! Ŝi estas vera anĝelo. Vi pravas, Duroc, mi agis malbone kontraŭ ŝi. Mi volas ripari tion, ĉar mi ne volas malĝojigi ŝin ! »

Kaj kaptita per pento, li tuj komencis skri-baĉi letereton al ŝi sur angulo de sia skrib-tablo.

Mia amikino, mia tenera Marie, mi ne povas elteni esti tiel for de vi. Vi estas la konstanta objekto de mia pensoj. Mia imago laciĝas serĉante, kion vi faras. Se mi vidas vin malĝoja, ma koro dissiriĝas. Se vi estas gaja, mi riproĉas al vi, ke vi forgesas, ke vi estas separita de mi. Aĥ, mi estas maltrankvila, ĉar mi amas vin ! Mi havas tiom da aferoj ĉi tie, ke mi ne trovis tempon skribi al vi. Ekskuzu min pro tio, plendu min kaj rapide diru al mi, ke vi neniam dubos pri la sentoj de via Napoleono.

La saman vesperon fraŭlino Guillebeaux, post severa interparolado kun la grandmarŝalo,

grimpis en poŝtveturilon kaj prenis la vojon al Parizo.

La restado de Napoleono en Marracq daŭris tri monatojn pro la fortaj kaj neantaŭvidataj eventoj en Hispanio. Balanciĝinte iom da tempo, Napoleono, inspirita de la senkompata logiko de lia kontraŭanglia sistemo, kaj eble ankaŭ memorante reĝon Ludovikon XIV, nomumis sian fraton Joseph reĝo de Hispanio kaj anstataŭigis lin per Murat sur la trono de Napolo.

Dum la tedaj semajnoj pasigataj en tiu malgranda kastelo, Joséphine elĉerpis sin per ruzoj kaj koketaĵoj por rekonkeri la koron de Napoleono, kaj li ne estis indiferenta al ili. Plurfoje li havis por ŝi amikecajn vortojn. La eskvizita takto kun kiu ŝi ricevis la detronigitajn Hispanajn Burbonojn kontentigis lin. Li parolis al ŝi pri kelkaj projektoj. Tiam ŝi rekuragiĝis, kaj dum konversacio kun li, ŝi remetis sur la tablon la zorgon kiu obsidis sian pensojn : ĉu li ankoraŭ longe estis permesonta, ke Fouché elĉerpas sian malamon kontraŭ ŝi ?

«Kial vi denove parolas al mi pri tio ? » li grumblis, malkontenta. Mi ne plu pensis pri tiu afero. Lasu la politikon. Vi komprenas nenion pri ĝi.»

Ŝi ne insistis, kaj nerimarkite ŝi kondukis la interparoladon al malpli danĝeraj temoj.

Sed la morgaŭon okazis neatendata sceno.

Post la tagmanĝo Napoleono venis en la salonon trinki tason da kafo, kiun la imperiestrino mem enverŝis. Li trinkis kelkajn glutojn, trovis ilin amaraj, elspulis ilin sur la tapiŝon, kaj tiam, metante manon sur la koron, diris ke lia estomako brulis. Li iris al sia ĉambro, sekvata de Joséphine, kaj subite estis skuata per vomado. Ne estis la unua fojo ke li suferis pro tiu malsaneto. Lia digestado ofte estis malfacila. La imperiestrino vokis Constant, diris al li rapide fari teon kaj intertempe malbutonigis la jakon de Napoleono, kiu etendiĝis sur la tapiŝon, kaj frotis lian epigastron per kolonja akvo. Tiam, metante la kapon de Napoleono sur siajn genuojn, ŝi dolĉe forvisis la ŝviton, kiu fluis sur lia frunto. Napoleono lasis ŝin fari, tre sentema al tiuj amplena traktado. Li, kiu riskis sian vivon dudek fojojn dum siaj militiroj, malbone eltenis fizikan doloron. Li trinkis du tasojn da brulanta teo kaj sentis sin pli bone.

«Ĉu vi volas kuŝiĝi iom da tempo ? » demandis Joséphine murmurante. « Mi restos ĉe vi.»

Ĵetante siajn vestaĵojn pelmele tra la ĉambro, li malvestis sin kaj kuŝiĝis sur sian liton, helpate

de Constant. Li ne plu suferis kaj malpermesis, ke oni avertu Corvisart. Joséphi-ne sidiĝis ĉe la litkapon.

Kun la kapo sur sia faldita brako, ŝajnigante dormi, li rigardis ŝin tra siaj okulharoj kaj, ekde longa tempo unuafoje tenerigita per ŝia zorgemo, li sentis reanimiĝi por ŝi ion de sia malnova afekcio.

Li rigardis ŝian velkintan vizaĝon, ŝiajn ŝminkitajn kavajn vangojn kaj ŝiajn malhelbluajn okulojn, kiuj restis tiel karesaj, ŝian larĝan buŝon, kiu ne povis malfermiĝi sen montri ŝiajn putrantajn dentojn, sed kiu nur malfermiĝis per dolĉa rideto. Li vidis la suplan longan kolon, sur kiu la leĝeraj frizoj de la haroj alprenis rufan brilon en la sunlumo. Li precipe spertis la ĉarmon de tiu familia ĉeesto plena je iomete artefarita gracio kaj de mola bonkoreco.

Napoleono komprenis, ke li ne povas facile separi sin de Joséphine. Ili havis tro da komunaj spertoj. Cetere ŝi adaptiĝis al ĉio... En tiu momento li decidis ion, pri kio li hezitis fari decidon dum baldaŭ du jaroj. Li forlasis la ideon de divorco, al kiu oni puŝis lin pro pura politika celo. Li volis ankaŭ pensi pri sia feliĉeco. Kaj tiu feliĉecon li trovis en la divido de sia intima vivo inter sia edzino kaj sia amantino, inter Joséphine kiu plu ornamis siajn palacojn, kaj Marie, kiu estis la sekura kaj diskreta kompanino de lia koro. Inter ili li estis maljuniĝonta. Sed kio pri heredonto ? Ĉu li tiom gravas, ke oni konsentas oferi tiom da aferoj ? Ĉu viroj kiaj li povus havi verajn heredontojn ? Per kio filo valorus pli ol nevo ? Ĉu estis okazonta al lia imperio, kio okazis al tiu de Aleksandro la Granda ? Estu tiel ! Lia nomo en la historio estus nur pli granda pro tio. Li tute malfermis la okulojn. Joséphine ridetis al li. Li tiris ŝin al si.

« Joséphine, mi pensis pri io kion vi diris hieraŭ. Ĉi-vespere mi skribos al Cambacérès por ke li silentigu Fouché, kiu enuigas vin per tiuj stultaj historioj pri divorco. Mi mem, post mia reiro al Parizo, mi skoldos lin tiamaniere, ke li lasos vin trankvila estontece.»

La imperiestrino, freneza pro ĝojo, kisis liajn manojn. Li liberigis sin kaj aldiris :

« Sed mi avertas vin, ke tio ĉi estos ĉio kion mi faros: mi ne forsendos Fouché. Li estas tro utila al mi. Mi neniam anstataŭigos lin. Vi do decidu. Oni ne regas ŝtaton kun virinaj antaŭjuĝoj. Cetere, estu certa, ke li ŝanĝos sian konduton kontraŭ vi. Mi repacigos vin ambaŭ. »

Dubante, Joséphine skuis la kapon.

«Jes » ripetis Napoleono, «mi volas, ke ĉesu la intrigoj ĉirkaŭ mi. Fouché obeos kaj faros, kion mi ordonos al li,» kaj li amikece minacis ŝin per la montrofinĝro, «sed atentu vi mem kaj ne plu malkontentigu min estontece.»

*
* *

Ses tagojn poste, la ĉefkanceliero komunikis al la ministro de la polico la eksplicitan malpermeson fari aŭ lasi fari la plej malgrandan aludon pri divorco de Lia Imperiestra Moŝto. Fouché promesis tion kiel bona ludanto.

« Mia kara princo, » li diris al Cambacérès, « sciigu, mi petas, al la imperiestro, ke mi akceptas sian ordonon kun plena submeto kaj ke mi plenumos ĝin sen sinretenemo. Mi forgesas mian propran opinion, tial ke ĝi povus kontraŭi la planojn de Lia Moŝto... »

VII. Post Wagram

En Schönbrunn, proksime de Vieno, Marie loĝas en malgranda domo je distanco de fusilpafo de la imperiestra palaco. Enpensigita Napoleono promenas tien kaj reen tra la modesta salono. Iam kaj iam li haltas kaj rigardas Marie, kiu sidas ĉe la fajrejo, en kiu – septembro finiĝas – jam flamas hela fajro.

Ŝi ridetas al li. Speco de fizika ekfloro transformis ŝin. Ŝiaj gestoj estas pli certaj. Sed ŝi gardas siajn naivajn okulojn, speguloj de sia entuziasma kaj juna animo, kiujn la vivo ne povas malbriligi.

Kun nekutima dolĉa voĉo kaj kiel eĥo de ia emocio, Napoleono diras :

« Ne restadu tro longe en Schönbrunn. Vi devas esti ĉe vi, ĉirkaŭita de bonaj zorgoj laŭ konvena reĝimo. Ĉi tie ĉio maltrakviligas min. Ni ankoraŭ ĉiam militiras. Akcidento povus facile okazi... »

Marie rearanĝas ĉirkaŭ ŝi la travideblajn faldojn de sia tula ŝalo.

« Ne, mia kara Siro, lasu min resti ĉi tie ĉe vi. Kion mi farus en Parizo sen vi ? »

« Marie, mia infano, vi ne plu rajtas konsulti viajn dezirojn nek la miajn, sed la intereson de via sano, tiun de la nova vivo, kiun vi portas en vi. Mi volas, ke mia filo – ĉar mi estas certa, ke ĝi estos filo, Marie – estu bela kaj forta. Vi foriros per malgrandaj etapoj. Ni aranĝos tion, Duroc kaj mi. Post du aŭ tri semajnoj, ĉio estos aranĝita ĉi tie, kaj tiam mi alliĝos al vi, lasante

liberan kuron al miaj ĉevaloj, antaŭ ol vi alvenos en Parizo. »

Marie estas graveda. Ŝi informis Napoleonon pri tio la antaŭan tagon. Jam de kelka tempo ŝi malsanetis. Vertiĝoj kaj vomemo subite klarigis ĉion.

Komence ŝi estis senfine konfuza. Ŝia neregula stato turmentis ŝin. La infano kiu estis naskiĝonta, estis havonta la nomon Walewski. Kion ŝia edzo, la grafo, estis dironta pri tio? Sed ŝia amo por Napoleono, kiu iom post iom absorbis ĉiujn ŝiajn aliajn sentojn, forgesigis ĉion al ŝi ĉe la penso, ke tiel forta nova ligo baldaŭ unuigos ilin.

Tremetante kaj ruĝiĝante ŝi konfesis sian sekreton al Napoleono post ties reveno de Moravio. Napoleono frenezigiĝis pro ĝojo kaj orgojlo. Li kunfrapis la manojn, ĉirkaŭbrakis Marie, kiu preskaŭ sufokiĝis, kaj tiam, kio ne plu okazis al li ekde la Konsuleco, li faris kelkajn dancaĵojn. Li ne forlasis Marie la tutan tagon nek la nokton, kaj kiam Duroc venis ricevi liajn ordonojn la postan tagon, li komunikis al li la novaĵon ridante kaj tirante je liaj haroj, tiel ke li kriis. Méneval, kiu aperis poste, ne ricevis konfidencan, sed surprizon : tridek mil frankojn da apanaĝo kaj la titolon baronon.

Napoleono jubilas. Joséphine do eraris, kiam ŝi atribuis al li la kulpon pro ilia sterila geedzeco. Li povas doni vivon, ĉar li donis ĝin sen ia dubo. Ne estas facila kaj avida knabino kiu deklaras esti gravedigita de li. Estas Marie, la plej sincera, la plej kara el ĉiuj virinoj kiun li konas. En la profundeco de sia animo li sentas mirigan kaj fortan emociion

«Por mi tio estas imense grava evento. Mia ekzisto estos transformita de ĝi. Ĉiuj miaj projektoj estos prokrastitaj. Mi pensas pri aferoj, kiujn mi ne povas nomi. Mi bezonas tempon por pripensi. Ĝiaj sekvoj estos tiel gravaj ! Sed vi estos kontenta pri mi !»

En sia kvazaŭa ebrieco li aldiras :

«Mi ŝuldas al vi eble la plej grandan ĝojon en mia vivo. Ĝis hieraŭ mi kredis, ke la feliĉeco de la patreco, kiun spertas ĉiuj viroj, estas rifuzita al mi kiel speco de venĝo de la sorto, kiu cetere superŝutis min per tiom da donacoj. Mi amas infanojn, vi scias tion. Sed tiu ĉi estas mia propra infano. Estas graco pri kiu mi ne plu kuraĝis pensi, kaj ekde hieraŭ mi pensas pri nenio alia. Miaj dosieroj, miaj libretoj, miaj etatoj restis sur mia skribtablo. Maret vane persekutas min por subskriboj. Ĉio estas indi-

ferenta al mi krom tio ĉi. Kiom mi amas lin. Kaj kiom mi amas vin !»

«Tiam, mia kara Siro, » ŝi diras ruze petante lin, «ni ne separu nin »

Por eskapi al tiu peto, kiu tuŝas lin, sed kiun li tamen ne volas aŭskulti, li ŝercas:

«Ĉu vi ne ŝatus revojaĝi al Parizo, Sinjorino, kie troviĝas ĉiuj bagatelaĵoj kiujn ŝatas tiom da virinoj, ekzemple via amikino Pauline. Ha ! Kiam mi estos reveninta tie, mi ne plu lasos vin esti ŝparema. Vi scios, kiom mi kapablas vesti kaj ornami la virinon kiun mi amas. Mi volas, ke via vestoŝranko kaj via juvelujo enviigu ĉiujn reĝinojn. »

Ŝi faras nean signon per la kapo.

« Al kio tio utilus. Nenio el tio plaĉas al mi. Elspezi monon ĝenas min. Mi volas esti bela nur por vi. Resti ĉe vi sufiĉas al mi. Kaj tiel longe ke vi permesas al mi ĝui tiun plezuron, mi estos kontenta.»

“Nu, Marie,” li diras, “vi devas esti prudenta. « Vi devas reiri al Francio, ne morgaŭ, sed post kelkaj tagoj. Mi bezonas mian tutan kapon, kaj mi ne povus havi ĝin tuta alie. »

Ŝi suspiras, kaj ŝia vizaĝo sombriga pro leĝera paŭtado.

« Mi tiom deziris restadi ankoraŭ iom da tempo en tiu ĉi malgranda domo, » ŝi mur-muras. « Ni estis tiel feliĉaj ĉi tie. Ĉu vi scias, Napoleono, ĉi tie mi pleje amas vin. Ĉar ĉiam estas gradoj en amo. En Parizo vi estas pli absorbata. La regado tute okupas vin. Ĉi tie, kvankam vi havas la zorgojn de militiro, vi ridetas pli ofte.»

Revante kaj premante inter siaj manoj la manojn de la imperiestro, kiu kliniĝas al ŝi, Marie laŭtvoĉe daŭrigas sian pensadon :

« Estas en vi – kaj eble vi ne scias tion – ia ĉarmo, la talento altiri la aliajn kiu ne tuj frapas onin, sed kies potencon oni sentas, tuj kiam vi parolas. Vi havas la plej belan, la plej kapte-man rideton en la mondo. Mi volus, ke vi ĉiam ridetu. »

«Mi ankaŭ volus tion, mia dolĉa Marie, sed mia metio ne permesas tion. Ne estas ĉiam facile esti imperiestro... »

La milito kontraŭ Aŭstrio finiĝas. Tuj kiam Vieno estas kaptita kaj li estas instalita en la palaco Schönbrunn, la imperiestro revokas Marie al si. Li ne povas vivi sen ŝi pli longe. Dum tiu malfacila militiro la penso pri Marie malofte forlasis lin. Dufoje Duroc iris al Parizo por ekscii kiel ŝi vivas, ĉu ŝi estas feliĉa, ĉu ŝi

ankoraŭ ĉiam amas lin, ĉar ĵaluzeco mordis lian menson. Marie, kiu kun timo en la koro sekvis la eventojn de tiu milito, dum kiu la sorto de Napoleono dum momento ŝajnis ŝanceliĝi, Marie kun ĝojo vojaĝis al li. Antaŭ ĉio ŝi volis revidi lin kaj tiam memori sian imperiestran amikon pri lia promeso... Napo-leono ofte ripetis al ŝi, ke tiu milito dependas la sorto de Pollando !

La imperiestro volas kontentigi Marie. Ekde la unuaj intertraktadoj li petas la registaron de Vieno forlasi siajn Polajn provincojn. Radiante, Marie jam vidas sian patrimon restaŭrigita sub nacia reĝo, kiel ekzemple princo Poniatowski... Sed la opozicio de Rusio estas tiel forta ĉi-foje, ke Napoleono, obsidita de la danĝero kiun konsistigas Anglio, ŝanĝas sian planon malgraŭ la malaproba konsilo de Maret kaj Duroc.

Por ne malpaciĝi sen riparo kun la caro, li decidis post semano de hezitado ankoraŭ prokrasti la kompletan restaŭradon de Pollando. Li klarigas al sia amikino la necesecojn de situacio, kiun ankoraŭ pli komplikas la kata-strofaj eventoj en Hispanio. Marie ploras, petegas kaj tiam silentas. Plena je fido en la viro, kiu jam plenumis tiom da mirakloj sur la plene ŝanĝita surfaco de Eŭropo, kaj malfor-tigita de sia amo, fine rezignacias. Napoleono, sentema al tiu nova ofero, ĵuras al si baldaŭ pagi al ŝi mem belegan prezon.

La fido de Marie en li igas lin duobligi la afablaĵojn al sia amantino, al kiu liaj fortaj sentoj kaj lia digneco donas en liaj okuloj kaj en tiuj de liaj familianoj la rangon de edzino. Surda al la flatado kaj plendoj de Joséphine, kiu petas lin en ĉiu letero reveni al ŝi, li ne plu respondas al ŝiaj leteroj, sed skribas al Cam-bacérès, ke tiu ĉi devas kontroli la elspezojn de la imperiestrino, ĉar li « *ne akceptas, ke lia foresto delogu ŝin al folaĵoj...* »

Vesperiĝas. La imperiestro agitas sonorileton. Constant aperas, portante du lampojn. Li fermas la kurtenojn kaj foriras per senonaj paŝoj. Sidante apud Marie, Napoleono meditas. La sonorado de l'angeluso²⁷ en la apuda kapelo de la kastelo tiras lin el lia silento.

«Mi ŝatas la sonon de la sonorilo, » li diras mallaŭte. «Eble ĝi plej forte emocias min. Mi memoras miajn unuajn jarojn en Brienne. Tiam mi estis feliĉa, sed ne tiel feliĉa kiel hodiaŭ.»

²⁷ Preĝo kiun antaŭe preĝis matene, tagmeze kaj vespere la Romkatolikaj kredantoj.

Tenera emocio ankoraŭ plidolĉigas la dolĉan vizaĝon de Marie. Ŝia tuta sento de forlasiteco malaperas ĉe tiuj vortoj...

«Jes, ni estas feliĉaj ĉi tie. Ni estas liberaj, malproksime de tiuj kiuj envias nin aŭ malamas min... Fojfoje mi bedaŭras, ke mi atingis tian altan staton. Kun vi, Marie, kaj la soldo de kapitano, mi vivus kontenta.»

Li diras la veron. Li gardis siajn simplajn gustojn. La lukso, kiun li imponas al sia kortego, la multekostaj tualetoj, la juveloj, kiuj brilas sur la nudaj ŝultroj de la gekorteganoj, estas por li nur akcesoraĵoj devigitaj de la grandeco de lia stato. Al la vivo en la palaco Tuilerioj li preferas la simplan militistan vivon. Malgraŭ lia orgojlo kaj granda gloro, kiuj estas la sekvoj de lia multjara potenco kaj sukcesoj, kaj ŝveligis lian koron, li eltenas la neeviteblan kortegan vivon, kiel soldato pezan kirason. La flatado kaj fihumila obeado de liaj konsilistoj kaj ministroj kaj iliaj edzinoj forpuŝas lin, igas lin bedaŭri la eksterordinarajn aventurojn en Italio kaj Egipto, kie li estis nur generalo sen alia ornamo ol la plifortiganta radiado de sia gloro.

Li ekstaras.

«Nun mi devas reiri al la palaco por akcepti Champagny, kiu revenis de princo Altenburg. Li devas diri al mi, kiel statas la afero de la paco kun Vieno.»

«Aĥ ! Ĝi baldaŭ fariĝu, se tio eblas ! Mi ŝatus, ke tiu milito baldaŭ finiĝu. »

«Kial do, mia infano?»

Milito estas la neantaŭvidata, la risko...»

«Ne, Marie, milito signifas ludadon, kalkulado, venkon. Ĉar vi ne estas por mi rivalu-lino pri la militista arto, mi ne povas doni al vi ĝian recepton. Ĝi estas tre simpla : tio estas risko, sed risko kiun oni bone pezas, kiun oni bone pripensis. Mi amasigas grandan amason da trupoj sur lokon, kie la malamiko ne atendas ilin kaj kiun mi konsideras kiel la decidan punkton. Tiam mi iras antaŭen sen halti... Kaj sekvas la venko.»

La venko ! Magia vorto kiu tremetigas liajn lipojn kaj ĵetas lin momenton en specon de ekstazo. Aĥ, bona, terura ludisto !

Sed li revenas de sia teoriado kaj reprenas :

«Ne timu pro mi : Fortuna protektas min. Mi revidos vin ĉi-vespere. Mi tamen petas vin pensi pri tio kion mi diris al vi: preparu vian foriron. Mi bedaŭras devi separi min de vi. Sed ni ambaŭ devas esti saĝaj. Post ok aŭ dek tagoj vi facile alvenos en Parizo. Vi tuj devas vidi Corvisart. El ĉiuj kuracistoj mi plej fidus lin, kvankam... Mi mem skribos letereton por li. Ne akompanu

min. Nur kisu min. Mi revenos vespermanĝi kun vi, Marie. Faru vin bela...»

Ŝi kisas lian dekstran manon, tiam la dekstran vangon kaj fine la frunton laŭ la Pola kutimo kaj faras sur ĝi krucosignon.

Sur la sojlo de la pordo, li returnas sin. Nun la muziko de fanfaro de akraj trumpetoj supreniras al ili: oni anstataŭigas la gardon. En la pordokadro Napoleono ŝajnas pli granda. Kaj Marie sentas en la aero ĉirkaŭ li kvazaŭ svarmon da nevideblaj agloj kaj flirtadon de flagoj.

VIII. La Sekreta Konsilio

Li sidis antaŭ imensa mahagona skribtablo, kiun kovris mapo de Aŭstrio. La ĉambro estis vasta kaj alta kaj memorigis pri lia kabineto en la Tuilerioj. Napoleono igis kovri la murojn per verda silko kun grandaj palmfolioj. Kiel viro kun fiksjaj kutimoj, li ŝatis senti sin hejme ĉie kie li troviĝis, eĉ en fremda palaco, kie li devis pasigi nur kelkajn tagojn

“Relegu, Méneval.”

La sekretario alproksimiĝis kaj legis alvokon al la imperiestro de Aŭstrio fini la pactraktadon ene de tri tagoj. Se ne, la milito estis rekomenciĝonta.

« Aĥ ! » ekkriis Napoleono, « mi vidas de tie ĉi, kiel mia bona frato Francisko ricevos tiun amikecan letereton ! »

Per mirige falsa voĉo li kantis strofon de malnova kanto eraranta en sia memoro :

Ni nin revidos morgaŭ,

Sur la batalkampo.

Ni nin revidos morgaŭ,

La sabron en la mano.

«Kopiu por mi tiun ĉi leteron, Méneval. Igu min subskribi ĝin kaj tuj sendu ĝin al imperiestro Francisko. Necesas, ke li ricevu ĝin ankoraŭ antaŭtagmeze.»

Tiu problemo estis solvita por li: li ne plu pensis pri ĝi. Alia jam okupis sian menson. En lia cerbo li kvazaŭe havis tirkestojn. Li malfermis tiun kiu li bezonis, trovis en ĝi kion li volis, refermis ĝin kaj malfermis alian. Neniam liaj pensoj konfuziĝis, el kio rezultis, ke liaj ordonoj ĉiam estis klaraj kaj admirinde precizaj.

Kiam Méneval forlasis lin:

« uj venigu al mi, » diris la imperiestro, « la dukon de Bassano kaj la dukon de Frioul ! »

Tio estis Maret kaj Duroc, ambaŭ titolitaj ekde la 15-a de aŭgusto, la tago de lia naskiĝo,

en kiu li finis la kreadon de la vasta imperiestra nobelaro, kiu devis anstataŭi kaj absorbi la malnovan aristokration.

Momenton li trarigardis paperojn kiuj troviĝis sur tableton apud la kameno, kaj, ne trovante ilin interesaj, li disvastigis ilin per la supra flanko de la mano sur la planko.

En tiu momento Constant malfermis la pordon sen fari anoncon. Duroc kaj Maret aperis.

La imperiestro respondis per leĝera kapklino al ilia saluto. Montrante al ili seĝojn, li lasis sin fali en la granda fotelo de verda marokeno lokita antaŭ lia skribtablo kaj komencis tranĉi per sia poŝtranĉilo la leonkapojn per kiuj finiĝis ĝiaj brakoj.

«Sinjoroj, » li diris, « mi vokis vin por konsulti vin pri grava, sekreta afero. Maret, kaj vi, Duroc, ne nur estas miaj servistoj, sed ankaŭ miaj amikoj.»

La ŝtatssekretario kaj la grandmarŝalo kliniĝis. Napoleono ne eraris. Al tiuj du viroj li povis malfermi sian koron. Maret tro ofte sam-opiniis kun la imperiestro, ne pro servileco, sed pro eksceso de admiro por lia genieceo kiu premlatigis lian subulan naturon. Duroc, same atenta, sendube estis ankoraŭ pli sindona al sia mastro per vireca afekcio, kiun ne malfortigis lian respekton.

«Mi troviĝas, » daŭrigis Napoleono, « en tia situacio, ke la decidon kiun mi estas faronta, havos la plej grandajn sekvojn por mia familio, por Francio kaj por la mondo. Tial mi deziras aŭdi vian konsilon. Ĉio kio estos dirita ĉi-matene restos inter ni.»

La duko de Bassano malfermis la buŝon por konvinki la imperiestron pri sia diskreteco. Duroc, per mansigno, haltigis tiun neutilan frazon. La imperiestro daŭrigis paroli.

«Vi ambaŭ scias, kiom mi amas sinjorinon Walewska. Vi ankaŭ scias, kiel digna ŝi estas je mia amo. Mi ne konas virinon kiu estas pli digna je mia amo, ol ŝi. Nu, hieraŭ ŝi forlasis Schönbrunn kaj reiris al Parizo. Tiu subita foriro havas kialon. Ĉu vi ne povas diveni ĝin, Maret ?»

La ŝtatssekretario faris geston de nescieco.

«Nu, sinjorino Walewska estas graveda. Ŝia gravedeco datiĝas de proksimume ses aŭ sep semajnoj. Tio tute ŝanĝas miajn aranĝojn koncerne la heredeco de la trono. Se la grafino akuŝos knabon, kion mi esperas, mi intencas sekurigi mian sukcedon al tiu infano. Ni volas nun ekzameni ĝiajn rimedojn.»

Pro emocio Maret lasis fali sian ĉapelon sur la plankon. La grandmarŝalo gardis sian tran-

kvilecon, krucigis la brakojn kaj trankvile demandis :

« Pri kiuj rimedoj vi pensas, Siro ? »

Sur sia skribtablo Napoleono karesis per la mano la rajdistan statueton de Frederiko II, reĝo de Prusio. Li prenis ĝin en 1807 en Potsdam kaj ĝi akompanis lin dum ĉiuj liaj militiroj.

« Mi intencas legitimi la infanon. »

Duroc ĉi-foje aperis mirigita.

« Sed, Siro, » timide diris Maret, « sinjorino grafino Walewska estas edziniĝinta. Se vi legitimas la infanon, vi deklaras ŝin adultulino per tio.»

« Mi pensis pri tio, » respondis la imperiestro. « Sed ĉu tio tre gravas ? Ekzistas precedencoj. Ludoviko XIV legitimis la infanojn de siaj amantinoj. Ankaŭ sinjorino de Montespan estis edziniĝinta, ĉu ne ? »

« Efektive, Siro. Tamen post la morto de la reĝo la parlamento nuligis lian decidon, almenaŭ en kio koncernis la rajtojn je la krono de la duko de Maine kaj la grafo de Toulouse... »

Li silentis, kvazaŭ timigita de sia kuraĝo. Napoleono vivece respondis :

« Jes, sed mia senato ne estas la parlamento de la malnova monarĥio. »

Duroc skuis la kapon kun la krispaj haroj.

« Kiu scias, ĉu en kazo de regenteco li ne arogus siajn rajtojn, kaj eĉ ne celus pli alte ? La revoluciaj asembleoj ankoraŭ ne estas tiel for de ni ! »

« Estas senco en tio kion vi diras... Sed se legitimado ne estas certa rimedo, kion vi pensas pri adopto ? »

« Princo Eugène, kiun vi jam adoptis, superus la infanon de sinjorino Walewska. »

Napoleono malpacience stamfis sur la plankon. Sen konfuziĝi la grandmarŝalo daŭrigis :

« Cetere mi timas, ke adopto aŭ legitimado – la vorto malmulte gravas – kaŭzus multajn malfacilaĵojn. Unue ĝi ofendus la imperiestraron... »

« Joséphine ! Vi ŝercas, Duroc ! Ŝi certe permesos tion, kion reĝino de Francio, naskiĝinta kiel *infante* de Hispanio, akceptis. Finfine ŝi naskiĝis nur kiel Tascher. »

« Kaj via familio, Siro, ĉu vi kredas, ke ĝi ne protestos ? »

« Ĉu mia familio ? Ĝi ricevis de mi ĉion. Ĉu ĝi jam imagus povi disponi pri mia heredaĵo ? Ĝi ricevos, kion mi restigos al ĝi. »

« Tre bone, Siro, sed Francio ? »

« Francio certe akceptos, kion mi petos ĝin akcepti. »

«Mi kredas tion, sed ĉu ĝi volonte akceptos tion ? Kaj ĉu en la publika opinio ne okazus tre noca ŝanĝo la tagon kiam vi ne plu estos inter ni ?»

Napoleono ne respondis. Il sajnis enpenŝigita. La singarda Maret restis silenta. Duroc daŭrigis :

«Finfine estas Eŭropo. Kio estus ĝia sento ? Ĉu tia decido estos konsiderata digna je imperiestro Napoleono? Ĉu via gloro ne estus malgrandigita de ĝi ? Ĉu oni ne diros eksterlande, ke, ne povante levi vian amantaron sur la trono, vi metis sur ĝin vian nelegitiman filon, malestimante la rajtojn de via legitima posteularo sen konsulti la nacion ?»

Kaj la grandmarŝalo aldiris :

«Mi esprimas min kun tiom da libereco, ĉar Via Imperiestra Moŝto scias, kiom mi estimas la karakteron de sinjorino grafino Walewska, kia estas mia respektoplena alligiteco al ŝi, kiel feliĉa mi estus povi helpi altigi ŝin kaj ŝian infanon. Sed samtempe mi ne povas fermi la okulojn antaŭ tiom da obstakloj kaj miskoni, kion mi kredas esti la intereso de la imperiestro.»

«Mi scias tion, mia amiko, mi scias tion, » mallaŭte diris Napoleono. « Sed tamen mi volas fari ion por tiu infano !»

La diferenco kiun li konstatis inter la mola Maret kaj la malmola Duroc ne iritis lin. Pli familiara ol oni ĝenerale kredis, li aprecis sincerecon.

La duko de Bassano ekstaris.

«Mi eble konas rimedon, » li diris, « sed mi ne scias, kion pri ĝi pensos la imperiestro.»

Napoleono fiksas sur li siajn ŝtalgrizajn okulojn kaj diris :

«Ni ja vidis tion : klarigu vin.»

«Mi pensas pro ŝanĝo de infano, nome ke, post ĝustatempa anonco, ke la imperiestro estas graveda kaj, prenante ĉiujn necesajn antaŭrimedojn, deklari kiel naskitan el ŝi kaj la imperiestro la infanon, kiun sinjorino Walewska akuŝos.»

Dum momento Napoleono kaj Duroc konsideris la ideon.

« Estas ebla solvo, » diris la imperiestro.

Lia rigardo iris al Duroc. La grandmarŝalo sajnjis necerta.

«La ĉefa afero, » reprenis Maret, « estus ricevi la permeson de la imperiestro.»

«Joséphine jam pensis pri io tia, » replikis Napoleono. « Timante divorcon kaj vidante mian timon, ke eble mi ne havos posteularon, ŝi jam proponis al mi deklari naskiĝinta de ni la

duan filon de Hortense. Sed tio signifus por mi tro meti min en siajn manojn. Kaj mi dubas, ĉu mia fraro Louis kontentus pri tio.»

«Estas granda diferenco por la imperiestro inter certigi la kronon al nepo aŭ meti ĝin sur la kapon de infano de rivalino, » diris Duroc

«La imperiestro inspiros sin per sia intereso, » seke replikis Napoleono. « Per rifuzo ŝi certe timos fari la unuan paŝon por malsupreniri de la trono, kaj laŭ mi ŝi ne malpravus. »

Li kuntiris la brovojn kaj murmuris kelkajn neklarajn vortojn. Minaco durigis siajn trajtojn.

«Sed la grafino ?» demandis la grandmarŝalo. « Ĉu ŝi mem ne povus rifuzi fari tion ? »

«Ne, ne. La estonteco promesita al ŝia infano ne permesos ŝin rifuzi.»

Ke en tiu afero Marie povus montri volon kontraŭan al la sia, sajnjis al li absurde. Ĉu ŝi ne kutimigis lin al sia kompleta submeto, perfekta disponebleco ? La propono de Maret povus ŝoki la kutiman moralon. Sed tio konfuzis lin nenian momenton : li estis malmorala. Lia genio levis lin super la aliaj homoj, li diris, kaj tiel li eskapis al ilia skrupuloj. Por li gravis nur, ke li atingu siajn celojn : la rimedoj estis indiferentaj al li. Tial li konfirmis :

«Ŝi akceptos, mi respondecos pri tio »

«Sed, Siro, ĉu ŝajnos verŝajne, ke la imperiestro havas infanon je ŝia aĝo ?»

«Ĉu je ŝia aĝo ? Ŝi havas nur kvardek ses jarojn! Kaj oni vidas virinojn de sesdek jaroj kiuj naskas infanojn. Pri tio atestas tiu fola sinjorino Fabre de l'Aude, kiu ĵus ekhavis sian dudek-kvinan infanon, kaj kiu respondis al mi iutage, kiam mi demandis ŝin, kiam ŝi kredis akuŝi: 'Kiam tio plaĉos al Via Imperiestra Moŝto!»

Duroc kaj Maret ekridis. Ili konis la anekdoton, kies memoraĵo ankoraŭ amuzis la imperiestron. Sed Duroc insistis :

«La publika opinio tute ne inklinas akcepti tiun novan gravedecon de la imperiestro, kiu ekde via geedziĝo neniam povis refariĝi patrino, kion ajn ŝi diris pri tio.»

«Jes, sed ŝi ĝuste esperis tion. Ŝi faris plurajn kuracadojn en Plombières kaj obtenis de Corvisart, ke li ripetu al ĉiu ajn, ke ŝi estas certe kapabla gravediĝi, kaj ke se tio ne okazas, estas mi kiu kulpas pro tio.»

«Estas certe, » intervenis Maret, kiu defendis sian ideon, « ke la imperiestro favoros ĉi tiun planon. Dubo pri tio povus ekesti en la imperiestra familio, kaj nur tie. Klera konsulto de la medicina fakultato povus konvinki ĝin. Kaj mi estas certa, ke danke al la lerteco de la

imperiestrino, kiu scios fari la ĝustajn aranĝojn kaj alpreni la indikitajn sintenojn, neniu en la kortego suspektos ion neregulan en la naskiĝo de la imperiestra heredonto.»

«Kaj se la infano estas filino ?» demandis Duroc.

«Tiam ĝi estos princino anstataŭ princo, jen ĉio, » diris Napoleono. « Tiu risko estas neantaŭvidebla. Ni do ne devas okupiĝi pri ĝi.»

«Ni devas ankaŭ esti certaj pri la akuŝantinoj, » diris la grandmarŝalo. «Tia sekreto pezas multe...»

«Corvisart kaj Dubois estas inteligentaj. Kial ili rifuzas fari al mi tiun servon kaj silenti ? Por ili tio estas fortuna. Kaj ĉar la infano estas mia filo, ilia konscienco estos sekura. Per tio gravus por ili, ke ĝi havus alian patrinon ol Joséphine ? Ĉu la trono estos la heredaĵo de mia edzino aŭ de mi ?»

«Sed estas alia fakta malfacilaĵo. Ĉu vi ne vivas separita de la imperiestrino ekde de la komenco de la militiro, tio estas dum kvin monatoj ? Kiel do akceptigi al la nacio ŝian gravecon ?»

«En tiu ĉi momento estas neeble, sed la imperiestrino povos aliĝi al mi post kelkaj tagoj. Du semajnojn poste la *Journal de l'Empire* kaj *le Moniteur* donos la novaĵon. Ĉar la naŭ monatoj ne estos tute pasintaj en la momento de la naskiĝo, oni deklaras, ke la infano venis frutempe. Infano povas naskiĝi jam post sep monatoj, sen ke oni dubas pri ĝia legitimeco. Se tiu rimedo estus riska, oni povus prezenti infanon de du monatoj kiel ĵusnaskitan infanon. La akuŝantinoj diros, kion ili devas diri. Sufiĉos bone elekti la personojn kiuj oficiale ĉeestos la akuŝon de la imperiestrino.»

«Sed ne estos eble, » replikis Duroc, « forigi certajn personojn de la imperiestra familio, ekzemple la fratinojn kaj bofratinojn de Via Imperiestra Moŝto, ĉar simpla rigardo sufiĉos al ili por konstati, ke la infano ne estas ĵusnaskito. Cetere, ne forgesu, ke la fakto havi legitiman filon forigos viajn fratojn de via sukcedo. Vi devus atendi aŭdacajn suspektojn kaj eĉ provojn esplori la aferon, kie la respekto ŝuldata al la imperiestro malmulte valorus. »

« Mi ne dubas pri tio, mia kara Duroc, sed tio estas nur detaloj. Ni aranĝos tion en la konvena momento...»

Oni gratis sur la pordo. Je signo de Napoleono la grandmarŝalo iris malfermi. Méneval metis la kapon tra ĝi.

«Ha, jes,» diris la imperiestro, «la letero al imperiestro Francisko. Donu ĝin, por ke mi subskribu ĝin.»

Li relegis ĝin per la okuloj kaj tiam skribis tre imponan kaj energian *Napoleono* sube de la zorge kaligrafita letero. Per la mano li forsendis Méneval.

«Mi sendas ultimaton al imperiestro Francisko. Se li ne akceptos miajn lastajn kondiĉojn, mi daŭrigas la militiron.»

«Ĉu tio estas prudenta, Siro ?» demandis Duroc. «Ĉu vi ne timas puŝi lin al malespero ? Pensu pri la ducent mil viroj kiuj amasiĝas en Hungario.»

«Mi scias,» respondis la imperiestro. «Tial mi postulas, ke li konkludu. Se li ne cedos, mi rompos sian monarĥion, mi reduktos ĝin al Vieno kaj kelkaj provincoj, kaj mi faros de Bohemio, unuiginta kun la granddukejo Varsovio, unu ŝtaton, kiu tenos en respekto Rusion kaj Prusion.»

Kaj mallaŭte li murmuris :

«Tiam Marie estos kontenta...»

Tiam li diris laŭte :

«Sed estu trankvila, eterna kontraŭparolanto, mi konas la Habsburgon pli bone ol vi : li cedos. Sen tiu letero li ankoraŭ serĉus pretek-stojn prokrasti pactraktaton kaj finfine lasus sin konvinki de Anglio, kiu faras proponojn al li. Kion vi trovas aŭdaca, estas do nur singardeco. Sed ni revenu al nia afero: ĝi estas pli grava ol ĉio. Mi akceptas la ideon de la duko de Bassano. Certaj el viaj objetaĵoj estas pravaj. Ni konsideros ilin dum la plenumado.»

Kaj tuj li refariĝis la agema viro. Liaj ordo-noj estis precizaj kaj detalaj.

«Necesas rapide agi. Vi foriros al Parizo, Duroc, aŭ prefere vi, Maret. Ne estante unu el siaj plej bonaj amikoj, Joséphine tamen pli ŝatas vin. Kaj la duko de Frioul ne estas sufiĉe partizano de la projekto por montri sin tre persvada. Vi foriros ĉi-vespere. Ni havas la 2-an de oktobro. La 7-an vi estos en Parizo. Vi kunprenos letereton mian por la imperiestrino kaj alian por grafino Walewska : ili servos al vi kiel enkondukiloj. Unue vi vidos Joséphine. Tio estis pli konvena. Vi eksplikos al ŝi la aferon kaj ricevos ŝian kompletan aprobon. Ŝi devas teni sin preta por aliĝi kun vi al mi por anonci la novaĵon al la kortego. Tiam vi iros viziti la grafion, al kiu vi montros la grandan destinon kiun mi preparos por ŝia infano. Se ŝi vidos en tio grandan oferon, ripetu al ŝi, ke mia trankvileco kaj mia gloro postulos, ke ŝi faru tiun oferon, pri kiu mi insistos ĉe ŝi en mia

letero. Post ŝia konsento, vi rekomendos al ŝi zorge teni kaŝita sian gravedecon al ĉiuj, eĉ al la maljuna Daŝa, eĉ al sia frato. Ŝi silentu pri tio kaj atendu mian revenon por ekscii la aranĝojn, kiujn mi juĝos utilaj. Post tio vi informos Cambacérés. Nur lin. Li estas tre diskreta, kaj mi povas fidi lin. Oni ne scias, kio povus okazi. Post mi li estas la plej grava politika persono de la ŝtato : lia atesto povus esti bezonata. Sed neniu alia povas scii ion pri tio. Ĉu vi respondecas pri tio, Maret?»

«Per mia kapo, Siro,» respondis la duko de Bassano kun pasia intonacio.

«Ĉu per via kapo ? Ĝi tute ĝuste sufiĉas por tia sekreto. Sed finfine, vi ne povas oferti al mi ion pli bonan, ĉu ?»

Li ridis, malkovrante siajn perlecajn dentojn. Liaj tre brilaj okuloj prilumis la marmoron de lia vizaĝo. Tiam tiu radiado malaperis.

«Vi revenos ĉi-vespere je la sesa. Mi donos al vi la leterojn por Parizo. Dum via foresto Duroc kaj Méneval dividos inter si vian labo-ron. Skribu al mi nenian leteron. Ĝi povus perdiĝi. Sed revenu kun la imperiestrino sen perdi momenton, tuj kiam ĉio estos aranĝita. Vi certe retrovos min en Bavario, ĉar, ekde kiam la paco estos subskribita, mi foriros. Mi havas laboron farendan. La invado de la Angloj sur Walcheren²⁸ postulas tujajn antaŭ-rimedojn. La alvoko al la naciaj gvardistoj far Fouché servas nur por alarmi la imperion. Avertu lin, ke li devas transdoni la ministerion de la internaj aferoj al Montalivet, kiun mi nomumas en tiu funkcio. Lia interimo daŭris sufiĉe longe... Metu ĉion en ordon kaj ĝis ĉi-vespere.»

Kaj dum la duko de Bassano iris en la antaŭ-ĉambron, kie amaso da princoj, marŝaloj kaj ambasadoroj duonlaŭte parolis atendante, sed ĉesis paroli ĉiuforte kiam la pordo malfermiĝis, Napoleono rimarkis, ke la frunto de la grand-marŝalo restis nubkovrita.

«Kio estas al vi, Duroc?» li demandis. «Kion vi diras inter viaj dentoj ? Ĉu vi ne kredas je la sukceso de tiu plano ?»

La duko de Frioul skuis la kapo.

«Vi tamen vidos, nekredulo, vi vidos, ke mi pravas.»

Kaj li tiris je orelo de Duroc.

«Vi havas malbelajn orelojn, mia povra amiko. Estas bedaŭrinde. Sed aliflanke estas vere, ke vi estas altstatura. Oni ne povas havi ĉion. Nu, serĉu por mi Berthier. Ni devas regroupigi niajn trupojn...»

IX. La misio de Maret

Joséphine promenis kun Hortense kaj sinjorino de Rémusat en la varmejoj de Malmaison, la kastelo kie Joséphine ŝatis loĝi. Tio estis unu el ŝiaj preferataj plezuroj. Ŝi adoris florojn kaj venigis ilin je altaj kostoj kiel stikaĵojn, bulbojn kaj grajnoj el ĉiuj landoj : Hispanio, Italio, Holando, eĉ el siaj insuloj de origino. Iufoje la Angloj, mastroj de la maroj, havis la kortezecon lasi pasi kestojn kun raraj cepoj, kiuj venis de Afriko aŭ Hindio. Napoleono faris al ŝi riproĉojn pro ŝia malŝparemo por tiuj sendaĵoj, kiuj ofte alvenis putrintaj. Tamen li ne konis la duonon de ŝiaj grandaj elspezoj.

La mateno estis ĉarma. La ankoraŭ varmeta suno brilis sur la deklivaj vitroj de la varme-joj, tiel ke la imperiestrino, zorgema pri sia vizaĝkoloro, aŭ plie pri sia koketeco, emo kiu neniam forlasis ŝin, portis leĝeran muslinan sunombreton.

Je kaj tie, laŭ signo de sia patrino, Hortense tranĉis tigojn kaj branĉetojn de magnolioj, kamelioj, hibiskoj, kerioj, la unuaj narcisoj, la lastaj rozoj, kaj donis ilin al Claire de Rémusat, kiu metis ilin en korbon. Ĉiuj tri gaje babilis sen la formaleco de la kortego. En Malmaison Joséphine estis vere hejme. Ŝi sentis sin libera tie kaj vivis laŭ sia fantazio, pli kiel kastela-nino ol imperiestrino, precipe kiam Napoleono forestis, kaj limigis per ferioj la honoran servon, gardante ĉe si nur siajn amikinojn.

La tri virinoj estis forlasintaj la varmajn ĉambrojn kaj ankoraŭ troviĝis en la varmejoj, kiam paĝio alvenis kurante en sia bela uniformo de blanka kaj skarлата silko.

«Sinjorino,» li diris, tenante sian ĉapon en la mano, «la sinjoro duko de Bassano, kiu alvenis el Vieno, petas Vian Imperiestran Moŝton pri aŭdienco por urĝa komuniko de la Imperiestro.»

Joséphine ne povus subpremi leĝeran krion de surprizo:

«Maret ! Kial Bonaparte, kiu ne povas malhavi lin, sendas lin al mi ? Devas temi pri io tre grava... Bone, Sint-Hilaire, diru al la sinjoro duko de Bassano, ke mi reeniros kaj akceptos lin en la malgranda blua salono... Claire, restu ĉi tie kun Hortense, vi realiĝos al mi poste.»

Tra la parko kiu estis malseka de la aŭtuna rozo, ŝi reiris al la kastelo.

²⁸ Insulo antaŭ la Nederlanda marbordo.

Tiu alveno agitis ŝin pli ol ŝi volis montri. Per siaj longaj silentoj kaj siaj malpermesoj aliĝi al li, kiujn ŝi ricevis, Napoleono ĝenis ŝin en ŝia trankvileco, kiun ŝi ĝuis ekde de ilia restado en Marracq. Ŝi sciis, – Fouché informis ŝin pri tio –, ke sinjorino Walewska estas ĉe la imperiestro. Ŝia instinkto ripetis al ŝi, ke la Polino kaŭzos al ŝi malfeliĉon. Superŝtira kiel ĉiuj Kreolinoj, ŝi ne sukcesis regi siajn antaŭ-sentojn.

Kiam ŝi eniris la salonon, ŝi gracie etendis la manon al la dukino de Bassano, kiu kisis ĝin. Maret ne estis amiko de Joséphine, kiel diris Napoleono, sed li ĉiam traktis ŝin tute korekte. Kaj siaflanke, ŝi klopodis indulgi la viron, kiu daŭre vivis kaj familiare rilatis kun la cesaro.

«Mi gojas vidi vin, Sinjoro Duko. Vi alportas al mi bonajn novaĵojn de la imperiestro, mi esperas.»

«Lia Imperiestra Moŝto, kiun mi forlasis antaŭ ses tagoj, estis perfekte sana, Sinjorino, kaj Li ŝarĝis min per la tasko prezenti al vi siajn plej afekciajn komplimentojn kaj enmanigi al vi leteron de Lia mano, kiun mi havas la honoron transdoni al Via Imperiestra Moŝto.»

Tirante el la interna poŝo de lia frako leteron kun la sigelo de Napoleono, li respektive enmanigis ĝin al la Imperiestrino. Joséphine haste rompis la vakson kaj legis :

«Mia amikino, mi kredas, ke la paco kun la imperiestro de Aŭstrio baldaŭ estos subskribita. Maret informos vin pri decido, kiun mi faris kaj kiu gravas por ni ambaŭ. Faru kion li diras al vi. Adiaŭ, mi ĉirkaŭbrakas vin. Miaj komplimentoj al Hortense. Tuta via, N.»

Joséphine metis la leteron sur la tablon, sidiĝis sur la grandan kanapon kaj montris fotelon tuj apud ŝi al la ŝtatestro.

«Sidiĝu tien, kara Duko, kaj diru al mi kion la imperiestro ordonis al vi diri al mi.»

Ekstreme ĝenata, Maret rtigardis ĉirkaŭ sin kaj komencis per mallaŭta voĉo:

«Mi obeos al Via Imperiestra Moŝto. La misio kiun la imperiestro konfidis al mi, postulas absolutan sekretecon.»

Paliĝante sub sia ruĝo kaŭze de tiu grava enkonduko, Joséphine respondis :

«Ni estas solaj ĉi tie. Parolu do, Sinjoro, vi vidas mian malpaciencon.»

Preskaŭ meĥanike kaj kvazaŭ li recitis lecionon, kiun li preparis en la poŝtveturilo, kiu transportis lin tra Germanion, Maret diris :

«Sinjorino, tio kion mi devas sciigi al vi estas de tre delikata naturo. La altaj ideoj de Via Imperiestra Moŝto kaj la sentoj, kiuj ligas Ŝin al

la imperiestro igas min esperi, ke Ŝi bonvolos ekskuzi min pro tio, ke mi parolos al Ŝi pri tia doloriga temo. Mi urĝe petas Vian Imperiestran Moŝton memori, ke mi estas nur la mesaĝisto de la Imperiestro.»

«Mi petas vin, Sinjoro...»

«Mi ne scias, Sinjorino, ĉu vi estas informita pri la famo de intima rilato inter la Imperiestro kaj iu Pola damo.»

«Sinjorino Walewska, jes, mi scias tion...» ŝi sopiris. «Kion diri pri tio, Sinjoro Duko ? Ne estas la unua malfidelaĵo de Bonaparte. Sed mi ĉiam fermis la okulojn al liaj nedaŭraj eraroj. Mi neniam volis lin kontraŭi. Sufiĉas al mia feliĉeco, ke li gardas por mi sian afekcion kaj amikecon.»

«Via Imperiestra Moŝto povas tute fidi la tenerecon, kiun la Imperiestro sentas por Ŝi. Ĝi estas tro profunda, por iam esti neniigita.»

«Daŭrigu do, Sinjoro.»

«Sed okazis incidento, kiu donas al tiu rilato specialan karakteron... La Imperiestro tiras el ĝi certajn sekvojn, kiujn mi devas submeti al Via Imperiestra Moŝto: la sinjorino grafino Walewska estas graveda.»

Joséphine lasis sin fali kontraŭ la dorson de la kanapo, kaj metis la manon sur sian koron. Ŝiaj antaŭsentoj do ne trompis ŝin. Tiu novaĵo estis terura. La katastrofo, kiun ŝi ĉiam antaŭ-vidis, estis do okazinta.

Maret ekstaris, preta sonorigi, konsternita de tiu duonsveno. Joséphine aspektis kiel fantomo en sia tro juna robo el malva organdio kun punto. Ŝia magra brusto forte leviĝis. Ŝiaj alie moviĝemaj trajtoj fiksiĝis. Ŝiaj okuloj ŝajnis grandiĝintaj.

Sed ŝi rektiĝis per forta klopodo :

«Nu, Maret, » ŝi diris per ŝanĝita voĉo, « nu, sciigu al mi la intencojn de Bonaparte.»

«La Imperiestro deziras, se la infano estas knabo, certigi al li la sukcedon sur la trono.»

Joséphine tremetis.

«Kiel ? Per adoptado ?»

«Lia Imperiestra Moŝto ekzamenis tion eblecon, sed ĝi evidentiĝis malpraktika.»

«Kaj nun ?»

«La Imperiestro kredas esti sufiĉe certa de Via dediĉiteco al liaj interesoj por simuli gravecon, ĉar li volas, ke la naskiĝonta infano estu legitime konsiderata kiel la via.»

Li diris tion tre rapide sen kuraĝi levi la okulojn al Joséphine. Kiam li eksilentis, ŝi profunde spiris. Estus do tio !... Ŝi tute ne atendis tion... Ne temis pri diverco!... Kiel ajn dura, kiel ajn humiliga estis tiu postulo, ĝi ne trafis sin

en la viva karno. Kontraŭe, ŝi tuj vidis, ke ĝi solidigos ŝian pozicion por ĉiam. Ŝia filo Eugène estus ekskludita de la trono... Jes, sed ankaŭ ŝiaj mortaj malamikoj, la Bonaprt-oj. Ŝi pretis fari kaj estis faronta la oferon kiun Napoleono postulis de ŝi...

Ĉar ŝi silentis, Maret, kiu suferis torturon, serĉis elirejon el la situacio.

«Via Imperiestra Moŝto certe bezonas tempon por pripensi tiel gravan proponon. Mi do adiaŭos Ŝin kaj mi revenos preni Ŝian respondon ĉi-vespere, se Ŝi permesas tion. Ŝajnas al mi neutile atentigi Vian Imperiestran Moŝton pri la neceseco de absoluta silento pri tiel grava afero. La Imperiestro deziras, ke Via Moŝto, se Ŝi konsentos, tuj aliĝu al Li, kie ajn Li tiam troviĝos, por preparoli kun Li ĉiujn detalojn de la plenumado. En tiu kazo mi havos la honoron akompani Vian Imperiestran Moŝton.»

Li ekstaris, sed la imperiestrino petis lin residiĝi.

«Restu ankoraŭ momenton, kara Duko. Mi ne bezonas pripensi, se cedante al deziro de la Imperiestro, mi povas plaĉi al li. Kvankam tio kostas al mi multe, kvankam mi estas tre sentema – sendube vi kredas tion –, al la ofendo, kiun mi ricevas kiel virino kaj suverenino, mi ne rajtas heziti. Mi konsentas. Mi volas nur la feliĉecon de Napoleono, la gloron de lia regado, la trankvilecon de Francio, kaj se per la rimedo kiun oni indikas al mi, mi povas altiri al mi sian dankemon, tiu ofero ne estos super miaj fortoj.»

Maret kliniĝis, ĝoja pro tio, ke lia misio sukcesis pli facile, ol li atendis.

«Permesu min, Sinjorino, direkti al Via Imperiestra Moŝto la omaĝon de mia admiro por tia nobla konduto. La Imperiestro, mi devas diri tion, ne atendis malpli de Vi, kaj mi povas certigi Vin, ke Li sentos la plej vivecan dankemon.»

Joséphine dankis lin per rideto, kaj per voĉo, kiu retrovis sian karesan tembron:

«Kiam vi devos reforiri, Sinjoro Duko?»
« Morgaŭ frumatene, se tio plaĉas al Vi. Mi revenos ĉi-vespere por informi Vin pri la aranĝoj kiujn mi faros por la vojaĝo. Mi reiros al Parizo por prepari ĝin kaj ankaŭ por plenumi la ordonojn de la Imperiestro.»

«Sed, mi ĵus pensas pri tio, Duko : ĉu Sinjorino Walewska estas informita pri la projekto ? Kion ŝi diris ? Sendube ŝi estas feliĉa ! Kia feliĉa sorto por ŝia infano !»

Ŝiaj okuloj pleniĝis per ĵaluzaj larmoj malgraŭ ŝi mem.

«La Sinjorino Grafino Walewska scias ankoraŭ nenion. Sed estas neimageble, ke ŝi ne konformiĝus al la urĝa deziro de la Imperiestro, kiam Via Imperiestra Moŝto konsentis.»

«Vi iros viziti ŝin nun, ĉu ne ?»

Surprizite de tiu rekta demando, Maret hezitis momenton antaŭ ol respondi :

«Jes, Sinjorino, je iros nun ĉe ŝin.»

Ŝi suspiris, murmurante :

«Kiu estus dirinta tion al mi en Marracq ?»

Tiam subite nova timo survenis ŝin.

«Se nur ŝi akceptos!»

Ŝi adiaŭis Maret kun sia kutima gracio.

«Do, Sinjoro Duko, ĝis ĉi-vespere, kaj bonvolu transdoni miajn afablajn salutojn al Sinjorino de Bassano.

Ŝi senfine ĝojos pri la komplezemo de Via Imperiestra Moŝto.

Apenaŭ estis la dek unua, kaj Maret estus povinta tuj iri al la strato Houssaye, sed, repaŝante en la veturilon, li donis la ordonon antaŭe veturi al lia hotelo. Li volis antaŭe revidi sian edzinon, unu el al plej belaj kaj popularaj virinoj de la kortego, kiun li adoris, kiu lasis sin malvarme adori, kaj kiun li ne kuraĝis vekti, kiam, alvenante ĉe la aŭroro, li elpaŝis sian veturilon por ŝanĝi siajn vestaĵojn.

Lia sukceso ĉe la imperiestrino faris, ke li atribuis malpli da graveco al sia vizito al la grafino.

« Mi iros posttagmeze, » li diris, « kaj li igis porti letereton al la strato Houssaye, kie, pro singardemo, li limigis sin al la peto esti akceptita je la tria por komuniki al sinjorino Walewska la deziron de la imperiestro.

Dum li gustumis kun trankvila menso la plezuron premi sur sian koron tiun postuleman sed karan dukinon post kvin monatoj da for-esto, lia kolego, sinjoro Fouché, duko de Otranto, – ĉar la promocio de 15-a de aŭgusto ne forgesis lin – , liveris sin al tute alia tempo-pasigilo.

Kiam Maret alvenis en Parizo, Fouché estis vokita de Cambacérès por ricevi la ordonojn de Napoleono koncerne la ministerion pri internaj aferoj, kiu estis konfidita al la grafo de Montalivet, kaj li estis malagrabla surprizita, kiam li eksciis, ke tiu ministerio, kiu, kune kun tiu de la polico, faris lin preskaŭ mastron de la cent tridek Francaj departamentoj, estis retirita al lia aŭtoritato. Sed li tuj denove regis sin kaj eĉ parolis kelkajn momentojn kun Maret kun speco de rezignacio. La sekretario ne kaŝis al li, ke li iris al la imperiestrino sed diris nenion pri la celo de la vizito. Lia ekstrema rezer-viĝemo kaj maltrankvila mieno frapis Fouché, kiu

kutimis trovi en li la plej malferman viron, kies leĝeraj maldiskretaĵoj fojfoje havigis al li grandvalorajn informojn. Fouché ekskuzis sin pro urĝaj aferoj, kiuj revokis lin hejmen, kaj, dum Maret restis ĉe la ĉefkanceliero por transdoni al li plej lastajn instruojn de la imperiestro, li sendis unu el siaj agentoj galope al Malmaison por averti Picard.

La lakeo Picard estis lokita antaŭ tri jaroj apud Joséphine por vidi, aŭdi kaj tuj komuniki al la ministro de la polico ĉion kio okazis aŭ estis dirita en la palaco, kio povus interesi lin.

Kaŝita malantaŭ la dikaj kurtenoj de la blua salono, Picard ĉeestis la interparolon de la imperiestro kun la duko de Bassano. Ĉar la temo ŝajnis tro grava por konfidi ĝin al la sendito de sia mastro, li saltis sur ĉevalon, ne sen demeti sian livreon kaj surmeti civilajn vestaĵojn. Malpli ol horon poste li alvenis ĉe la hotelo de Fouché kaj estis tuj enkondukita en la kabineto de la ministro.

La duko de Otranto silente aŭskultis la raporton de la spiono. Li jam suspektis, ke sinjorino Walewska estas graveda, ĉar lia polistica intuicio divenis la motivon por la nekutima, neatendata reveno de la tiel kare amata amantino de Napoleono, dum la paco ankoraŭ ne estis konkludita kun Aŭstrio. Vizito al la strato Houssaye lasis lin necerta. La raporto de Picard heligis ĉion per viveca kruda lumo. Interne Fouché tremetis pro ĝojo. Li konis la sekreton de Napoleono. Ĉu li silentus? Ĉu li lasus ĉion okazi, preta vendi poste pli longan silenton? Sed se tiu alta trompo sukcesus, Joséphine estus konfirmata sur la trono por ĉiam, ĉar ne plu estus parolo pri divorco por la imperiestro, kiu tiel fariĝis patrino! Tiam ŝi estus tre potenca. Ĉu li povus rezisti al ŝia malamo, kiu ne senarmiĝis? Ĉu li ne estus la viktimo de ŝia malfovorado? La fakto ke li konis la sekreton, eĉ ne povus protekti lin. Tuj kiam Napoleono estus avertita pri tio, li devus timi fini siajn tagojn en ŝtatprizono, ĉar la imperiestro ne ŝercis, kiam temis pri afero, kie lia honoro kaj la heredeco estus en danĝero. En tri minutoj Fouché konis la avantaĵojn, estimis la danĝerojn kaj determinis sian konduton.

Post kiam la spiono finis sian rakonton, li restis ĉe li.

«Ĉu vi scias, kien la Sinjoro Duko de Bassano iris, post kiam li forlasis Malmaison?» demandis la ministro.

«Mi aŭdis, kiel la Sinjoro Duko diris al sia kuĉero: 'Hejmen!'»

«Bone,» mallaŭte murmuris Fouché, «tiu idioto estas perdonta tempon kun sia edzino. Mi alvenos antaŭ li.»

Kaj laŭte li diris:

«Vi bone laboris, Picard, mia amiko. Mi ne estas malkontenta pri vi. Vi tuj reiros al Malmaison kaj reprenos vian servon. Sed vi forgesos ĉion, ĉion kion vi rakontis al mi, ĉu vi komprenas?»

La rigardo de la ministro, glaŭka inter liaj palpebroj, estis tiel akra, ke la viro komprenis, ke lia vivo estus en danĝero, se li ne obeus.

Balbutante li respondis:

«Mi jam forgesis tion, Monsinjoro.»

La duko de Otranto ridetis per la buŝanguloj.

«Vi estas tra lerta knabo. Jen por la peno.»

Li etendis al li paketon da bankbiletoj, kiujn li prenis el sia skribtablo.

«Mi bone pagas, kiam mi estas kontenta.»

La paketo entenis dudek mil frankojn. La agento enpoŝigis ilin, salutis kaj forkuris...

Fouché sonorigis kaj prenis sian mantelon.

Servisto alkuris.

«Ĉu miaj ĉevaloj estas pretaj?»

«Post kvin minutoj, Monsinjoro.»

«Tio estas tro malfrue. Mi malsupreniras. Serĉu por mi fiakron.»

X. La imperiestro malsukcesas

«Grafino,» diris Fouché, «pardonu min, se mi venas tiel sen anonco. Mi devas diri al vi ekstreme gravajn aferojn, kaj mi urĝe petas vin ekskuzi min, se en la komenco miaj vortoj ŝajnos al vi iomete tro hastaj kaj eĉ ofendaj. En tiu ĉi momento mi devas rapidi, kaj vi baldaŭ scios kial, sed mi apenaŭ povas kredi la novaĵon, dum vi certe koleros kontraŭ mi.»

Marie respondis per sufiĉe malvarma, sed kurteza frazo, kiu invitis la dukon de Otranto paroli.

«Vi scias, kiu mi estas, Sinjorino, vi konas miajn sentojn por la Imperiestro kaj por vi. Antaŭe vi ne akceptis partumi mian vidpunkton. Mi ne insistis, ĉar sufiĉis al mi rajti servi vin malgraŭ vi. Hodiaŭ mi venas alporti al vi novan pruvon de mia fideleco... Vi estas ricevonta la viziton de la duko de Bassano...»

«Mi scias tion,» diris Marie, «la duko de Bassano informis min, ke li venos posttagmeze. Mi demandas min, kial. Mi kredis, ke li estas en Vieno.»

Kaj subite timeme:

«Espereble nenia malbono okazis al li.»

«Ne, grafino,» respondis Fouché. «La imperiestro fartas bone. Liaj aferoj estas en bonega stato. Li kredas, ke la paco povos baldaŭ esti subskribita, kaj tiam li tuj revenos al Francio. Sed por ne perdi tempon en tre urĝa afero, li sendis al vi la dukon de Bassano, kiu devas paroli al vi en lia nomo.»

Marie ne povis kaŝi sian surprizon.

«Ĉu paroli al mi en la nomo de la imperiestro? Sed mi ricevis leteron de li ankoraŭ ĉi-matene. Ĝi aludas al nenio speciala...»

«Tio kion la imperiestro volas komuniki al vi ne povas esti skribita. Kaj li deziras tujan respondon. La peto kiu estos farita al vi, postulas tion.»

«Nu, Sinjoro, ĉesu paroli en enigmoj. Diru al mi, kio venigis vin ĉi-tien. Vi ŝajnas prepari min al pruvo...»

«Ĉu pruvo? Jes, eble... Ĉiakaze malfacileco. Jen pri kio temas: la imperiestro intencas deklari la infanon kiun vi atendas, kiel infanon naskiĝintan el lia unio kun Joséphine. Maret venos peti vin pri via konsento.»

Ŝokita kaj konfuzita, Marie portis manon al sia frunto. Pensoj tiel rapide alfluis en sian cerbon, ke ŝi asociis ilin malbone. Apogante sin per mano sur marmoran tableton kun oru-mitaj sfinksoj, kiun Napoleono donacis al ŝi, ŝi provis regi sin. Kvazaŭ araneo, kiu senmove atendas, ĝis muŝo estos kaptita en sia araneaĵo, Fouché atente rigardis ŝin.

Finfine ŝi relevis la okulojn.

«Vere, Sinjorino, tiu novaĵo konfuzas min. Sed unue : kio povis igi vin supozi, ke mi atendas infanon ? Kaj kiu informis vin pri la sekretaj intencoj de la imperiestro?»

«Sinjorino, mi scias multajn aferojn. Sed estas malfacile malkaŝi al vi, kiel mi eksciis ilin. Ĉio kion mi povas diri, estas, ke la duko de Bassano ne estas tre lerta, kaj ke mi havas bonajn agentojn.»

Kaj ĉar Marie paŭtis, li aldiris :

«Kion vi volas, Sinjorino ? Mi estas la ministro de la polico, kaj mi faras mian metion, kio estas ekscii, kio okazas por povi pli bone servi la imperiestron kaj Francion. Ĉu cetere mi devas memori al vi, ke mi tute apartenas al vi ? Kiel vi povos kalkuli je mia diskreteco, tiel vi povos kalkuli je miaj konsiloj. Via konfuzeco estas tute normala. Mi antaŭvidis ĝin, kaj se mi estas nun ĉe vi, tio estas ĉar mi volas doni al vi la tempon regi vin kaj pripensi, antaŭ ol Maret venos.»

«Mi komprenas, Sinjoro, mi komprenas,» diris Marie, kiu iom post iom ekregis sin.

«Sed vidu... Se la imperiestro volas agnoski la infanon ?»

«Tute ne temas pri tio. Li intencas forpreni ĝin al vi kaj doni al la imperiestrino, tiel ke ĝi estos konsiderata kiel naskiĝinta el lia edzeco kun la imperiestrino, kaj ke ĝi, se estos knabo, povos sukcedi lin sur la trono. »

«Ĉu forpreni ĝin de mi ?»

Ŝi nur aŭdis tiujn vortojn.

«Ne estas pridubinde, grafino, ke tiu politika kombino havas multajn avantaĝojn por la imperiestro. Ĝi sekurigas la daŭrigon de lia dinastio sen devigi ŝin divorci...»

Ŝi interrompis lin :

«Sed fordoni mian infanon ? Mi ne volas. Neniam mi konsentos pri tio.»

La duko de Otranto malrapide glitigis manon sur la frunto. Dume Marie, kvazaŭ por trankviligi sin mem, aldiris :

«Cetere tia trompo estas neebla. Necesas por tio la kunsento de la imperiestrino. En ŝia situacio, akcepti tion estus vera honto...»

«Via natura fiereco trompas vin, Sinjorino. La imperiestrino jam akceptis. »

«Kiel vi scias tion ?»

«Miaj informoj tre malofte trompas min, kaj ĉi-foje ili estas tute ĝustaj. Vi povos fidi ilin. La bona, deducita Joséphine ne nur akceptis, sed mi povas certigi vin, ke ŝi akceptis la ideon kun ĝojo.»

«Kiel do, sinjoro ? Vi ŝercas.»

«Ĉu mi? Tute ne. Tia aranĝo fiksos la kronon sur ŝia kapo.»

«Do, pro tio ŝi, la edzino de Napoleono, akceptis fari tion! Ah, mi ne plu estimas ŝin...»

Ŝi interrompis sin, konfuzite pro tio, ke ŝi lasis eskapi juĝon tiel facile.

«Ŝi neniam meritis vian estimon, » seke diris Fouché. «Mi, kiu perfekte konas ŝin, ĉiam rifuzis al ŝi la mian. Sed vi ne volis kredi min. Estas bedaŭrinde, ke vi ne akceptis miajn konsilojn pli frue ! Hodiaŭ estas Joséphine kiu la unua urĝos Napoleonon separi vin de via infano.»

Per gesto ŝi forpuŝis tiun ideon.

«Neniu iam separos min de ĝi, Sinjoro, mi certigas tion al vi.»

«Tion mi atendis, Sinjorino, » diris Fouché malrapide por doni al siaj vortoj pli da pezo. «Neniam momenton mi dubis pri tio, ke la voĉo de la naturo parolos en vi pli laŭte ol tiu de la ambicio, eĉ legitima, por via infano. Via nuna sinteno konfirmas mian opinion pri via karaktero, kiun mi jam de longe formis al mi,»

Sed nun ke vi decidis – ĉar vi decidis – , ĉu vi permesas al mi doni al vi konsilon ?»

«Jes.»

«Estu firma. Maret provos konvinki vin. Ne cedu.»

«Ne timu, Sinjoro Duko. La imperiestro mem ne devigus min fari tion. Mi ne pretos partopreni en sakrilegia komedio, kiu senigus min de mia infano.»

«Bonege, bonege. La duko de Bassano certe asertos, ke tiu aranĝo permesos al vi vidi vian infanon ĉiumomente, ke ekzemple oni povus nomumi vin gubernistino de la infanoj de la imperiestro, kio lasus al vi la taskon eduki ĝin. Mi estas certa, ke ili konsideras tiun ideon...»

«Tio ne sufiĉus al mi, Sinjoro. Mia infano ne scius, ke mi estas ĝia patrino kaj mi povus nur kisi ĝin, kaŝante min kun ĝi.»

«Mi bone komprenas vin, Grafino ! Mi mem estas patro de familio. Miaj du filoj kaj mia filino, inter tiom da zorgoj, estas mia unika ĝojo. Tial viaj paroloj trovas en mi klaran eĥon. Tamen tenu vin frima kontraŭ la atako, kiu estos lanĉita kontraŭ vin. Ĉar mi ankoraŭ ne diris ĉion. Mi hezitas atentigi vin pri sekvo, kiun via honesteco ne suspektas. Estas tamen necesediri tion al vi. Estas por mi konsciencia devo. Se vi lasus vin konvinki, se, fidante la garantiojn kiujn oni donus al vi, vi pretus kunlabori en tiu trompo, vi ne nur preparus vian malfeliĉecon, sed ankaŭ kondamnis vian infanon. Konsidere la aĝon de Joséphine, la Bonepart-oj, kiuj ne amas ŝin, certe suspektos trompon. Ili tre baldaŭ malkovrus la tutan veron. Tro da homoj estus engaĝitaj en tiun aferon, kian ajn diskretecon oni alstrebos. Vi vidas : mi jam scias ĉion, kvankam oni volis teni min ekster la afero. Kion ili ne kuraĝus fari kontraŭ legitima filo de la imperiestro, ili certe faros kontraŭ natura filo de la impe-riestro, metita en lian lokon. Pripensu, kion ili perdus per la naskiĝo de filo de Napoleono : la imperion Francion, la reĝlandon Italion, la unuan lokon en la tuta Eŭropo. Inter ili estis tre avidaj personoj, kiuj pretas al ĉio por povi regi. Se via infano vivus proksime de la trono, ĝi ne longe vivus.»

«Kion do vi kuraĝas diri, Sinjoro ?» ekkriis Marie, tremetante kun tordita vizaĝo.

Fouché levis la ŝultrojn, dirante en indifera tona :

«Infano estas fragila ! Mi scias, kio estas. Mi mem ofte tremis pro la miaj. Febro, akcidento tiel facile forportas la vivon al tiuj malgrandaj kreituloj ! Kaj kion fari, kion pruvi, kiam la

evento estos okazinta, la veneno absorbita, la infano mortinta ?...»

«Mi ne bezonis tiun teruran eblecon por dikti al mi mian decidon. Mi jam decidis, antaŭ ol vi parolis al mi pri tiuj aferoj, je kiuj mi ne povas kredi. Tio estis superflua zorgo via-flanke...»

Tiel parolante, Marie estis impona pro sia digna sinteno malgraŭ sia malgranda staturo. La ministro de la polico tute ne akceptis ŝian riproĉon :

«Ne, Sinjorino, ĉar estontece vi estos pli forta por rezisti al la sieĝo, kiun vi devos elteni.»

Tio estis vera. Sen Fouché ŝi certe estus rifuzinta, sed lacigita de la lukto, ŝi eble finfine kapitulacus antaŭ la petegoj kaj promesoj. Nun kontraŭe, havante tiom da malfido en sia propra menso, ŝi ne plu povis cedi.

«Ho !» ŝi diris, «Ne estas la sinjoro de Bassano kiu timigos min. Kun li mi estas certa de mi mem. Sed kion diros la imperiestro ?»

«La Imperiestro ne estos ĉi tie antaŭ du aŭ tri semajnoj, kaj tiam aliaj zorgoj okupos sian menson. Li koleriĝos, tempestos, sed je kvin cent mejloj de ĉi tie. Maret ricevos tion ĉi, sed li havas forton dorson. Kiam la unuaj momentoj estos pasintaj, li pripensos. Viaj kialoj estas tiel fortaj, ke li kliniĝos antaŭ ili. Enfunde li ne povas malpravigi vin. Li estas familia viro : vi nur kreskos en lia menso... Sed mi konas iun kiu multe perdos. Mi eĉ diros : kiun via rifuzo perdigos.»

«Kiun, Sinjoro »

«La Imperiestrino.»

Marie sentis la ĝojon kiu tremetis en lia paroloj. La duko de Otranto plenumis la nesingardecon perfidi la veran celon de lia interveno. Li tuj bedaŭris tion kaj mordis siajn lipojn. Sed Marie, kiun iritis la pozicion de Joséphine en tiu afero, havis neniun inklinon servi la interesojn de la duko.

«Sed vi diris al mi, ke ŝi havas fertilan menson kaj ke ŝi bone defendis sin ĝis nun. Konsiderinte ĉion, mi sentas por la imperiestrino nur respekton kaj simpatian – jes, simpatian –, sed mi tute ne intencas subteni ŝin oferante al ŝi mian infanon...»

En tiu momento oni frapis sur la pordon. Ĉambristo venis al sia mastrino.

«Ekscelenco, la sinjoro duko de Bassano petas, ĉu la grafino povas akcepti lin.»

«Jes, post kelkaj minutoj,» repondis sinjo-rino Walewska.

«La povra Maret ne tiom malfruis,» pensis Fouché, «sed la tempo urĝis.»

«Adiaŭ, Grafino,» li diris, «mi malaperos. Kiel mi povos malaperi sen renkonti mian karan kolegon?»

Marie antaŭiris lin al la manĝoĉambro, dum oni enkondukis la dukon de Bassano en la salonon, kiun Fouché ĵus elliris.

Fouché foriris tra la ĝardeno al sia fiakro, kiu atendis lin en la sakstrateto. Grincante per la dentoj pro plezuro, kiam li pensis pri la komplikaj frazoj de Maret, per kiuj tiu ĉi devis plenumi sian komision en la sama momento, la ministro de la polico pensis:

«Parolu, mia amiko, parolu. Via klopodoj estos neutilaj. Eĉ se via mastro estus ĉi tie, vi ne povus konvinki ŝin.»

*
* *

Finfine la paco kun Aŭstrio estis subskribita. Napoleono estis forlasanta Schönbrunn, kiam la duko de Bassano revenis raporti la rezulton de sia komisiono. Fouché ĝuste vidis ĉion. La imperiestro, kolera pro ŝia rifuzo, imputis ĝin al la malfeliĉa duko.

«Vi ne sciis bone esprimi vin. Vi kompreneblas nenion pri la virinoj. Vi devis samtempe esti dolĉa, insinua kaj energia. Sed vi estas nur stultulo! Mi estus devinta sendi Duroc.»

«Siro, mi faros la neeban. Mi preĝis, mi petegis. Mi montris ĉiujn favorajn sekvojn de la projekto. La sinjorino grafino Walewska perfekte komprenis min. Ŝi havis la animon disŝirita, ĉar ŝi oponis la deziron de Via Imperiestra Moŝto, sed la patrino amo estis pli forta. Kion mi povis fari? Ŝi ploris...»

«Diable! Vi ankaŭ ne devis igi ŝin plori. Ha! Vi ne estas taŭga intertraktanto!...»

Li revenis al sia tablo kaj febre skribaĉis kelkajn liniojn:

Marie, mi ne povas kaŝi tion al vi: vi seniluziĝis min. Mi atendis de vi pli da obeemo kaj konfido. Via respondo devigas mi fari tre gravajn decidojn. Sed tamen, Marie, mi restas tute via. N.

«Prenu tiun ĉi letereton, Maret, sigelu ĝin kaj sendu ĝin ankoraŭ hodiaŭ. Ni baldaŭ forlasos Vienon. Nu, ne faru tiel vizaĝon: mi ne koleras kontraŭ vi.»

Li donis al li leĝeran frapeton, kiu revivigis la ŝtatestro, ĝis tiam ŝrumpintan en la sintenon de malĝoja submeto.

Restinte sola en sia kabineto, la imperiestro longe meditis. Li estis ĝuste eskapinta al la atenco de Staps, kiu, refoje montris al la tuta

Eŭropo la fragilecon de la konstruaĵo, kiu, kiel ajn miriga ĝi estis, ripozis sur la ekziston de nur unu viro. Denove, kaj pli ol antaŭe, la estonteco de lia laboro obsedis lian menson. Li kredis esti aranĝinta ĉion per tiu substituo, kiu kuŝigus la infanon de lia amantino en la liton de lia edzino. Sed oni repuŝis ĝin. Kion do fari? Ĉu insisti ĉe Marie? Li tro amis ŝin por devigi ŝin... Cetere la bona momento por realigi tiu planon estis pasinta. Li tuj forĵetis ĝin kaj konsideris alian. Fortrenite de sia agemo, li neniam persistis en ideo, kies realigo atendigis sin.

Kun la kapo klinita sur la bruston, li ekzamenis lastan fojon la solvojn kiuj kapablis doni sukcesanton al la imperio. Eugène estis fidela kaj kuraĝa, sed havis molan menson. Li estis bona subkomandanto. Cetere, kontraŭ tia elekto la aliaj Bonapart-oj levus siajn voĉojn, kiujn Napoleono, familia viro, ne povus rezisti. Ĉu nomumi unu el siaj fratoj? Lucien, certe la plej inteligenta el ĉiuj, estis ribelulo, preskaŭ proskribito. Joseph ne havis la necesajn paciencon kaj energion. Louis suferis pro podagro en la piedoj, kaj Jérôme estis vanta kaj leĝera. Francio sekvus neniun el ili. Li devis rezigni pri la maniero de la Romiaj imperiestroj nomumi fremdulon sia heredonto. Li bezonis filon.

Tial li devis separi sin de Joséphine, divorci ŝin kaj alfronti la dolorigajn scenojn, kiuj ĝis nun fortimigis lin. Malgraŭ lia egoismo aŭ eble pro ĝi, oni jam vidis, ke li timis larmojn, kaj Dio scias, kiom da ili li estis flugonta!

Dum tuta horo li eltenis tiun duran batalon kun si mem. Finfine li faris la decidon, kiu forigis el li la homon kaj lasis nur la ĉefon.

«Finfine Fouché pravis,» li suspiris.

Li vokis Constant.

«Venigu la grandmarŝalon.»

Kiam Duroc ĉeestis, li sciigis al li en kelkaj vortoj la rezulton de la vojaĝo de Maret. La grandmarŝalo tute ne miris pri tio.

«Siro,» li diris, «mi antaŭvidis la respondon de sinjorino Walewska. Vi ne povas kolera kontraŭ ŝi: ŝi nur respondis al la impulso de sia koro.»

«Ĉiam viaj malspritaĵoj!» replikis Napoleono malpacience. «Marie ne komprenis min. Sed ni ne haltu ĉe tio. Temas pri tute alia afero. Vi skribos al la intendanto de la imperiaj palacoj, ke li devas fermi per brikoj la komunikan pordon inter mia apartamento kaj tiu de Joséphine en la palaco de Fontainebleau.»

La unuan momenton Duroc ne povis kredi siajn orelojn.

«Ĉu fermi per brikoj tiun pordon ? Sed kion diros la imperiestrino pri tio ? Kaj se ŝi demandas, kial vi donas tiun ordonon, kiun eksplikon doni al ŝi ?»

«Nenian. Ŝi sufiĉe frue ekscios miajn motivojn. Faru tion, Duroc, kaj ne plu parolu al mi pri tio. Tio dolorigas min, mia amiko, sed estas necese, estas necese... Kaj nun lasu min...»

XI. Fontainebleau

Ĵaŭdon, la 26-an de oktobro je la kvina matene Napoleono alvenis en Fontainebleau. Neniu estis avertita de tio. La palaco estis dezerta. Elĉerpita la imperiestro longe banis sin, tiam enlitiĝis kaj dormis tri horojn.

Ĉe lia vekigo Constant anoncis lin, ke la duko de Otranto troviĝis en la servosalono, atendente la ordonojn de la imperiestro.

«Ĉu Fouché ? Kion li volas ? Mi ne venigis lin. Li foriru. Mi ne volas vidi lin.»

Lia humoro estis malbonega. Lia rapidega reveno de Vieno estis iritinta liajn nervojn. La penso, ke li devas revidi Joséphine, kaj ke li devas informi ŝin pri sia decido divorci ŝin, pleniĝis lin per amareco. La alveno de Fouché, kiu estis por li, kiel por ĉiuj, la viva simbolo de la politiko kies celo estis lia divorco, malesperigis lin.

Por trompi sian malpaciencon, dum li atendis Cambacérès, kiun li igis voki, li komencis dispecigi siajn poŝtaĵojn kun Méneval.

Kiam la ĉambristo informis la ministron de la polico Fouché, ke la imperiestro ne povis akcepti lin, Fouché sidiĝis sur benketon kaj diris kun flegmo :

«Mi havas sufiĉe da tempo...»

Ĉe la tagmezo la ĉefkanceliero aperis. Dika, impona, sed havanta akran okulon, li respondis per protektema saluto la gentilaĵojn de la duko de Otranto kaj penetris en la kabineton de Napoleono.

Iom post iom la servosalono pleniĝis per viroj en uniformoj aŭ en kortegaj kostumoj, kiuj venis de Parizo, ĉambelanoj, adjutantoj, ministroj, Clarke, Savary, Beausset, Ségur, Rémusat, Corvisart, Ornano, Decrès, Mollien, Gaudin, Fontanes kaj multaj aliaj, kiuj flustris inter si de buŝo al orelo, ĉiam rigardante la pordon de la imperiestra kabineto. Ĉiuj evitis Fouché, kiu, apogante sin kontraŭ la aperturon de fenestro, ŝajnis absorbita per la kontemplado de la parko, de la lageto kaj de la ruĝiĝantaj kaj senfoliĝantaj aŭtunaj arbopinj-

toj. Post la ofendo, kiun la imperiestro igis suferi al li, rifuzante akcepti lin, lia malfavoro ŝajnis probabla. Kiel ankaŭ tiu de lia deklarita malamikino, la imperiestrino, kiun unuafoje en sia vivo Napoleono ne informis pri sia alveno, kaj kiun lia ordono fermi la komunikan pordon inter iliaj apartamentoj, ŝajnis kondamni por ĉiam.

Tiuj du gravaj eventoj okupis ĉiujn mensojn, sed precipe la tuja falo de la malamata ministro. En tiu ĉi momento Napoleono kaj la ĉefkanceliero sendube estis elektantaj lian anstataŭonton. La trejnita orelo de Fouché pretere surprizis kelkajn malmildajn vortojn, kiujn li tuj loĝigis en sia memoro. Li tamen gardis sian bonan mienon kaj palan rideton, sed fojfoje forte kunpremis siajn magrajn manojn. Tio estis lia sola gesto de timo. Ekde kelkaj semajnoj li sentis, ke lia pozicio ĉe la imperiestro estas en danĝero. La forpreno de la ministrejo de internaj aferoj montris al li, ke la imperiestro volas limigi lian povon kaj bridi lin. Lia rolo en la registaro estis kritikata. Li devis defendi sin. Ĉu tio estus malfacila afero ? Ba, li jam subtenis kaj gajnis aliajn aferojn, kie lia kapo estas riskata. Eksplikado kun la imperiestro ne timigis lin. Li timis nur lian silenton.

Subite la pordo de la kabineto de Napoleono malfermiĝis, kaj, multobligante siajn ceremoniajn salutojn, Cambacérès eliris. Malantaŭ li la imperiestro antaŭeniĝis sur la sojlo kaj rapide rigardis la ĉeestantaron. Li estis surprizita ankoraŭ vidi tie la ministron de la polico.

«Ĉu vi estas ankoraŭ ĉi tie, Sinjoro Duko de Otranto ? Kion vi atendas de mi ?» li severe demandis.

Fouché faris kelkajn paŝojn al Napoleono.

«Siro, mi pretigis min reiri al Parizo, vidante, ke Via Imperiestra Moŝto ne plu bezonas min.»

«Mi certe ne plu bezonas vin nun. Kion do vi ankoraŭ volas ? Tio estas enuiga. Kiam mi bezonas vin, mi venigos vin.»

Tiam, cedante al subita impulso, li aldonis tre malafable:

«Ĉar vi estas ĉi tie, vi povas enveni. Tiel ni ŝparas tempon.»

La duko de Otranto glitis preter la imperiestron, kiu mem violente refermis la pordon. Tiu gesto sendube parte trankviligis lian nervozecon, ĉar en preskaŭ trankvila tono li diris al Fouché :

«Vi ŝajnas esti malpacienca por ricevi miajn riproĉojn. Vi scias, ke mi estas malkontenta pri vi, ĉu ne.»

«Mi vidas, ke Via Imperiestra Moŝto estas iritita kontraŭ mi. Sed kiam Li estos dirinta al mi pri kio temas, mi ne kredas nebla, pravigi min en Liaj okuloj.»

« i jam menciis tion al vi : en tiu afero koncerne la naciajn gvardiistojn vi agis kun frivoleco, kiu ŝajnis suspekta al mi. Kial vi agis tiel sen ordono ? Ĉu estas vi aŭ mi kiu regas Francion ? Ĉu vi kredis vin reirinta al 1793 ? Mi avertas vin : mi ne estas Ludoviko XVI²⁹.»

La ministro leĝere moviĝis.

«Ha, vi ne ŝatas, » daŭrigis la imperiestro , « ke oni parolas al vi pri Ludoviko XVI ! Diable ! Tio estas malagrabla memoraĵo por vi, ĉu ne ? Cetere tute ne necesis sendi lin al la gilotino, mia kara !...»

La riproĉo estis dura, sed Fouché jam estis kutimiĝinta je la akraj riproĉoj de Napoleono, kiu, malpeziginte sian menson, fariĝis tiam pli facila. La batalo, tiel violente komenciĝinta, tiam fariĝis malpli danĝera. Tial li kuraĝis respondi :

«Ne decas al vi riproĉi tion al mi³⁰.»

«Kaj kial vi rifuzas al mi tiun rajton, Sinjoro ? Mi volus ekscii tion.»

«Ŝajnas al mi, Siro, ke tio estis la unua ser-vo kiun mi havis la feliĉecon fari por Vi.»

Tiu cinika spritaĵo ne malstreĉis la tenditan maskon de la imperiestron.

«Al vi certe ne mankas aŭdaco... Sed ni lasu tiun temon de la naciaj gvardianoj, ĉar mi sciis ripari viajn foliaĵojn. Prefere ekspliku al mi, kial vi, dum mi estis kun la armeo en la eksterlando, subite sentis la bezonon renkonti Talleyrand, kiu perdis mian favoron kaj sian oficon, kaj kiu neniam estis, tiom mi scias, amiko via. Pri kio vi parolis ĉe la princino de Vaudemenot, kie sinjorino de Rémusat unu-igis vin ? Vi prenis viajn antaŭzorgojn, ĉu ne? Kaj ĉar vi kredis min en danĝero, vi pensis pri Murat por sucedi min. Ha, ha ! Murat ! Tiu povra kapo kun plumaĵoj !... Mi ne faras al mi iluziojn pri viaj sentoj. Post mi, iu alia... Sed ĉu Murat ? Tio certe ne honorigas vian juĝon.»

Li malestime levis la ŝultrojn.

«Mi frapis Talleyrand. Mi ne scias, kio retenas min frapi ankaŭ vin. Kian fidon mi ankoraŭ povos havi en vi ? Vi estas tro agema, vi faraĉas tro da aferojn malantaŭ mia dorso. Vi kredas povi trompi min kaj ĉiam, ĉiam denove. Ĉu vi aŭdas ? Mi travidas vin. Viaj kutimoj de

policano malheligas en vi ne nur la dececon, sed ankaŭ la politikan klarvidecon. Vi pli valoris sub la Konsuleco. Donante al vi bienojn kaj titolojn, mi esperis fari vin pli trankvilan, pli certan, sed via agemo ne malpliigis. Nece-sas, ke tio ŝanĝiĝu, se ne, ni separos nin, duko de Otranto ! »

«Siro,» komencis Fouché...

«Kion vi ankoraŭ trovas ? Ĉu denove mensogojn ? Atentu : sufiĉas al mi.»

«Mi tute ne intencas diri al la imperiestro ion alian ol la veron : ĝi estas mia plej bona defendo. Iam vi diris al mi : ‘La homoj ne estas tiaj, kiaj oni volas, ke ili estu.’ Tio estas ebla por certaj karakteroj, kies argilo estas mola kaj kiuj obeas al la fingroj de la potfaristo. Sed estas aliaj kiuj, malgraŭ sia bona volo, ne povas ŝanĝi sian aspekton kaj rimedojn. Ili tamen ne servas malpli bone. Mi estas unu el ili. Mi faras ĉion por vi, Siro, sed per miaj kvalitoj kaj mankoj, kiujn la naturo donis al mi. Via Imperiestra Moŝto riproĉas al mi tro moviĝi. Estas, ke moviĝante, oni lernas, metante al si demandojn, surprizante sintenojn kaj rigardojn kaj serĉante respondojn. Via Réal asertis gvidi la policon de sia kabineto. Sed kion do li atingis ?»

La kuraĝa lingvaĵo de Fouché estus miri-ginta personojn kiuj ne vivis en la ĉirkaŭaĵo de Napoleono. Sed Fouché konis lin sufiĉe bone kaj tro longe por ne pridubi, ke en tiu por li tre delikata momento la plej profunda politiko devas esti tiu de preskaŭ agresiva sincereco. Napoleono ĉiam montris sin suspektema. Lia geometria menso inklinis al konstanta analizo de la aliaj kaj si mem. Li kredis, ke ĉiu homa ago havas celon, kaj malbone eksplikis al si la spontaneajn moviĝojn de la aliaj. Iom da brutaleco trankviligis lin kaj refaris lin konfidema. Jam ofte Fouché faris tiun sperton : ĝi estis unu el la risortoj per kiuj li tiel longe sukcesis gardi sian mirigan influon sur la imperiestro.

Cetere, post kiam li klarigis sian vidpunkton, la duko de Otranto faris unu paŝon malantaŭen:

«Estas eble ke mi, dum via foresto, tro rapi-de armis la naciajn gvardiistojn, kiam la Angla danĝero ŝajnis al mi manifesta. Mi mem pensas tion nun. Sed bonvolu vidi en tio nur eksceso de mia fervoro, kaj ne ago kiu ŝajnas priridinda de viro kia mi, kiu, mi kredas, tamen estas realisto.»

²⁹ Reĝo Ludoviko XVI malpermesis al la armeo elpaŝi kontraŭ la revoluciuloj. Li estis senkapigita en 1793, kio estis la komenco de la Teroro.

³⁰ Kondamnante Ludovikon XVI al la gilotino Fouché helpis liberigi la tronon por Napoleono.

La tono de tiu defendo estis de penetranta simpleco. La ĉarmo de Fouché residis ĉefe en liaj alvokoj al la intelekto, kiuj estis tiel nudaj kaj netaj, ke li ŝajnis preskaŭ nur cerbo kun nenia homa. Li ŝajnis direktiĝi nur al la intelekto de la interparolanto, kaj intelekto respondis lin.

Unu plian fojon tiu prestiĝo funkciis. Laŭ tio ke la duko de Otranto plu parolis, Napoleono ne povis eviti aŭskulti lin kun kreskanta komplezo.

«Kia lerteco !» pensis la imperiestro. «Li respondis al ĉio. Se li ne tiom ŝatis intrigojn, li estus perfekta servisto.»

Li sidiĝis sur sian skribtablon, balancante la kruojn kaj komencis foliumi raporton de Berthier, post kiam li faris signon al Fouché, ke li povas daŭrigi.

La ministro de la polico deziris nenion alian, kaj tiom pli volonte ĉar li vidis pli solidan terenon.

«Koncerne miajn rilatojn kun sinjoro de Talleyrand, mi povas koncize resumi ilin. Mi renkontis lin dufoje ĉe sinjorino de Vaudément, kaj ni parolis pri la eventoj de la tago en tre banala maniero, tre malproksimaj de la celoj de Via Imperiestra Moŝto. Inter la princo de Benevento kaj mi, vi scias tion, Siro, ne ekzistas granda simpatio. Niaj temperamentoj estas tro diversaj. Li estas la skeptikismo kaj apatio en persono, dum vi riproĉas al mi mian aktivemon. On devas tamen esti tre aktiva kun mastro kia vi. En la posteno, en kiun vi metis min, apatio estus perfido. Sed persekutante senkompate la internajn kaj eksterajn mal-amikojn de la reĝimo, oni malfeliĉe gajnas pli da malamikoj ol paradante tra la konsilioj aŭ la antaŭĉambroj. Tiamaniere mi amasigis multajn malamikojn. Hodiaŭ ili volas venĝi sin kaj detruu min en la menso de la imperiestro. Ĉu ili sukcesos ? Mi timas, ke jes, ĉar okazoj esti malkontenta pri ministro prezentiĝas ĉiutage, kaj mi estas, ankaŭ mi rimarkas tion, tre povra kortegano.»

«Duko de Otranto, » diris la imperiestro kun digneco, « miaj sentoj ne estas influataj en la maniero, kiel vi kredas. Kiam mi skoldas vin, tio estas, ĉar mi vere havas kialon plendi pri vi. Tio ne malhelpas min apreci certajn meritojn viajn. Mi ne neas, ke vi faris al mi grandajn servojn. Kaj vi faros al mi aliajn estontece, mi esperas. Koncizadire, vi bone agis insistante por vidi min. Ĉu vi havas ian gravan aferon komunikendan al mi?»

«Mi tenis Vian Imperiestran Moŝton informita per miaj ĉiutagaj leteroj pri mia plej grava

laboro. Sed mi dezirus meti sub la okulojn de la Imperiestro, tuj kiam li havos tempon por tio, pluraj dokumentojn kaj ankaŭ paroli kun li pri certaj administraciaj aranĝoj, kiuj ŝajnas al mi utilaj.»

«Ne hodiaŭ. Mi ĵus alvenis, kaj mi devas aranĝi pli gravajn aferojn.»

«En tiu kazo, restas nur al mi prezenti al Via Imperiestra Moŝto mian tre humilan omaĝon.»

Kliniĝante li faris kelkajn paŝojn al la pordo. Napoleono eksilentis. Pro ia stranga skrupulo li hezitis paroli al Fouché pri lia divorco. Tiamaniere kontentigi la deklaritan malamikon de Joséphine naŭzis lin. Li vidis en tio kvazaŭ maldececon. Sed ĉu tio ne estis infanaĵo ? Li ne povis longe teni nescia la ministron de la polico. Sendube li jam sciis tion. Sed eble estus bone, ne konsulti lin, sed informi lin, por vidi, kion li diros. Tiu griziĝanta vulpo plena je ideoj...

Siavice en tiu momento Fouché pensis nur pri la divorco kaj atendis nenion alian. Ĉu la imperiestro lasus lin foriri sen diri ion pri tio ? Tio estus neeltenebla ofendo. Fola malpacienca tordis liajn nervojn sub trankvila eksteraĵo. Li divenis la heziton de la imperiestro kaj deziris venki ĝin per ĉiuj siaj fortoj. Por li lia reveno al la favoro ne estus kompleta, se Napoleono gardis la buŝon fermita pri tiu imensa okazantaĵo. Cetere, se la imperiestro informus lin pri siaj planoj koncerne Joséphine, Fouché povus konfirmi ilin per iuj riveloj kaj detruu la lastajn pontojn, se ankoraŭ restis iuj.

La ministro de la polico ĵus estis elironta, kiam Napoleono revokis lin.

«Restu ankoraŭ momenton ĉi tie, duko de Otranto... »

Li neis sian senton de antipatio, cedante al la utileco. Li fiksas sian rigardon sur la longan figuron de la ministro de la polico kaj diris :

«Vi vidis pasi la ĉefkancelieron. Ĉu vi scias, pri kio ni parolis ?»

«Jes, Siro, » respondis Fouché memfide, « aŭ almenaŭ mi kredas tion.»

«Hej, vi volas igi min kredi, ke vi scias tion ? Diable, vi estas tre forta, se vi divenis tion.»

La duko de Otranto ridetis.

«Se mia memoro estas fidela al mi, Via Imperiestra Moŝto malpermesis al mi antaŭ nelonge mencii la temon.»

«Kian temon? Nenia rebuso por mi, mi petas !»

«Temo kiu esence tuŝas kaj la intiman vivon de la imperiestro kaj la estontecon de Lia domo.»

Napoleono abrupte haltigis la ritman balan-
cadon de siaj kruroj kaj diris, mirigita :

«Vi do estas la diablo !... Sed vi divenis ĝuste.
Mi interparolis kun Cambacérès pri separo inter
la imperiestrino kaj mi. La ĉefkan-celiero
objetis. Li asertis, ke Joséphine estas populara,
amata, ke Francio bedaŭros ŝin...»

«Siro, la ĉefkanceliero, sen ŝajni tia, jam ĉiam
estis partiano de la imperiestrino.»

«Ne, sed li estas instinkta konservativulo. Li
volas gardi la nunan situacion. Aliflanke mi
estas certa, ke mi ne ŝuldas pro la sterileco de
nia geedzeco. La interesoj de la imperio pos-
tulas, ke mi provu havi rektajn heredontojn. Vi
scias tion, tiel bone kiel mi, ĉar vi estis unu el la
unuaj kiuj konsilis al mi divorci...»

«Siro, mi estas feliĉa ekscii, ke la impe-riestro
konvinkis sin de la politika neceseco de tia ago.
Tia decido faros la imperion neŝan-celebla.»

«Mi esperas tion. Sed mi devas konfesi al vi,
ke tio dolorigas min. Kaj Cambacérès antaŭ-
vidas problemojn.»

«Cambacérès ne konas la publikan opinionon. Li
kredas, ke ĝi favoras la imperiestrion. Mi, kies
tasko estas informi min por instrui vin, Siro, mi
povas repondi, ke Francio kliniĝos kun ĝojo
antaŭ tia decido, kiu plifortigos la reĝimon, kun
kiu ĝia sorto estas ligita. Kion volas la Francoj ?
La feliĉecon kaj la gloron de Via Imperiestra
Moŝto, la daŭrigon de Lia dinastio. Kiu estas
por ili la imperiestrino ? Ili apenaŭ konas ŝin,
kaj por diri ĉion, la laŭdo per kiu kovras ŝin la
oficialaj gazetoj malbone respegulas la verajn
sentojn de la popolo kaj ne venkas la famon jam
delonge divastigitan pri ŝia frivoleco, ŝiaj
elspezoj, kiuj, ĉe virino de ŝia aĝo kaj kiu ne
naskiĝis sur la trono, vundas la sentojn de la
burĝaro kaj de la popolo...»

«Estas vere, ke ŝi malŝparas,» diris Napo-
leono. « Sed ilia tualetto necese okupadas la
virinojn. Se ĉiuj reĝinoj havus tiun tendencon,
iliaj edzoj havus malpli da problemoj. Per kelkaj
ruloj da oro ili povus kontentigi ilin. Kiam la
virinoj ne okupiĝas ĉiam pri siaj tualettoj, ili
pensus pri politiko, havus tro da pretendojn kaj
malordigis ĉion. Mi preferas vidi Joséphine
amuziĝi per ĉifonoj ol provi interveni en la
regado.»

Tamen Napoleono estis tre ŝparema. Tre ofte
li furiozis kontraŭ la ekstravaganco de la Kreo-
lino, kiu, senĉese maloportunata de la live-
rantoj, ne cesis mendi robojn kaj juvelojn,
mensogante por kaŝi sian malordon kaj tur-
nante sin al la plej malbonoj trompisto. Sed en
tiu ĉi momento li volis malpli pensi pri la

prodigemo de Joséphine ol pri ŝia konsento
divorci.

«Ne estas tiel, ke la imperiestrino ne puŝis
siajn kreatulojn,» Fouché reprenis senkom-
pate, « sed se ŝi ne povis forte influi la regadon
de la ŝtato, konfidita al por ŝi tro fortaj manoj, ŝi
neniam ĉesis per insinuoj kaj manovroj ŝajnigi
partopreni en ĝi. Ŝi ĉiam kredis sin la centro de
partio, en kio ŝi forte eraras. Ŝi vivis en kliko de
aristokratoj unuigitaj nur per la lipoj kaj kiuj
forlasos ŝin, tuj kiam ŝi ne plu povos servi iliajn
celojn. Ĉar Via Imperiestra Moŝto aperas
permesi min paroli al Vi kun plena libereco, de
viro al viro, oni ĝenerale ripetas al la publiko,
ke la kastelgrafino de Beauharnais povus esti
aminda virino, sed ke ŝia pasinteco faras ŝin tute
maldigna esti la edzino de la plej granda
suvereno, kiun havis Francio ekde Karlo la
Granda. Ŝia inklino al intrigoj estas konata, ŝia
maldiskreteco for-puŝas, sed nek la publiko nek
la imperiestro mem scias, kion mi scias pri tio.»

La frunto de Napoleono sombrigis.

«Kion do vi asertas, Duko de Otranto ? Eks-
pliku tion pli klare.»

«Estante en Strasburgo,» daŭrigis Fouché per
sia akra voĉo, «en la momento kiam alve-nis la
novaĵo de la batalo apud Essling, la Impe-
riestrino, troigante la malsukceson, ne hezitis
konfidi sian timon al Metternich, aku-zante la
imperiestron pri tro granda soifo je konkeroj,
kvazaŭ ŝi serĉus alie apogon kaj sekurecon... Ŝi
aperte kondamnis vian kon-duton vidalvide de
la Papo... Ŝia opinio pri la reĝo de Hispanio kaj
la reĝo de Napolo, frato kaj bofrato de Via
Imperiestra Moŝto, ne ĉesis kontraŭi la ideojn
kaj agojn de la imperiestro »

«Efektive, ŝi amas nek Joseph nek Murat. Sed
kion ŝi precize diris?»

«La Imperiestrino bedaŭris antaŭ pluraj per-
sonoj de sia kortego, kaj eĉ antaŭ fremduloj,
kies nomojn mi povus citi al la imperiestro –
ĉar en la ministerio mi gardas plenan raporton
pi tiuj faktoj –, ke Via Imperiestra Moŝto kredis
esti necese ĉirkaŭi la imperion per satelitaj
ŝtatoj, regataj, pro Via familia amo, per
nekapablaj suverenoj, kiuj estos post nelonge
kaŭzoj de grava malfortigo.»

Kun kreskanta indigno Napoleono aŭskultis
tiujn rivelojn de Fouché, kiujn li tamen sentis
esti ekzaktaj. Kio! Tiu virino, kiun li levis al tiel
alta nivelo, faris sin kulpa pri tiaj perfidoj? Se
li ankoraŭ iomete hezitis divorci ŝin, tiu ĉi
interparolo sufiĉis por nuligi tiun hezidadon. Pro
sia propra intereso, pro stulteco, pro mal-
fideleco ŝi kuraĝis tuŝi tion kio estis la plej

sankta en liaj okuloj: lia politikon. Ŝi meritis sian pereon. Nenio plu povis savi ŝin.

«Ĉio tio estas tre grava. Vi tuj devus esti avertinta min.»

«Vi malpermesis min, Siro, paroli al Vi pri la imperiestrino, ĉar vi kredis min ŝia maljusta malamiko. Kion mi tiam estus dirinta, estus estinta suspekta.»

Napoleono violente frapis per sia kalkanumo kontraŭ la skribtablo.

«Jen kiel mi estas servata! Mi nur ekscias la veron per surprizo... Daŭrigu vian rakonton : ĝi estas instrua...»

«Siro, mi kolektis tre dikan dosieron pri la nesingardaĵoj en la konduto kaj la paroloj de la imperiestrino dum la lastaj jaroj. Mi alportos ĝin morgaŭ al Via Imperiestra Moŝto, se Vi deziras tion. Sed mi tamen kredas, ke, se la imperiestro jam decidis divorci, la momento fari riproĉojn al ŝi malmulte konvenas. Kion mi diris al Vi, mi diris nur por forpreni al Vi bedaŭron pri Via decido.»

«Ha ! Fouché, » eksklamis Napoleono, « mi estas vivonta terurajn momentojn... »

«La Imperiestrino lamentos : tio estas ŝia taktiko. Sed la intereso de la imperio ne povus cedi al ŝiaj plendoj. La imperiestro devas forpreni siajn okulojn de la pasinteco kaj turni ilin al la estonteco, kiu apartenas al Li. Cetere, se Vi permesas al mi doni al Vi tre humilan konsilon, mi aldiras, ke nenio kontraŭas, ke Napoleono, separante sin pro politika kialo de la reganta imperiestrino, donu al ŝi grandan situacion, riĉe orumu ŝian retiriĝon kaj pagu ŝiajn servistojn. La imperiestrino certe ne estos sensentema al tiu prespektivo. Ŝi jam ĉiam amis monon.»

Sentante urĝan bezonon moviĝi, Napoleono leviĝis, trairis tien kaj reen per grandaj paŝoj dum minuto sian kabineton, kaj tiam ekstaris antaŭ sia biblioteko, kiu ornamis la tutan malantaŭan muron kaj, sen rigardi Fouché, rapide diris :

«Venu morgaŭ vespere. Alportu al mi tiun dosieron. Mi volas scii ĉion detale. Preparu ekde nun la publikon al la divorco per la gazetoj kaj la aliaj rimedoj pri kiuj vi disponas. Sed procedu dolĉe, kun mezuro kaj per ŝtupoj. Antaŭ ĉio necesas, ke oni bone sentu, ke nur la zorgo certigi al mi heredontojn devigas min al tiu doloriga separo. Malgraŭ ŝiaj mankoj Joséphine restos mia amikino, kaj precize nun mi ŝuldas al ŝi respekton... Sed Fouché, mi timas revidi ŝin... Ĝis morgaŭ...»

Li malfermis la pordon. La ministro de la polico salutis lin kaj eliris.

«Ĝis morgaŭ, ĉu ne, duko de Otranto ?» ripetis la imperiestro. «Sinjoro de Ségur, venu momenton, mi petas.»

Kiam la grandmastro de la ceremonioj eniris ĉe Napoleono, okazis vera refluo de tiu civila kaj militista kortego, kiu unu horon antaŭe kredis pri la malfavoro de Fouché, vidante lin foriri kun radiantata vizaĝo. Escepte de Duroc, Savary kaj Ornano ĉiuj serĉis per vorto, rideto forgesigi la malamikan aŭ malestiman sintenon, kiun ili antaŭ nelonge montris al la ministro, kies falon ili atendis tro frue.

Post gesto per la ĉapelo al la ĉeestantaro :

«Ekskuzu min, Sinjoroj,» diris Fouché, « i reiras al Parizo, tre haste, kiel vi vidas, ĉar multa laboro atendas min en la servo de la imperiestro.»

Kaj la duko de Otranto per longaj, silentaj paŝoj, iris al la antaŭĉambro.

XII. Vespermanĝo en la Tuilerioj

Kvankam ŝi torturis sian kapon, Joséphine ne sukcesis ekspliki al si la subitan ŝanĝon en la sinteno de Napoleono. Tuj kaj senrezerve konsentinte al la plano, ke ŝi substituu Marie kiel patrino de ŝia infano, proponita de Napoleono, ŝi kredis esti konservata por ĉiam en sia stato de imperiestra edzino. Anstataŭ reveni al Malmaison, Maret sendis al ŝi malklaran leteron, dirantan ke li ricevis de la imperiestro novajn ordonojn, plenumendajn post la foriro kaj ke li aliĝos al li en Germanio. Tiam nenio plu krom letereton de Napoleono, datitan en Munkeno.

Munkeno, la 21-an de novembro

Mi estas ĉi tie ekde hieraŭ en bona sanstato. Mi haltos unu tagon en Stuttgart. Vi estos informita de mia reveno. – N.

Kaj kiam ŝi alvenis en Fontainebleau, ŝi koliziis sur glacie malvarman akcepton kaj krudajn vortojn.

«Kio? Vi malfruas kiel ĉiam? Kion do vi faris en Saint-Cloud ? Vi ne plu estas bela. Vi maldikiĝis !»

Li bruske forlasis ŝin kaj enfermis sin kun Berthier en sia kabineto.

Informita de sinjorino de Rémusat, ke la speciala komunikada pordo de ŝia apartamento kun tiu de la imperiestro estis fermita, ŝi inter-pretis tiun novaĵon kiel la plej sinistran antaŭ-signon. Ŝi provis ekkoni ĝian motivon tra sinjoro de Beausset, prefekto de la palaco, kiun ŝi konis

kiel honestan viron. La dika, ridema viro plilongigis sian vizaĝon kaj respondis embarasita, ke riparoj estis komencitaj, kaj ke la subita reveno de la imperiestro suspendis ilin. Joséphine suspiris kaj diris :

«Sinjoro de Beausset, kreu, ke malantaŭ tio kaŝiĝas ia mistero.»

La sekvantajn tagojn ŝi malpacience atendis eksplikon fare de Napoleono. Sed li ŝajnis fuĝi ĉiun okazon de intimeco. Neniam plu ili estis solaj. Aferoj kaj akceptoj okupis lian tutan tempon. Lia sinteno kontraŭ Joséphine ŝajnis malfamiliara, preskaŭ malamikeca. Iun vesperon ŝi iris al li, sed Constant, plenumante liajn ordonojn, ne lasis ŝin penetri en la ĉambron de la imperiestro, kiu, li diris, dormis. Ŝi ne kuraĝis malobei la ordonon kaj reiris al sia apartamento, timoplena.

Ŝi ne komprenis lin. Se la projekto de la supozita gravedeco restis, aranĝoj estis farendaj, tuja anonco farena, detaloj konsentendaj. Napoleono parolis pri nenio. Ĉu li do rezignis pri tiu plano? Ĉu li renkontis neantaŭvideblajn malfacilaĵojn? Ŝi kuraĝis aludi pri tio al li, sed li tuj forlasis ŝin sen respondi.

Kio do okazis, renversante kombinaĵon, kiu estis tiel avantaĝa por ĉiuj : per kio Napoleono estis povonta efektivi siajn politikajn celojn, Joséphine konservi sian rangon, kaj sinjorino Walewska sekurigi – kaj kun kia splendo! – la estontecon de sia infano. Ĉu ŝi devis kredi, ke la Polino rifuzis subteni la deziron de la imperiestro? Ĉu heredeco por ŝia filo ne sufiĉis por ŝi ? Ĉu ŝi volis la tronon por si mem?

Kiel ajn frivola Joséphine estis, malgraŭ ŝia timo ŝi inklinitis al logika rezonado, kiu estis ankoraŭ plifortigata de ŝia bona observot talento. La sinteno de la kortego estis signifoplena por ŝi. La ŝajna respekto restis. Sed la komplezeco malpliigis, precipe en la ĉeesto de la imperiestro. Oni ne plu petis sin interveni por ia graco. Kaj dum la Bonapart-oj, radiantaj, renkontis ŝin per ofendaj ridetoj, tiuj kiuj ŝi sciis esti alligitaj al ŝia fortune, surmetis funebrajn mienojn.

En tiu timigo Joséphine ne restis malaktiva. Kiu virino estus povinta ? Ŝi petis pri interparolo Cambacérès, kiu ĉiam estis montrinta sin kompleza ĝis tiam. Sed ŝi povis tiri nenion el li pri la celo, kien la eventoj ŝajnis treni ŝin. Svaga, pompa, singarda li respondis al ŝiaj demandoj per kaŝemaj frazoj, kiuj igis ŝin dubi – kion li deziris – ĉu li estis ankoraŭ en la favoro de la imperiestro.

Ŝi ankaŭ vidis Maret. Sed li retiriĝis malantaŭ kompletan diskretecon, al kiu devigis lin lia funkcio. Ĉiuj klopodoj de Joséphine fiaskis pro tiu nepenetrebla sinteno. Ekde tiam ŝi komencis malesperi.

Unu semajnon poste, la vesperon de la 30-a de novembro, la imperiestrino sidis en sia salono de la Tuilerioj kun sia filino Hortense kaj la du virinoj, kiujn ŝi pleje fidis – sinjorino de Rémusat kaj sinjorino Junot, antaŭ nelonge titolita dukino de Abrantès. En ilia ĉeesto ŝi transdonis sin al la korpremiteco, kontraŭ kiu ŝi jam luktis tiom da tagoj. Nun ŝi sentis sin perdinta. Nenio povis forigi nun la baton, kiun ŝi timis jam tiom da jaroj, ekde la reveno de Napoleono el Egipto ; baton , kiun ŝi povis eviti dum multaj jaroj per mil ruzoj, kaj kontraŭ kiun ŝi estis levinta tiom da fragilaj barieroj. Ĝi neeviteble estis venonta ĉi-foje. Napoleono eskapis al ŝi per la plej certa taktiko : silento. Kial insisti pri klarigo? Ĉu ŝi ne jam sufiĉe luktis ? Ŝi estis neniigita, preta akcepti ĉion.

Ŝiaj du amikinoj provis konsoli ŝin. Sinjorino de Rémusat, inklinita al ruzoj, konsilis al ŝi diplomation. Gajni tempon, ŝajni submetita, profiti de incidento por revenki Napoleonon, kion Joséphine sukcese faris jam tiom da fojoj, kaj antaŭ nelonge en Marracq.

«Pacienco !» ekkriis Joséphine. «Kiom da pacienco mi jam havis kun li! Vi scias tion, Claire. Vi ĉeestis plurajn terurajn scenojn, dum kiuj li riproĉis al mi miajn elspezojn, kie li ordonis al mi fermi la okulojn antaŭ liaj distraĵoj, kie li eĉ insultis min, ĉar, vi atestis ĉion, mi toleris ĉiujn liajn insultojn ! Mi suferis ĉion, eltenis ĉion. Sed ĉio estis vana. Eĉ mia komplezemo iritas lin. Kial do serĉi kialojn ? Mi ne plu plaĉas al li, jen ĉio!»

Sinjorino d'Abrantès, kies maldika korpo kaŝis bataleman animon, kuraĝe konsilis al ŝi rezisti. Edzino de soldato, edukita en la familiareco de la Bonapart-oj kaj vera amikino, ŝi ne pripensis siajn parolojn :

«Mi certas, Sinjorino, ke la imperiestro ne forprenos al vi la kronon sen paroli al vi pri tio. Oni ne repudias la imperiestrion de Francio kaj la reĝinon de Italio. Krom tio Napoleono, eĉ se li povas fari tion, ne farus al vi tian insulton. Li ne havas sufiĉajn plendmotivojn kontraŭ vi por divorco. Laŭ Junot necesas akordo inter vi. Kaj se vi ne subskribos, la imperiestro, kiel ajn potenca li estas, estos senpova.»

«Sed kiel mi rifuzus al li mian konsenton, se li petas min konsenti? Li timigas min... Kaj cetere, mi ŝuldas ĉion al li...»

«Li ŝuldas multon al Via Imperiestra Moŝto,» diris mielece sinjorino de Rémusat. «Li ŝuldas al vi multajn jarojn de feliĉeco.»

«Ve,» murmuris Joséphine, «li eĉ ne plu parolas al mi.»

Ŝi revis kelkajn momentojn kaj tiam aldiris :

«Ne estas la krono kiun mi hezitas fordoni. Ĝi ofte multe pezis al mi. Kiel privatulino mi estis pli feliĉa, ol kiel suverenino. Mi ne ploris, ĉar mi fariĝis princino. Mi estus kontentiĝinta, se Bonaparte estus restinta konsulo. Sed separi min post tiom da jaroj, dum kiuj mi partumis lian vinon, vidi lin edziĝinta al alia virino, kiu eble estos la malamikino de miaj infanoj, tio estas dura !»

«Tial vi devas batali, Sinjorino !»

«Por tio necesas pli da kuraĝo, ol mi havas. Se mi havus aferon kun Bonaparte sola, mi sendube havus esperon. Sed lia familio estas kontraŭ mi, kaj tiu Fouché malamas min, Fouché kiu reprenis sian tutan influon, kiu vidas la imperiestron ĉiutage sen atestantoj, dum mi ne plu vidas lin. Li estas nia malbona genio, tiu sinistra senfrokiĝinto³¹, kiu volas fari el mi sia ludilo. Mi povas fari nenion kontraŭ liaj intrigoj, liaj perfidoj... Tial ili faru, kion ili volas... ili forpelu min !... Mi ne defendos min... Mi ne plu kapablas...»

Ŝi ekploris, rigardante la pentraĵon de la malgranda Napoléon-Charles, kiun ŝi igis meti dekstre de la kameno. La morto de tiu ĉarma princeto, la plej aĝa filo de Hortense, kiun la imperiestro amegis, estus estinta la funebra sonorilo de ŝia regno. Se li ankoraŭ vivus, oni estus farinta lin la heredonto.

«La sola savo de Via Imperiestra Moŝto kuŝas en Via energio, » reprenis la dukino d'Abrantès, kiu ne facile forlasis siajn ideojn. « Se vi montros vin decidema, la imperiestro ne povos igi vin malsupreniri de la trono. Ĉu vi ne estas edziniĝinta antaŭ la Eklezio ? En tiu ĉi momento oni povas apenaŭ nomi la papon la amiko de de la imperiestro. Li rifuzos nuligi la geedzecon. Kaj Napoleono ne povos kontentiĝi nur per civila divorco, se li pensas pri nova geedeziĝo.»

Efektive, la tagon antaŭ ol Napoleono estis konsekrita imperiestro Joséphine konfidis al papo Pio VII, ke sia unio kun Napoleono ne estis benita de pastro, kaj la suverena pontifiko postulis, antaŭ ol konsekri la imperiestron , ke kardinalo Fesch, unuigu ilin religie. Napoleo-

no, sekrete furiozante, sed montrante afablan mienon al la malbona sorto, submetis sin, ĉar la ruza Joséphine kredis, ke tiu rapida kaj sekreta religia ceremonio armus ŝin kontraŭ divorco. Sed nun ŝi ne plu kalkulis je tio.

«Se la papo rifuzos, Napoleono agos sen lia konsento. Li igis prononci la nuligon far la oficialularo de Parizo. Jam unufoje li parolis pri tio al Eugène...»

«Sed, Sinjorino, se la imperiestro rifuĝus al tiu artifiko, li trovus kontraŭ li sian onklon, kardinalon Fesch, kiu insistos pri bonaj rilatoj kun Romo. Kaj monsinjoro Fesch estas la ĉefo de la oficialularo.»

«Kion do vi konsilas al mi ?» demandis Joséphine, kiu denove vidis lumon, kvankam ankoraŭ tre malfortan.

«Iri al la Imperiestro, rakonti al li vian doloron kaj demandi al li, kio estas la kaŭzo de lia sinteno...»

«Li ne ricevos min. Mi jam vane provis fari tion.»

La nigraj okuloj de Laure d'Abrantès brilis en ŝia bruniĝinta vizaĝo.

«Vi sieĝos lian pordon. La imperiestro estas viro, kaj ĉiuj viroj estas malkuraĝaj en tia momento. Mi jam spertis tion kun Junot, kiu tamen ne estas timida. Via Imperiestra Moŝto tenas sian sorton en Sijaj manoj. Lerta kiel Ŝi estas kaj kun iom da energio Ŝi triumfos.»

«Ve, mia bona dukino, por paroli tiumaniere, mi estas tro malforta. Vi malbone konas min, aŭ vi ne bone konas lin.»

«Ĉu la imperiestro, Sinjorino ? Mi ludis sur liaj genuoj. Li povas ŝajni dura kaj malfacila en certaj momentoj, sed funde li estas sentema. Li amas vin, Via Imperiestra Moŝto povos emocii lin.»

«Mi dubas pri tio, mia infano. Kaj ankaŭ vi, ĉu ne, Claire, vi dubas pri tio, » Joséphine diris al sinjorino de Rémusat.»

«Mi, Sinjorino, » aroge respondis la damo de la palaco, « se mi estus en via loko mi atendus...»

Post tio ŝi petis ilin lasi ŝin sola kaj igis diri al la servanta ĉambelano, ke ŝi ricevos plu nenium de ŝia domo ĝis la vespermanĝo.

Tenante la kapon inter la manoj, kaj vestite en noktosturo, ŝi sidis antaŭ la fajro, kies flamoj, iam kaj iam pli vivecaj, animis la oron de la

³¹ Antaŭa katolika pastro apartenanta la kongregacio de la oratorianoj kaj instruisto de matematiko, li defrokiĝis en 1792 kaj fariĝis jakobeno.

mebloj kaj plafono, kaj restis enpensigita ĝis la vespero.

Kie estis la tempo, kiam Napoleono, arda, ebria pro amo kaj ĵaluza, foriris al Italio, de kie li sendis al ŝi febrajn kaj pasiajn leterojn, al kiuj ŝi respondis per sekaj leteretoj, kiam la amuza Charles, ŝia amanto, lasis al ŝi la tem-pon fari tion. Pri la juna triumfanta generalo, kiu petegis ŝin aliĝi al li en Milano por ke li, ankoraŭ varma pro la bataloj per kiuj li libe-rigis Lombardion, povu ĉirkaŭbraki ŝin, pri li ŝi tiam diris : « Kiel komika li estas, tiu Bona-parte ! »

Tiam li adoris ŝin, sed ŝi, apatia kaj mal-estima, ne amis lin. Kaj nun li ne plu amis ŝin. Li estis ligita kun ŝi nur per speco de kutimo, kiu estis rompiĝonta. Dum ŝi, iom post iom, finfine spertis por li tian profundan senton, kian ŝi povis sperti per sia leĝermensa naturo. Ŝi amis en li la viron kiu superŝutis ŝin per riĉaj vestaĵoj kaj juveloj, kiu famigis ŝin, de kiu dependis la brila aŭ la banala estonteco de siaj infanoj. Ŝi estis superfortita de tiu supera kaj obstina. naturo. Sentante , ke ŝi estis per-danta lin, ŝi malespere alkroĉiĝis al tiu viveca memoro, al tiu eksterordinara atestanto de ŝia juneco kaj ŝia beleco. Ŝi konkeris la konke-ranton. Li havis Eŭropon, kaj ŝi havis lin. Ŝi aprecis ĉion kio estis lia, sed nun ŝi estis perdonta ĉion. Ŝi bedaŭris la perdon de lia gloro, de lia konfidenco, de liaj kisoj...

Sendube ŝi povus rezisti, kiel konsilis al ŝi la obstina dukino, se ŝi havus pli fieron karakteron. Napoleono certe retroirus antaŭ imperiestrino rigidiĝinta en sia purpuro. Antaŭ ĉio li timis skandalon, kiun liaj burĝaj ideoj ne povus permesi kaj pro kiu unu plian fojon li pro-krastus sian planon. Sinjorino d'Abrantès pravis, sed ŝi ne povis konvinki ŝin. Ŝiaj antaŭaj eraroj estis forgesitaj. Ŝia konduto fariĝis neriproĉebla. Nur li konstante estis malfidela. Ĉu li estis divorconta ĝin pro ŝtatrezono ? Ĝi ne estis inskribita en la Kodo nek en la Statuto de la Imperiestra Familio. Se ŝi forte rezistus, ŝi povus gardi la diademon.

Sed tiun firman volon ne povis trovi en si tiu facilanima kreatulino, kiu ŝatis amuzadon kaj gracion,. Gardi la diademon kontraŭ la volo de tiu kiu metis ĝin sur ŝiajn harojn en la kate-dralo Nia-Damo, kontraŭ la intereso, kiujn ŝi komprenis, de la viro kiun ŝi admiris kaj amis, estis neeble. Ŝi klare sentis, ke ŝi ne povos fari tion.

Lakeo venis bruligi la kandelojn, meti ŝtipojn en la fajrejo, super kiu la busto de la imperiestro, farita de Canova, radiis kun super-homa

sereneco. Ŝi longe kontemplis ĝin kun malĝojo, kaj dulce movante la kapon, ŝi ripetis:

« Mi ne volas lukti, sed provi plimildigi lian koron... »

Je la sesa la pordo malfermiĝis per ambaŭ aloj kaj Napoleono eniris.

Vekite el sia meditado, Joséphine tremetis. Li venis al ŝi, unuafoje dum semajnoj. Ili estis solaj. Kio li estis dironta ?

Li vidis ŝiajn ruĝajn palpebrojn, ŝiajn magri-ĝintajn trajtojn. Kiel malĝojo maljunigis ŝin ! Li forte ruĝiĝis, tiam tuj paliĝis, kion li ĉiam faris ĉe forta emocio. Tiam li komencis paroli balbutante, forturnante la rigardon.

Li parolis pri lia multa laboro, kiu tenis lin en lia kabineto la tutan tagon, pri la vizito de la reĝo de Saksio, kiu reiris al sia lando. Ŝi ne aŭskultis nek aŭdis, kion li diris. En tiu terura momento unu sola instinkto transvivis en ŝi. Ŝi rigardis sin en speguleto, kiun ŝi tiris el sia retikulo, kaj vidis sin tiel pala, tiel velkita, ke larmoj denove fluis el ŝiaj okuloj. Ŝiaj haroj estis malbone frizitaj. De konsolo ŝi prenis grand muslinan ĉapelon, surmetis ĝin kaj nodis la ŝnuretojn sub la mentono Tiu sceno dolorigis Napoleonon. Li tamen pensis, ke tiun doloron ne kaŭzis li, sed fataleco, sorto kiu dominis ilian vivon. Ŝi certe komprenis tion. la irititeco kovris lian kompaton per amara ondo. Kaj ĉar la prefekto de la palaco, Beausset, ononcis la vespermanĝon, lin murmuris :

«Nu, necesas ĉesigi tion...»

Kaj li ofertis la brakon al Joséphine.

Krom la dimanĉoj, kiam reunuiĝis la tuta familio Bonaparte, la vespermanĝo estis prezentita en la servosalono de la supra etaĝo sur malgranda tablo, ĉe kiun sidiĝis nur la imperiestro kaj la imperiestrino.

Dum le manĝo, kiu daŭris nur kvaronhoron nek li nek ŝi diris unu vorton. Joséphine volis manĝi de nenia plado. Napoleono manĝis rapide ion de la plej proksima plado. Kontraŭ sia kutimo, li, kiu estis tiel sobra, igis verŝi al ŝi de la paĝio, ŝarĝita de tiu tasko, plurajn glasojn, unu post la alia, de Cambertin. Finfine li ĵetis sian buŝtukon sur la tablon kaj, ekstarante, li demandis al la prefekto de la palaco :

«Kia estas la vetero ?»

Sen atendi la respondon, li eniris la najbaran ĉambron. La imperiestrino malrapide sekvis lin. Kafo estis servita. La imperiestro ricevis sian tason el la manoj de la paĝio, faris al li kaj al Beausset signon ke ili devis forlasi la ĉambron. Kiam la pordo estis refermita, li sidiĝis apud Joséphine.

«Joséphine,» li diris mallaŭte, «se vi sciuz, kiel vi malĝojigas min. Mi malĝojas vidi vin tiel deprimita. Vi devas refariĝi racia, mia ami-kino. Mi mem perfortas mian koron. La decido kiun mi faris, dolorigas min ankoraŭ pli ol vin, kreu min. Vi vidis tion: mi faris la neebulon por eviti tion al vi. Sed mi renkontis tro da obstakloj... Ni devas rezigni pri la neeviteblo kaj levi nin super ni mem...»

Forta spasma ŝajnis kapti la imperiestrion. Ŝi tordis siajn brakojn kaj eligis du aŭ tri mal-longajn sed akrajn kriojn. Tiam nova nerva krampo rigidigis ŝin kaj glitante de sia seĝo, ŝi peze falis sur la tapiŝon. Timigite, la imperiestro, kuris al la servosalono por serĉi helpon. Sinjoro de Beausset ankoraŭ estis tie, kaj Napoleono rapide diris al li :

«Eniru, Beausset, kaj fermu la pordon.»

Ili rapidis al Joséphine, kiu malforte moviĝis kun fermitaj okuloj.

«Beausset,» demandis la imperiestro. «Ĉu vi estas sufiĉe forta por levi la imperiestrion kaj porti ŝin tra la interna ŝtuparo al ŝia ĉambro ?»

La dika prefekto de la palaco kurbiĝis kun peno kaj levis la imperiestrion. Helpate de Napoleono, li prenis ŝin inter siaj brakoj kaj forportis ŝin, dum la imperiestro, kaptante torĉon de sur la tablo, prilumis lin kaj malfermis la pordon, ekde kiu mallarĝa kaj malhela koridoro kondukis al la malgranda ŝtuparo. Joséphine, kun la kapo renversita kontraŭ la ŝultro de sinjoro de Beausset, estis ĉesinta ĝemi. En ia momento, dum ili malsupreniris la ŝtuparon, Napoleono transdonis la torĉon al la gardisto de la paperujo, kiu estis altirita de la bruo, kaj subtenis la kruojn de la imperies-trino. La prefekto kredis ŝin sveninta. Sed kiam li faris malbonan paŝon kaj liaj brakoj instinktive plifortigis sian kapton, la imperiestro murmuris en lian orelon :

«Ne pinĉu min tiel forte, Sinjoro de Beausset.»

Tiel Beausset komprenis, ke la nervatako de la imperiestro estis ŝajnigita kaj ke ŝia sano ne estis alarmanta.

Intertempe la malĝoja procesieto alvenis en la teretaĝo kaj la dormoĉambro de Joséphine. La imperiestro estis kuŝigita sur sian liton. Napoleono forte tiris je la kordoj de la sono-rilokaj kaj igis alkuri la virinojn. Tiam, lasante ilin prizorgi sian mastrinon, li eniris la buduaron kiu troviĝis antaŭ la ĉambro, akompanata de Beausset, kiu sekigis sian malsekan frunton.

Napoleono estis tre pala. Tiu sceno estis tuŝinta liajn plej profundajn fibrojn. Li rapide

paŝis tien kaj reen tra la ĉambro kiel sovaĝa besto en sia kaĝo. Finfine li frapis Beausset sur la ŝultron kaj diris al li :

«Vi ĉeestis dolorigan scenon ... Vi vidas min en malespero... Sed la divorco estas por mi rigora devo... Mi kredis, ke Joséphine estas pli rezignacia kaj pli forta. Mi tutkore kom-patas ŝin... Mi ne estis preparita al siaj eks-plodoj de doloro...»

Li spiris kun peno, li parolis intermite, kaj larmoj fluis el siaj okuloj. Mirigite, Beausset aŭskultis tiun konfidencan de la imperiestro. Sed jam mastrante sin, Napoleono aldiris:

«uj venigu Corvisart. Sendu pagion al reĝino Hortense, por asisti sian patrinon. Kaj sendu al mi Fouché kaj Cambacérès. Ili trovos min en mia kabineto. Mi atendas ilin. »

Post tio li rapide foriris, kaj dum li supreniris la malhelan ŝtuparon du ŝtupojn unupaŝe, sinjoro de Beausset kredis aŭdi sufokitan sin-gulton.

XIII. La lasta provo

La morgaŭon Napoleono kaj Joséphine havis interparolon, kiun la imperiestro forlasis en stato de ekstrema eksciteco. Joséphine, kiun Hortense vidis tuj poste, estis multe malpli deprimita, kaj ŝia filino multe miris pri ŝia trankvileco. Frazo eskapita al Napoleono eksplikis al ŝi la enigmon de la konduto de ŝia patrino. La imperiestro, kiu estis tiel deprimita la antaŭan tagon, nun denove decidis defendi sin.

« Bonaparte, » ŝi diris al Hortense, kiu sidis sur kusenon ĉe ŝia piedoj en la granda flava salono, « Bonaparte estis tre bona por mi. Li ankoraŭ amas min. Mi sentas tion. Nur politikaj kialoj devigas lin separi sin de mi. Li multe suferas pro tio kaj farus ĉion en la mon-do por ŝpari tion al mi, se li trovis rimedon. Tiun rimedon li kredis posedi antaŭ kelka tempo, sed li estis repuŝita de la persono, de kiu dependis, ke oni povus uzi tiun rimedon. Mi tamen pensas, ke oni povus denove provi ĝin. »

Kaj post tiu sibila enkonduko ŝi konfidis al Hortense la tutan ideon, kiun havis Napoleono antaŭ monato, nome supozi gravedeco ĉe ŝi kaj deklari kiel la ŝian la infanon kiu devos naski al sinjorino Walewska.

«La grafino rifuzis, » ŝi aldiris, « sed ŝi certe ne antaŭvidis, ke ŝia rifuzo puŝis la imperiestron al divorco. Ekde tiam ŝi certe pli bone pripensis la aferon. Bonaparte diris al mi : ‘ Tio

ĉi ne estus okazinta, se ŝi estus konsen-tinta. ? Kiu scias, ĉu mi ne povus sukcesi, kie li malsukcesis ? Laŭ tio kion mi eksciis pri la grafino, ŝi estas bonkora kaj ne deziras mian malfavoron. Mi volas viziti ŝin kaj persvadi ŝin.»

Hortense, pli flegma kaj pli pruda ol sia patrino – la diversaj eventoj de ŝia vivo ne tiel profunde vundis ŝin kiel la burgografino de Beauharnais – paŭtis pro malaprobo.

«Sed, kara panjo, » ŝi diris dolĉe, «ĉu vi ne trovas tiun elpaŝon nedigna je vi ? Ĉu tio ne estus malprudenteco viaflanke ? Se la imperiestro eksciis tion – kaj li certe eksciis tion, ĉar en tiu ĉi lando ĉio eksciigas –, li estus malkontenta, kaj la momento ne estas bona por inciti lian koleron.»

«Kion mi povus perdi, Hortense ? Li jam decidis. Cambacérès jam ricevis la ordonon prepari la oficialajn aktojn. Se mi ne agos nun, estos tro malfrue.»

«Kiel vi farus tion ? Se vi vokos ŝin ĉi tien, ĉu ŝi venos ? Kaj kiu povas diri, ĉu via retiriĝo ne kontentigos tiun virinon ? Ĉu vi ne estas obstaklo al la ambicio, kiun ŝi certe havas ?»

«Tio estas ebla, » murmuris Joséphine. «Mi tamen ne estas certa. Vi tro kalkulas, Hortense. Sinjorino Walewska havas nenion de avonturistino. Mi volas paroli al ŝi kaj fari el ŝi mian amikino. Mi malbone ricevis ŝin antaŭe : kiom mi bedaŭras tion nun ! Sed tiam mi ne povis antaŭvidi tiom da malfeliĉo !...»

La reĝino de Holando restis muta. Ŝi amis sian patrinon. Tamen la intenco de Joséphine ŝokis ŝin. La komedio de la anstataŭigo de sinjorino Walewska per la imperiestrino kiel patrino de infano aliflanke vekis en ŝi, sen ke ŝi konsciis pri tio, malhelan intereson. Se oni promesus la imperiestran heredecon al la filo de sinjorino Walewska, ŝiaj propraj du filoj, en tiu ĉi momento ankoraŭ verŝajnaj heredontoj de sia onklo, vidus sin frustritaj. Ŝia malaprobo estis ankoraŭ plifortigita de kombino, kiun ŝi rigardis humiliga. Se ŝia patrino povus gardi la kronon nur per artifiko, estus pli bone tuj rezigni pri ĝi kaj tiel savi la honoron

Joséphine esperis, ke Hortense povos aranĝi por ŝi renkonton kun la grafino en ŝia hotelo. La sinteno de Hortense komprenigis al ŝi, ke ŝia filino neniam konsentos fari tion. Necesis do, ke ŝi invitu la grafino al la Tuilerioj. Sed tiu malfacila detalo ne igis ŝin retropaŝi.

Sed kial atingi la Polinon kaj averti ŝin ? Sinjorino de Rémusat ne estas tre fidinda, la dukino d'Abrantès estas tro babilema. La ĉam-

belanoj kaj la paĝoj estas spionataj de Fouché. Subite ŝi pensis pri Duroc. Li ĝuas la fidon de sinjorino Walewska. Joséphine bone sciis, ke li ne amas ŝin, ĉar ŝi malfeliĉigis lin separante lin de Hortense, kiuj amis sin kaj volis gedziĝi. Sed ŝi povis fidi lian lojalecon de soldato. Se li akceptus tiun mision, li certe ne malsukcesus. Kaj se la aferoj finiĝus malbone, li povus servi kiel respondeculo ĉe Napoleono.

Ŝi do petis la grandmarŝalon de la palaco veni al ŝi. Hortense forlasis ŝin. Estus pli bone, ke ŝia ĉesto ne vekos amarajn memoraĵojn.

Kiam Duroc, malvarma kaj grava, staris antaŭ ŝi, la imperiestrino hezitis momenton. Esti devigata al tia humiligo ! Finfine ŝi silen-tigis sian vantecon.

«Generalo, ĉu mi povis peti vin pri servo ?»

«Mi estas je la servo de Via Imperiestra Moŝto !»

Oficiala respondo sen elano. Tiam Joséphine eksplikis sian deziron vidi private sinjorino Walewska, kaj ŝi petis Duroc uzi sian influon por konvinki ŝin veni al la Tuilerioj.

Sen dureco, sed sincere la grandmarŝalo eks-kuzis sin pro tio, ke li ne povis fari tion, ĉar tia renkonto certe malplaĉus al al imperiestro.

«Kiel malfeliĉa mi estas !» suspiris Joséphine. « Mi ja vidas, Generalo, ke vi ankoraŭ ĉiam koleras kontraŭ mi. Vi rifuzas al mi vian hel-pon kiun mi bezonas por savi min! “

Surprizita, la generalo pridemandis ŝin per la okuloj.

«Ĉu vi ne komprenas min ? Ne. Neniu viro povus kompreni min. Ĉar vi ne konsentas fari al mi plezuron, mi petas vin, Generalo, alme-naŭ ne paroli pri tio ĉi al Bonaparte !»

«Via Imperiestra Moŝto povas kalkuli je mia diskreteco. La imperiestro eksciis nenion per mi pri tio ĉi.»

Ŝi estis forsendonta lin, kiam penso ankoraŭ haltigis ŝin.

«Generalo, ĉu vi akceptus porti leteron mian al sinjorino Walewska ?»

Duroc respondis en mezurita tono:

«Mi certe faros tion, Sinjorino.»

«Tiam atendu momenton.»

Ŝi eliris sian dormoĉambron kaj skribis sen-interrompe per sia neregula skribo tiujn ĉi liniojn sur la dika papero kun ora randoj, kiun ŝi igis fari por sia sola uzo:

Sinjorino,

La paŝon kiun mi provas fari al vi certe ne estas kutima, sed ĝi estas diktita al mi per la koro. Mi esperas, ke la via respondos al ĝi positive. La eventoj kiuj prepariĝas igas min

deziri vidi vin. Ĉu vi povus fari al mi la komplezon viziti min en la kastelo morgaŭ matene je la 10-a horo ? Mi estas sola kaj tuj ricevos vin. Bonvolu anonci vi, mi petas, sub la nomo sinjorino Desvignes, kiu estas tiu de unu el miaj antaŭaj amikinoj, ĉar nia interparolo devas resti sekreto por ĉiuj.

Kredu, sinjorino, je miaj sentoj de alta estimo, Joséphine.

Sur la verda vakso, kiu fermis la randojn de ŝia letero, li premis sigelon kun la kronita litero J, kiu neniam forlasis ŝin, kaj revenis al Duroc, restinta en la salono.

«Jen, Generalo, mi dankas vin pro tio kion vi bonvolas fari por mi. Mi ankoraŭ ĉiam bedaŭras, ke malnova miskompreno separas de mi en momento kia tiu ĉi viron, kiun mi volonte nomus mian amikon...»

La grandmarŝalo kliniĝis emociita. Sed la duraj trajtoj de lia bela vizaĝo ne malstreĉiĝis. Li kisis la magran kaj febrecan manon, kiu estis ofertita al li, trovante la kuraĝon ne respondi.

*
* *

La morgaŭon je la deka la imperiestrino atendis en sia ĉambro. Kiam ŝi ne devis pretigi sin por aliĝi al la imperiestro, ŝi ofte okupiĝis pri sia tualetto ĝis la tagmezo, sed nun ŝi estis jam de longe vestita. Ŝi forsendis la honoran damon, siajn servistinojn kaj la multajn liverantojn, kuj sieĝis ŝin ĉiumatene. Nur restis kun ŝi ŝia legistino, sinjorino Gazzani, pri Joséphine sciis, ke ŝi estas fidela al ŝi, malgraŭ ŝia pasinta amafero kun Bonaparte. Cetere ŝi estis sufiĉe simpla por kompreni malmulte et imagi ankoraŭ malpli.

Ĉu la grafino estis venonta ? Joséphine estis atendinta respondon de Duroc, sed ŝi ricevis nenion. Tiu silento flanke de la grandmarŝalo ŝajnis al ŝi malbona aŭguro.

Sed la sonorileto de la granda pendolhorloĝo sonis la naŭan kaj duono, kaj preskaŭ samtempe sinjorino Gazzani aperis sur la sojlo de ĉambro.

«Sinjorino Desvignes estas ĉi tie, » ŝi diris. « Ĉu Via Imperiestra Moŝto permesas, ke mi enkonduku ŝin? »

Joséphine faris signon per la kapo, kaj iris en la salonon renkonte al la vizitantino. Ŝia koro batis, sed kiel kutime, rideto animis ŝian zorge ŝminkitan vizaĝon, kaj ŝi ricevis Marie Walewska kun perfekta gracio .

La juna virino surhavis redingoton el verda lano borderita de martesoj kaj larĝrandan ĉapelon kovrita per vualo, kiun ŝi ĵetis malantaŭen laŭ la etiketo por fari sian reverencon antaŭ la imperiestrino.

Joséphine ĵetis sur ŝin rigardon de sperta matrono, kaj mallibervole ŝiaj okuloj descendis ĝis la eleganta talio, kie ankoraŭ nenio perfi-dis la goĵigan atendon. Marie surprizis tiun rigardon, vidis en ĝi riproĉon kaj estis ankoraŭ pli timigita.

Transdonante al ŝi la imperiestran letereton, Duroc estis farinte pli ol li promesis al Joséphine : li konsilis al Marie pozitive respondi al la invito, ĉar la imperiestrino, kiu estis tiel proksime al detroniĝo, eble volis peti ŝin pri io. Konvenis do, en la por la imperiestrino tiel doloriga tempo, montri al ŝi pli da respekto ol en la tempo de ŝia gloro. Marie komprenis tion. Noblanima, Marie hezitis nenian momenton. Sed alvenante en la Tuilerioj, ŝi estis sufiĉe konfuzita, kaj preskaŭ balbutante post la mankisado, ŝi murmuris frazon montrante sian obeemon kaj respekton.

Joséphine siaflanke gardis sian flegmon.

« Sinjorino, » ŝi diris, kondukante sian vizitantinon al la otomano, sur kie ŝi kutimis sidi, kaj sidiĝis ĉe ŝian flankon. « Mi dankas vin, pro tio ke vi akceptis mian peton. Eĉ dum la momentoj, kiam mi havis kaŭzon plendi pri vi, mi neniam dubis pri la via grandanimeco. Mi petis vin veni, ĉar la imperiestro, vi kaj mi, troviĝas en gravega krizo, tiel ke interparolo inter ni ambaŭ, kvankam la imperiestro ne estas informita, povos feliĉe malnodi ĉion. »

«Via Imperiestrina Moŝto povas tute disponi pri mi,» diris Marie.

«Aŭskultu do. Sed unue, grafino, ni forgesu – mi insistas pri tio – niajn reciprokajn ran-gojn. En tiu ĉi momento vi kaj mi devas agi sen zorgo pri la diverseco de niaj pozicioj kaj eĉ intereso, por pensi nur pri la bono de la persono kiu estas egale kara al ni. Mi sentas, ke ni povos, ke ni devos esti amikinoj...»

Marie respondis al tiu stranga komenco per modesta kapklino.

«Mi sciigas nenion al vi, kiam mi diras, ke la imperiestro estas profunde malĝoja ekde sia reveno el Germanio. Konsilite de miaj malamikoj, li inklinas al divorco, kiu sola penso disŝiras lin, sed kion oni sciis prezenti al li kiel necesa. Ni travivis plurajn dolorigajn scenojn... Vi ne povas scii, sinjorino – ĉar vi estas ankoraŭ juna – kiom valoras tiom da komunaj memorajoj en la momento kiam oni volas neni-

igi ilin... Se mi ŝuldas al li la kronon, ankaŭ Bonaparte ŝuldas al mi multon. Mi edziniĝis al li antaŭ dek tri jaroj, dum kiuj mi uzis ĉiujn miajn fortojn por servi lin, protekti lin kontraŭ liaj kontraŭuloj kaj siaj inklinoj. Kaj nun divorco estas mia rekompenco !...Ah, se li plenumos tiun planon, mi ne transvivos ĝin...»

Ŝi premis ambaŭ manojn kontraŭ sian malvarĝan bruston, kvazaŭ por reteni tro vivecan suferon, sed ŝiaj okuloj restis sekaj.

«Sinjorino,» diris Marie per tremetanta voĉo, «kredu, ke mi bedaŭras per mia tuta koro tiun situacion, pro kiu mi ne ŝuldas...»

«Ĉu pro kiu vi ne ŝuldas ? Kion vi diras, sinjorino ! Ĝuste vi puŝas lin al divorco.»

Joséphine lasis fali sian ludatan dolĉecon. Ŝi nun atakis Marie.

Malforto ekkrio respondis al ŝi :

«Ĉu mi, Sinjorino?»

«Jes, vi.»

La dureco de tiu tono rektigis Marie. Subite ŝi sentis ŝin forta.

«Kiel Via Imperiestra Moŝto povas akuzi min pro penso, kiu estas tiel malproksima de mi. Neniam mi diris vorton kontraŭan al la respekto, kiun mi ŝuldas al Via Imperoestra Moŝto. Oni provis engaĝi min en intrigojn, sed mi rifuzis...»

La imperiestrino krucigis sur siajn ŝultrojn sian rozkoloran ŝalon kun nigraj palmfolioj.

«Vi ne komprenas min, grafino. Mi kredas, ke vi ne uzas vian influon sur Bonaparte por instigi lin forlasi min, sed vi devigas lin al tio rifuzante proponon kiu sekurigis liajn inte-resojn, la miajn kaj la viajn, kaj kiu precipe feliĉigus lin !»

Marie klinis la kapon. Estis do tio, kion volis diri al ŝi la imperiestrino !La intima interparolo finiĝis per riproĉo. Ŝi bedaŭris esti veninta por ricevi tiel justan plendon, kiun ŝi ne povis refuti !

Ŝi faris geston de ĉarma kaj naiva kapitulaco.

«Kion mi povis fari, Sinjorino ? Oni petis min liveri mian infanon !..»

«Ĉu liveri lin ? Sed li neniam ĉesus esti via infano ! Vi povus havi lin ĉiumomente... Vi estus enirinta en mian domon kun la grava tasko eduki ĝin.»

«Via Imperiestra Moŝto forgesas, ke en tiu kazo mi baldaŭ estus la objekto de la suspektoj de la familianoj de la imperiestro, kaj ke la sekreto ne povus esti longe gardata.»

«Per kio tio gravus ? La imperiestro estas la mastro. Li defendus vin kaj sian heredonton. Kaj mi estus tie por subteni lin per ĉiuj miaj

fortoj. Ni tri, li, vi kaj mi, ni estus pli fortaj ol Francio kaj la mondo !...Sed vi ne volis !...»

«Sinjorino, ankaŭ Via Imperiestra Moŝto estas patrino. Ŝi certe komprenas la gravecon de la ofero, kiun oni petis min fari. Kaj pardonu al mi tiun ĉi mankon je respekto, sed en mia loko, ankaŭ vi ne estus konsentinta...»

«Ĉu mi ? Jes ja, mi estus konsentinta pro amo al Bonaparte, pro zorgemo pri sia tran-kvileco, por la sekureco de lia trono, mi pretus al ĉio. Nenio estus reteninta min... Sed sen-dube vi amas lin malpli ol mi... Vi estas anko-raŭ tiel juna !...»

Marie klinis iomete la kapon kaj prononcis nenian vorton. Joséphine vidis, ke ŝi gajnis nenion. Ŝi tamen ne malkuraĝiĝis kaj daŭrigis :

«Tio tamen estus tiel oportuna, pli ol vi sendube povus imagi ! Sed vi ne bone pripensis, la aferon, vi respondis tro frue, vi ne havis fidon, vi ebele timis min...»

«Ne, Sinjorino, mia malĵusta sinteno kon-traŭ Via Iperiestrina Moŝto, por kiu mi kuraĝas peti Ŝian pardonon, ne devos erarigi Ŝin pri miaj sentoj. Mi sentas por Vi nur respekton kaj admiron, sed...»

«Sed ? » ripetis Joséphine, kiu pendis je ŝiaj lipoj.

«Sed Via Imperiestrina Moŝto ne petu min forlasi mian infanon. Mi preferus, se necesus, folasi Francion kaj reiri al mia lando... Jes, se tiu solvo povus trankviligi Vian Imperiestrinan Moŝton aŭ esti avantaĝa por Ŝi, mi tuj pretus fari tion.»

Joséphine ŝajnis venkita. La batalo kiun ŝi komencis, estis malgajnita. Marie Walewska ne estis cedonta. Tiuj dolĉaj naturoj havas nevenkeblan obstinecon.

Peza silento ekestis inter la du virinoj kaj separis ilin kvazaŭ per mejloj. La imperiestrino interrompis ĝin la unua.

«Mi eraris,» ŝi diris amare. «Mi kredis vin kapabla renonci. Mi jam renoncis tiom ! Sed vi volas gardi ĉion, vian filon kaj la Imperies-tron ! Kaj, kion mi scias ? Mia malgajno eble favoros viajn sekretajn dezirojn !»

Marie ekstaris, ofendita.

«Via Imperiestrina Moŝto faras al mi ofendon, kiun mi ne meritas ! En tiu ĉi sama minuto Ŝi povus konvinki Sin, ke mi estas malproksima de tiuj malnoblaj kalkuloj ! Ni iru kune al la Imperiestro. Mi ĵetos min ĉe liaj piedoj kaj ripetos en via ĉeesto kion mi diris al Li tiom da fojoj, ke al la konscienciproĉo, kiu pezas sur min, ĉar mi forlasis mian edzon, mian familion

kaj mian landon por veni al Francio, mi ne volas aldoni tiun de intrigi kontraŭ vi!...»

«Venu, » diris Joséphine, ekstarante siavice.

Ŝi ne estis virino kiu lasis eskapi neantaŭviditan okazon, certe danĝeran, sed potencon, kiu povus frapi la imagon kaj la koron de Napoleono. Certe, la imperiestro komence kolerus, sed kiu sciis ? Eble lia emocio kaj tiu de Marie ne estis kondukantaj al interparolo kies rezulto favorus ŝin ? Ke divorco estus prokrastita jam sufiĉis por ŝi. En tiu ĉi momento ŝi deziris nenion pli. Poste ŝi povus regajni terenon...

La incititeco de Marie estis ekstrema. Ŝi rapide paŝis en militista maniero. Joséphine estis devigata rapidigi la paŝojn por povi sekvi ŝin. Tempesto estis subite leviĝinta en sia delikata menso, kiu dominis sian prudenton kaj puŝis ŝin al nerezisteblaj agoj. La Polino, ŝajne tiel rezervema kaj timema, subite fariĝis arda kaj decidema. La supozo de Joséphine pri ŝiaj intencoj, profunde vundis sin. Eĉ se ŝi riskus per tio sian vivon, ŝi retroirus nenian paŝon.

Ili supreniris la internan ŝtuparon, kiu kondukis al la apartamento de la imperiestro. En la servosalono estis nur du servistoj. Haltigante per gesto ilian pretecon helpi ilin, ili penetris en la salonon, kie la imperiestro donis siajn aŭdiencojn. Roustam staris antaŭ la pordo, kiu separis tiun vastan ĉambron de la imperiestra kabineto. Joséphine iris rekte al la Mameluko, kiu venis kun Napoleono el Egipto

«Malfermu, mi deziras paroli al via mastro.»

«Tio ne eblas, Via Empirestrina Moŝto,» diris Roustam en sia speciala lingvaĵo.

Joséphine rigardis lin per orgojla mieno.

«Ek, lasi min eniri. Estas necese.»

Ŝi metis la manon sur la klinkon. Timigita, Roustam cedis, kaj la du virinoj eniris la kabineton de Napoleono.

En tiu momento la imperiestro, klinita al Méneval, kiu febrece skribis sur sia tablo ĉe la fenestro, estis diktanta koleran leteron al sia frato Joseph, la reĝo de Hispanio, kies vanta incitigemo paralizis siajn armestrojn kaj perdis lian aferon... Ĉe la bruoj de la malfermanta pordo, Napoleono, vidante eniri Joséphine kaj Marie, levis la kapon, mirigita. Kio estis tio ? Malgraŭ liaj ordonoj ! Joséphine kaj Marie kun ŝi ! Kio okazis ?

«Ĝis baldaŭ, Méneval,» li diris al sia sekretario, al kiu tiu paŭzo multe plaĉis, «mi revo-kos vin poste.»

«Kio do estas ?» grumblis la imperiestro, kun kolera grimaco. «Kial do vi ambaŭ venas

perforti mian pordon, vi, Joséphine, kaj vi, Sinjorino ?»

«Siro», ekkriis Marie, falante, kiel ŝi diris, sur la genuojn antaŭ la imperiestro, «mi petas vin pravigi min antaŭ la imperiestrino. Ŝi imputas al mia rifuzo cedi mian infanon la minacon de la separo inter Vi kaj ŝi. Ŝi kredas, ke mi estas ŝia malamiko. Tio ne estas vera, ĉu ne, Siro ? Ĉu mia koro ne ĉiam sangis ĉe la penso, ke vi povus forlasi la kompaninon de viaj unuaj gloraj tempoj por mi ? Atestu por mi, se vi ne volas, ke mi perdu mian honoron en la okuloj de la imperiestrino, kaj ke mi tuj forlasu Parizon por retiriĝi min sur la angulon de tero, kie mi naskiĝis.»

Ŝi kunigis la manojn kvazaŭ por diri fervoran preĝon, en kiu ŝi metis sian tutan animon. El ŝiaj puraj, bluaj okuloj kaj ŝia bela, tenera vizaĝo, ruĝiĝinta de emocio, emanis tia entuziasmo kaj nobeleco, ke Joséphine tute konfu-ziĝis, kaj ke Napoleono sentis malperi sian koleron.

«Trankviliĝu, Marie,» li diris, relevante ŝin kaj sidigante ŝin en fotelon. «Trankviliĝu. Tiu sceno estas absurda. Mi kredis vin pli saĝa. Kiu metis en tiu alie tiel prudentan kapeton tiom da stultaĵoj ? Via ĉeesto ĉi tie kaj viaj paroloj estas pli ol strangaj : ili estas malkon-venaj. Se vi volas gardi mian amikecon, vi ne povas daŭrigi tiun interparolo.»

«Bonaparte,» diris Joséphine, prenante la manon de la imperiestro, «la Sinjorino Grafino meritas nenian riproĉon. Pri noblanimeco ŝi volis akompani min ĉi tien. Kaj ne utilas, ke vi respondu al ŝia peto. Estontece mi estas certa pri ŝi, kaj mi ĉiam kredos je ŝia delikateco kaj lojaleco.»

La repliko estas lerta kaj konvenis por agi sur la menso de Napoleono.

«Vi ambaŭ metas min en kruelan embarason,» li diris, «retirante sian manon. Estas vere, Marie, ke, se vi estus konsentinta al tio kion mi atendis de vi, mi ne vidis min devigita fari al la ordo, kiun mi establis en Francio, oferon, kiu pezas sur mian koron. Ne ekscitiĝu, Joséphine, vi sciis, kiom tiu afero dolorigas min. Ni ĉiuj tri estas tre malfeliĉaj. Sed kion ni povas fari kontraŭ politika neceseco ? Mi rezignis pri la solvo, pri kiu mi pensis. Tro da ĵaluzuloj sendube estus penetrintaj en tiun mis-teron. Cetere estas jam tro malfrue, kaj mi ne plu revenos al ĝi. Helpu min anstataŭ kompliki la aferon. Ankaŭ mi bezonas mian tutan energion por rompi ligilojn kiuj estas karaj al mi... Foriru, retiriĝu vin ambaŭ... Mi volas tion... Estas necese...»

Li malfermis la pordon, vere ekster si mem pro tiu terura situacio, kaj ne volante resti en ĝi pli longe, li kriis:

«Duroc !... Roustam ! Ĉu vi estas tie ? Tuj rekonduku al mi la grandmarŝalon !»

Tiam li reiris en sian kabineton..

Joséphine, humiligita, nerekonebla, senbrue ploris en sia fotelo. Marie, proksime de ŝi, plena je kompato, kvazaŭ aŭtmate agitis la lipojn. Ŝi volis rekuri al la imperiestro kaj peti lin ankoraŭfoje. Sed al ŝia peteganta rigardo li respondis per tia kolera, suverena rigardo, ke ŝi sentis, ke reiro al li estas neebla, kaj ke la sorto de Joséphine estas sigelita.

Alvenante, Duroc rigardis la scenon.

«Duroc, rekonduku tiujn ĉi damojn,» diris Napoleono, «kaj tiam revenu.»

Dolĉe li helpis Joséphine restariĝi. Ŝance-ligante ĉe la brako de la grandmarŝalo kaj subtenata de Marie, ŝi foriris. Ĉe la sojlo ŝi haltis kaj diris malrapide kun neesprimebla malĝojo :

«Ĉu ĉio estas do finita inter ni ambaŭ, Bonaparte ?»

La imperiestro ne respondis. Nervoze levante la ŝultrojn, li returniĝis, kvazaŭ estus tro dolorige por li vidi malproksimiĝi tiujn du viri-nojn, kiuj kontraŭstaris sin en lia amvivo kaj kiuj reprezentis, unu lian antaŭan ardon, la alia lian nunan tenerecon, unu lian brilan junecon, la alia lian maturecon plenan je forto, sed superŝutita de zorgoj...

Kiam venis Duroc, li trovis Napoleonon apogante sin per la kubutoj sur la skribablon kaj kovrante la okulojn per la manoj. Komence li respektoplene silentis antaŭ tiu videbla malĝojo de la imperiestro. Kiam tiu ĉi malkovris sian frunton, Duroc raportis pri sia misio.

«Mi rekondukis la imperiestrinon al ŝia ĉambro kaj sinjorinon Walewska al ŝia veturilo. »

«Bone,» diris Napoleono.

Kaj li refalis en sian silentan revadon.

«Se la divorco tiom kostas al vi, »murmuris Duroc, «kial ne reveni de via decido ?»

Napoleono suspiris.

«Ĉu ĝi kostas al mi multe ? Ha jes, ĝi kostas al mi senfine multe, mia amiko. Mi forsendas virinon, kiu estis la ĉarmo de mia juneco, kiu komprenis min nur ĵetante rigardon al mi, kiu neniam libervole kontraŭis min, kiu amas min kaj por kiu mi sentas senfinan amikecon... Tio ĉi estas tro doloriga...»

«ial preni sur vin tiun aflikton ?» replikis Duroc, kies tuta rankoro kontraŭ la imperiestrino en tiu ĉi momento estis englutita per lia

afekcio por la imperiestro. «Estas ankoraŭ tempo ŝanĝi viajn decidojn. Sufiĉas unu vorto via por solvi la problemon... Por sekurigi la heredaĵon vi trovos aliajn vojojn. Memoru, kion vi diris la morgaŭon post la batalo apud Aŭsterlitz. : ‘Miaj soldatoj estas miaj infanoj. Se unu el ili havus filon, kiu estus digna je ni, mi testamentus al li miajn posedaĵojn kaj nomus lin mia sukcedonto !’ »

« Ah, Duroc, mia amiko, » diris Napoleono, laŭte purigante sian nazon, tio estis nur frazoj... Vi lasis vin kapti de ili, ĉar vi pensas pri la heroaj ideoj de la antikva mondo. Sed ni ne plu estas la viroj kiujn priskribis Plutarĥo ! La tempoj ŝanĝiĝis. Ni estas parto de sistemo al kiu estas subigitaj niaj propraj deziroj kaj kiu ne aŭdas niajn plendojn. Mi ne plu estas libera. Reveni malantaŭen estas neeble. La divorco estas publika. La tuta Parizo, la tuta imperio jam okupiĝias pri ĝi. En la salonoj, la rondoj, la kafejoj oni parolas nur pri tio. Francio volas tion. Rigardu la raportojn, kiujn oni sendas al mi de ĉie. »

Li montris la dosierojn, akumulitaj sur sia skribtablo.

« Ho ! » diris Duroc. « Estas la raporto de Fouché ! Vi diris al li prepari la publikon : li ribeligis ĝin. Li kaŝas, transvestas siajn agentojn kiel homojn el la popolo kaj ordonas ilin ekstari sub viaj fenestroj, kiel antaŭ kelkaj tagoj, peti de vi novan edziĝon ! Ĉu vi ne konas lin ? »

«Ne kredu tion, Duroc. Fouché ne faras la publikan opinion, li estas ĝia eĥo. Eble li plifortigas kaj misformas ĝin iomete, sed mi povas legi inter la linioj. Cetere, inter ni, la deziro de Francio ne sufiĉas por determini mian konduton. Ĉe aliaj okazoj mi sekvis mal-graŭ ĝi mian propran vojon... Ne, mi faris decidon. Mi malĝojas, sed mi ne povas lasi regi min de miaj sentoj. Mi ne plu havas la rajton senti kiel aliaj homoj. La divorco estas necesa por la solideco de la imperio : ĝi faros finon al la necerteco de la estonteco. Ĝi oka-zos... Mi nun laboros por ne plu pensi pri ĝi.»

Per klopodo de sia volo, li refariĝis trankvila, sed liaj genuoj tremetis.

Siavice Duroc komprenis, ke ĉia insisto estas vana kaj nur doloriga. Kiel ajn en tiuj tagoj de necerteco, kiam interkoliziis kaj konfuziĝis liaj memoroj, povus fluktui lia amikeco por Joséphine, lia amo al Marie kaj lia patra instinkto, li estis firme decidinta. Li suferis, sed li estis neŝancelebla.

«Ĉu vi deziras paroli al Méneval?» demandis Duroc.

«Jes, voku lin. Ah, vi legas en mi, Duroc. Laboro estas mia plej bona amiko !»

Kaj ĉar leĝera tiko kontrahis la vizaĝon de la grandmarŝalo, li iris al li. :

«Vi ankaŭ, Duroc, estas bona amiko.»

Kaj li ĉirkaŭbrakis lin

XIV. Necerteco

Sed kiu estas anstataŭonta Joséphine sur la trono ? Ĉu Rusa grandprincino ? Ĉu Aŭstra arkidukino ? Ĉu Saksa princino ?

Inter tiuj tri kandidatinoj, la gastoj de la Tui-lerioj estas dividitaj. La Bonapart-oj, la altrangu-
loj, la ministroj havas ĉiuj siajn proprajn opiniojn. Sed ili esprimas ĝin sekrete en flus-
troj, en murmuroj. Ankoraŭ neniu kuraĝas paroli pri nova edzino por Napoleono. Oni sentas, ke li pensas pri tio, kalkulas, hezitas.

Se li aŭskultus sian koro, li kronus Marie. Li amas ŝin, kaj ŝi amas lin. Ŝi estas havonta infanon. Tra ŝi la heredeco estos certa. Forma-
laj objektoj povos kontraŭi tiun geedziĝon. Ili ne gravos la tagon, kiam li decidus.

Kiel ajn prizorgema de sia aŭtoritato li ŝajnas esti, Napoleono tamen restas sentema por la publika opinio. Li timas la reprezentantojn de sia familio, precipe sian patrinon, la imperti-
nentaĵojn de siaj fratinoj, Pauline kaj Caroline, kiujn nur princino povos kontentigi. Por soli-
digi sian dinastion kaj pligrandigi lian presti-
ĝon, filino de reĝo konvenus pli ol la juna Pola grafino. Tamen, pensinte dek jarojn nur pri la ŝtato, ĉu li ne rajtus pensi fine pri si mem ? Venas momento kiam heroo sopiras je sia propra feliĉeco.

Li metas al si demandojn, li pezas ĉiujn eblecojn... Se li foje ŝajnas distra dum konsilio aŭ aŭdienco, estas ke li pensas pri Marie. Ofte dum la nokto, forsendinte Méneval, kiu preskaŭ falas pro laceco, li malrapide pro-menas tra sia kabineto, haltas ĉe la ogivo, rigardas antaŭ sin sen vidi, la manojn malantaŭ la dorso, kaj reprenas sian paŝadon. La soldatoj de la gvardio, scivolaj, vidante pasi kaj repasi la ombbron de la imperiestro, kredas, ke li pripensas novan militiron. Ne, li pensas pri trankvila kaj feliĉa vivo, kiun li volas certigi al si post tiom da obstakloj, sidigante ĉe sian flankon la virinon, kies neprofitemon, sincerecon, veran kaj profundan amon li mezuris...

Fouché estis sekrete informita pri la sinteno de Aŭstrio. La Franca ambasadoro en Vieno, la grafo de Narbonne, private skribis al li vivece

rekomdante la preferatan arkidukinon de la imperiestro. La ministro de la polico gardis la leteron kaj diris nenion pri ĝi. Li esperis povi triumfigi alian kandidatinojn. Helpi nevinon de Marie-Antoinette sidiĝi sur la trono de Francio estus neeble por reĝomurdinto. Lia plano ne ŝanĝiĝis. Tiu kiu laŭ li devos anstataŭi Joséphine sur la trono, estas Marie Walewska.

Marie, sed kondiĉe ke ŝi akceptus fari tion, ke ŝi serioze konsiderus la konsilojn de la duko de Otranto, ke ŝi lasus lin eniri sian konfi-
dencon, ke ŝi montrus sin sufiĉe dankema pro la servoj, kiujn li faras al ŝi, por certigi al li sian konstantan apogon apud Napoleono, ekde la tago, kiam ŝi estos imperiestrino. Minacata de tro da malamo, li trovis la ideon de alianco kun Marie ekde ŝia alveno en Francio la plej forta garantio de sia fortuno. Sed estis necese silente fari almenaŭ spiritan akordon kun ŝi. Negoco, kiu postulis ekstreman delikatecon. Cetere la tempo urĝis. Kiel ajn ruza la duko de Otranto estis, li troviĝis tiam en la plej granda embaraso de sia vivo.

Li finfine decidis provi sian ŝancon. Li sentis, ke Marie estas nun tiel suspektama kontraŭ li, ke li komencis paroli al ŝi kun ekstrema singardeco. Li prezentis sin ankoraŭ iam kaj iam en la strato Houssaye, sed laŭ la konsilioj de Duroc, Marie ricevis lin kiel altrangulon pli ol kiel amikon. Fouché toleris tiun traktadon kun ŝajnigata submeto espe-rante baldaŭ povi regajni la perditan influon.

Finfine li decidis agi, kaj iumatene, kiam li alportis al Marie loĝion por la operejo, kie, honore al la reĝo de Bavario, estus donita parada spektaklo, li demandis ŝin ridante, sen ŝajni serioze paroli, ĉu « ŝi timas la pezon de la krono por siaj belaj haroj ».

«Ĉu mi ?» demandis Marie. «Ha, ankoraŭ ĉiam viaj revoj !»

Per ŝia sinteno de abnegacio li komprenis unu aferon, kiun li ne suspektis, ĉar li estis tro ruza. Tiu tiel sendependa kaj fiera virino ankoraŭ ĉiam ne esperis, en la momento kiam la imperiestro estis fariĝonta libera, ke li povas proksmigi ŝin al li.

«Ĉu vi do forgesis, kion mi antaŭe diris al vi?» li replikis, insinuante. «Kaj nun, kiam la trono vakos, ĉu vi ne scias, ke vi povos sidiĝi sur ĝin, kiam vi volos ?»

«Ĉu kiam mi volos ? Tiam, neniam...»

Ŝi rigardis lin desupre, kio maloftis ĉe ŝi.

Li ne insistis, promesante al si mem repreni la temon en pli bona momento, kiam ŝi estus pensinta pri ĝi.

Ŝi pensis pri ĝi, sed ŝia animo estis fermita kampo, kie interluktis kontraŭaj sentoj. La ideo, ke, akceptante la kronon, ŝi pravigus la suspekton, kiun esprimis Joséphine, nome ke Marie aspiris ŝian rangon, naŭzis ŝin. Sen ambicio, amante nur la viron en Napoleono kaj atendante de li kiel prezon de ŝia amo nur la relevon de sia kara subpremata patrio, ŝi komence reagis per repuŝo de la perspektivo de la por ŝi kapturita levo. Religiaj skrupuloj, timo pli profunde vundi la grafon Walewski per sensacia rompo de iliaj lastaj ligoj, ĉio kion ŝi antaŭe diris por oponi la tentajn vortojn de Fouché revenis en sian menson kun pli granda forto.

Tamen, se Napoleono dezirus tion ?

Se li volus tion, se pro amo al la infano kiun ŝi portis, se, por obteni tujan heredonton, la imperiestro petus ŝin ŝanĝi sian opinion, kion ŝi tiam farus ? Ĉu ŝi havus la forton rifuzi ? Malsuprenirante en si mem, en la honestecon de sia memo, ŝi konfesis, ke antaŭ viveca kaj forta peto de Napoleono, ŝi cedus.

Sed tion ŝi konfesis al neniu. Eĉ ne al sia frato Laczinski, al Duroc, sia amiko, eĉ ne al Pauline Borghese, kiujn ŝi ofte vidis kaj kies nediskreta scivolemo devis kontentiĝi per elturniĝaj vortoj. Napoleono sola estis rice-vonta tiun jesan respondon, kiun ŝi kaŝis en sia koro, pro kiu ŝi preskaŭ hontis kaj kiun, se Napoleono mem ne serĉus ĝin, neniu en la mondo iam malkovrus.

XV. Intrigoj

En sia kastelo Malmaison Joséphine havis nur unu personon : malhelpi Napoleonon edziĝi al Marie. Oferite al dinastia neceso, ŝi volis, k almnaŭ princino sukcedu ŝin. Ŝi kredis, ke ŝia honoro estis engaĝita: en tio ŝi trovis la solan eblan dolĉigilon por sia humiliĝo. Ke ordinara virino fariĝus imperiestrino en ŝia loko, precipe se ŝi estus Marie, ŝi rigardis kiel novan malvenkon, ankoraŭ pli kruelan ol la unua.

Malgraŭ la noblanimeco, pri kiu Marie ĵus donis al ŝi pruvon en la Tuilerioj, malgraŭ tiu kulmino de emocio, kiu ĵetis ilin en la brakojn unu de la alia, elirinte la kabineton de la imperiestro, la ĵaluzeco kaj rankoro de Joséphine tute revenis. Dum ŝiaj longaj interparoloj kun sinjorino de Rémusat kaj ŝia filino Hortense, tiu demando ĉiam revenis, bruligante siajn lipojn, haltigante sian ploradon : ĉu li estis edziĝonta al ŝi ? Kaj suflorite de ŝia filino kaj la damo de la palaco, ŝi komencis konsideri la strangan

planon, kies malkonveneco tute ne ŝokis ŝin : mem edziĝi Napoleonon, mem indiki la novan suvereninon, kiu, ŝuldante al ŝi la sceptron, estis devonta respekti ŝin estontece kaj fari al ŝi servojn, kiujn ŝi jam imagis.

Reedzigi Napoleonon al princino... Sed kiun? Estante virino de la malnova reĝimo, malgraŭ la multaj eventoj, kiuj devis esti forbalaintaj ŝiajn antaŭajn ideojn, ŝi rigardis aliancon kun Rusino aŭ Saksino maldigna je la imperiestro. La arĥidukino Marie-Louise de Aŭstrio, la nevino kaj baptofilino de la lasta reĝino, jen kiun bezonis Francio, kiun bezonis Joséphine. La analoj dela plej maljuna dinastio de Eŭropo, nun kiam la Burbonoj estis mal-perintaj, blindigis ŝian menson, kiel en la tempo, kiam ŝi sensukcese provis igi sin prezenti al Marie-Antoinette. Cetere ŝi konser-vis kortezajn, eĉ amikecajn rilatojn kun imperiestro Francisko, la imperiestrino kaj pluraj arĥidukinoj. Plurfoje ŝi faris al ili malgrandajn servojn. Kun tiu juna knabino, nescia kaj mola, kronita laŭ ŝia rekomendo, ŝi estis certa povi gardi ian gravecon, potencon. Ŝi jam vidis sin kiel trian personon en tiu nova imperiestra familio, revenintan al la kortego, donantan siajn konsilojn, regajnintan per lerta konduto sian influon sur Napoleono, kiun ŝi estis ricevinta per longdaŭra kutimo kaj mil zorgoj.

Sed oni devis rapidi... La imperiestro estis viro kiu faris subitajn decidojn. Apud li sinjorino Walewska, sub sia ŝajnigita modesteco, sendube faris sian ludon... Tial Joséphine ne perdis tempon.

La 1-an de januaro 1810, tiun unuan tagon de la jaro, kiam oni povus kredi, ke ŝi, separita de Napoleono, absorbiĝas en bedaŭroj kaj malnovaj memoraĵoj, ŝi sendis Claire de Rémusat al Parizo ĉe la grafinon de Metternich, la edzino de la kanceliero de la imperiestro de Aŭstrio, antaŭe ambasadoro apud Napoleono, por peti ŝin viziti ŝin en Malmaison. La postan matenon, sinjorino de Metternich faris tiun viziton. En la longa galerio, kiu antaŭis la salonon de Joséphine, ŝi estis akceptita de Hortense, kiu, per kelkaj frazoj, informis ŝin pri la stranga konfidenco, kiun ŝia patrino estis faronta al ŝi.

«Ĉi tie ni ĉiuj estas Aŭstroj en nia animo,» diris la reĝino de Holando, «kaj ni dezirus havi vian arĥidukinon kiel imperiestrino.»

Tuj kondukita al Joséphine, la grafino estis akceptita kun tiu delikata respekto, kiun ŝi estis gardinta kiel imperiestrino kaj igis ŝin amata.

«Mi havas grandan projekton,» diris Joséphine. «Ĝi ekskluzive okupas min, kaj nur ĝia

sukceso povos konsoli min de mia ofero. Mi deziras, ke nia imperiestro edziĝos al Marie-Louise. Mi jam parolis al li pri tio, sed li respondis al mi, ke li ankoraŭ ne faris elekton, sed mi kredas, ke mi povus konvinki lin. Ĉiakaze estus bone, se via kortego povus komuniki al mi kiel eble plej rapide, kion ŝi pensas pri tia alianco, se ĝi estus proponita al ĝi. Se oni deziras ĝin, necesas iri rapide, ĉar mi timas manovrojn de la aliaj kortegoj. Estas tre malfeliĉe, ke mia bona amiko, sinjoro de Metternich, ne estas en Parizo. Via ambasadoro, la princo de Schwarzenberg, estas vera soldato, kiu komprenas nenion pri fajnaj nuancoj.»

Sinjinoro de Metternich reagis pozitive, sed prave memorante, ke ŝi estas la edzino de diplomato, ŝi faris kelkajn rezervojn pri ebla akcepto far la filino de imperiestro Francisko por plialtigi la prezon.

«Tio estus por ni ĉiuj vera feliĉeco, sed la memoroj de la Revolucio povus fortimigi nian junan principon...»

«Ni scios aranĝi tion, vi kaj mi, » vivece replikis Joséphine. Tiu geedziĝo havus la plej grandan intereson por vi. Komprenigu tion al via edzo. Se imperiestro Francisko ne kaptos tiun onkazon, li malfacile povos eviti novan militon, kiu detruos lian monarĥion. Tio estas sendube ankaŭ la sola rimedo malhelpi Bonaparte fari skismon kun la Sankta Sieĝo...»

Sinjinoro de Metternich retiriĝis promesante senatende sendi leteron al Vieno. Kion ŝi faris. Kaj je la mezo de januaro ŝi ricevis respondon, kiun ŝi portis al Malmaison. Aŭstrio akceptus doni sian arĥidukinon. Kaj Metternich certigis ŝin kun mil flataĵoj kaj laŭdoj, ke la Hofburg senfine dankis imperiestrinon Joséphine pro ŝia interveno.

Ĉe la unua vizito kiun Napoleono faris al ŝi en Malmaison, kien li venis ankoraŭ ofte, Joséphine longe parolis al li pri sia projekto, nombrante ĉiujn ĝiajn avantaĝojn. La principino estis bela, sana kaj obeema. Ŝia parenkaro estis fekunda. Kun ŝi Napoleono estos certa ekhavi heredontojn. Ŝi parolis ŝage pri ĉiuj aspektoj. La imperiestro atente aŭskultis ŝin. Li ne koleris, kiam li eksciis, kiel li devas teni sin kontraŭ Vieno. Sed li ankoraŭ hezitis. Edziĝi al la arĥidukino senfine flatis lian vantecon. Sed oferi Marie : ĉu tio estus ebla ? Kiam Joséphine estis elĉerpinta ĉiujn argumentojn kaj eksilentis, li diris al ŝi bruske, kion li ĉiam faris, kiam li sentis sin ĝenata kaj volis kaŝi siajn intencojn :

«Kial vi enmiksiĝas en tiujn aferojn ? Tio ne konvenas al vi. Mi tute ne scias, kion mi decidis fari. Cetere nenio urĝas min. Pensu pri tio, kiel bone vivi kaj esti feliĉa. Distru vin. Vi estas bone establita ĉi tie...»

Kaj lia zorgo pri ordo, kiu ĉiam persekutas lin, igas lin aldiri :

«Gardu vian domon en bona ordo kaj ŝparu por viaj infanoj.»

Post tio li forlasis ŝin. La interveno de Joséphine neniel pezas sur lian menson. Sed ŝi tamen avertas lin ne tro prokrasti sian decidon. Reirinta al la Tuilerioj, li komencas siajn konsultojn. Estas la plej grava afero de lia vivo, tiu kiu devas fini kaj plifortigi lian tutan laboron. Eĉ se li devas decidi laŭ siaj sentoj, li volas antaŭe aŭdi la opiniojn de la politikistoj.

Tuj kiam li parolas pri la konkludenta unio, la langoj loziĝas, la preferoj estas elparolataj, la interesoj malkaŝiĝas. La sinjinoro Patrino, kun kiu li pasigas vesperon sola en la severa hotelo de Brienne, esprimas siajn dubojn pri la sinteno kiun la arĥidukino alprenos kontraŭ ŝi kaj la Bonaparte-oj. Ŝi timas ŝian altecon. Jam antaŭ longe severe riproĉita de sia bofratino, la hipokrita Julie, reĝino de Hispanio, ŝi provas forturni sian filon de geedziĝo kun Marie Walewska. Diskrete ŝi konsilas edziĝon kun la Saksino., Ekde kiam ili regas en Napolo, la Murat-oj malkonsilas la arĥidukinon, kiam oni demandas ilian opinion. Sed en tiu ĉi momento Napoleono ne maltrankviliĝas pro tio. Ili certe kliniĝos antaŭ lia decido. Li faris sufiĉe por ili, farinte ilin gereĝojn kaj principinojn. Ili devas silenti kaj adori. Jérôme kaj Joseph ne estas en Parizo. Louis estas perdonta Holandon pro sia tendenco al sendependeco. Pauline estas por Marie per sia tuta birda cerbo kaj sia ĉarma kaj kaprica babilado. Ŝi la unua kuraĝas diri tion al la imperiestro. Ŝi tro insistas kun blinda fervoro. Incitita, Napoleono, ordonne al ŝi ne okupiĝi pri ŝtataferoj, se ŝi ne volas, ke li okupiĝu pri ŝiaj aferoj, en kiuj ŝi ofte kompro-metas sian dignecon de principino kaj ŝian koron. La ekzilo de Canouville jam estis averto por Pauline Borghese. Ŝi silentas.

Laŭvice konsultite dum liaj hazardaj laboraŭdiencoj, la gravuloj kaj ministroj donas siajn opiniojn kun mil antaŭmedoj, kiuj povos en kazo de neceseco, malfermi al ili retirovojn. Cambacérès ne ŝatas ligan kun Aŭstrio, Kontraŭe Talleyrand, denove ĝuanta iom da favoro, volas gajni Napoleonon por ĝi. Fouché kredas, ke la grafino Walewska estos perfekta imperiestrino. Li estas konvinkita, ke la Rusoj igos

sin petegi. Koncerne Aŭstrion, kiu malaprobo tio estus de la dek jaroj de la nova reĝimo, se Napoleono edziĝus al la nevino de Ludoviko XVI !

«Kial do ?» demandas la imperiestro. »Tio estus renodo kun la malnovaj tradicioj. Mi vidas nur avantaĝojn en ĝi. Se mi decidus favore al la arĥidukino, tio estus unu el la motivoj kiuj puŝos min. Vi ne konscias, kion valoras kontinueco por la imago de popoloj ! »

Li sondas kiel laste sian plej intiman amikon Duroc, lia konsilisto dum la plej malbonaj horoj ; Duroc, kiu diris ankoraŭ nenion, ĉar li estas la diskreteco en persono kaj li juĝus maldigna liaflanke paroli pri Marie al Napoleono sen esti invitita fari tion.

Nebrila mensa, sed preciza, ekvilibrigita, bona, justa, li deziras la feliĉecon de siaj du amikoj kaj trankvilecon por Francio. Tial lia respondo estas simpla. Kial la imperiestro serĉus aventuron? Ĉiu el la tri princinoj povas esti honorinda edzino por li, sed neniu amus lin, kiel amas lin Marie. Ŝi esta digna je la trono pro siaj virtoj kaj sia beleco. Li do edziĝu al ŝi : li estos feliĉa.

Nur al li Napoleono lasas aŭdi al kiu elekto li inklinas:

«Mi efektive pensas, ke tio estus bona elekto, Duroc, “ li diris, “sed ŝi, ĉu ŝi volos?»

La grandmarŝalo pensis momenton.

«Jes, Siro, se vi prezentos al ŝi tiun geedziĝon ne kiel favoron, sed kiel ĝojon por vi mem.»

«Ĉu vi ne parolis pri tio al ŝi ?»

«Ne, Siro.»

«Kaj ŝi, ĉu ŝi parolis al vi pri tio ?»

La serioza Duroc ridetis :

« u ŝi, Siro ? Ĉu vi ne konas ŝin ?»

Per gesto Napoleono sciigis al la grandmarŝalo, ke li povas retiriĝi, vidante lin enpenŝigita. Kaj li murmuris:

«Kun Marie kiel edzino, kaj Duroc kiel amiko, jes, mi vere estus feliĉa.»

Li ŝajnis decidiĝinta. Poste li denove pripensis la aferon. La ideo revenis, ke princino povus doni pli da graveco kaj brilo al lia domo.

Ankoraŭ neniam li spertis tiom da balandon, preskaŭ dolorigan, de sia volo...

Kaj subite li decidiĝis.

XVI. Ĉe Marie

Ĉiun merkredon post la vespermanĝo Marie ricevis en la strato Houssaye siajn plej intimajn amikojn. Estis burĝaj vesperoj, dum kiuj, sub

lampoj ludante viŝton aŭ alian kartludon, retroviĝis dek aŭ dek du personoj, ĉiam la samaj, la viroj en urbaj vestaĵoj, la virinoj en simplaj roboj : la imperiestro, princino Jablonska, Duroc, la duko kaj la dukino de Bassano, Fontanes, la ekspastro Delille, sinjoro de la Bouillierie, sinjorino de Rovigo, ofte ankaŭ Pauline Borghese, kelkfoje Fouché.

Ĉirkaŭ la naŭa la muzikisto Grétry sidiĝis antaŭ la klavicenon kaj ludis. La etoso estis subluma kaj agrabla en tiuj du salonoj kun simplaj mebloj, kie montriĝis pli da spirito kaj spriteco ol en la Tuilerioj. Tortoj, sorbetoj, teo kaj kafo konsistigis la tutan interaĵeton.

Napoleono spertis multan plezuron dum tiuj kunvenoj. Tamen ekde la divorco li malofte aperis tie. La pasigis siajn vesperojn en sia kabineto inter dosieroj kaj ciferoj. Li ankaŭ kredis, ke lia publika ĉeesto ĉe Marie, tiel malmulte da tempo post lia separo de Joséphine, povus lezi tiun ĉi. Kiel ajn kruda li ofte ŝajnis, li tamen gardis certan delikatecon.

Tiun merkredon li tamen venis, kaj eĉ tre frue. Trankvila, atentema, li parolis kun tiu senafekteco, kiu ĉarmis la aŭskultantojn dum la unuaj jaroj de lia potenco, kaj kiun li perdis iom post iom kun la jaroj.

Li laŭdis la bonan Delille pro liaj versoj, de kiuj nova kolekto ĵus aperis, kaj li dolĉe riproĉis al li lian rifuzon akcepti lian donacemon, dirante, ke li, kiel nova Aŭgusto, neniam konsolos sin de tio, ke li ne povis ligi al si la novan Vergilion. La poeto elegante defendis sin. Li estis protektata de Marie-Antŭaneta dum sia debuto kaj konservis la kulton de ŝiaj memoraĵoj. Malgraŭ lia povra monstato li volis akcepti de Napoleono nur literaturan katedron en la Kolegio de Francio. Kaj la imperiestro aprobis tian honestan fidelecon.

Poste li incitetis Grétry, kies nomon li ĉiam pretendis forgesi.

«Kiel do vi nomiĝas ?» li demandis, pres-kaŭ ĉiufoje, kiam ili renkontis sin.

«Siro, ankoraŭ ĉiam Grétry,» murmuris la muzikisto.

«Estas vere ! Kie do mi havas la kapon ? Pardonu min...»

Kaj li ridis tiun luman ridon, kiu redonis al siaj trajtoj aspekton de miriga juneco.

Tre afabla kontraŭ la bela dukino de Rovigo, kies edzon, la povran Savary, li ĉiam ien sendis kun misio, por ke ŝi ekhavu, kiel li pretendis, iom da agrabla tempo. Kun princino Jablonska, viveca kaj baroka, kiun li ŝatis pro ŝia dediĉiteco al Marie, li amuzis pro siaj komen-

toj la tutan kompanion. Sed kiam la tabloj estis lokitaj por la kartludo, li ĉiam eksidis flanke de Marie sur la divano inter du fenestroj en la plej malgranda, sufiĉa malluma salono. Je kelkaj paŝoj de la lumoj kaj voĉoj ili havis la iluzion esti inter si.

Kontraŭe al la imperiestro Marie troviĝis tiun vesperon en melankolia animstato. Iom da laceco kaŭzis faldojn sub siaj okuloj. Ŝia gravedeco ankoraŭ nevidebla, komencis maloportuni ŝin. Cetere la vizitoj multiĝis la las-tajn tagojn. Ŝi devis ŝlosi sian pordon. Ŝi sentis plimultiĝi ĉirkaŭ si afablaĵoj kaj aludoj, kiuj anoncis ŝanĝon en ŝia ekzisto, pri kiu ŝi ne volis pensi, sed svaga timeto invadis ŝin.

Al la karesaj vortoj de Napoleono ŝi respondis per nespontana gajeco ! Kiel li rigardis ŝin ! Kiom da afekcio estis en lia vizaĝ-esprimo ! Ŝajnis al ŝi, kiu tiel bone konis la imperiestro, ke sub lia leĝera konversacio kaŝiĝis gravaj pensoj, kiujn li volis vortigi al ŝi, sed kiujn li retenis pro ia motivo.

Ŝi ne eraris. Dufoje Napoleono havis frazon preta sur la lango, sed ne eldiris ĝin, ĉar ŝi ŝajnis al li tre laca, kaj li timis kaŭzi al ŝi fortan emocijon per la oferto dividi lian vivon. Tial li prokrastis sian peton al la morgaŭo kaj intencis fari ĝin ĉe la unua okazo, kiam li estos vere solaj.

Intertempe en la granda salono la duko de Otranto glitis inter la rigidaj foteloj kun leonpiedoj, turniĝis ĉirkaŭ la damojn, igis sin agrabla kaj kompleza, nerimarkeble emfazante sian familiarecon kun la domo. Senpacience li tamen atendis la momenton, kiam li povis proksimiĝi al Marie kaj paroli al ŝi. La tempo urĝis por havi decidan konversacion kun ŝi. Post unu tago eble jam estus tro malfrue.

Por li kaj por ĉiuj kiuj troviĝis ĉe la grafino – escepte de ŝi mem – la ĉeesto de Napoleono, tute kiel lia sinteno, havis klaregan signifon : la imperiestro estis edziĝonta al Marie Walewska. Gravis do, ke la ministro certigis sin pri la bonvolo de lia estonta suverenino, kun la celo meti ŝin en la lokon de ŝuldantino.

La okazo prezentis sin pli frue ol li esperis. Vidante, ke la etoso de la kunveno suferis ekde sia aparta kunesto kun Marie, la imperiestro mallaŭte diris al ŝi kelkajn vortojn, kaj tute laŭte proponis ludi loton, tiam preskaŭ tute novan kaj tre popularan kartludon. Li kolektis gevolontulojn : sinjorino de Rovigo, la princo Jablonowska, Pauline Borghese, Corvisart, Ornano, kaj instalas sin kun ili ĉe la plej granda tablo, dum li kantetis *la Avon*. Marie ekskuzis

sin pro tio, ke ŝi ne ŝatis ludi. Ŝi preferis ripozi ankoraŭ momenton en la trankvileco de sia du-na izoliteco. Kun enuo ŝi baldaŭ vidis Fouché proksimiĝi al ŝi. Sed ĉiam afabla, ŝi invitis lin eksidi ĉe ŝia flankon. De fore Napoleono ridetis al ŝi.

«Nu, grafino,» duonlaŭte diris la duko de Otranto, zorge levante la baskojn de sia maronbruna vestaĵo por sidiĝi, «nu, mi esperas, ke post kelkaj tagoj tiuj kiuj nun flatas sin esti viaj geamikoj kaj geservistoj, povos gratuli vin kiel viaj respektemaj gregatoj.»

«Mi ne komprenas vin, Sinjoro duko,» ŝi murmuris.

«Antaŭ malmulte da tempo, vi riproĉis al mi miajn revojn. Sed tiuj revoj estas baldaŭ realiĝontaj. Sufiĉos mallaŭta 'jes' por ke grafino Marie Walewska nomiĝu per alia nomo, kiun la historio memoros.»

Ŝi ne replikis, sed speco de timo superfortis ŝin, kiam ŝi vidis tiun sensangan figuron kliniĝi antaŭ ŝi.

«Imperiestrino !»

«Mi ne scias, kion vi volas diri, Sinjoro.»

«Ĉu vere ? » li respondis kun iom da ironio.

«Permesu do, ke mi informu vin. La imperiestro pretas kroni en vi la patrinon de sia heredonto. Mi estas tiom pli feliĉa, grafino, ĉar mi iel kontribuis al tiu decido.»

«Sinjorino,» diris Marie, «viaj bonaj servoj – mi bedaŭras devi sciigi tion al vi – ne havos la rezulton kiun vi atendas. Mi volas resti kiu mi estas. Miaj kialoj pro tio ne ŝanĝiĝis ekde la tago, kiam mi sciigis ilin al vi.»

La duko de Otranto faris movon, kvazaŭ li ektimis.

«Kio do ? Ĉu vi rifuzas ? Vi seniluziigus Napoleonon !»

«Mi estas certa, ke la imperiestro aprobas miajn motivojn...»

«Vi ĝojigus viajn malamikojn.»

«Se mi havas malamikojn – sed tion mi ne scias – , tiu konduto eble senarmigos ilin.»

«Vi seniluziigus viajn amikojn, kiuj senripoze laboris por vi kaj kiuj estas vidontaj ilian plej karan deziron elaŭdita.»

«Mi ŝatas amikecon, kaj precipe tiun kiu ne deziras plialtigi min kontraŭ mia volo...»

Fouché respiris. Sed tiu defendo de Marie ne konvinkis lin. Tio ĉi estis por li komedio. Oni volis trompi lin. Lin ! Nekredeble ! Li daŭrigis:

«Ke vi ne akceptus tion por vi mem, Sinjorino, mi ankoraŭ povus ekspliki al mi... Mi faras omaĝon al tiel malofta malegoismo. Sed infano estas naskiĝonta. Filo aŭ filino, rifu-

zante, vi senigus lin aŭ ŝin de la plej splenda heredaĵo kaj mondfama nomo. Sed se vi akceptos, ne temos pri bastardo aŭ bastardino, sed pri legitima infano. Ne plu estos riskoj por vi. En klare hela tago, en brila radiado la trono estos ofertita al vi ! Kaj forigante vin mem de la trono, vi forigos vian infanon...»

« Ĝi ne bezonos imperion por esti feliĉa. »

« Fi do, grafino, tio estas virina rezonado ! »

« Ne, Sinjoro, tio estas patrino rezonado. »

« Ĉu vi konscias pri tio, ke, se Napoleono, forpuŝita per via rifuzo, kontraktos alian union, li malligos sin de vi ? Vi riskus perdi lin... »

« Mi fidus la imperiestron. »

Ŝi fiere rigardis la vizaĝon de tragika bufono, kaj rigardante ĝin, ŝi apenaŭ povis subpremi tremeton de malestimo. Kio do, ĉu li ankoraŭ kredis, ke li povas fari sian instrumenton el virino kia ŝi? Li estis sukcesinta kun Joséphine, kiu longe agis laŭ lia volo. Sed Marie Walewska havis alian karakteron, alian sangon. Grimpis sur la tronon kun lia helpo – ĉar tion insinuis la bufono –, ŝajnis al ŝi honte. Prefere ol ŝuldi al li subtenon, estus pli bone plu vivi en tiu duonmallumo, kiun ŝi ŝatis pli ol brilon.

« Permesu, » li ankoraŭ diris...

Ŝi interrompis lin, kaj ĉiam simple kaj mallaŭte, sed per firma tono kiu malpermesis ĉiun insiston, ŝi diris :

«Ŝparu al mi, Sinjoro, tiujn tedaĵojn...»

Kaj ekstarante por iri al Napoleono kaj siaj gegastoj, ŝi forlasis la dukon de Otranto, antaŭ ol li povis malfermi la buŝon.

La pala figuro de Fouché fariĝis pli blanka. Liaj manoj, kiuj estis tiel maldikaj, ke ili pensigis pri ungegoj, kuntiriĝis. Kolero skuigis sian maldikan korpon. Li viŝis la ŝviton de sia frunto, kaj sekrete forlasante la salonon, surmetis sian pelton el martesfelo kaj malsupreniris al la ĝardeno por retransviliĝi, ordigi siajn konfuzitajn pensojn kaj repuŝi novan danĝeron, kiu minacis sian ambicion.

Tra la glacimalvarma januara nokto li rapide paŝis ĉirkaŭ la nigran gazonon.

Tiel do la lasta vorto de tiu virino estis dirita. Li malsukcesis ĉe ŝi. Ne ŝatante liajn servojn, ŝi mistaksis, kion ŝi jam ŝuldis al li. Ĉar fine, kuraĝigante ŝin refuzi la substituon, li puŝis la imperiestron al divorco. A Fontainebleau li forigis la lastajn remparojn, la lastajn defendoliniojn post kiujn Joséphine povis kaŝi sin. Ĉiujn dratojn de tiu granda afero li tenis, miksis kaj tiris. Kaj nun kiam ŝi estis certa atingi la celon, – ĉar regata de sia propra intereso, li ne

povis kredi je tiu senzorgeco de Marie –, ŝi forĵetis la silentan aliancanon, kiu, iom post iom, pacience, obskure, sed kun perfekta scienco liberigis ŝiajn paŝojn de ĉiuj obstakloj kaj malfermis al ili la imperiestran vojon. Ŝi volis fariĝi imperiestrino tute sola aŭ tute ne ! Kaj se ŝi fariĝus imperiestrino, lia neerarema instinkto avertis lin, ke ne estus amikino, kiun Fouché vidus grimpi sur la tronon... Certe ne kiel amikino, sed virinon, kies honesteco faris ŝin nefleksebla, kaj kiu malestime deturnis lin de Napoleono. Se Marie sukcedus Joséphine, ŝi ricevus de la imperiestro ion, kion Joséphine, malgraŭ tri jaroj da obstina kaj perfdida lukto, ne povis obteni de li : la forsendon de la ministro, kiu estis sufiĉe kuraĝa por kontraŭi ŝin. Sed Joséphine jam de longe estis por Napoleono nur agrabla kompanino, speco de konstanta gastino sen vera influo sur liaj agoj. Marie Walewska, mastrino de la koro kaj sentoj de la imperiestro, estus multe pli timenda kontraŭulino. Konsilato de Duroc, ŝi tre baldaŭ igus forpeli Fouché.

Envolvite en sia mantelo, li marŝis sur la sablo de la aleo. Malantaŭ la vitroj de la hotelo brilis lumoj, la solaj helaĵoj en tiu senstela nokto. Apud Marie la omaĝoj certe plimulti-ĝis, indico kaj antaŭludo de sia venko... Ŝi ne ŝatis lin ! Tiel estu ! Li estis montronta al tiu orgojla Polino kaj al tiuj kiuj laŭdegis ŝian supreniĝantan fortunon, ke oni ne senpune defias Fouché. Ŝi ne konis lin, ŝi ne sciis, al kio li kapablas, per kiuj bruskaĵoj, mirigaj turnoj li ĉiam sciis venĝi sin. Ŝi ne suspektis la fertilecon de lia imago, kiu, tuj kiam plano malsukcesis, estis preta, tuj anstataŭigi ĝin per alia. La fontoj de lia volo, kiuj en la plej tragikaj circumstancoj, kiam ĉiuj aliaj viroj perdis la kapon, neniam sekiĝis. Eble ŝi imagis lin senkuraĝigita, senarmita... Kiom ŝi eraris ! Povra infano ! Kio ŝi estis por viro kiu, eksterleĝigita de Robespierre, tamen venkis lin kaj sendis lin sur la eŝafodon !

Li subite transviliĝis kaj reprenis la padon al la hotelo de Marie. Li ankoraŭ ne decidis, kiel li kondutos estontece, sed en lia menso jam prezentiĝis pluraj rimedoj pour certigi lian revanĉon. La okazo estis diktonta lian elekton. Estante viro kiu studis ĉiujn siajn movojn, li ŝatis la valoron de la hazardoj kaj la komplikeco de la neatendaĵoj : la okazoj havigis al li liajn plej belajn batojn.

Li regrimpis la ŝtupojn de la perono kaj denove miksiĝis en la kompanion de la imperiestro. La lotludo, forte disputata, finiĝis. Prin-

cino Pauline vokis la lastajn numerojn. Marie sidis malantaŭ la imperiestro kaj skevis lian ludon. Ĉiu malplezuro estis malperinta de lia vizaĝo. Kaj kiam Fouché reaperis ne tre malproksime de ŝi, Marie montris nenian malvarmon. En sia simpleco ŝi eĉ riproĉis al si, ke ŝi antaŭe estis tro dura por viro, kiun liaj kalkuloj erarigis, sed kies sinteno longe estis afabla kaj amikeca. Ne suspektante la galon kiu nun plenigis la koron de la maljuna konvenciulo, ŝi plurfoje alparolis lin.

Baldaŭ Napoleono ekstaris.

«Estas preskaŭ la dek-unua,» li diris, refermante sian horloĝon. Petu alkonduki miajn kaleŝon. Ornano kaj Duko de Otranto, ni devas interparoli: vi venos kun mi.» Fouché kliniĝis kun tremeto de espero. Ĉu la sorto unu plian fojon favoris lin? Sen saluti la ĉeestantojn, sed post tenera adiaŭo al Marie, kiu akompanis lin ĝis la sojlo, la imperiestro grimpis en sian veturilon. La duko de Otranto sidiĝis kontraŭ li.

«Ĝis morgaŭ, Duroc, bone amuzu vin, » diris Napoleono al la grandmarŝalo, kiu klini-ĝis ĉe la pordo, nudkapa. Mi ne plu bezonas vin ĉi-vespere.»

La ĉevaloj forgalopis. La imperiestro longe silentis, absorbite en siaj pensoj. Kun streĉitaj nervoj Fouché apenaŭ spiris, ŝajnigante rigardi la plankon. Fine Napoleono parolis kun subita sincereco.

«Fine mi estas malpezigita, mia amiko,» li ekkriis. «Estas finite: mi decidis aŭskulti nur mian koron. Mi jam sufiĉe donis al la politiko. Nenia princino, al kiu mi povos edziĝi, donus al mi la plezuron kiun mi spertas en la kompanio de la dolĉa, amanta kaj fidela virino, kiu jam faris por mi tiom da oferoj. Ŝi okupos la lokon de Joséphine. Kion vi diras pri tio? Mi scias, ke vi aprobas min, kiel la tuta Francio aprobas min, kiam ĝi ekscios mian elekton. Ĝi trovos ĝin tute normala. Ĉar kio mi fakte estas? Soldato. Mi gardis miajn antaŭajn sim-plajn gustojn! Kion mi farus per Rusa grand-princino, edukita laŭ la Bizanca maniero, aŭ per arĥidukino, kiu vidos en mi nur produkton de la Revolucio kaj kiu traktos miajn bonajn servistojn kiel parvenuojn? Mi petis vin reiri kun mi por ekzamni kune, en kiu maniero ni devas konigi al la publiko mian decidon. Vi estas la unuaj al kiuj mi anoncas ĝin.»

Tuj – tio estis unu el la trajtoj de lia genio – Fouché glitis sin en la breĉon, kiun li ekvidis.

«Siro, » li diris, trenante siajn vortojn por doni al si tempon pensi, «mi havis la honoron rekomendi al vi tiun elekton. Ke vi faris tiun

decidon, plenigis min per ĝojo. Neniu princino estas pli digna de la titolo de imperiestrino ol sinjorino grafino Walewska. Ŝi havas ĉiujn kvalitojn, ĉiujn perfektaĵojn, kiuj povos garanti al ŝi la amo de la Francoj. Sed eble prezentiĝas kelkaj obstakloj... »

«Kiaj obstakloj? Mi vidas neniajn,» replikis Napoleono.

«Ili ne estas tre gravaj, kaj Via Imperiestra Moŝto senpene sukcesos forigi ilin. Tamen konvenas laŭ mi en tiu kazo agi kun lerteco. Ne povas okazi, ke imperiestrino Marie, trovos la saman malamikecon, kiun spertis imperies-trino Joséphine.»

«Sed kiuj obstakloj?» ripetis Napoleono.

«Tiu kiuj povos naskiĝi el la seniluziigo aŭ la ĵaluzeco de pluraj membroj de la imperiestra familio.»

«Kiu ne trovos bona mian elekton, nur forlasu Francion,» deklaris la imperiestro kun leĝere krispigita vizaĝo.

«Sendube, » reprenis la duko de Otranto. «Tamen, kiel ne agi tiamaniere, ke ĉiuj povos nur kliniĝi sen rankoro antaŭ via nova edzino? Kial trudi, se vi povos persvadi? Por tio ekzistas tre simpla maniero. Mi submetos ĝin al Via Imperiestra Moŝto, se Ĝi ordonos tion.»

«Kiu estas tiu maniero?»

«Vi bezonas nur kunvoki vian Privatan Konsilion. Vi anoncos al la princoj kaj gravuloj, kiuj konsistigas ĝin, ke vi volas aŭskulti ilin antaŭ ol prononci vian decidon. Se vi donas la parolon al ĉiuj el ili, estos trovita plimulto de la voĉoj – pri tio mi okupiĝos – pour petegi vin doni al la regenerita Francio suverenon kiu apartenas al neniun malnova Eŭropa monarĥio. Mi mem parolas laŭte favore al sinjorino Walewska kaj mia ekzemplo konvinkos la hezitatojn. Tiam, forta per tiu opinio publike esprimita de la precipaj viroj de la ŝtato, vi povos edziĝi al la grafino sen aperi nur cedi al korinklino. Nenia opozicio kaj nenia paŭtado tiam plu eblos. Ankoraŭ pli, se, kiel oni devus timi, la modesta sinjorino Walewska estus timigita de la prospektivo de la trono, ĉiuj ŝiaj skrupuloj falus antaŭ la solena deziro de Francio.»

«Tio ne estas malbona rezonado, » diris Napoleono. La grafino scias ankoraŭ nenion pri mia intenco. Mi pensis averti ŝi morgaŭ...»

«Se mia konsilo plaĉas al Via Imperiestra Moŝto, Ĝi devas silenti pri tio al sinjorino Walewska ĝis post la kunveno de la Konsilio. Por ŝi estos belega surprizo, tiel agrabla kiel glora, se vi anoncos al ŝi samtempe vian deziron

kaj la peton de la plej alta korpuso de la imperio.»

Napoleono, kutime tiel suspektema, estis en unu el tiuj momentoj de familiareco, en kiu malperas ĉiu krompenso. La sugesto de Fouché ŝajnis bonega al li. Li konis lian lertecon, kaj li ne dubis momenton pri tio, ke ĝi devis ekzerci tian influon sur la membroj de la Konsilio, ke, se Fouché suflorus al ili opinion konforman al lia deziro, li, Napoleono, ŝuldus nenion al ili. Kion li ne estis povonto fari, la duko de Otranto estis faronta. Li estis preparonta la mensojn, nomante al ili la amatan nomon, kaj kreante entuziasmon, al kiu Marie ne estis povonta rezisti. La kritikoj, la rankoroj, la ĵaluzecoj, al kiuj li estis elmetota, estis falontaj aŭ reduktotaj al malklara flustrado. Eŭropo, Francio, lia kortego, eĉ lia familio estis povontaj nur aplaŭdi.

«Diable, vi estas ruza kamarado, Fouché. Kaj mi volas sekvi viajn konsilojn. Reirinta hejmen, mi kunvokos per Maret la Konsilion por koveni post semajno. Ĝis tiam vi vizitos la ĉefajn membrojn kaj konvinkos ilin subteni mian deziron. Sed agu diskrete kaj lerte. Mi mem ne aperos. Tio estos pli bona.»

« Via Imperiestra Moŝto povas fidi mian dedicecon.»

Kaj li frotis siajn manojn, kiuj estis flavaj kiel abelvakso.

XVII. La Privata Konsilio

La privata konsilio kunvenis en la granda kabineto de la imperiestro. Tiu sama salonego vidis ankaŭ la kunvenojn de la familio Bonaparte kaj la falon de Joséphine. Ĉirkaŭ imensa tablo kovrita per ruĝa veluro kun oraj pasamentoj, la reĝoj, princoj, gravuloj kaj ministroj eksidis laŭ la strikta sekvo de prioritato. En la centro, izolita per malplena spaco sidis imperiestro Napoleono.

Tie estis la membroj de la imperiestra domo, kiuj estis en Parizo en tiu momento : Louis Bonaparte, reĝo de Holando, Joachim Murat, reĝo de Napolo, Eugène de Beauharnais, vicreĝo de Italio, kardinalo Fesch ; tiam la gravuloj kaj la grandoficiroj : arĥikanceliero Cambacérès, duko de Parmo, Talleyrand, princo de Benevento, Berthier, princo de Neufchâtel, duko Garnier, prezidanto de la Senato, grafo Fontanes, prezidanto de la Leĝdona Korpuso, grafo Lacépède, grandkanceliero de la Honora Legio, grandmarŝalo Duroc, duko de

Frioul, grafo de Ségur, grandmastro de la ceremonioj ; tiam la ministroj : Champigny, duko de Cadore, Savary, duko de Rovigo, Fouché, duko de Otranto, Clarke, duko de Feltre, Gaudin, duko de Gaëte, Régnier, duko de Massa. Maret, duko de Bassano, tenis la plumon en sia kvalito de sekretario de la Privata Konsilio.

Napoleono malfermis la seancon per kelkaj mallongaj frazoj pri la graveco de la debato, el kiu devis rezulti la indiko de la nova imperiestro, kaj tra ĝi la daŭrigo de la dinastio. Li rekomendis al siaj konsilistoj paroli kun plena libereco. Tio ne estis nur formulo. La imperiestro deziris, ke oni diras tiel publike kiel private, kion oni havas en la menso. La krudeco de lingvaĵo ŝokis lin malpli ol neklara babilaĉado, kaj favore al klareco li eĉ parolis pri devo :

«Via opinio,» li diris finante, «kontribuos al la fiksado de la mia. La indikoj kiujn mi ricevis de iuj el vi, anoncas kontraŭdirajn opi-niojn. Tiu ĉi kunveno akordigos ĉiujn. Mi ne povas pli longe prokrasti la decidon : Francio kaj la tuta Eŭropo rigardas min. »

Tiu parolado, kiu, eĉ suverena, povus ŝajni aroga el alia buŝo, sonis nature, ĉar Napoleono, en tiaj cirkonstancoj, sciis involvi sin per vera grandeco kaj sincereco. Cetere, estis vere : en tiu komenco de 1810 ne estis alia domina penso sur la kontinento ol tiu ĉi: kiu estos la nova edzino de imperiestro Napoleono?

La unua kiu ricevis la parolon, estis la reĝo de Holando, kiu tiam havis tridek unu jarojn. Li similis al Napoleono, sed lia maldika, ruinigita, inertia vizaĝo, ĉirkaŭita per tro longaj vangharoj, igis lin ŝajni pli aĝa ol lia frato. Koncerne moralon, la edzo de Hortense de Beauharnais ĉiam havis ĝustajn kaj honestajn intencojn kaj li estis la plej preciza kaj eĉ etspirita viro, « la plej avara akuratulaĉo » laŭ la vortoj de la imperiestro mem.

Li komencis paroli en malgajhumora tono, malmulte konvena por kreskigi la malmulton da atento, kiun donis al li liaj aŭdantoj. Ekde kiam li perdis la favoron de la imperiestro, la antaŭe respekto ĝenerale montrata al la prefe-rata frato de Napoleono, rapide malaperis.

«Siro, de la tri edziĝaj projektoj kiuj ĝis nun ricevis la atenton de Via Imperiestra Moŝto, edziĝo kun Saksa princino ŝajnas al mi la plej sekura por Francio. Via unio kun imperiestra princino havus antecedentojn en nia historio. La edzino de Ludoviko XVI apartenis al la Aŭstra imperiestra domo. Saksio ĉiam montris sin fidela aliancano de Francio. Situante en la mezo

de Germanio, ĝi gardas siajn okulojn sur la tuta lando. Aliflanke ĝi ne estas sufiĉe forta por iam povi influi vian politikon.

«La du aliaj projektoj estas danĝeraj. Rusio estas tro stranga por niaj moroj, por ke unu el ĝiaj grandprincinoj povu facile adopti niajn kutimojn. La ĉirkaŭaĵo de caro Aleksandro, precipe lia patrino, estas malamika al Francio.

«Koncerne Aŭstrion, la militoj kiujn ĝi faris kontraŭ ni dum dudek jaroj, tro vundis ĝin por ke repaciĝo estu vere sincera.

«Mi aldiras, ke la Saksa princino jam havas dudek sep jaroj, aĝo kiu multe pli bone konvenas al la imperiestro, ol tiu de la arĥidukino, kiu havas nur dek ok jarojn. La grandprincino Katerina Romanova estas ankoraŭ pli juna...»

La paroloj de lia frato malplaĉis al Napoleono. Lia frato aldonis novan mallertaĵon al liaj antaŭaj koncerne Holandon, parolante pri aĝo. Ĉu oni estas maljuna je la aĝo de kvardek unu jaroj ?

«Ĉu tio estas ĉio ? Ĉu vi finis ? Bone. La vico estas al la reĝo de Napolo.»

Joachim I, reĝo de la Du Sicilioj, grandadmiralo de Francio kaj edzo de Caroline Bonaparte, ekstaris. Louis estis parolinta sidante. Sed la antaŭa butikservisto povis fari nenion sen emfazo. Teatra instinkto agitis tiun bonegan soldaton de kvin futoj kaj ses koloroj da alteco³² en duorienta kostumo, en kiu veluro, silko, punto, oro, peltaĵoj, plumoj kaj diamantoj intermiksiĝis en burleska tuto, kiu povis ravi mulatinojn. «La Franconi³³ de la armeo», oni diris. Sed admirinda kondukanto de viroj kaj eksterordinare kuraĝa heroo sur la batal-kampo.

«Ĉar la imperiestro volas, ke ni parolu sincere, » li komencis per sia vulgara lingvaĵo, en kiu ankoraŭ ĉiam ruliĝis la akĉento de Cahors, « mi ne iras tra kromvojoj. La suvereno de Francio, nia patrio, kiu estis renovigita de la Revolucio, ĉefo de la armeo en kiu la respublikanoj gardis sian prestiĝon, ne povus reveki la memoron pri la Aŭstra Maria-Antŭaneta, kiu ankoraŭ ĉiam estas malamata de la nacio. Li ŝuldas ĉion al sia genio. Kial li, kiu havas la plej grandan gloron en la mondo, bezonus serĉi kontentecon kaj gloron unuigante sin kun la plej postrestanta kortego de Eŭropo, kortego kiu montris sin naŭzita de li, tiel longe ke ĝi ne estis konvinkita en Toskano, ke la familio Bonaparte apartenas al malnova nobleco.»

Li ekridegis. Napoleono, iomete rektigante sin, diris:

«Ĉio ĉi estas stultaĵoj, Murat Mia nobleco datiĝas de Montenoto kaj Arkolo³⁴. Pli ol iu alia lando Aŭstrio devas memori tion.»

«Per tou proksimiĝo al la Malnova Reĝimo, malamata de la Francoj, la Imperiestro kompromitus sin kaj malpliigus sian gloron. La veraj amikoj de la granda Napoleono ne povas konsili al li edziĝi al la filino de imperiestro Francisko. Edziĝi al la Rusa princino estus pli bone. En tiu flanko almenaŭ ne estas ĝenaj memoroj nek rankoro. Se aliflanke oni volis apogi sur forta aliancano, Rusio estas potenca, dum Aŭstrio estas nur disfalanta kolekto de provincoj.»

Li martiris la tablon per siaj pugnoj, turnante dekstren, tiam maldekstren al la ĉeestantoj sian dikan mopsecan vizaĝon kun fajrecaj okuloj. Enfunde tre ruza sub siaj fanfarona aspekto, li oponis la Aŭstran geedziĝon nur pro sia zorgo pri siaj Napolaj interesoj. Ĉu li ne okupis la tronon de la geavoj de la arĥidukino ? Tiu unio estus danĝera por li. Sed li ŝajnigis esprimi sin nur kiel filo de la Revolucio kaj defendanto de la gloraj tradicioj de la Franca armeo. Lia pasia lingvaĵo, en kiu incenso envolvis la cenzurojn, estis sufiĉe subtile kalkulita por ne malplaĉi al Napoleono, kiu tamen respondis al sia bofrato :

«Ne parolu tiel leĝere pri Aŭstrio. Ĝi havas pli da vitalecon, ol oni kredas. Ĝi ankoraŭ disponas pri bonaj soldatoj kaj spertaj generaloj. La lasta militiro pruvis tion.»

Ke Louis subtenis la Saksan kandidatinojn kaj Murat la Rusan, tute ne mirigis Napoleonon. Fouché ne sukcesis konvinki lian familianojn. Lia agado certe precipe sukcesis ĉe la gravuloj. Cetere unuanimeco de la opinioj ne estis necesa : la plimulto sufiĉis. Tuj kiam ĝi estis aparonta, ĉiuj estis aliĝontaj al ĝi.

Tiam li transiris al Eugène. Oni atendis lian opinion sen scivolemo. Li estis ĝenerale amata. Kvankam li neniam ofendis iun, li estis nek granda kapitano, nek granda menso, sed nur modesta viro kaj bona administranto kun honesta koro. Lia konscienco kaj precizeco faris el li la plej bona lernanto de Napoleono. Oni sciis, ke deziris la elekton de la arĥidukino, tute kiel lia patrino, imperiestrino Joséphine, kaj lia fratino Hortense. Li deklaris tion sen kromvojoj, bazante sian preferon sur la sekurecon, kiun tiu intima unuiĝo de ambaŭ monarĥioj provizus al la Franca imperio, kiu,

³² Li tamen havis nur 1,67 m.

³³ Fama tiutempa aktorino.

³⁴ Lokoj en Norda Italio, kie Napoleono batalis.

post tiom da venkoj, sopiris al paco. Kiam li finis, Napoleono faris al li afekcian signon per la mano.

Nun la vico estis al kardinalo Fesch, onklo de imperiestro kaj primato de Francio. Ruĝvizaĝa, malsprita, li longe parolis per nazeca voĉo, kiu sonis ankoraŭ pli malbone komprenebla pro lia forta Korsika akĉento. Per molaj, singardaj, ekleziaj frazoj li subtenis la Aŭstran princi-non pro la volo de sia familio kaj la konfor-meco de religio en ambaŭ omperioj. Li volis ankoraŭ plu insisti, sed la imperiestro, laca, vidante, ke neniu plu aŭskultis lin, interrompis lin :

«Al vi, Cambacérès »

La arĥikanceliero ekstaris kaj ekparolis. Lia maniero paroli havis la formojn de la Malnova Reĝimo, al kiuj li estis koralligita ne nur pro sia gusto, sed ankaŭ pro sia vaneco kiel viro de malnova kulturo. Malgraŭ lia bombasta maniero esprimi sin li estis tamen plena je prudenteco. Ekde la 18-a de Brumaire, li reprezentis konstantecon kaj ekvilibron en la potenca registara maŝino muntita de Napoleono. Ankaŭ li oponis Aŭstran geedziĝon.

«Tiu juna arĥidukino, kies eduko certe estas modelo kaj kies amindaj virtoj meritas servi kiel ekzemploj por ĉiuj Eŭropaj princinoj, certe estas por Francio senfine dezirinda imperiestrino, se ŝi ne apartenis al la Aŭstra domo, malamikeca al niaj interesoj ekde Karolo V, kaj se aliflanke tia elekto ne estus maniero nei la eventojn okazintajn en Francio antaŭ nur dek sep jaroj: ĝi estus preskaŭ maskita reiro al la antaŭa monarĥio. La lasta reĝo kaj la lasta reĝino estis ŝiaj baptoĝepatroj. Ŝia nomo certe ŝajnos al la Francoj kvazaŭ riproĉo al nia pasinteco kaj kvazaŭ minaco al la plej fortaj subtenantoj de la nuna reĝimo. Francio ne komprenos tiel neantaŭvidatan novan orientiĝon, kaj se ĝi ne komprenos tion, ĝi ne estos tre for de malfideliĝo...»

«Tute ne estas tiel,» pensis Napoleono. «La maljuna ruzulo ne diras, kiun li deziras kiel imperiestrino.»

«Al vi,» li diris al Talleyrand.

Li prononcis la nomon kiel 'Tajran' anstataŭ Talran. La princo de Benevento, ridetante sub la pudro, direktis al Napoleono diskretan saluton kaj komencis paroli kun ekskvizita eleganco per mallaŭta voĉo, kiu estis tamen perfekte komprenebla.

«Mia opinio, Siro, Via Imperiestra Moŝto scias ĝin ekde kelka tempo. Mi ne kredas, ke Rusa grandprincino estas tio, kion Vi bezonas. La politiko, tute kiel la persona gusto de la

Imperiestro, ŝajnas al mi povi sufiĉe kontentigitaj per unio kun arĥidukino Marie-Louise. Aŭstrio longe estis la kontraŭstaranto de Francio. Sed ni ne plu estas en la tempo de Henriko II aŭ Ludoviko XIV. Plurfoje la antaŭa jarcento – mi ne devas memori tion ĉi al vi – vidis akordon inter la kabinetoj de Vieno kaj Versailles. Post niaj lastaj venkoj ni ne plu devas timi Aŭstrion. Sed ni devas ŝpari ĝin kiel garantion kontraŭ Prusio. Oni tro facile parolas pri la spirito de obskurantismo de la Habsburgoj. Sed edukita al obeemo, la princino estas perfekta en ĉiuj rilatoj. Ŝia juneco helpas ŝin volonte adopti la Francajn kutimojn. Mi scias, ke ŝiaj aŭgustaj gepatroj, kiel ŝi mem, tre favore konsideras la ideon de tiu geedziĝo. Ĉu ni povas diri, ke ni trovas la saman pretecon en Sankt-Peterburgo ? La sinjorino duko de Cado-re certe scias tion pli bone ol mi, sed mi kredas, ke ne. Koncerne la domon de Saksio, eĉ se ĝi estas honorinda pro ĝia origino kaj rekomendas sin per siaj servoj, familia proksi-miĝo al tiu lando ŝajnas al mi tro mezbona por la imperiestro de Francio. Tio povus esti nur paliativo kontraŭ... »

Ĉi-foje Napoleono malkviete agitiĝis sur sia fotelo. Kio do? Talleyrand, tiom dezirante reveni al sia antaŭa ministerio parolis tiamaniere ? Ĉu Fouché ne parolis al li ? Aŭ ĉu li marŝis libervole kontraŭ la konsilo de Fouché ? Tio estis nekomprenebla...

Grafo Garnier eldiris kelkajn frazojn favore al la Saksa princino. Tiam la bela kaj multvorta Fontanes paroladis por subteni la vidpunkton de Talleyrand, sia amiko. Post tio la princo de Neufchâtel, Berthier, diris, ke li submetos sin al al juĝo de la imperiestro, ĉar la tri kandi-datinoj havis egalvalorajn avantaĝojn laŭ lia opinio. Lacépède, timigita, havis grandan penon vortigi en komprenebla maniero siajn konfuzajn ideojn.

Tiel la konsilio restis do dividita. La eldiritaj opinioj nuligis sin reciproke. Oni atendis la opinion de Fouché kun ĉiam pli da malpacienco. Ĉiuj antaŭvidis flanke de tiu reprezentanto de la malnova jakobena partio difinitivan eldiron kontraŭ la Aŭstra projekto. Napoleono atendis ion pli bonan : la nomon de Marie.

Seka, tranĉa, plena je aludoj la voĉo de la ministro de la polico leviĝis en la vasta salono :

«Mi demandis min, Sinjoroj, tuj kiam la divorco de la Imperiestro permesis konsideri la nunan problemon, se ne estus eble al Lia Imperiestra Moŝto kontrakti union alian ol suverenan. Mi konfesas, ke tiam mi havis alian

opinion. Sed pli profunda analizo de la Eŭropa situacio kaj de la veraj interesoj de la Imperio konvinkis min pri mia eraro. Kaj la fakto, ke neniu el vi konsideris la eblecon de tia unio igas min pli kaj pli pensi, ke la Imperiestro ne povos edziĝi al persono de privata kondiĉo, kiel estis la antaŭa imperiestrino...»

La membroj de la Konsilio rigardis unuj la aliajn kaj tiam rigardis Napoleonon. Li estis konsternita. Kion diris tiu fripono ? Li devis proponi Marie kaj li postulis princinon !... Kio kaŭzis tiun ŝanĝiĝon ? Nur antaŭ du tagoj, li demandis al Fouché :

«Kiel fartas nia afero ?»

«Laŭ la deziro de Via Imperiestra Moŝto,» respondis la duko de Otranto.

Kaj jen nun kiel li esprimis sin ! Kio okazis? Ĉu li perfidis lin? Sed kial ? Kiun intereson Fouché povus havi por ludi tian ludon, tiel gravan por li, la imperiestro ? Sed li daŭrigis sian paroladon. Silentigi lin en publiko estis neeble. Kun malĝoja koro li devis regi sin kaj aŭskulti lin ĝis la fino.

«Ne ke estus neeble trovi, eble tute apude, virinon aŭ filinon, kies gracio, nobleco kaj la raraj talentoj de inteligenteco kaj koro meritis la kronon. Sed ĉar rigora ŝtatintereso vakigis tiun gloran lokon, mi diros kun la respekta firmeco de elprovita servisto, ke la Imperiestro bezonas edzinon de fama sango por simboligi la union inter la nova kaj la malnova socio kaj doni al la infanoj de Napoleono pragepatrojn kies historio perdiĝas en la nokto de pasin-teco...»

Tio estis la vortoj de Napoleono mem, kiujn li uzis, kiam li unuafoje parolis pri tio al Fouché. En la buŝo de la duko de Otranto tiuj vortoj alprenis nun strangan ironian signifon. Kolero purpurigis la palajn vangojn de Napo-leono. Li laŭte purigis sian nazon. Tiam, ser-ĉante en sia veŝtupoŝeto la flartabakujon, li tiel nerveze inspiris pinĉeton, ke li malpurigis sian veŝton kaj la tapiŝon.

La ĉeestantoj komprenis la aludon al sinjorino Walewska, kaj kvankam kutimiĝintaj al la temereco de Fouché, ili estis konsternitaj de la aŭdaco de tiu lingvaĵo. En profunda silento la duko de Otranto daŭrigis neŝanceble :

«Cetere la Imperiestro havas tro zorgoj pro sia gloro, kiu fariĝis, mi rajtas diri tion, la plej altvalora patrimonio de ĉiuj Francoj, por mallevi siajn okulojn al nivelo pli malalta ol la regantaj domoj. Koncerne la elekto farenda inter ili, ŝajnas al mi, ke estas pli da sekureco kaj signifo en unio kun la Aŭstrino. Tial mi favoras tiun union. »

Napoleono ĝissange mordis al si la lipojn. En sekundo li revidis la scenon en la veturilo, en kiu Fouché prezentis siajn servojn. Kiel stulta li tiam estis aŭskultante lin kaj lasante sin delogi de la inĝenia ruzeco de tiu fripono ! Kiel stulta li estis tiam ! Oni ne povas konfidi aferojn de la koro al subuloj ! Li estus devinta kalkuli nur je si mem sen prepari al ĝi la nacio kaj anonci ĝin, trudi sian volon al sia familio kaj al Francio. Se estus estintaj rezistoj, li estus nuliginta ilin per unu vorto... Dum nun. Ĉio estis fuŝita !

«La sinjoro ministro de la polico deklaris sin kontraŭ ĉia neprinca unio pro motivoj, kiujn nur alta politiko inspiras lin. Sed ĉu nur politiko gravas en tiu ĉi afero, kaj ĉu la rigar-do de la Imperiestro devas esti enfermita en tiel mallarĝa cirklo ? Lia aŭtoritato estas sufiĉe forte establita por ne bezoni ies alia subtenon. Li rajtas elekti por dividi kun si la tronon iun ajn virinon, princinon aŭ ne, kiu donos al li la plej bonan garantion de feliĉeco. Francio kaj la armeo jam antaŭe ratifos lian elekton.»

Tiu fidela voĉo defendis do la elekton de Marie. Napoleono ĵetas al sia amiko dankan, rigardon. Sed Duroc venis tro malfrue kaj ne ricevas eĥon. Fouché, kies influo kaj ekzemplo estus kuntreninta la tutan konsilion, kiu, se li estus parolinta favore pri Marie, estus konvinkinta pro malamo al Aŭstrio Louis, Murat, Cambacérès kaj ĉiujn dubantojn kaj timantojn, Fouché, kiu certe estus kolektinta plimulton por subteni la deziron de la imperiestro mem, perfide aliĝis al la Aŭstra flanko kaj rompis la ekvilibron en ĝia favoro.

Kion Napoleono estis decidonta? Dum parolis la lastaj ministroj, li pripensis la aferon. Fari sian amantinon imperiestrino kontraŭ la klara volo de la plimulto ŝajnis al li nun ne plu eble. Ne estis tiel, ke li timis la opozicion de la gravuloj, kiuj ricevis ĉion de li kaj kiujn li, se li volus, povus neniigi. Sed antaŭ ĉio estante politikisto, li estis senteblo al la argumentoj de la konsilistoj. Tro multaj kaj tro fortaj kialoj ŝajnis turniĝi kontraŭ edziĝo pro pura korinklino. Malgraŭ tiu korinklino la konsilo de la personoj kiuj estis ligitaj sian sorton kun la lia, influis lin. La vektopesilo kliniĝis aliflanken. Tio ĉi estis bedaŭrinda por lia amo. Kutimiĝinta al tio neniam rigardi malantaŭen kaj akcepti eventon por deiri al nova celo, li tuj turnis sian artilerion. Ĉar oni volis tion, kaj ĉar tio estis pli saĝa, li silentigis siajn sentojn : li decidis edziĝi al la arĥidukino. Almenaŭ li tiel estis trovonto brilan konsekradon de la nuna ordo de aferoj kaj la okazon de miriga persona

trumfo : la filino de la cezaroj en la lito de la leŭtenanto de Valence ! Nubo da orgojleco supreniris al lia cerbo. Lia sorto vokis lin : li ne rezistis.

Meze de ĝenerala atento la voĉo de imperiestro klare resonis :

«Mi dankas vin, Sinjoroj, pro tio, ke vi esprimis al mi vian penson opinion pri afero, de kiu dependas ne nur mia feliceco sed ankaŭ la estonteco de niaj institucioj. Mia decido estas farita. Mi edziĝos al la filino de impe-riestro Francisko. La vicreĝo de Italio, » li aldiris, turnante sin al Eugène, «kontakto morgaŭ la ambasadejon de Aŭstrio. Nenia embusko estas timenda tiuflanke, ĉar la kor-tego jam antaŭe sciigis al ni sian aprobon. Sinjoro duko de Cadore, vi subskribos dum la tago kun la princo de Schwarzenberg la interkonsento pri la geedziĝo. Bonan nokton, Sinjoroj.»

Per signo de la kapo li salutis la gravulojn, kiuj leviĝis en respektoplena murmurado kaj klinis la kapon antaŭ ol eliri. Kiam ili retiriĝis en la galerion Diana, ili aŭdis lin krei ekde sia ĉambro, kiun li estis enirinta :

«Duko de Otranto, bonvolu resti. Mi vokos vin post momenton.»

XVIII. Velura ganto

Estis la unua matene. Napoleono sonorigis al Constant kaj, atendante lin, komencis malvesti sin. Sur fotelon li metis sian sabron, tiam li demetis sian frakon, ĵetis ĝin teren kaj lanĉis sian veŝton kaj sian grandan rubandon sur la liton.

Constant alvenis.

«Kion vi faris, drolulo ?»

La ĉambristo klinis la kapon kaj ne respondis. Liaj trajtoj perfidis grandan lacecon, kaj li ŝajnis fali pro dormemo.

«Mia bano,» grumblis Napoleono.

Li eniris sian banĉambron. Ĝi est plena je varmega vaporo, kies temperaturon malmultaj homoj povis elteni. Helpata de Constant Napoleono lasis sin gliti en la akvoplenan bankuvon. Kaptite de la varmego, li komence faris grimacon, fermis momenton la okulojn kaj, kutimiĝante, eligis suspiron de kontenteco.

Bano estis lia favorata maniero mallaciĝi kaj ankaŭ lia kuracilo. Li ofte restis en ĝi dum tuta horo, fojfoje pli longe.

«Serĉu por mi la dukon de Otranto.»

Sen miro Fouché sekvis la serviston. Ekde sia restado en Egiptio Napoleono allasis al si siajn sekretariojn, adjutantojn, eĉ siajn minis-trojn,

ĉu li estis ankoraŭ en sia lito, ĉu li okupi-ĝis pri sia tualetoj aŭ kuŝis en sia bankuvo.

«Metu ĉi tien seĝon, Constant, kaj foriru.»

La ĉambristo forlasis la ĉambron.

Fouché sidiĝis ne malproksime de la bankuvo, tusetis kaj atendis la fulmotondron. Sed je la plej neŭtrala tono en vere trankvila tono la imperiestro diris :

«Nu, Fouché, ekspliku al mi la sintenon kiun vi alprenis dum la Konsilio. Laŭ tio kion vi diris al mi antaŭe, mi atendis, ke vi subtenu alian tezon. De kie venis tiu ŝanĝo ?»

«Estas vere, Siro, ke mia konduto povis nur surprizi vin, kaj mi estas senpacienca klarigi al vi miajn motivojn.»

«Gardu por vi tiajn frazojn, Sinjoro, rekte iru al la celo.»

«Siro, kiam Via Imperiestra Moŝto faris al mi la honoron averti min private, mi aprobis Lian intencon edziĝi al sinjorino la grafino Walewska. Poste venis al mi alia penso...»

«Kiu ? Ke princino estis necesa ? Tio ne estas nova! Vi estus devinta pensi pri tio pli frue !...»

«Ne, Siro, ne estas la neceso sidigi sur vian tronon filinon de reganta suverena domo, kiu frapis min.»

«Sed vi diris tion dum la Konsilio.»

«Mi diris tion dum la Konsilio, ĉar mi ne povis ekspliki al Li mian veran kialon. Mi estus malhavinta respekton kontraŭ Via Impe-riestra Moŝto.»

Napoleono, kiu volis ekridegi, nur ridetis...

Tiu sereneco kuraĝigis la ministron fini sian klarigon :

«Cetere, se, degnante neglekti tiujn obstaklojn, Vi estus volinta agi laŭ via deziro, vi estus haltigita de sinjorino Walewska mem.»

«Jes, vi jam antaŭe diris tion al mi : ŝia modestio...»

«Ne, Siro, ŝia pieco : la grafino ne estus permesinta divorcon por ŝi mem.»

«Ĉu estas nur tio ? Mi igus nuligi ŝian geedzecon kun la grafo Walewski per la oficialularo de Varsovio. Ĝi ne estus montriĝinta pli severa por ŝi ol la oficialularo de Parizo por mi.»

«Tio ne estus sufiĉinta por la grafino. Nur decido de Romo povus kontentigi ŝin, kaj konsiderante viajn rilatojn kun la Papo...»

«Ba!» diris Napoleono senzorgeme, «mi venigus ĉi-tien Pion VII inter du regimentoj. Vi vidus, se li rifuzis tion al mi.»

«Eĉ al Napoleono ne estas eble trakti la Suverenan Pontifikon kiel ŝteliston nur por povi pli facile edziĝi al sia amikino.»

«De kie venas al vi tiu subita malfrua respekto por sutano?» okis Napoleono.

«Mi ĉiam oponis ekscesojn, Siro!»

«Ne en Liono³⁵, mi pensas!»

«Tio estis eraro de juneco, ĉirkaŭ kiuj oni brodis multajn fablojn. Ĉiakaze mi ne ĉesis badaŭri ĝin.»

«Nu, ĉio estis solvita, sed alimaniere. Ne plu revenu al tio.»

Kia ajn estis lia volo ne lasi legi la ministron en sia animo dum tiu interparolado, li ne povis retenigi leĝeran suspiron. Sed li aldiris en tono de perfekta digneco:

«Kion mi faris hodiaŭ vespere, mi ŝuldis, mi kredas, al Francio kaj al mia domo... Jam estas malfrue, duko de Otranto, foriru dormi...»

«Ĉu dormi? Ne, Siro, mi bedaŭras,» Fouché diris, ekstarante. «Mi devas ankoraŭ ekzameni ĉiujn raportojn pri la situacio en Holando. Mi devos raportojn pri ili al la Imperiestro, antaŭ ol li parolos al reĝo Louis.»

«Estas vere,» diris Napoleono, kiu apogis sin sur la rando de la banujo. «Tiu interparolado kun mia frato naŭzas min. Kiu estus dirinta al mi, ke frato, kiun mi nutris per miaj soldoj de leŭtenanto, turniĝos kontraŭ mi? Li havas malbonan kapon, acidiĝintan koron. Sed mi devas alfronti tiun problemon kaj per aneksado de liaj limprovincoj rekte povi disponi pri la rivero Skeldo kaj Antverpeno. Ekzameni tion kaj preparu por mi projekton de traktado. Ĝis revido.»

Dum Fouché malaperis en la dezerto de la palaco, la imperiestro eliris el la banujo, helpate de Constant. Li surmetis ĉemizon, pantalonon el fusteno kaj longan hejmveston el tondita fusteno kaj tre eluzitajn pantoflojn el ruĝa marokeno, lasis nodi madrason³⁶ ĉirkaŭ la kapo kaj foriris ne al sia lito, sed al sia kabineto.

Li sidiĝis, foliumis kelkajn paperojn, provizis dokumentojn de notoj, tiam, leviĝinte, eksidis en fotelon, kiu staris apud la kameno. Krucigante siajn brakojn sur la brusto, li eligis sonoranan blasfemon.

La sinregado kiun li antaŭ nelonge trudis al si dum sia konversacio kun Fouché kvazaŭ koncentris sian rankoron. Danke al sia sagaceco la duko de Otranto povis foriri, konvinkite de la indiferenteco de la imperiestro, sed tiu ĉi neniam pardonis lin.

Fouché estis ludinta senhonte. Malmulte gravis liaj ŝajnaj kialoj. Malmulte gravis, ke li tute pravis, pri kio ankaŭ Napoleono estis persvadita. Sub la kovro de politika kalkulo lia vera celo restis sekreta. Tiu viro, kion ajn oni faris por li, ligis sin kun neniu. Sub sia masko de bonkoreco kaj de sincereco li estis nur falsa kaj perfida. Lia ĉeesto en militista monarĥio, kiu povis esti renversita, ĉiam estis danĝera por ĝi. Fouché gaje estis fariĝonta ĝia tombisto, se li trovis en ĝi profiton – kiun li estis trovonta.

Ĉu forpeli lin? En tiu ĉi momento tio estis multe malpli simple, ol tio ŝajnis. Se Napoleono forpelus lin, li ŝajnus oferi sian ministron pro sia amantino. Oni farus kantojn pri tio en Parizo. Li plimalgrandiĝus en la okuloj de la Francoj, dum Fouché pligrandiĝus, kaj danke al liaj ligoj kun la jakobenoj kaj antaŭaj revoluciuloj li povus fariĝi danĝera. Estus pli bone gardi lin ĉe li. Sed lia grandanimeco havis ankoraŭ alian kialon: li vere bezonis Fouché. Li bezonis lin pro la aferoj kun Romo, por solvi la problemojn en Holando, por plifortigi la kontinentan blokadon. Ĉio ĉi estis konfidita al la zorgoj de la duko de Otranto, kies rolo pligraviĝis dum la lasta tempo. Se li malaperus tro frue, la delikata radaro riskis denove konfuziĝi, gravaj malfacilaĵoj denove estiĝus. Politika neceseco retenis la brakon de Napoleono. Li ne povis anstataŭigi kaj forsendi Fouché en tiu ĉi momento.

Li intencis rompi lin post kelkaj semajnoj – kaj kun kia ĝojo! –, kiam la entreprenitaj aferoj estus kontentige aranĝitaj, la morgaŭon de sia edziĝo, kiu metus lin en brilegan pozicion kaj malkuraĝigus liajn lastajn oponantojn. Li estis romponta lin tiamaniere, ke li neniam pli estis povonta rektigi la spinon. Tiam li estis havonta la liberecon puni lin pli severe ol nun. Estus facile surprizi lin en fraŭdo aŭ trompo kaj publikigante lian fifaron, neniigi lin por ĉiam.

Intertempe li estis montronta afablan mienon al Fouché por endormigi ties malfidon. Kaj tio senpene. Napoleono estis dotita per miriga talento de ŝajnigado.

Redolĉigite per la penso, ke lia venĝo perdos nenion per tiu atendo, la imperiestro ĵetis la kapon malantaŭen kaj, kun malstreĉitaj trajtoj, pensis pri Marie.

«Kara infano,» li murmuris, «mi oferas vin al la politiko. Sed mi oferas ankaŭ min mem la

³⁵ Dum la Teroro Fouché estis sendita al Liono por subpremi tie la reziston kontraŭ la Revolucio, kion li faris senkompatate.

³⁶ Speco de kaptuko.

unuan. Marie certe komprenos : ŝi havas grandan koron. Feliĉe mi diris ankoraŭ nenion al ŝi pri mia intenco. Tial ŝi ne estos seniluziigita...»

La granda regulatoro³⁷, pendita inter la du libroŝrankoj, kiuj okupis la tutan muron, sonoris la trian horon. La sono de la horloĝo igis Napoleonon eksalti.

«Ĉu estas jam tiel malfrue ? Kaj morgaŭ mi havos tiom da laboro ! Estas tempo enlitiĝi. Constant !... Sed mi forgesis la problemojn kun Rusio. Mi devos fari paŝon malantaŭen en tiu flanko.»

«Kie estas Méneval,» li demandis al sia ĉambristo, kiu alkuris.

«Siro, sinjoro de Méneval retiriĝis post la seanco de la Konsilio, pensante, ke Via Imperiestra Moŝto ne plu bezonos lin. Ĉu mi devas averti lin ?»

«Ne, ne, » diris la imperiestro. « Tiu povra Méneval jam ne plu estas tiel forta : mia servo mortigas lin. Ne plu ĝenu lin. Voku nur la noktan adjutanton. Estas Ségur, ĉu ne ?»

Momenton poste Constant enkondukis en la kabineton la filon de la grandmastro de la ceremonioj, Philippe de Ségur, kiun li vekis en la servosalonon. Li dormis sur matraco metita antaŭ la pordon, kaj, reĝustigante sian uniformon, kun konfuzitaj haroj kaj okuloj duone malfermitaj pro dormo li aperis kiel viva riproĉo al la diligenta tiraneco de Napoleono.

Vidante lin, Napoleono ekridis, ekstaris kaj frapis sian adjutanton sur la ŝultron.

«Mi bedaŭras, kara Ségur, sed vi havas tre belan skribon. La mia estas tiel malbona, ke mi mem povas apenaŭ deĉifri ĝin. Faru al mi la plezuron skribi kelkajn liniojn al Champigny. Sidiĝu tie.»

La junulo sidiĝis en la fotelon de la imperiestro antaŭ la belegan skribtablon, kiun portis orumitaj grifonoj.

«Skribu,» diris Napoleono.

Sinjoro duko de Cadore,

Mi petas vin, antaŭ ol enlitiĝi, forsendi la Rusajn poŝtaĵojn al Rusio, tute kiel mi eksplikis al vi. Ne parolu pri la seanco de hodiaŭ vespere. Morgaŭ, kiam vi estos subskribinta kun la princo de Schwarzenberg, vi sendos duan leteron por sciigi, ke mi decidis por la Aŭstra arĥidukino. Venu morgaŭ al mi ĉe mia ellitiĝo. Alportu al mi la kontrakton de Ludoviko XVI kaj la historion de lia edziĝo.N.

Ségur relegis la leteron kaj donis ĝin al la imperiestro, kiu traregardis ĝin, substrekis plurajn vortojn kaj subskribis ĝin.

«Tuj portigu tiun ĉi leteron per la adjutanto al la ministrejo de eksteraj rilatoj. Oni veku lin, se li dormas. Bonan nokton, Ségur. – Constant, kie vi estas, fripono ?»

Dum Ségur retrovis la servosalonon, Napoleono, antaŭirita de sia ĉambristo, eniris sian dormoĉambron.

La dormo estis al lia servo. Dek minutojn poste, li jam profunde dormis.

XIX. En Versailles

La frua printempo animis la aeron, la teron kaj la akvon. Fajna nebulo supreniris de la lago en tiu ĉi frua horo, vatante la poplojn kaj salikojn, sur kiuj naskiĝis la unuaj folioj, kovrante la kanojn ĉe la akvobordojn kaj la gazonon per arĝenta pulvoro. La altaj florantaj laburnoj lasis pendi sian flavan hararon, la kratagoj levis siajn novelzinajn bukedojn en la ĉielon, kiu estis ankoraŭ pala post la vintro. Du majestaj cignoj navigis sur la trankvila akvo de lago, semita per akvolilioj. La suno ankoraŭ ne estis videbla, sed neklara heleco, kvazaŭ hezi-tema radiado de la tagastro, kiu jam karesis la rustikan dekoracion de la domaro de Marie-Antoinette. La agrablaj domoj, la laktejo, la muelilo, tamen kadukiĝintaj post dudek jaroj da neglekto, ŝajnis rejuniĝi sub siaj pajlo-tegmentoj. Oni dirus, ke la reĝino, vestita en leĝera silko, kiu estis tiom amata kaj tiom malamata, estis elironta de la ŝafejo ĉe la brako de Fersen³⁸, sekvata de la frivola sinjorino de Lamballe, kies vivecaj okuloj ridetis...

«Mi vidis ŝin ĉi tie,» diris Napoleono, revante. « Tio estis en la aŭtuno de 1785. Mi havis tiam dek ses jarojn. Mi ĵus estis nomu-mita dua leŭtenanto, kaj mi estis aliĝonta al mia regimento en Valence. Akompanis min kamarado de mia promocio, Angobert, kiu estis mortigita en Arkolo en Italio. Ni estis surmetintaj niajn novajn uniformojn, kaj ni estis tre fieraj. La reĝino pasis proksime al ni, kaj ni respektoplene salutis ŝin. Ŝi respondis nin per leĝera kapsigno kaj daŭrigis sian pro-menadon, gaje parolante kun la senjoroj kaj la damoj, kiuj konsistigis la procesion. Ŝi ŝajnis al ni bela kaj majesta... Povra virino ! Kian finon ŝi estis havonta ! Ŝiaj malamikoj ĉiam kalumniis ŝin,

³⁷ Speco de tre regula horloĝo (neol.)

³⁸ Svedo, kies kompanion ŝi multe ŝatis.

nur ĉar ŝi estis Aŭstrino. Ili nomis ŝin : ‘*Chienne autrichienne*’ (Aŭstra hundino) kaj akuzis ŝin pri ĉiaj fifaroj. Sed mi ne povis kredi tion. Ĉu vi scias kial, Marie ? Pro la memoro pri tiu afabla signo kiun ŝi direktis al tiu malgranda, maldika juna oficiro en siaj grandaj botoj, kiu antaŭ nelonge finis siajn studojn kaj aspektis, kiel diris sinjorino Junot, kiel la botvestita kato... »

«Povra virino,» ripetis Marie.

Ekde la antaŭa tago ili estis en Versailles, okupante sur la Korto de la Cervoj la malnovajn, malgrandajn apartamentojn de reĝo Ludoviko XV. Ilin servis Constant kaj kelkaj aliaj fidindaj servistoj.

Ĉar tiel malmulte da tempo separis lin de lia nova edziĝo, Napoleono volis pasigi tie sen zorgoj kaj sen aferoj du tagojn kun Marie. Por li tio estis, antaŭ ol li estis daŭrigonta sian brilan karieron, kvazaŭ mallonga, sentimentala retiro. Donante al Marie tiun pruvon de lia amo, li ankaŭ volis protekti ŝin kontraŭ la necertaĵoj de la tagoj post lia proksima unio kun la Aŭstrino, kiuj timigis ŝin.

Tiun union Napoleono estis delikate anoncinta al ŝi, certigante ŝin, ke tiu geedziĝo pro monarĥiaj interesoj ne kaŭzos ŝanĝojn en ilia rilato.

«Mi estus volinta, » li diris, « kaj tio estis la deziro de mia koro, fari el vi mian edzinon. Sed mia Privata Konsilio elektis la arĥiduki-non. Oni certigis min, ke vi neniam akceptus divorci de via edzo pro religia konvinko, kaj ke mi devis pensi pri alia unio.”

«Ho !» ŝi diris

Tiu ‘ ho’ sonis preskaŭ kiel plendo. Sed la imperiestro ne aŭdis tion. Kaj tuj, pro boneco, pro nobleco, pro tiu gusto de sinofero, kiu ĉiam estis aperanta en ŝia naturo de kristanino kaj Slavino, Marie parolis ol li kun la celo forpreni de li ĉian rimorson.

« Mia kara Siro, » ŝi diris, iomete ridigiĝante, « vi bone agis. Por la Eklezio mi estas unuigita kun grafo Walewski, kaj kvankam mi grave pekis per mia amo al vi, mi devas resti lia edzino antaŭ Dio tiel longe ke li vivos. Kvankam mi iom suferas pro tio, “ kaj ŝia voĉo tremetis, sed tuj alprenis firman tonon, “mi komprenas la devigojn de la politiko, kaj mi estos feliĉa, se vi trovos feliĉecon en tiu geedzeco. Edziĝu do, Siro, sen maltrankviliĝi pro mi. Tiu juna princino, digna je vi, pli-altigos vian tronon, kaj donos al vi heredontojn por viaj kronoj. »

Ŝi povis diri nenion plu, ĉar forto mankis al ŝi. Sed tiuj kuraĝaj paroloj sufiĉis por naski en Napoleono profundan kvietecon. Li sentis sin

liberigita de timo, de pensoj, kiuj ofte maltrankviligis lin. Li denove sentis sin gaja. Li enspiris grandan kvanton da aero. La estonteco ŝajnis esti lia : li devis nur tuŝi ĝin por ekhavi ĝin. Samtempe, malgraŭ sia egoismo, sento de dankemo por Marie survenis lin

«Kvankam mi cedis al la ŝtatbezono,» li diris kun sincera elano, «almenaŭ mia koro restis fidela al vi. Neniam mi amis vin pli, mi kredas, neniam vi estis pli ol nun mia kara kompanino kaj mia amikino. Via abnegacio kompensas al mi la avidecon kaj malnoblecon, kiuj ĉirkaŭas min. Ĝi igas min denove kredi, ke ekzistas virtoj ĉe la homoj. Tial, mia kara Marie, mi donos al vi la plej belan markon de estimo kiu povas fierigi virinon. Vi gardis la kulton de via patrio, kaj pro amo al vi, mia unua tasko estos relevi ĝin, restabli ĝin en ĝia tuta antaŭa grandeco. Se vi donos al mi filon, mi ĵuras al vi, ke li estos la unua reĝo de la reunigita kaj regenerita Pollando !»

Granda kaj sankta ĝojo tremetigis Marie Walewska. Tiu granda promeso tuj forviŝis en ŝi ĉian tedon, bedaŭron kaj malĝojon. Ŝi ĵetis sin kontraŭ la bruston de la imperiestro, kiu longe kisis ŝin.

Elirinte el la domaro de Maria-Antŭaneta, ili promenis sub la verdiĝantaj arboj en la direkto de la palaco. Estis ankoraŭ malvarme. Atentoplena Napoleono relevis la larĝan kolumon de la kun pelto provizita *vitŝuro* de Marie. Ŝi dankis lin per rideto, kiu sombrigiĝis, kiam ŝi aŭdis tusi la imperiestron.

«Estas nenio. » diris Napoleono. «Mi ofte malvarmumas. Sed en mia familio ni havas solidajn pulmojn. Ni ne pereos pro tio »

Vidante ŝin maltrankviligita, li ekkris :

«Kio ? Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj iam finos ? Sed ĉu oni povas plendi, se oni postlasos senmortan nomon ?»

Ŝi deziris reiri al la palaco laŭ la plej mallonga vojo.

«Ne,» diris Napoleono, «mi certigas vin, ke tiu promeno en la kampara aero faras al mi multan bonon. Vi neniam venis al Versailles : mi volas montri al vi la parkon.»

Ili do reiris al la terasoj, al tiuj ĉiuj lokoj, kiujn iam hantis emociantaj aŭ famaj gastoj : la labirinto, la banujoj de Apollono, la kolonaro vidis ilin preterpasi. Leĝera kiel silfo, Marie, ĉe la brako de Napoleono, reguligis sin je la paŝoj de Napoleono.

Kiam ili estis grimpintaj laŭ la grandaj dezer-taj ŝtuparoj, ili haltis momenton antaŭ la grandioza panoramo : la verda tapiŝo, la basenoj,

tiam la kanalo en formo de kruco, finante en la malproksimo per gigantaj arboj, kiuj ŝajnis malfermi pordon al la horizonto. La lageto de la Svisoj maldekstre brilis sub sia krono de sombraj arbaroj.

Metinte sian malgrandan lornon antaŭ la dekstran okulon, la imperiestro studis tiun belan spektaklon. Lia imago de monarĥo estis frapita de la impona beleco, la mezurita potenco de tiu dekoracio. Ĉio en ĝi estis ordo, volo, grandeco. En tiu minuto la figuro de Ludoviko XIV okupis sian menson kun domina insistado.

«Li estis feliĉa,» li fine diris. «Li havis famajn prapatrojn. Neniu povis kontesti sian titolon. Tial li povis realigi, malgraŭ sia mez-bona inteligenteco, verkon de granda princo, nur per sia diligenta laboro kaj sia forta volo, dum mi, kiu havas eble dekfoje lian ŝtufon, ne estas certa, ke mi povos fari sulkon tiel profun-dan, kiel la sia. Venkoj kaj konkeroj estas esence fuĝemaj. Necesas fondi, kaj por fondi nenio valoras la generacioj da konstruistoj kiuj antaŭiris min. Mi estas bona kreanto, sed mi improvizas. Kiam Ludoviko XIV kreis, li nur daŭrigis kaj levis pli alten la konstruaĵojn de siaj antaŭuloj, kiujn li jam vidis kiel infano. Sed mi devis komenci de nenio. Mi ne disponas pri tradicio kiel bazo. Mi devas do krei por mi novan, solidan bazon.»

Ili daŭrigis sian promenadon. Ambaŭ silentis. Ili aŭdis nenian alian bruon, ol tiun de iliaj paŝoj sur la gruzo, la kriojn de birdoj, la mallaŭtan murmuradon de la folioj. La soleco esti milfoje pli dezerta kaj emocianta, ĉar ĉi tie iam loĝis homoj.

Ŝi komencis sperti lacecon pro la longa promenado. Malgraŭ la freŝa aero ŝiaj vangoj paliĝis. Ili sidiĝis sur benkon, kaŝitan en niĉo tondita en la arbustaro, kie la suno, finfine elirinta el la nebulo, faligis sur ilin sian varmon kiel humidan drapon.

Napoleono dolĉe premis la brakon de Marie kontraŭ la sian. Li estis fiksinta tiun momenton en sia menso por anonci al Marie novaĵon, kiu sendube estis doloriga aflikto por ŝi, sed kiun li ne povis prokrasti pli longe.

«Marie, mi pensas, ke ni devas separi nin por kelkaj semajnoj, eble kelkaj monatoj...»

«Ĉu separi nin...?»

Ŝi rigardis lin timigite kiel infano, kiu nokte penetras en malluman kelon. Kiel ajn rezignacia ŝi estis, ŝi tute ne antaŭvidis tion! Tio estis la suprema seniluziigo...

«Separi nin!...»

«Ne devas saĝe rezoni, mia amikino. La arĥidukino de Vieno estas venonta. La malbonvoluloj – kaj estas multaj ĉirkaŭ ni! – baldaŭ informus ŝin pri niaj rilatoj, se vi troviĝus ankoraŭ en Parizo ĉe ŝia alveno. Precipe via gravedeco povus ofendi ŝin. Pripensu, kion povus signifi por la filino de imperiestro Francisko tia rivelado la morgaŭon de sia edziniĝo. Ŝi neniam pardonus al mi tiun ofendon. Nia unio estas politika, kaj mia tuta politiko suferus pro tio.»

Ŝi forturnis la kapon por ne montri al li la malĝojan espimon sur sia vizaĝo kaj murmuris:

«Mi faros ĉion kion vi decidis, Napoleono.»

«Jen kiel ni povus aranĝi tion. Vi foriros post kelkaj tagoj kun via frato kaj via bofratino al banurbo: Plombières, Aix aŭ Baden, laŭ via elekto. Vi restos tie la tutan tempon kiu separos vin de via akuŝo. Kaj kiam vi estos doninta al mi dikan filinon aŭ belan filon – provu akuŝi knabon,» li aldiris bonkore ride-tante, «vi revenos al Parizo, kie mi instalos vin pli lukse ol en la strato Houssaye. Mi volas, ke vi estos ĉirkaŭita de ĉio kion povas deziri virino de via kvalito.»

«Se mi estas proksime de vi,» ŝi replikis, «la resto estas egala al mi.»

Kaj ŝi eksilentis. Pensoj interŝokis sub ŝia frunto. Ŝi komprenis, ke ŝi devos malproksimiĝi pro dececo. Sed kiel sola ŝi estis sentonta sin en nekonata urbo, dum li, Napoleono estis kondukonto la arĥidukinon al altaro starigita en galerio en la palaco Louvre! Ŝi volis repuŝi la sekretan, vivecan ĵaluzecon, kiu igis ŝin ruĝiĝi, sed ruĝo ne volis malaperi, farante ŝian koron inerta kaj amara...

Ideo tamen naskiĝis el tiu konfuzeco.

«Eble, se vi ne trovos tion malbona ideo, mi povus reiri al mia hejmo en Walowice, kie mi sentus min pli komforta. Mi petus mian patron asisti min ĉe mia akuŝo. Por la grafo la ofendo restus pli kaŝita, ĉar la naskiĝo restus sekreta. Cetere mia infano naskiĝus en Pollando, kio ankaŭ gravas.»

«Faru kion vi volas. Kiam vi estas kontenta, mi aprobos ĉion. Cetere vi tute pravas. Iru al Walowice. Ne estas indiferece, ke mia filo naskiĝos tie, ĉar li estas destinata por regi la Polojn.»

Kaj denove li prenis ŝin inter siaj brakoj. Melankolie ŝi ridetis al li. Li amis ŝin: ŝi estis certa pri tio. Li volis, ke ŝi estu feliĉa, sed kiel li estus povinta protekti ŝin kontraŭ sen-iluziigoj kaj malĝojoj? Kiel radia ŝajnis al ŝi la vivo antaŭ

kelkaj monatoj, kaj kiel nebrila ĝi estis nun malgraŭ lia belega promeso !

La imperiestro ne plu parolis, superfortita de kompatato ĉe la penso, ke tiun virinon, tiel belan, tiel bonan kaj sinceran, kiu akceptis ĉion de li, kiu forlasis ĉion por li, li devis forigi por kelka tempo por permesi al li sekvi sian brilan vojon...

Unuafoje ŝi sentis moviĝi en sia korpo la infanon de Napoleono.

XX. Adiaŭo

La momento de ŝia foriro estas venonta. La antaŭvesperon ŝi adiaŭas sian domon kaj la ĝardenon, kaj tiam ŝi rifuĝas en la malgrandan buduaron, tapetitan per blanka kaŝmiro, kie troviĝas ĉiuj objektoj kiuj agrabligis sian vivon : la skribtablo, sur kiu ŝi skribis tiom da leteretoj al Napoleono ; la pentrostablo, sur kiu ŝi pentris tiom da fojoj per malsperta mano lian portreton; la tapiŝo, sur kiun ili tiel ofte sidis flankon ĉe flanko rigardante la fajron, parolante aŭ silentante – ĉar eĉ silento unuigis iliajn korojn.

Tra la fenestrojn enpenetras la pala krepusko. La tagoj plilongiĝas en tiu komenco de marto, kaj la ĉielo estas ankoraŭ hela. De tie li montris al ŝi sian stelon. Ĉu ŝi vidos ĝin brili ankoraŭfoje antaŭ ol foriri ? Ĉu ŝi retrovos ĝin inter la malvarmoj nuboj en la nordo, kie ankoraŭ regas vintro ? Marie tremetas pensante pri la nigra kastelo de Walewice, kiu situas inter marĉoj kaj pinarbaroj, kie ŝi devos vivi, atendantante kion ? Ĉu lian revenon ? Ŝi esperas tion, sed ve, tiom de seniluziigoj jam tiom vundis ŝin, ke ŝi ne plu kuraĝas fari planojn, ke ŝi sentas sin nur malforta estulino kuntrenata de la ondoj de mistera maro.

Ĉu ŝi iam revenos ? Kiu scias ? La imperiestro estas sincera. Li ne volas senigi ŝin de ŝia infano. Sed per mil indicoj, kiuj ne povas erarigi virinon, ŝi divenas, ke dum la lastaj semajnoj granda orgojlo venis ŝveligi la koron de Napoleono. Ankoraŭ neniam li tiom sentis sian grandecon. La fakto ke li baldaŭ eniros la ekskluzivan rondon de la reĝoj kaj imperiestroj, miksante sian sangan de Korsika parve-nuo kun la sango de la Habsburgoj-Lorenanoj, suprenigante sian dinastion ĝis Karlo la Granda, kiun li konsideris kiel sian grandan modelon kaj kies kolosa bildo jam dek jarojn, laŭ siaj propraj vortoj, persekutis lin.

Kiu sciis, ĉu tiu ebrieco, kiun li malbone kaŝas, ne daŭros tiel longe, kiel oni kredas ? Ĉu

pli forte kaptanta influo, imputenda al lia nova familia feliĉeco, sukcedante liajn politi-kajn revojn, ne ekregos lin iom post iom ? Ĉu amo, aŭ almenaŭ geedzeca feliĉeco, povos unuigi kun lia senlima ambicio ? Ĉu li ne estos influata de la granda prestiĝo de sia juna, aminda kaj bela edzino ? Marie foriras, la alia venas. La lukto estos malegala, kiam unu estas tiel malproksime, la alia tiel proksime !

Marie est vekita el tiuj sombraj konsideroj de servisto kiu venas anonci ŝin, ke la duko de Otranto igas demandi, ĉu li povas prezenti al ŝi siajn servojn.

«Mi estas okupita. Mi ne povas akcepti lin. Petu lin skribi al mi.»

Kion li venas fari ? Ĉu li volas ankoraŭ tormenti ŝin ? Kion li bezonas de ŝi en tiu ĉi horo ? Ŝi estas forironta. Li antaŭe minacis ŝin per tio, ke ŝi devas foriri.

Pri la agadoj de Fouché rilate al ŝi, ŝi silentis pro speco de pudoro, ne nur al Napoleono, sed ankaŭ al Duroc, kiu informis ŝin pri la sinteno de la duko de Otranto en la Konsilio. Ŝi diris nur al sia amiko Duroc, kiom ŝi timas pro la imperiestro la influon de tiu 'malbona viro'.

«Estu trankvila,» respondis al ŝi la grand-marŝalon, kiu legis en la pensoj de Napoleono : liaj tagoj estas nombritaj.»

Ŝi ne kapablas malami, sed Fouché inspiras al ŝi granda antipation. Se tio estas en ŝia povo, ŝi intencas neniam plu renkonti lin.

La servisto revenas.

«La duko ŝarĝis min diri al Via Ekscelenco, ke lia vizito havas nenian alian celon ol saluti Ŝin antaŭ Ŝia foriro al Pollando kaj deziri al Ŝi bonan vojaĝon.»

Si kredas, ke li volas mensogi al ŝi pri sia rolo dum la lastaj eventoj. Sed ŝi eraras. Fouché ne estas unu el tiuj homoj kiuj estas tute amikoj aŭ tute malamikoj. Lia kompleksa naturo havas malantaŭajn ĉambrojn. Ĝi ofte konas ellasilojn de sentoj. Ekde kiam li elimini-nis la grafion per sia hipokrita manovro, li sentas por ŝi tiun estimon, kiun li donas nur al altmoralaj karakteroj. Li eĉ spertas bedaŭron por ŝi. Eble sinjorino Walewska ne meritis, ke li rektigis kontraŭ ŝi la potencon de sia genio. La batalo estis tro malegala inter tiu senkulpa digna virino kaj lia ruzeco. Ŝi estas venkita kaj li kredas, ke ŝi foriros por ĉiam. Li fuŝis ŝian vivon, sed li sentas nenian kontentecon pri tio. Li ne denove venis al la strato Houssaye por fanfaroni, sed pro speco de malklara, nedifine-bla respekto. La rifuzo de Marie akcepti lin, tute ne mirigas lin.

Ŝi pravas. Kun iomete klinita kapo li forlasas la hotelon.

La princino Jablonska estas nun ĉe ŝi. Ili ŝatas sin reciproke, kvankam ili estas senfine distaj unu de alia koncerne aĝon, karakteron kaj gustojn. La princino, kiu estas la plej juna fratino de grafo Walewski, elektis la flankon de Marie ekde la komenco de ŝia rilato kun Napoleono. Ŝi pasigas la duonon de la jaro en Parizo, kie ŝi luis domon. En periodoj de dubo kaj malĝojo ŝi konsolas sian bofratinon per sia agrabla ĉeesto kaj konfuza parolado. Sub ŝia gvido Marie devas fari la vojaĝon al Pollando, kie, laŭ la eksplicita deziro de la imperiestro, ŝi restos ĝis post la akuŝo.

«La berleno³⁹ jam alvenis, » diras sinjorino Jablonska, « ĝi estas tirata de ses ĉevaloj el la ĉevaloj de la imperiestro. Oni estas ŝarĝanta la pakajon. Ĉu vi havas nenion alian kunportendan, Marie? »

Marie nee skuas la kapon.

«Vi devas prepari vin, ĉar jam estas malfrue, kaj la imperiestro estas venonta.»

Marie lasas sin vesti de sia bofratino kaj la fidela Daŝa per vasta pelerino kaj velura turbano. Ŝi ĵetis ankoraŭ rigardon sur ĉiujn aferojn, kiuj vidis ŝin feliĉa ĉi tie kaj kiuj ne povas sekvi ŝin, kaj malsupreniras al la salono.

Napoleono, akompanata de Duroc eniras post kelkaj momentoj. Li longe premas Marie kontraŭ sian bruston, tiam, sidigante ĉe ŝian flankon, detale informiĝas pri ŝia sano, donas al ŝi konsilojn kaj igas ŝin ankoraŭfoje promesi skribi al li ĉiun tagon.

«Pacienciĝu, mia eta Marie, nia separo ŝanĝos nenion en mi. Ne pensu pri aferoj, kiuj povus konfuzi kaj malĝojigi vin, pensu pri nia amo. Ba, temas pri separo de nur kelkaj monatoj ! Mi revokos vin tre baldaŭ...»

«Aĥ, mia kara Siro, mi deziras tion per ĉiuj miaj fortoj. Ĉiu horo trovos min preta reveni. Mi malproksimiĝos, ĉar vi volas tion. Sed tiel longe ke mi ne povos vidi vin, mi malĝojos.»

«Kial ? Ĉu vi ne fidus min ? Mi amas vin, Marie, kaj mi ne povas longe vivi sen vi. Tiu geedziĝo estas necesa, vi scias tion, sed ĝi lasas mian koron indiferenta. Nur al vi sola mi restos koralligita. Ĉu vi dubus pri via baldaŭa reveno ? Ĉu vi volas, ke mi ĵuras al vi tion ? »

Ŝi tenere premas lian manon.

«Ne, Siro, ne ĵuru. Mi preferas ŝuldi mian revenon nur al la deziro de via koro kaj ne al konscienca skrupulo. Estu trankvila : via eta

Marie estos sufiĉe prudenta por plaĉi al vi kaj tute ne volas pligrandigi viajn zorgojn.»

Ŝi staras antaŭ li, preta por forlasi la hotelon. Li tiras ŝin al la fenestro, tra kiun falas resto de la tago, kaj tenante ŝiajn brakojn, li rigardas ŝin. Unu plian fojon, li rigardas ŝian altan senfaltan frunton, ŝiajn fajnajn brovojn, ŝiajn grandajn blujajn revemajn okulojn, en kiuj li tiel ofte serĉis la reflektajn de ŝia amo. Li vidas ŝian buŝon similan al ruĝa rozo, la fajnan lanugon super ŝia supra lipo, la leĝere bluetajn vejnojn sur ŝiaj vangoj. Kiom da juneco, dolĉeco kaj vera sentemo ! Preta lasi eskapi ĉion ĉi, kion li tiom amas, li denove sentas supreniri tenerecon en li... Unu lasta ĉirkaŭ- brako. Per imensa streĉo Marie repuŝas siajn larmojn kaj kuraĝe provas rideti. Tiam, apogante sin sur la imperiestron, ŝi malsupreniras la ŝtupojn de la perono kaj haltas antaŭ la gran-da veturilo, kiu devas veturigi ŝin al Pollando. Ŝi deziras, ke unue grimpu en ĝin la princino, sia frato kaj Daŝa, kaj tendas al Duroc manon kiu ne tremas.

«Adiaŭ, mia amiko,» ŝi murmuris. «Ankaŭ vi, ne forgesu min.»

Emociite, la grandmarŝalo kliniĝas, nekapa- bla respondi ion al tiu simplaj vortoj, en kiu amara noto apenaŭ sentebblas. Kaj siavice Marie sidigas en la berlenon. La postiljonoj klakigas siajn vipojn, dum ŝi turnas la kapon al la fenestro de la pordo.

«Ĝis revido, Marie, ĝis revido,» krias Napoleono kun malkovrita kapo.

Per la mano li salutas ŝin. Tiam bruske li faras kelkajn paŝojn malantaŭen. La peza maŝino ekmoviĝas kaj la ses fortaj ĉevaloj komencas galopi. Ĉe la angulo de la strato malgranda mano agitas poŝtukon tra la fenestro de la berleno. Nur Duroc vidas tion. La imperiestro resurmetas sian ĉapelon, post kiam li distrite brosis ĝin per sia maniko. Preninte la brakon de la grandmarŝalo, li paŝas al sia veturilo, kiu atendas lin en la sakstrateto. Kaj enpaŝante ĝin, li diras, kunpremante la dentojn, por regi sian emociion :

«Ĉu vi vidas, Duroc ? Ŝi estas la sola virino kiu vere amas min...»

Li profunde suspiras.

«Kaj nun ŝi foriras, ĉar tio necesas, » li diras. « Ni reiru al nia laboro.»

*
* *

³⁹ Speco de granda, peza veturilo.

Tra la nokto la berlino veturas sur la sonora pavimo de vojo en Germanio. Laczinski dormas. Por eskapi al la bablado de la princino, Marie faldas vian delikatan kolon kaj fermas la okulojn kvazaŭ por dormi.

Ŝi pensas. Ŝi memoras tiu deliran tagon, kiam Napoleon alvenis en Varsovio kaj ŝi ĵetis florojn al li ekde la balkono. Nur tri jaroj pasis ekde tiam. Kaj nun ŝi foriras, spertinte la plej fortan amon, kiu regas la koron kaj la menson de la mastro de la homoj. En tiu momento lia kuraĝo forlasas ŝin. Imensa, nevenkebla bedaŭ-ro invadas ŝin. Se ŝi foriras, ŝi ŝuldas pro tio. Ŝi estis fola, orgojla ! Ŝi estus povinta resti. Por tio ŝi estis devonta nur montri afablan mienon al Fouché. Sed ŝi repuŝis lin kaj starisgis kontraŭ si. Ha! Ŝia delikateco, siaj virinaj skrupuloj... Kiom gravis la intrigoj de la duko de Otranto ? Ŝi ne volis kunlabori kun li, mal-konsilite fari tion far sia instinkta malfido, kaj ĉar ŝi konis la reputacion de la viro. Sed nur ŝajnigante aŭskulti lin, ŝi estus nun ankoraŭ ĉe Napoleono kiel lia kompanino por ĉiam, lia edzino...

Dum ŝi foriras al loko je okcent mejloj de Francio, al tre necerta estonteco, lasante en Parizo la viron, kiun ŝi amas, okupiĝi pri la preparo de la plej splenda geedziĉo. Li revokos ŝin, li diris. Sed se li ne revokos ŝin ? Se, edziĝinta al la arĥidukino, li forgesas Marie kaj sian infanon ? Ŝi scias, ke li disponas pri la kapablon ĉiam renoviĝi. Ĉiutage li renaskiĝas. Ĉiu mateno faras el lia animo novan paĝon. Tiel longe ke li estis kun ŝi, ŝi fidis la sorton, kiun li preparis por ŝi. Sed nun ŝi jam estas tiel for de li. Ŝi sentas sin nun nur povra, forlasita virino en la plej dusenca situacio, sen edzo, sen konsilo, sen subteno.

Dum la nokto en la berlino Laszinski kaj la princino dormas. Sola Daŝa maldormas. Ŝiaj dolĉaj okuloj ne forlasas sian mastrinon, kiun ŝi edukis kaj kies mutan malĝojon ŝi partumas pli ol iu alia.

Senforta, Marie kliniĝas al ŝi, metas sian kapon sur ŝian ŝultron, kiel kiam ŝi estis malgranda filino kaj metis sian glatan vangon kontraŭ la sulketan vangon de Daŝa. Konvulsia movo de ŝia tuta korpo skuas ŝin. Sed ŝi ne ploras. Ŝi ne volas plori. Tion ŝi promesis al Napoleono. Kaj malrapide ŝi denove sukcesas regi sin. Ŝi rektiĝas. Ŝi estos nek malkuraĝa, nek egoisma. Ŝi restos digna je li, digna de ilia amo, en kiu ne miksiĝas neniu etmensa penso. Ŝi restos pacienca kaj atendos.

Ŝi signas sin kaj komencas preĝon. La heleco de la brila luno, kiu blankigas la vojon, pene-

tras tra la vitroj, karesas ŝian vizaĝon kaj faras ŝin tiel pala, ke, falinta sur la kusenojn, ŝi similas al juna mortintino, tiel ke Daŝa, timiĝas kaj prenas ŝian manon per la sia.

Dum mallonga halto en Epernay, oni ŝanĝas la ĉevalojn kaj reforiras. La sekvantan matenon oni estas en Vitry. La veturilo haltas antaŭ la poŝtoŝeĉejo. La malgranda urbo estas ornamita per flagoj. Sur la placo leviĝas ligna triumf-arko, kiun laboristoj estas ornamantaj per kverkaj kaj pinaj branĉoj... Marie, tute rigidiĝinta, elpaŝas kun la princino por ripozi iomete kaj preni leĝeran manĝon, dum oni rejungas la ĉevalojn. Kaj distrita, ŝi demandas al la gastejestrino, pro kiu festo oni flagis la urbeton.

«Tion oni faris por honorigi la novan imperiestrion, kiu alvenos morgaŭ.»

«Estas vere,» murmuris Marie. «Morgaŭ ŝi alvenos.»

Ŝi mallevas sian vualon kaj regrimpas en la veturilon. Per sufokita voĉo ŝi diras al princino Jablonowska:

«Ni reekveturu. Mi ne volas resti ĉi tie.»

Kaj, ne plu eltenante la situacion, ŝi esploras.

XXI. La insulo Elbo

La loko estas majesta. Sur la pinto de la monto troviĝas la ruinoj de antikva templo de Jupitero. Vera nido de aglo, de kie la okulo povas atingi la nedefinitan horizonton de la Tirena Maro. La tuta insulo ŝajnas dekliva ebenaĵo kun sia nuda spino, siaj torentoj, arbaregoj, vinberejoj, vojoj kaj havenoj.

«Rigardu, Marie,» diras la imperiestro. «La ĉielo estas klara : oni povas vidi Italion.»

Ŝi turnas la okulojn orienten. Klara griza linio supreniras en la bluan de la ĉielo. Tie troviĝas la Apenenoj de Toskano. Malantaŭ ili troviĝas la valo de la rivero Arno kaj Florenco. Kiel proksima ŝajnas la kontinento ! Kiel facile oni povis atingi ĝin ! Sed tio estas nur Italio. Francio estas pli for.

Ambaŭ, Marie kaj Napoleono, surĉevale reprenas la mallarĝan padon, kiu kondukas de la Monte Giove (Monto de Jupitero), supro de la insulo, al la Ermitejo. Inter la oranĝaj arba-retoj oni divenas la rozkolorajn tegmentojn de Marciana.

La imperiestro estas gaja. Ekde kiam lia amikino tute sekrete alvenis la antaŭan vesperon, li, kiu montris sin silentema la antaŭajn tagojn, ŝajnis parolema kaj agitita de la bezono je movado. Apenaŭ vekite, Marie devis vesti sin kaj sekvi lin al la bonodoranta montaro, de kie

li volis montri al ŝi la panoramon de sia malgranda, sed bela imperio. Marie atendis sin al elverŝoj de tenereco, sed nenio tia okazis. Kun ĝojo li vidis sian filon, la malgrandan Aleksandron, ĉirkaŭbrakis la infanon kaj lian patrinon, kaj tiam parolis pri mil aferoj en strange indiferenta tono, kvazaŭ okazis nenio de la imensa katastrofo, kiu ŝokis la tutan mondon kaj faris el la nova Karlo la Granda malgrandan Italan princon, al kiu restis nur la titolo imperiestro...

Grandmarŝalo Bertrand sekvas ilin je mallonga distanco. Li estas la sukcedinto de Duroc, kiu mortis en Wurtzen en 1813 inter la brakoj de sia mastro. Marie ne povas vidi Bertrand sen memori la tiel sinceran kaj karan amikon.

«Ha, se Duroc estus tie ! Kiel malpli soleca sentus sin Napoleono !» ŝi pensis.

Antaŭ la Ermitejo, povra kabano sub altaj kastanujoj, ili elseliĝis, Marie ĉiam leĝere, Napoleono peze. La ĉevalo rapide lacigas lin. Li estas dika. Lia ventro streĉas la veŝton el blanka kaŝmiro sub la uniformo de la gvardiaj ĉasistoj. Lia vizaĝo estas ankoraŭ pli pala, kvazaŭ el marmoro. Liaj haroj maloftiĝas. Sed li gardis la junecan rideton, kiu dolĉigas la rigoran rigardon de liaj profundaj malhelaj okuloj.

Ankaŭ Marie ŝanĝiĝis. Ŝi havas nun dudek ses jarojn. Ŝi ne plu estas la delikata feino el la nordo, kiu aperis en 1808 antaŭ la maltran-kvila rigardo de Joséphine. Malpli fragila, ŝi nun estas pli virino, ŝia fajna rozkolora vizaĝo estas pli plena kaj ŝiaj bluaj okuloj alprenis novan gravecon. Ŝi silentas pli ol antaŭe.

Ekde sia reveno en Francion kelkajn monatojn post la naskiĝo de Aleksandro, ŝi vivis tiel retiriĝinta kiel antaŭe, ĉar ŝi amis la ombro, en kiu ŝi paŝigis sian tagojn, kiu estis la ombro de imperiestro. Tiuj kvar jaroj, dum kiuj la brila imperio disŝiriĝis kaj tiam kolapsis, ŝi restis proksime de Napoleono, kiun lia dua geedzeco, senkolora kaj malvarma, ne povis malligi de Marie. Necesis la katastrofo en Rusio, la milito transportita al Francio kaj fine lia abdiko, kiuj separis ilin.

Sed ekde kiam la imperiestro estis instalita sur la insulo Elbo, Marie havis nur unu penson : iri al li kaj ne plu forlasi lin. Per ruzo kaj senpapiroj ŝi sekrete luis malgrandan ŝipon, enŝpiĝis kun sia filo sur furioza maro kaj alteriĝis sur la insulo en momento kiam neniu

atendis ŝin. Nun ŝi estas tie, kaj ŝi estas feliĉa. Sed revidante Napoleonon, ŝia emocio estis tiel granda, ke ŝiaj kruroj malfortiĝis, kaj ŝi preskaŭ falis, dum ŝi metis manon sur sian koron, kiu sovaĝe batis.

La tagmanĝo estas surtabligita en la tendo, kiun Napoleono igis starigi proksime de la Ermitejo kaj kie li dormis tiun nokton. Estis militista tendo kun ŝtofaj vandoj, kies solaj ornamoj estis, alkroĉigitaj super lia militista lito, la sabro de Desaix⁴⁰, kiun li uzis en Marengo, kaj la flago de la honoraj velitoj⁴¹.

Enirante Marie demetas sian mantelon, kiun ricevas generalo Bertrand. Ŝi estas vestita pli bele ol kutime por plaĉi al sia amiko : longa robo el griza fajo kun zono sub la mamoj, punta kapeleno⁴² sur la kapo kaj ermenfela skarpo sur la ŝultroj, ĉar pro la vento de la maro, eĉ sub bela, blua ĉielo, la tagoj en sep-tembro jam estas malvarmetaj. Ŝi ankaŭ surmetis juvelojn.

Ili sidiĝas antaŭ la eta tablo, sur kiu oni metis la manĝilarojn. Ne plu estas la orkoloraj kloŝoj de la Tuilerioj, kronitaj de la imperiestra aglo, sed simplaj procelanaj pladoj. Por vivi kun la soldatoj, kiuj akompanis lin ĉi tien, Napoleono vendis sian argentajon.

Marchand, la nova ĉambristo, diligente servas ĉe la tablo. Li anstataŭas Constant, kiu perfidis Napoleonon dum la disfalo de la imperio en Fontainebleau. Bertrand staras malantaŭ la seĝo de Napoleono.

La etiketo de la imperiestraj palacoj daŭre regas en tiu ĉi priridinda kortego. Napoleono eble ne plu deziras tion, sed liaj servistoj faras tion por li. Sub tiu etiketo, pli ol dum la feliĉaj tagoj de la Franca imperio, oni divenas ilian imensan respekton, pligrandigitan de la tuta emocio kaŭzita de la disfalo. La potenco malaperis, sed la gloro restis, pli granda ol iam antaŭe kaj jam legenda. Ĉirkaŭ la fama vivanto ŝvebas etoso de morto.

Napoleono manĝas rapide kun apetito, prenante senorde ion el unu plado, tiam ion el alia, laŭ la grenadista maniero. Maria apenaŭ tuŝas sian teleron.

«Tio ĉi memorigas min pri Finckenstein, » diras la imperiestro.

Kaj dum li ofertas al Marie flavan, magran birdaĵon, li aldiras ridante :

«Sed la kokinoj estis pli dikaj tie for.»

Finckenstein, la komenco de ilia amo !

⁴⁰ Generalo de Napoleono, kies alveno en Marengo decide kontribuis al ties venko. Badaŭrinde li estis mortigita fine de la batalo.

⁴¹ Korpuso de elektitaj junuloj, fondita de Napoleono en sia gvardio por formi estontajn gradigitojn.

⁴² Speco de kaptuko.

Marie, kiu provas resti kvieta, ridetas por imiti la malinteresiĝon de la imperiestro, kiu ŝajnas al ŝi nur fasado.

Napoleono rakontas pri siaj planoj por plibeligi la insulon, kiun la suverenoj konfidis al li. Li tute ne parolas pri Francio, sed de la domo kiun li konstruis en Port-Ferrajo, de la terasoj, kiujn li igas konstrui de siaj grenadistoj por ebligi sian malgrandan ĉefurbon defendi sin, pri la projekto de salproduktado. Li ne plu estas la imperiestro, la mastro de la mondo, kiu parolas, sed aktiva kaj prudenta proprietulo, kiu valorigas sian domonon.

Kiam fine venas la kafo, li interfrotas siajn manojn.

«Venigu la junan grafon,» li diras al Marchand.

Kaj preskaŭ tuj, kondukita de Daŝa, eniras lia filo, la filo de Maria, la malgranda Alexandre. Napoleono metas lin sur siajn genuojn, kisas lian frunton kaj subite, for fari al li ŝercon, smiraĉas lin per kremo.

La infano tute en estas timigita. Cetere la infanoj ĉiam amis Napoleonon, ĉar li amas ilin. La incitaĵoj amuzas la vivecan kaj ludeman knabeton, kiu ridas, saltas kaj stamfetas sur la genuojn de sia patro, kiun lia konduto amuzas. La okuloj estas tiuj de sia patrino, eble pli vivecaj ol la ŝiaj. Li havas blondajn harojn. Sed de Napoleono li havas la rondan formon de la kapo, la matan vizaĝkoloron kaj la buŝon de la Bonapart-oj. Filo de tiel dolĉa patrino, li havas pli decideman kaj preskaŭ ordoneman karakteron. Kiam li alvenis la antaŭen vesperon, generalo Bertrand demandis lin, ĉu li ne volas diri saluton al li.

«Ne,» diris la infano, ne antaŭ ol saluti la imperiestron. »

Kaj post skoldeto de Marie, li eksilentis kaj kunpremis la lipojn.

Napoleono amuziĝas ankoraŭ momenton kun li kaj tiam demandas lin :

«Kiom da jaroj vi havas, Aleksandre ?»

«Kvar jarojn kaj duonon.»

«Kie vi naskiĝis?»

«En Pollando.»

«i do estas Polo. »

«Ne, mi volas esti Franco, kiel Napoleono. »

«Kion vi faros, kiam vi estas granda ? »

«Mi militos kiel Napoleono. »

Per la sama rigardo Marie ĉirkaŭbrakas la patron kaj la filon : la homon de la fortuna kaj la senkulpan estuleton. La imperiestro karesas la malgrandan kapon.

«Ĉu vi do amas Napoleonon ?»

«Ho jes!» ekkrias la infano, kunfrapante la manojn.

«Kaj kial vi amas lin ? »

«Ĉar li estas mia paĉjo, kaj ĉar panjo diris al mi, ke mi devas ami lin.»

La malgrandaj brakoj ĉirkaŭas la kolon de la imperiestro kaj freŝa buŝo kisas lin. Napoleono sentas sin teneriĝi, sed tion li ne volas. Li volas paroli al Marie sen atestantoj.

«Marchand, forkonduki la infanon, kaj oni lasu nin solaj.»

Aleksandre, kiu ne obeas al aliaj personoj, obeas al sia patro. Li glitas de liaj genuoj kaj lasas sin kuntreni de la ĉambriŝto, kaj en la aperturo de la tendo li sendas al Napoleono kaj al Marie unu, du, tri kisojn.

*

* *

Marie ĵetis sin inter la brakojn de la imperiestro kaj, se li ne retenus ŝin, ŝi glitus sur siajn genuojn.

«Marie, kara infano, kio estas al vi ? Kio ? Vi ploras... Ĉu vi do ne estas feliĉa kun mi ?»

Kun forta emocio ŝi kisas liajn manojn, kovrante ilin per siaj varmaj larmoj. Ŝia buŝo ripetas apenaŭ kompreneblajn vortojn.

«Napoleono, Napoleono, gardu nin ĉi tie!»

Li skuis la kapon sen respondi.

Ŝi releviĝas, denove prenas liajn manojn, forte premas ilin kaj kun plifirmigita voĉo ŝi diras :

«Mia kara Siro, ne forsendas nin. Lasu nin restadi ĉi tie. Vi estas tiel sola. Vi vidis nin nur, kiam vi deziras tion. Oni certe trovas por mi dometon sur la insulo, kie mi vivos nerimarkite kaj de kiu mi kuros al vi ĉe la unua voko. Neniu scios tion, krom vi. Mi estos via servistino. Diru al mi, Napoleono, ke vi konsentas.»

La imperiestro dolĉe liberigas sin el ŝiaj brakoj kaj sidigas ŝin.

«Mi ne kredas, ke tiu vivo ĉi tie estos ebla por vi. »

«Kial do ne, mia kara Siro ? Nenio revokas min al Francio. Mi estas libera hodiaŭ. Mi tute apartenas al vi. Nenio plu povos nin separi.»

«Mi scias,» murmuris Napoleono.

Marie nun estas libera virino antaŭ Dio. Antaŭ du monatoj ŝia edzo, la grafo Walewski, mortis en Romo, postlasante leteron, en kiu li, senarmigite per la sorto kaj digneco de sia edzino, pardonas ŝin kaj sendas al ŝi sian benon.

«Ne,» ripetis Napoleono, «tio ne estas ebla. Nek por vi, nek por mi. Tie ĉi oni scias ĉion. La insulo estas kvazaŭ granda vilaĝo. La imperiestro estus informita pri nia rilato...»

«La imperiestrino !...» ekkrias Marie per tia amara tono, ke ŝi mem estas frapita de ĝi, kaj eksilentas

Kion ŝi povus diri ? Li sendube ne scias, ke Marie-Louise, tiu malkuraĝa kaj mense limigita virino, kiun li kredis alligi al si per tiom da komplezaĵoj, ne nur perfidis la imperiestron, sed primokis lin, dum ŝia filo, la reĝo de Romo, estas en Vieno kaj estas ne pli ol malgranda arĥiduko, la honto de la Habsburgoj kaj la mokobjekto de Eŭropo, dum lia patrino restadas en Svislando kun ŝia amanto !

Estas vere : li ankoraŭ ne scias tion. Jam kvar monatoj li estas sen novaĵoj. Unu momento, la antaŭvesperon, kiam oni anoncis al li la alvenon sur la strando de Marciana de ŝipeto alportanta du virinojn kaj infanon, li saltis pro ĝojo, kredante, ke temas pri la imperiestrino kun la malgranda reĝo de Romo, kiuj finfine aliĝis al li. Sed generalo Bertrand diris al li, ke ne estas ili kiuj alvenis.

«Estas do Marie, » murmuris Napoleono, fariĝante tre pala. «Ha, tiu nobla kaj fidela koro !... Sed kiom mi estus doninta, por ke estu la alia !»

La alian, la imperiestrion, li ne amis, kaj neniam povis ami. Tre baldaŭ, ekde la unuaj monatoj de ilia geedzeco, li estis rebatita kaj senluziigita de la spirita povreco de la granda Aŭstra pupo. Sed la orgojlo, kiu estis la bazo de ilia geedzeco, retenis en li ion kvazaŭ mira-ĝon, respekton. Marie-Louise estas la generantino de lia legitima linio, la patrino de la heredonto de liaj kronoj. Tio sufiĉas al li por ke la unio restu sankta por li. Kaj nun, dum li sidas sola sur sia roko, liaj pensoj iras al ŝi.

Silento ekstis inter ambaŭ. Por rompi ĝin, Marie volas ankoraŭ insisti.

«Napoleono... »

Sed li faras al ŝi signon ne plu paroli. Lia decido estas firma. Kiel ajn emociita de ŝia dediĉiteco, li ne akceptas ŝian proponon. Kaj ŝi, por kiu tiu ofero signifus la plej grandan feliĉon, kaj kiu kutimas cedi al li en ĉio, klinas la kapon. La imperiestro tamen diras :

«Via ĉeesto estas utila por mi aliloke. Forirante de tie ĉi, vi portos sekretan leteron al Murat. Mi havas planon... Vi konos ĝin poste... Sed unue mi atendas de vi servon. Mi scias tre malmulte, tre malbone, kio okazas en Francio. Unuj el miaj informantoj deziras mian revenon, priskribante la situacion de la lando sub la Burbonoj en la plej nigraj koloroj. La aliaj,

kontraŭe, konfirmas, ke la lando estas kutimiĝanta al la novaj mastroj. Vi, Marie diros al ili, kio vere okazas tie.»

Li fidas ŝin, ŝian fajnon menson, ŝian maturan intelekton kaj precipe la tutan foreston de kalkulado ĉe ŝi.

Marie levas la okulojn, iomete konsolite.

«Vi devas scii multajn aferojn. Vi pasis tra Parizo, ĉu ne ? »

«Jes, mia kara Siro. »

«Kion oni diras pri mi?»

«Francio sentas bedaŭron pro vi. La popolo estas submetita, sed ĝi ne estas kontenta. La Kortego insultas ĝiajn sentojn, volante forviŝi la memoron de via regno kaj la akiraĵojn de la Revolucio...»

«La stultuloj ! Kaj miaj soldatoj, ĉu ili ankoraŭ amas min ?»

«Senĉese ili parolas pri viaj venkoj kaj prononcas vian nomon kun admiro kaj doloro. Sen perfido, ili diras, vi ne estus venkita.»

«Tio estas vera. Marmont perdis sian landon kaj liveris sian princon. Ah !»

Li pugnigis siajn manojn.

«Kaj la politikistoj, kion ili faras ? Talleyrand estas en Vieno por la kongreso. Sed kion faras Fouché ?»

Kion faras Fouché ? Li ofte demandas tion al si mem. El la viroj kiuj ĉirkaŭis lin, li plej interesas lin. Li punis lin, kiel li promesis. Sed tre humile kuŝinte iom da tempo en la polvo, la duko de Otranto pacience laboris por ludi denove politikan rolon. Tiel lerta kompano ! Tiel inteligenta viro certe trovos por si bonan okupon. Napoleono kredis, ke oni sendube revidos lin en la registaro.

«La duko de Otranto estas en Parizo kaj ŝajnas ne voli reveni al la ŝtataferoj.»

«Tio estas stranga. Sendube li atendas sian horon... Verŝajne li ne kredas, ke la Restaŭracio⁴³ longe daŭros. Ĉu vi vidis lin ?»

«Napoleono, vi scias, ke mi ne plu vidis lin dum pluraj jaroj.»

«Estas bone tiel,» diras la imperiestro. «Tiu fripono faris grandan malbonon al ni ambaŭ.»

Tiam li metas la demandon kiun Marie plej multe timas kaj kiun ŝi esperas povi eviti :

«Kie estas la imperiestrino ?»

«En Vieno, Siro, kun ŝia filo.»

Unuafoje en sia vivo Marie mensogas al Napoleono. Ŝi kredas, ke ŝi ŝuldas tiun mensogon al li. Ne ŝia buŝo malkaŝos al li la

⁴³ La reveno de la malnova reĝimo.

sinistran veron. Sed Napoleono insistas. Ĉu li suspektas ion?

«Oni raportis al mi, ke ŝi iris al la banurbo Aix, akompanta de...»

Li hezitas...

«Akompanata de generalo Neipperg, ŝia honora kavaliro.»

Marie subpremis ne percepteblan tremeton.

«Mi aŭdis nenion pri tio, Siro. Kiam mi enŝipiĝis en Livorno, mi aŭdis, ke Ŝia Imperiestra Moŝto anoncis viziton al sia dukejo Parmo.»

«Mi komprenas,» diris Napoleono. «Ŝi certe faras tion por proksimiĝi al mi,» diris Napoleono. «Sed kial ŝi ne respondas al miaj leteroj?»

Profunda kompatu superfortas Marie. Ah! Li ankoraŭ ĉiam havas tiun iluzion! Povu li neniam scii la veron! Kaj ŝi paroladas, paroladas, inventante, laŭ tio ke estas necese kun takto, kun eltrovemo, kun amo !

«La imperiestrino vivas tre retiriĝinta en la palaco de Schönbrunn. Ŝia filo ne forlasas ŝin. Ŝi gardis el siaj servistoj de Francio ĉiujn personojn, kiuj volis resti. La reĝo de Romo estas bela kaj fartas bone. Li estas gaja, aktiva kaj ofte parolas pri vi. Li komencas lerni legi kaj skribi la Germanan lingvon...»

Elokvante ŝi rakontas pri la ludoj de la eta princo. Ŝi parolas pri tiu senkulpa infano prefere ol pri lia patrino. Napoleono, ravita de tiuj detaloj, gravuras ilin en sia memoro. Li ĝuas ilin dum pluraj tagoj...

Kiam Marie eksilentas, li ripetas nur :

«Ĉiuj miaj leteroj restis sen respondo. Ĉu ŝi ne ricevas ilin? Mi plendis pri tio al la grandduko de Toskano, ŝia onklo, sed vane.»

«La Aŭstra registaro interkaptas ŝiajn leterojn : Metternich, kiun vi bone konas kaj kiu malestimas vin, kaj imperiestro Francisko, kiu estas tiel malforta. »

«Do vi kredas, Marie, ke ŝi ankoraŭ ĉiam estas korligita kun mi ?»

«Kiel tio povus esti alimaniere ?»

Kiam ŝi respondas, la voĉo de Marie leĝere tremetas. Sed Napoleono en sia ĝojo tute ne rimarkas tion.

La sufiĉe malhela tendo, fariĝas ankoraŭ pli sombra. La atmosfero estas peza. Subite videblas du mallongaj fulmoj, preskaŭ tuj sekvataj de tondro. Napoleono iras al la pordo. Marie sekvas lin. Nuboj kuras tra la ĉielo. Forta vento igas ĝemi la kastanujojn kaj la korkokverkojn. La maraero, pli sala, pikas en la naztruoj. La unuaj raraj gutoj falas sur la polvon de la vojo,

tiam terenbatiĝas densa, malvarma pluvo. Trempita, Marie premas la skarpon sur siajn ŝultrojn.

Ili reeniras la tendon. Sur la tolo la akvo bruadas kiel frapado de miloj da fingroj.

«Oni dirus, batado de tamburoj,» diras Napoleono.

*
* * *

La vesperon post la manĝo, sidantaj proksime de kandelo, kies flamo trembrilas sur la eta tablo, ili troviĝas solaj en la mizera ĉambro de la Ermitejo, kie Marie devas dormi en per kalko blankita ĉelo sur malbona lito sen kur-tenoj, kun krucifikso kontraŭ la muro ĉirkaŭita per sekaj palmoj.

Napoleono kliniĝas al Marie kaj diras al ŝi tre mallaŭte:

“Kion mi nun konfidas al vi, vi povas ripeti al neniuj. Sed mi devas averti vin : mi intencas reiri al Francio. »

«Ĉu reiri al Francio ?»

«Ĉu vi kredas, ke mi rezignacius, ke mi kontentiĝus per regado en Porte-Ferrajo, post kiam mi regis en Parizo? Marie, mi preferus morti. Sed la vivon ĉi tie mi ne eltenas. Cetere ne estas por mi mem, ke mi volas reaperi sur la scenejo de la mondo. Mi plimaljuniĝis. Mia gloro estas establita, mia nomo vivos, tiel longe ke ekzistos la mondo. Se mi pensus nur pri mi, mi irus al Ameriko por fini miajn tagojn kiel plantisto. Sed mi devas forpreni Francion de tiuj mizeruloj, kiuj malhonoras ĝin, kaj transdoni la kronon al mia filo...»

Marie aŭskultas lin, muta. Ŝia maltrankvileco malaperis do nur dum kelkaj horoj ! Napoleono volas do ĵeti sin sur la ondojn. Kie ili demetos lin ? Sur la tronon aŭ sur la eŝafodon ?

«Mi foriros. Mi ankoraŭ ne sias kiam. La entrepreno estos malfacila. Mi devos prepari ĝin. Mi vidas la danĝerojn, sed ili ne estas super miaj fortoj. Mia fortuna forlasis min dum unu tagon, sed mi povos rekapti ĝin. Mi estas certa pri tio. Mi forlasos la insulon kun mia sabro, miaj Poloj, miaj grenadistoj. Se oni sendos regimentojn kontraŭ mi, mi nudigos mian bruston, kaj ĉiuj soldatoj ĵetos siajn fusilojn teren. Vi scias, mia infano, ke mi povas havi malamikojn inter tiuj marŝaloj kaj ministroj, kiujn min faris, kio ili estas. Ili deziras nur povi trankvile vivi sub la mezepoka sceptro de la Burbonoj. Sed la ĉefoj ne tiel gravas por mi. Nur la amasego de la malgranduloj gravas, kaj mi havas ĝin. Vi mem diris tion. Mi armis ĝin, dum

ĝi ankoraŭ tremetis pro la insultoj de la rojalistoj. Mi havas la popolon, kiun oni volas remeti en la sklavecon de antaŭ la Revolucio. Mi ankoraŭ dubis, sed vi decidigis min. Mi sentas, ke Francio sopiras al mi. Kiam mi tuŝos sian marbordon, mia aglo reprenos sian flugon de sonorilturo al sonoril-turo ĝis la turoj de la Notre-Dame ! »

«Sed, kara Siro,» dolĉe diris Marie, «kiel reagos Eŭropo ? Ĉiuj suverenoj en koalicio estas ankoraŭ kune en Vieno. Iliaj armeoj estas pretaj. Ili ĵetis sin sur vin, kiu ne havos la tempon prepari vin al ilia atako.»

«Ba, la suverenoj ! Se Francio aklamas min, ili pensos dufoje antaŭ ol komenci kontraŭ mi novan militon, kiu estos multekosta kaj riska. Iliaj popoloj ne plu estas tiel obeemaj al ili. La Revolucio subfosis la malnovajn tronojn. Se necese, mi tute faligos ilin. Kaj tiam, la caro estis mia amiko : li povos refariĝi tio. Francisko de Aŭstrio estas mia bopatro. Prusio facile kliniĝos. Sed restas ankoraŭ Anglio, mia eterna kaj nelacigebla malamiko... Sed mi reaperos en la mondo kun tute nova vizaĝo. Mi mirigos ĝin per mia modereco. Mi diros al Eŭropo: “Ĉu vi volas pacon? Bone. Mi nun estas konstitucia monarĥo, kiu respektas ĉiujn akiritajn limojn. Ĉu vi volas militon ? Mi brulos la kontinenton per tiel terura fajro, ke vi ĉiuj pereos en ĝi. Elektu ! » Marie, ne dubu : ĉiuj homoj estas lacaj pro dudek jaroj da milito. Ili certe malantaŭeniĝos antaŭ mal-espera Napoleono...»

Marie kunfaldas la manojn : admiro luktas en ŝi kun timo. Ŝi ĉiam kredis je Napoleono, eĉ kiam li estis venkita. Kial tiu admiro ne venkas sian timon ? Tamen kion ajn ŝi faras, ŝia timo estas pli forta. Si ankoraŭ insistas :

«Ĉu ne estas tro frue por realigi tian projekton ? Se vi atendus...»

«Mi ne plu povas atendi. Mia malgranda armeo enuas ĉi tie kaj malpacientiĝas. Mia trezoro estis malplena. Kaj kiu scias, kio okazos, se mi atendas tro longe? Ĉu Anglo ŝipo ne venos kapti min kaj ekzili min pli for de Francio ? Talleyrand parolis pri la insulo Sankta-Helena !»

«Ĉu Sankta-Helena ?»

«Jes, perdita insuleto en Atlantiko, tre for de la Afrika marbordo. Iri tien signifus la finon de ĉiu espero. Mi trovus tie mian tombon.»

Li eksilentas, krucigas la brakojn antaŭ sia brusto, kaj, klinante la kapon, pensas...

En tiu ĉi momento amo estas malproksima de la koro de tiu eksterordinara ludisto. Lia revo pri

potenco kaj gloro tute rekaptis lin. Marie sentas tion, sed tute ne estas vundita. Ŝi amas lin sufiĉe por kompreni lin.

Li ankoraŭ ĉiam meditas. Ŝi deprenas la kolieron de belegaj perloj, kiu ornamas ŝian kolon. Estas koliero digna je reĝino. Napoleono donis ĝin al ŝi pro la naskiĝo de Aleksandre. Tiam ŝi demetas siajn orajn brasetojn kaj ringojn, gardante nur la harrington, kiun ŝi ricevis de Napoleono, kaj la modestan arĝentan braseton, kiun ŝi ricevis de sia patrino. Fine ŝi metis la oron kaj la perlojn sur la tablon el blanka ligno. Relevante la kapon, Napoleono vidas tion.

«Kion vi faras ? »

«Napoleono, vi bezonas monon, kaj tiuj ĉi juveloj estas neutilaj por mi. Vi donos aliajn pli belajn al mi poste.... »

«Ne, Marie,» diras la imperiestro. «Mi ne volas akcepti tion. Vi estas malriĉa. Mi havas nenion, kion mi povus doni al vi kaj nia filo... »

Sed ŝi rigardas lin kun tia digneco, ke li haltas, surprizita.

«Mia amiko, ĉu vi rifuzas al mi la solan ĝojon, kiu povus konsoli min pro tio, ke mi devas forlasi vin nun? Tiu ĉi momento estos la plej kara memoro de mia vivo, la plej bela heritaĵo por nia filo...»

En tiu minuto iliaj koroj estas estas tiel proksimaj unu de la alia, kiel eblas inter viro kaj virino. Estas unika momento, en kiu iliaj animoj kunfandiĝas. Li stariĝas, ricevas ŝin inter siaj brakoj kaj kisas la blondan kapon, sur kiu fluas liaj larmoj.

«Mi akceptas, Marie.»

Dum momento ili ne povas paroli. Tiam li interrompas la ĉirkaŭbrakon.

«Iru ripozi nun, Marie. La tago estis laciga. Ridetu al mi. Ne rigardu min per tiaj okuloj. Mi ne volas vidi vin malĝoja. Se vi scius, kiom mi envias vin. Vi revidos Fancion antaŭ mi ! Atendu min tie, Marie !»

Sen ia dubo ŝi atendas lin tie. Dum ŝia tuta vivo ŝi atendis. Ŝi atendis liajn vizitojn, ŝi atendis lian infanon, ŝi atendis la liberigon de sia patrio. Tenera, maltrankvila kaj fidela, ŝi denove atendas lin.

Sur la sojlo li karesas ŝiajn harojn.

«Marie, mia eta Marie, timu nenion. Ni havos ankoraŭ multajn belajn jarojn !»

Multajn belajn jarojn! Tiel proksima de la aventuro, en kiun li lanĉos sin, Marie sentas forflui la esperon el sia koro. Kion ajn ŝi faras, la ombro sur ŝia frunto densiĝas. Kiu scias ? En tiu ĉi momento ŝi eble jam havas la malhelan

antaŭsenton, ke ŝia vivo baldaŭ finiĝos. Efektive, apenaŭ tri jaroj poste, ŝi ne plu estos inter la vivantoj.

Kaj li, kiun ŝi tiom amis, fidele servis kaj ĉiam pardonis, kie li estis nur unu jaron poste? Post nur kelkaj monatoj de ekzilo sur Elbo li efektive revenis al Francio kaj estis entuziasme akceptita tie. Cent tagoj poste, en junio 1815 Waterloo nenigis lian revon. Li mortis sur la insulo Sankta-Helena en 1821.